

eLIBRO

Sten Bergman

Tra sovaĝa Kamĉatko



INKO

Sten Bergman
TRA SOVAĜA KAMĈATKO

El la sveda tradukis
Birger Gerdman

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-076-7

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

FEBRUARO 2001

Antaŭparolo

Ĉi tiu libro enhavas popularan priskribon pri vintraj veturoj tra Kamĉatko, kiujn entreprenis ekspedicio, kiu dum la jaroj 1920-22 estis en tiu malproksima siberia duoninsulo por sciencaj esploroj.

En la libro la leganto konatiĝos kun multaj strangaj gentoj, kiuj vivas primitivan vivon kiel ĉasistoj, fiŝkaptistoj aŭ boacbredantoj en la sovaĝaj regionoj de Kamĉatko. Plue kun tiuj ŝanĝaj aventuroj, kiujn renkontas vojaĝanto en tiu lando, kie la naturo estas severa kaj negastama sed la homoj gastamaj kaj afablaj.

En akraj neĝoŝtormoj kaj malvarmego nia forto estis ĝisekstreme provata, sed ĉiuj mirindaj travivaĵoj inter homoj kaj bestoj kaj la studoj, kiujn ni havis okazon fari, riĉe rekompencis nin pro nia penado kaj igis nin facile forgesi ĝin. Tiuj travivaĵoj ankaŭ donis al ni memorojn por la tuta vivo, kiuj neniam paliĝos.

Ĉi tiu libro, kiu nun aperas en Esperanto, jam antaŭe estas tradukita en 11 lingvojn. La aŭtoro esperas, ke pere de la mondlingvo Esperanto ĝi nun atingos multajn novajn legantojn en diversaj partoj de la mondo.

Stockholm en februaro 1932

Sten Bergman

Adiaŭ al la civilizacio

Post kelksemajna restado en Tokio kaj Yokohama, dum kiu ni per helpo de la sveda legacio ordigis la diplomatajn formalaĵojn, kiuj estis necesaj antaŭ la ekvojaĝo al Kamĉatko, kaj kompletigis la lastan parton de la ekipo, ni ekiris al la havenurbo Hakodate en norda Japanio. De tie eliras la plej multaj japanaj ŝipoj al Kamĉatko, kaj preskaŭ ĉiuj rusaj haltas en tiu loko.

Ni jam estis en Hakodate iom pli ol unu semajnon. La ŝancoj baldaŭ trovi ŝipon al Kamĉatko ŝajnis tre malfavoraj. En la haveno ja kuŝis kvarmasta skuno, kiu estis irona al iu loko ĉe la nordorienta bordo de Kamĉatko. Ĝia posedanto ne estis malinklina albor-digi en Petropavlovsk kun ni, sed li postulis fabele altan sumon kiel rekompencon. Tamen post kelktaga diskutado li fariĝis iom pli prudenta. Ni decidis veturi sur la rodon por pli detale ekzameni la ŝipon. Dum japano padelis nin al la skuno, alvenis malgranda ŝipo, kiu vekis nian atenton. Ĝi estis eleganta ŝipeto kun ruĝa flago en la poŭpo. Ni eksciis de japano el niaj akompanantoj, ke ĝi venis de Vladivostok kaj verŝajne iros al Kamĉatko.

Ni tuj ŝanĝis la direkton kaj igis la japanon padeli nin al la nova ŝipo anstataŭ al la skuno. Ni eksciis de la ŝipestro, ke la ŝipo estas "Kommandor Bering", armita inspekta ŝipo de la soveta registaro kaj iros rekte al Petropavlovsk en Kamĉatko.

Je mia demando ĉu ses svedoj rajtas kunvojaĝi, li ne povis doni certan respondon, sed li deklaris, ke ĉiuj lokoj estas okupitaj, ankaŭ ĉiuj benkoj kaj planklokoj, sed tre afable li sciigis, ke eble restus iu

dormloko sub la manĝeja tablo kaj kredeble ankaŭ en iu savboato.

Eksciinte, ke ni tre deziras ricevi permeson vojaĝi per tiu ŝipo, li deklaris, ke li mem havas nenion kontraŭ tio, sed estas sinjoro nomata Volovnikoff, kiu devas decidi pri la afero. Li surbordiĝis kaj ne estis renkontebla. Nur je la 7-a horo vespere ni sukcesis trovi lin, kaj li ne nur donis al ni permeson kunvojaĝi, sed ankaŭ konsentis, ke ni havu senpagan vojaĝon kaj senpagan transporton de tiom el nia ekipaĵo, kiom havos lokon. Je la 12-a h. noktomeze la ŝipo estis ekironta al Kamĉatko.

Mi ne bezonas mencii, ke estis varmegaj horoj por ni. Nia tuta ekipaĵo, ĉ. 150 kestegoj, sin trovis en la doganaj magazenoj, kiuj estis fermitaj por tiu tago. Ni devis lui pramojn por transporti la kestegojn al la vaporŝipo, kiu kuŝis malproksime sur la rodo, kaj multege da kulioj estis dungitaj por la krudlaboro. La leganto povas imagi, kiel estis por ni, se mi rakontas, ke nia pakaĵo kuŝis plej interne de la dogana magazeno, ke oni antaŭ ĝi amasigis ferfandaĵojn preskaŭ ĝis la plafono, ke ni devis uzi stĉarinajn kandelojn por elserĉi, kion ni bezonis, ĉar la elektra lumo ne funkciis, kaj ke fine la kulioj strikis en la plej kriza momento kaj tute simple iris hejmen.

Dek minutojn antaŭ la 12-a h. tamen ĉio estis enŝipigita, kio havis lokon, kaj estis feliĉe por ni, ke ne estis loko por la tuta pakaĵo. La restaĵo estis ironta per la sekva ŝipo. Japano, kiu akompanis nin kiel hundo dum la antaŭaj tagoj kaj gajnis nian plenan fidon, ricevis la komision Pluensendi niajn ceterajn kestegojn. Li tiel bone ludis sian rolon, ke li havis larmojn en la okuloj, kiam li disiĝis de ni ĉirkaŭ la noktomezo. Tiom dolora la adiaŭo estis por li. Poste li montriĝis unu el la plej grandaj friponoj de la mondo.

Kiam "Kommandor Bering" en la stelklara nokto levis la ankron kaj en plej rava lunlumo direktiĝis norden, ni ne tre suspektis, ke la eleganta ŝipeto ekiris por sia lasta veturo en tiuj ŝtormplenaj ma-

roj. Grava estis por ni la momento, kiam ni nun forlasis Japanion, ĉar per tio ni ankaŭ diris adiaŭ al la civilizita mondo por tempo de tri someroj kaj du vintroj. Mi memoras, ke mi longe staradis sur la ferdeko en tiu nokto kaj vidis, kiel malrapide foriĝis la lumoj de Japanio kaj de la civilizacio. La pensoj flugis al la granda nekonataĵo tie norde, sed ankaŭ hejmen al patrino, patro, gefratoj kaj al multaj amikoj.

Laŭ sciigo ni alvenos al Petropavlovsk post ses tagoj. La ŝipo estis provizita per du kanonoj kaj kunportis kun pasaĝeroj kaj ŝipanaro, 53 homojn, ĉiuj rusoj krom ni.

Diverskolora aro da homoj estis surŝipe. La plej multaj estis partoprenintaj la militon, kaj kiam ili rakontis siajn sortojn, oni komprenis, ke estas viroj, kiuj pli ol unu fojon rigardis al la morto en la vizaĝon. Jen sidis juna soldato kun la Georga kruco sur la brusto, jen armeaviadisto en sia uniformo, kaj en anguleto ripozis maljunulo ĉirkaŭita de kelkaj malpuraj kunligaĵoj. Li estis survoje hejmen al Petropavlovsk kaj volvis sian cigaredon, dum li rigarde sekvis la flugadon de la marbirdoj ĉirkaŭ la ŝipo. Ĉiuj venis el Vladivostok kiel plej proksima loko, kie ankoraŭ sonis la pafilaj klakoj post la lasta revolucio, kaj ĉiuj sopiris al la trankvilo kaj kvieto en Kamĉatko.

Unu tago pasis post la alia, dum ni veturis laŭlonge de la neĝokovrita vulkaninsuloj de la Kuriloj, kaj ni sentis, kiel la aero plimalvarmiĝis je ĉiu tago. Balenoj nin akompanis dum horoj kaj de temp' al tempo naĝis tute apud la ŝipo.

Kiam ni atingis unu el la lastaj Kurilinsuloj, la estraro de la ŝipo faris decidon fatalan. La ŝipo, anstataŭ iri rekte al Petropavlovsk, flankeniru en la Oĥotskan maron kaj sekvu la okcidentan marbordon de Kamĉatko kelkan distancon por rigardi, ĉu iuj eksterlandaj

ŝipoj sin trovas najbare de Kabo Lopatka, kie aliro estis malpermesita.

Oni pretigis la kanonojn, kaj "Kommandor Bering" plenvapore eniris en la glacikelon de la Oĥotska maro. La lanternoj estis estingitaj, kaj sur la ŝipo regis militema sento. La rusoj frotis la manojn pro ekstazo, ke ili en la matenkrepusko eble povos kapti iun skunon. Malvarma kaj kruda nebulo envolvis ĉion. Falis la mallumo, kaj ni ekkuŝis por dormi. Sed estis malvarme kaj malmole en la negetigita savboato, kie mia edzino kaj mi havis nian kajuton.

La postan matenon je la 6-a h. kaj duono nin vekis terura brukraĵo. Mi eksaltis pro la puŝego kaj en la unua momento mi kredis, ke la kanonoj estis en aktiveco. Du novaj puŝegoj, unu tuj post la alia, tamen tuj konvinkis min pri la seriozeco de la momento.

La ŝipo suriris subakvan rokon. Ĉiuj surŝipe kuregis sur la ferdekon, kie estiĝis konfuzo ĝenerala. La akvo komencis verŝiĝi en maŝinojn kaj holdon. Ĉe la terura kolizio kontraŭ la rokoj tiuj evidente disŝiris la ŝipfundon. La ŝipestro ordonis al la ŝipanoj, ke ili elmetu la savboatojn. "Kommandor Bering" komencis pleniĝi je akvo kaj devis esti forlasata. "Al la savboatoj", sonis la komandokrioj.

Ĉiu provis rapidege kolekti siajn plej valorajn posedaĵojn, kaj ekestis terura kurado surŝipe. Kompreneble ni unue devis pensi pri savo de ĉiu homvivo, sed estis dolore forlasi nian altvaloran ekipon.

Feliĉe estis nur kvin kilometroj al tero — la sudokcidenta marbordo de Kamĉatko. Kiam la boatoj estis plenigitaj de homoj, kunligaĵoj kaj valizoj, ili ekiris al la bordo. La malgrandaj savboatoj fakte saltis sur la ondoj, kaj la akvo plene tramalsekigis nin. Iom post iom ni atingis la teron, kaj jen ni nun staris sur la bordo de Kamĉatko, nia sopirita celo — kiel ŝiprompiĝuloj.

La marbordo estis kalva kaj tute senarba. Grandaj neĝamasoj

atingis ĝis la akvo, kvankam estis la 14. junio. Ligna kruco sur la tundro atestis, ke ni ne estas la unuaj sur la loko.

La savboatoj nun faris novan veturon al la ŝipo kaj alportis la reston da pasaĝeroj. La ŝipestro kaj kelkaj ŝipanoj daŭre restis, kaj la savboatoj faris trian veturon tien. Tre feliĉe unu el ili estis provizita per motoro, kaj ĝi posttrenis la aliajn. Alie certe estus tre malfacile ree atingi la ŝipon, ĉar la vento estis rekte kontraŭa. Kiam la motorboato je la tria fojo atingis la bordon, la ŝipestro ordonis al ni alveni al la ŝipo, por elekti nian plej valoran ŝarĝon.



"Kommandor Bering" post la akcidento en la Oĥotska maro

Kiam ni alvenis al "Kommandor Bering" la akvo jam leviĝis alte en la maŝinejo kaj en la malmultaj kajutoj, kaj la ŝipo komencis kuŝiĝi flanken. La elekto de la plej valoraj kaj plej gravaj kestegoj estis tre malfacila, ĉar nia tuta ŝarĝo en la ŝipo ja estis elekto el la

plej gravaj partoj de nia ekipo. La malpli gravaj kuŝis en Hakodate atendante la sekvontan ŝipon.

Tragedia estis la reduktado. Ni devis elpreni ĉ. dek kestegojn kaj tio devis iri rapide. Ni elektis tiujn dek kestegojn, en kiuj estis pakita la plej grava parto de la scienca ekipo. Oni konsilis al ni treni tiujn kestegojn sur la antaŭan ferdekon. De tie ili estis mallevotaj en la savboatojn. Kiam ni sukcesis altreni tien ok kestegojn kaj estis alrulantaj la naŭan, ni estis interrompitaj de la krioj: "Al la savboatoj! La ŝipo subakviĝas!" Ni povis nenion fari sed lasi la kestegon kaj forkuri trans la ŝiprandon. La akvo tiom altiĝis en ĉiuj ĉambroj, ke la ŝipo ŝanĝis la ekvilibron, ĉar ĝi komencis ruliĝi al unu flanko. Ni timis, ke ĝi kiam ajn povus renversiĝi tute kaj kuntirus nin en la profundon. Kun malĝojo en la koro ni devis forlasi "Kommandor Bering" ne savinte pli ol kelkajn rapide elserĉitajn valorajojn, ekz. mikroskopon, kelkajn meteorologiajn instrumentojn, kelkajn armilojn kaj kamerojn. La ŝipestro tamen deklaris, ke li kredas, ke la ŝipo restos kuŝanta sur la roko ĝis la sekvonta tago, kondiĉe ke ne komenciĝos ŝtormo.

Kiam ni revenis al la bordo, komencis vesperiĝi. Sur la dezerta bordo sin trovis 50 ŝiprompiĝuloj, ĉirkaŭitaj de entukpakaĵoj, kestoj kaj valizoj. Preskaŭ ĉiu viro ankaŭ havis pafilon, ĉar tio estas nepre necesa apartenaĵo en Kamĉatko. Ĉiujn tendojn kaj gudrotukojn, troviĝantajn surŝipe, oni savis, kaj baldaŭ ili estis starigitaj kaj etenditaj, kaj ĉiu aranĝis al si kiel eble plej bone. Pli nekomfortan lokon, ol estas la sudokcidenta marbordo de Kamĉatko, oni apenaŭ povus trovi interne de la duoninsulo. Ŝtormo, pluvo kaj nebulo havas tie hejmon.

Dum la venonta nokto la sorto de la ekspedicio estis decidota. Ne trankvile malfrue vespere ni ekkuŝis por ripozi sur malseka tero aŭskultante la frapadon de la pluvo sur la tenda tuko. Kun eĉ pli

granda maltrankvilo ni aŭdis la muĝadon de la vento, kaj ŝajnis al ni, ke ĝi alterne plifortiĝas kaj malfortiĝas. Ke neniu el la partoprenantoj de la Sveda Kamĉatka Ekspedicio iom menciinde dormis, estas memkompreneble. Ni nur atendis la mateniĝon, kiam la savlaboro estis daŭrigota — se restus io por savi. Mi mem estis eksterre plurfoje dum la nokto por provi esplori tra la duonmallumo, ĉu la ŝipo restas, sed nebulo kaj pluvo malhelpis al mi ion vidi.

Kiam la nokto fine komencis cedi al la tago, oni ankoraŭ povis distingi la ŝipon, kiu daŭre kuŝis sur la roko. Ankoraŭ do estis espero. Post nelonga tempo ĉiuj estis pretaj por la savado.

Estis malvarma kaj malagrabla junimatenato, kiam ni ekiris al "Kommandor Bering". Sur la ŝipo nin renkontis tragedia vidaĵo. La tuta malantaŭo de la ŝipo estis subakviĝinta kaj kun ĝi ĉ. 30 kestegoj, kiuj apartenis al la ekspedicio. El tiuj ni sukcesis elserĉi dek, kiuj danke ke ili estas kovritaj per zinko kaj lute fermitaj, ne menciinde difektiĝis per la akvo. Ĉirkaŭ 20 kestegoj estis malaperintaj. Tiuj ok, kiujn ni metis sur la antaŭan ferdekon, ankoraŭ staris tie. Do ni nur povis savi tion, kio restis. Ni plensarĝis la savboatojn, kaj la direktisto prizorgis, ke ĉio venis sur la bordon.

Kiam ni surbordiĝis, unu el la rusoj renkontis nin kun la ĝojiga informo, ke kvin el la perditaj kestegoj alnaĝis al la bordo kelkajn kilometrojn de la tendejo. Ĉar la vento estis alborda dum la nokto. Ni nun entreprenis promenadon laŭ la bordo kaj efektive trovis kvin kestegojn kun bluaj-flavaj strioj kaj laŭ la ekstero nedifektitajn. Oni ankoraŭ povis klare legi la stampitan adreson: "Swedish Scientific Kamtchatka Expedition" (Sveda Scienca Kamĉatka Ekspedicio). Ili lokiĝis kun nur kelkmetra interspaco sur la sablobordo. Ili prezentis vere strangan vidaĵon, kie ili kuŝis, kaj pakante ilin en Stockholm ni apenaŭ pensis, ke la ondoj de la Oĥotska maro prizorgos ilian albordiĝon al Kamĉatko. Je pli detala prikalkulo montriĝis, ke

15 kestegoj estis tute perditaj. Nun ni komencis studi la listojn pri la enhavo. Unu momenton oni aŭdis ekkrion pro ĝojo, ke tiu aŭ tiu objekto estas savita, alian momenton pro malĝojo pri iu nekompensebla aĵo, kiu perdiĝis.

La plej gravaj perditaj objektoj estis la jenaj: la ekspedicia medikamentujo, la stoko de fotografaj plakoj, kiu estis tre granda kaj zorge elektita, ĉiuj kinematografaj filmoj, $\frac{3}{4}$ de la municia provizo, kelkaj armiloj, unu kamero, granda parto de la vesta ekipo krom sennombraj etaĵoj de granda valoro dum ekspedicio.



Nia loĝejo, post la ŝiprompiĝo. (Fotis la aŭtoro)

Nun necesis iamaniere akiri helpon. Oni ekbruligis grandan signalfajron kaj hisis alarmflagojn. Skuno montriĝis ĉe la horizonto sed ne rimarkis nin. La duan tagon ni ekvidis novan skunon, sed ankaŭ

ĝi iris en alia direkto. Tiam oni decidis, ke oni provu atingi ĝin per la motorboato. Oni hisis alarmflagon sur ĝi, kaj ĝi forrapidis plenumaŝine, sekvate de interesataj okuloj.

La ĝojo estis granda, kiam la skuno subite ŝanĝis direkton kaj renkontis la motorboaton. La skuno, malgranda rusa dumastulo, estis survoje al iu loko kun la nomo Kambolnaja ĉe la okcidenta marbordo de Kamĉatko, sed estis ema tuj reveni de tie por venigi tiom da pasaĝeroj, kiom ĝi povis enhavi, sed neniom da pakaĵo. La ŝipestro supozis reveni post tri-kvar tagoj. Venis la kvara, kvina, sesa kaj sepa tago sed neniu skuno. Poste ni eksciis, ke ankaŭ tiu ŝipo surfundiĝis.

Dum la tempo de la atendo unue necesis vivteni nin. Kelkaj sakoĵ da faruno estis savitaj el la provizo de la ŝipo kaj multe da aliaj manĝeblaĵoj, kaj ni havis unu keston da kekso kaj unu keston da malmola pano krom iom da avengrioj kaj kondensita lakto. Sed la tendejo konsistis el 53 homoj, kiuj ĉiuj estis dotitaj per bona apetito. Por kompletigi la malfeliĉon ni albordiĝis ĉe la senarba, je ĉasaĵo malriĉa sudpinto tute apud Kabo Lopatka. Nur ekzistis fokoj kaj marbirdoj en la maro kaj kelkaj marmotoj sur la tero sed ĉio avare krom fokoj, kiuj tamen estis malfacile alporteblaj, post kiam ili estis pafitaj.

Kun bona apetito ni manĝis viandon el foko, kormorano* kaj marmoto kaj disporciigis zorge keksojn kaj malmolan panon, kiuj dank'al la bonega lutfermado de la kestegoj estis sendifektaj kaj ĉiutage estis laŭdataj. Efektive ni suferis nenian mizeron, kvankam ni devis rezigni ĉiun pretendon pri sekaj vestoj kaj ŝuoj. Iom pli bone estis, kiam ni per la kestegoj konstruis dometon, kiun ni kal-fatris per musko.

La malgranda rusa-sveda kolonio aspektis sufiĉe stranga je dis-

* Vidu la vortklarigojn fine de la libro!

tanco. La tendaro konsistis el deko da tendoj, kaj super la tendo de la bolŝevika komisaro Volovnikoff flirtis la ruĝa sovetflago, sur kiu oni povis legi: "Vivu la demokrata respubliko!" La tendeja vivo cetero estis tre interesa. Ni kune dividis dolĉon kaj maldolĉon. Ni pruntis manĝaĵon unu de la alia, faris ekskursojn kune, vizitis nin reciproke en la tendoj kaj faris ĉion tiel agrabla, kiel permesis la cirkonstancoj. La ŝiphundo, kiu estis sur la ŝipo de kiam oni surakvigis ĝin antaŭ 15 jaroj, kaj tri porketoj, kiuj, metitaj en sakon, estis ĵetitaj en la savboaton, kaj nun rajtis iri tute liberaj, kontribuis por gajigi la humoron. Ĉiu tendo havis sian propran fajron, kaj tie oni kuiris la manĝaĵon kaj varmigis sin, kiam estis malvarme, ĉar kvankam estis somermezo, la neĝo tamen ankoraŭ kuŝis kelkajn metrojn de la tendejoj.

Preskaŭ ĉiuj rusoj estis bolŝevikoj, sed je ilia honoro mi devas diri, ke mi neniam kredis, ke bolŝevikoj povas esti tiel afablaj homoj. Inter la ŝipanoj ja ekzistis malbonaj elementoj, sed neniu iel ofendis nin, se oni esceptas kelkajn noktajn ekspropiadojn je municio kaj konservaĵoj.

Post ok tagoj ekvidiĝis fumo ĉe la horizonto. Do estis vaporŝipo, kaj nun estis necese akiri interkomunikon. Ni ekbruligis grandajn signalfajrojn el drivligno kaj musko, sed sur la ŝipo, kiu estis tre malproksima, oni nenion rimarkis. Tiam mi decidis, ke la motorboato elveturu sur la maron kun alarmflago ĉe la pruo en espero, ke ĝi estos ekvidata. Kun treege streĉa atento ĝin sekvis multaj okuloj kaj granda estis la ĝojo, kiam la granda vaporŝipo subite ŝanĝis direkton kaj aliris la malgrandan boaton. La du ŝipoj renkontiĝis tie ekstere. Japana komerca ŝipo estis. La japanoj estis ĝentilaj kaj afablaj, sed ne povis kunporti la ŝiprompiĝulojn al Petropavlovsk. Anstataŭe ili promesis provi nin savi en alia maniero.



Ni forlasas Kabon Lopatka sur la japanaj torpedŝipoj. (Fotis la aŭtoro)

La ŝipo havis senfadenan telegrafon kaj la japanoj kredis, ke okaze sin trovus kelkaj japanaj militŝipoj en la Oĥotska maro. Se tiel estus, ili povus garantii, ke tiuj militŝipoj tuj venus por nin savi. Ili promesis provi interkomunikiĝi kun la militŝipoj.

Do ni returneniris kaj daŭrigis nian vivadon sur la dezerta bordo esperante, ke iu militŝipo venos por nin savi.

Post du tagoj aŭdiĝis de sur la nebula maro fajfegantaj sirensonoj, kaj kiam la nebulo tuj poste maldensiĝis, ni ekvidis du ekstreme mallarĝajn kaj elegantajn torpedŝipojn, kiuj kuŝis ĉe ankro iom ekster la ŝipruino. La japanaj oficistoj estis treege afablaj kaj nun proponis surŝipigi ĉiujn ŝiprompiĝulojn, sed nur malmulte da pakaĵo pro nesufiĉa loko. Ni tamen sukcesis kunpreni ĉiujn niajn apartenaĵojn, kaj en la Nokto de Sankta Johano ni suriris la du milit-

ŝipojn, kiuj kun granda zorgemo navigaciis al la Pacifiko. Baldaŭ la du torpedŝipoj kuniĝis kun ankoraŭ du, kaj poste ĉiuj kvar ŝipoj sekvis en vico la rokplenan orientan marbordon de Kamĉatko, ĝis ili post unu tagnokto ennaĝis en Avaĉan Golfon.



La rokplena sudorienta marbordo. (Fotis la aŭtoro)

Baldaŭ ekvidiĝis Petropavlovsk, la celo de nia longa veturo. Mi ne volas nei, ke estis iom stranga sento nun per propraj okuloj vidi tiun lokon, kiun mi tiom multfoje rigardis sur karto kaj opiniis kuŝanta ĉe la fino de la mondo.

Estis kvazaŭ veni en paradizon, kiam oni vidis la verdajn kaj abundajn betularbarojn, kiuj kovris la valojn kaj la montdeklivojn. La neĝkovritaj vulkanoj tamen estis envolvitaj de densa nebulo.

Baldaŭ ni ĵetis ankron sur la rodo en Petropavlovsk, la ĉefurbo de Kamĉatko kaj la estonta elirpunkto de niaj esploraj ekskursoj en la lando.

Petropavlovsk, la ĉefurbo de Kamĉatko

Jam antaŭ ol ni surbordiĝis, nin atingis la sciigo, ke la kvarmasta skuno en Hakodate, per kiu ni preskaŭ veturis, eksplodis kaj subakviĝis, ĝuste kiam ĝi ekiris al Kamĉatko. Ĉiuj homoj pereis. Nun ŝajnis al ni, ke ni havis grandiozan feliĉon, kiuj suferis ŝiprompiĝon kun "Kommandor Bering" anstataŭ ekflugi en la aeron kun la skuno.

La ruĝa registaro, reprezentata de la poliestro, aperis sur la torpedŝipoj kaj donis al ni permeson surbordiĝi. Do japanaj maristoj remveturigis nin al la bordo, kaj je la dua fojo ni suriris la bordon de Kamĉatko. Ni komence faris promenadon laŭ la ĉefstrato. La domoj ĝenerale estis unuetaĝaj domoj el ligno kaj nekolorigitaj kun tegmento el ondumita lado. Diversaj vendejoj sen abundo je varoj borderis la straton. La plej multaj estis ĉinaj.

En la strato maldense iris homoj. La rusa lingvo tranĉis niajn orelojn, miksitaj kun ĉina kaj japana. Ĉiuj homoj haltis kaj gapis al ni kaj ŝajnis treege mirigitaj vidante nin. Malplena ĉaro bruante alruliĝis tirata de ĉevalo kun la tipa rusa granda lignarko super la jungilo. La veturigisto nepre devis haltigi la ĉaron por rigardi. Verŝajne ni aspektis senmezure strangaj. Sed eble aro da kamĉatkanoj kaŭzus same grandan sensacion en eŭropa urbeto.

Tiel ni daŭrigis rigardante la urbon, kaj baldaŭ ni jam vidis la plejmulton. Fine ni haltis en la sola kafejo, sesaklasa tia, ĉar ni estis tre malsataj. Tiam ni estis konstatintaj, ke Petropavlovsk estas malgranda simpatia urbeto kun tri stratoj kaj la komenco de la kva-

ra, ke ĝi plejparte estas loĝata de rusoj, ĉinoj, japanoj kaj koreanoj, sed krome de diversaj aliaj popoloj, kiuj ne estis tre facile difineblaj senprezare. Plue, ke la loĝantoj estas tre scivolaj kaj ke neniuj ŝajnas rapidema. Krome, ke porkoj iras liberaj ĉie kaj ke ursidoj promenas ekster kelkaj domoj, kaj diversajn aliajn aferojn.



Petropavlovsk vidata de sur unu el la ĉirkaŭaj montoj. (Fotis René Malaise)

Kelkajn horojn pli poste ni sidis ĉe la ĉina komercisto Sun-in-tun kaj traktis pri luado de iu domo. Ni sukcesis lui la solan liberan domon de la urbo, tute eŭropan konstruaĵon kun kvin ĉambroj kaj kuirejo, kuŝantan ĉe la tria strato kun belega vido al Avaĉa Golfo.

Por kvindek mil rubloj (laŭ tiama kurzo kvindek kronoj) la blankbarba maljunulo Saĥaroff veturtransportis niajn kestegojn, kaj post kiam ni aranĝis lotumadon pri la ĉambroj, ĉiu komencis laŭpove ordigi por si.

La plej grandan ĉambron ni aranĝis je laboratorio kun laborejoj

por preparo de bestoj kaj plantoj, alia ĉambro fariĝis manĝejo, kaj la tri ceteraj fariĝis privataj labor- kaj dormĉambroj. Ni ĉarpentis vigle kaj fervore, kaj ĉiu rigardis kiel honoron aranĝi la ĉambron kiel eble plej plaĉe. Kelkaj portaĵoj da lignotabuloj, kiujn ni sukcesis akiri, baldaŭ estis transformitaj je bretoj, tabloj kaj benkoj, kaj dormetantaj ĉarpentistaj talentoj ekhavis brilajn ŝancojn montrisian efikon. La sinjorinoj kunhelpis laŭ plejebla kapablo kaj zorgis pri la estetika ornamado.

Aranĝante nian domon ni ankaŭ interkonatiĝis kun kelkaj el la eminentuloj de la urbo. Kelkajn el ili, kiuj ludis pli gravan rolon por ni, mi petas permeson prezenti.

La plej grava trovito en tiu rilato estis la pastro de la urbo, bonvestita sinjoro kun longaj haroj, kiu subite atakis nin en plej pura sveda lingvo. Li estis naskita de sveda patrino kaj rusa patro kaj kreskinta en Finnlando. Li fariĝis unu el niaj plej intimaj konatuloj kaj komence li estis valora kiel interpretisto kaj konsilanto. Kun malfalse rusa sincereco li senceremonie regalis nin per granda parto de la historio de sia vivo, kiu estis ekstreme varia. Li renkontiĝis kun Sven Hedin* en Tibeto, vivis dum dek jaroj en Koreo ktp. Li poste rigardis kiel sian naturan devon kaj komision veni al ni preskaŭ ĉiutage por doni al ni resumon de la lastaj skandalaĵoj de la urbo. Li estis helpema kaj afabla kaj volonte kunportis faskon da fiŝoj aŭ ion alian manĝeblan al nia mastrumado kaj reiris de ni kun pake-to da malmola pano, skatoleto kun anĉovoj aŭ io alia.

Li donis al ni multajn utilajn informojn pri la urbo kaj la homoj kies animoj estis pli nigraj ol tiuj de la plej nigraj negroj. Baldaŭ ni sciis, ke la viro, kiu vivis en tiu domo kutimis fanfaroni, ke li murdis tiom kaj tiom da homoj, ke lia najbaro forkuris el Saĥalin, ke tiu kaj tiu gajnis multe da mono je malhonestaj komercoj, ke lia bofrato

* Fama sveda esplorvojaĝanto.

estis ŝtelisto ktp. La resumo de la tuto estis, ke plej multaj urbanoj estis pli malpli grandaj friponoj. Nur malmultaj homoj trovis plaĉon en liaj okuloj.

Alia eminentulo estis la estro de la supera lernejo en Petropavlovsk, kamĉatkano studinta en Tomsk. Li estis inteligenta homo kaj parolis angle bonege. Antaŭ ĉio li havis natursciencajn interesojn kaj fervore sin dediĉis al botaniko kaj kompreneble bone konis la cirkonstancojn de la lando. Li faris al ni plurajn valorajn servojn en diversaj okazoj.



Vintra bildo de Petropavlovsk

Plue troviĝis veterinaro en la urbo, estono, kiu loĝis minimume dek jarojn en Kamĉatko. Lia distrikto ampleksis la tutan Kamĉatkan duoninsulon, la Anadyr-regionon, la Ĉukĉo-duoninsulon, la insulon de Wrangel ktp. Ĝi estis tiel vasta, ke jam je la komenco li komprenis la senesperecon povi fari ian utilon kaj tuj decidis nur vegeti.

Li neniam forlasis Petropavlovsk kaj ne havis laboron dum multaj jaroj, kvankam li estis en ofico kaj akceptis salajron. Li ankaŭ diris, ke li forgesis ĉion, kion li lernis en sia fako. Li parolis germane.

Tiuj tri personoj estis la solaj kun iom da edukiteco, kun kiuj ni pli intime interkonatiĝis dum la unua somero.

Kiel estas videble laŭ la bildo, Petropavlovsk situas sur montdeklivo. Ĉe la ĉefstrato ĉiuj vendejoj estas kolektitaj. Plejparte estas ĉinaj sed ankaŭ kelkaj japanaj kaj rusaj kaj unu amerikana. La lasta, "Seidenberg kaj Wittenberg", estis senkompare la plej riĉe provizita. Tie oni povas aĉeti svedajn Primus-kuirilojn, kaliforniajn fruktokonservaĵojn, japanajn alumetojn kaj plue ĉion, kion oni modere povas pretendi en tia loko, kia Petropavlovsk, kaj multe krom tio.

Ĉe la sama strato kuŝas la poŝt- kaj telegrafoficejo, okupanta ĉ. 15 personojn, kvankam kutime venas nur po du-tri poŝtŝipoj ĉiujare, plue la preĝejo kaj malgrandan distancon de ĝi la Popola domo, kie oni kutimas aranĝi tumultajn politikajn kunvenojn variante kun amuzaj aranĝoj en formo de kino, danco k. a. Se mi plue mencias japanan razejon, mi kredas, ke nenio grava restas en la centro de la urbo. En la orienta parto de la urbo la registarejoj estas lokitaj, ĉiuj konstruitaj en sama stilo, grizkoloraj duetaĝaj domoj kun ladaj tegmentoj. Inter ili oni distingas la domon de la eksguberniestroj, antaŭ kiu kuŝas kelkaj kanonoj.

Iom ekster la urbo en la sama direkto kuŝas la radiostacio, la sola komunikilo kun la ekstera mondo dum la longa vintro. Post ĝi la sovaĝejo daŭriĝas en plej rimarkebla maniero. Nome fariĝas abrupta halto, se oni deziras daŭrigi la promenadon, ĉar tie komenciĝas la "alŝovniko" (*Alnus maximoviczi*), la seninterrompa tapiŝo de densejo, unu el la plagoj de Kamĉatko, tra kiu oni eble povus rampi, se oni ne havas portaĵojn, sed aliokaze devas elhaki sian vojon.

Laŭ la ekstero Petropavlovsk povus esti karakterizata kiel io inter tipa rusa urbeto kaj rapidege konstruita orserĉista urbo en Alasko. Tiu aro da grizaj lignodomoj, el kiuj konsistas la urbo, ŝajnas pli malpli senzorge disŝutitaj ĉirkaŭ la tri stratoj. Esceptante la ĉefstraton, kiu ŝajnas iomete civilizita, oni tie kaj ie ĉe la aliaj stratoj ektrovas domaĉojn kaj kabanojn, kiuj estas kunigitaj el ladskatoloj, lignaĵetoj, malnovaj pantalonoj kaj la plej neimageblaj ingrediencoj. Ili premiĝas pri la loko inter rubejoj kaj terpomkampoj. Se oni eniras en la vestiblon de tia domo post la mallumiĝo, ofte okazas, ke oni falpuŝiĝas je dika porko, antaŭ ol oni trovas tiun, kiun oni serĉas. Rilate la porkojn, ili estas tiel multnombraj en la urbo, ke ili certamaniere karakterizas ĝin. Ĉie ili rajtas iri liberaj kaj devas plejparte vivteni sin mem per vegetaĵoj kaj balaaĵoj. Iam kaj tiam okazas ke iu porko subite malaperas sen postsigno, aŭ en la faŭkon de iu sin elŝirinta sledhundo, aŭ kiel okazis kiam la pastro de la urbo pro pura bonfaremo ektenis malgrandan forkurintan porkidon, kiu grandiĝis tute konvene ĝis Kristnasko.

La akvoliverejo konsistas el kelkaj petolaj montriveretoj kun la plej bongusta akvo, kiuj saltetas malsupren laŭ la monto kaj disbranĉiĝas en multaj fluakvetoj al la diversaj domoj. La serenakvon okaze malklarigas iu porko, al kiu plaĉas kuŝi banante sin en la akvokondukilo dum sunluma antaŭtagmezo, aŭ iu nesolidara urbano, kiu lavas vestojn aŭ metas barelon kun sala salmo por sensaligo en la rivereton supre de la disbranĉiĝo.

En tiu per si mem idilia urbo loĝas iom pli ol milo da homoj. La plej multaj estas rusoj, sed japanoj, ĉinoj kaj koreanoj konsistigas bonan trionon. La du lastaj popolspecoj hakfendas brullignon, alportas akvon kaj faras entute ĉiun pezan laboron en la urbo. Al la rusoj nome ne plaĉas tia laboro. Ĉiu ruso kun ioma memrespekto

tenas ĉinon, sur kiun li povas ŝuti ĉiun pezan kaj penigan laboron. La japanoj en Petropavlovsk plejparte estas komercistoj.

Se al la supre menciitaj popolspecoj krom kelkaj kamĉatkanoj mi aldonas la aluditajn en la komenco de tiu ĉi ĉapitro individuojn el pli malpli malfacile difineblaj rasoj, aleutojn, jakutojn, tatarojn k. c., kiuj prezentas multnuncan miksaĵon de flavo kaj blanko, jen la loĝantaro de la urbo estas kompleta.

Kontraste al la orserĉista urbo en Alasko, kie energio kaj senripoza laborado metas signon sur la vivon, kuŝas super ĉi tiu eta norda loko kvazaŭ vualo de nenionfarado, mallaboremo kaj senvigleco. La tempo ĉi tie havas nenian valoron. Kion oni ne faras hodiaŭ, oni same bone faros morgaŭ aŭ postmorgaŭ aŭ venontjare. Ĝuste tio estas la danĝero por eŭropano. Malrapide sed neeviteble li malvigliĝas pli kaj pli je ĉiu jaro. Mi kredas, ke homo loĝinta en Kamĉatko dum dek jaroj estas perdita por la civilizacio kaj maltaŭga por laŭorda laboro.

La rusa loĝantaro en Petropavlovsk estas el tre miksita speco. La karakterizo de la pastro pri ili akordigas al granda parto. Mi tre baldaŭ rimarkis, ke oni prefere ne demandu ilin, pri kio ili sin okupis, antaŭ ol ili venis al Kamĉatko. Ĉar oni povas esti absolute certa pri tio, ke ili ne estas naskitaj en la lando. Anstataŭe ili venis el ĉiuj imageblaj anguletoj de la rusa regno. Oni trovis homojn el Krimeo kaj Astraĥano, el Arĥangelsk kaj Jakutsk, el Leningrado kaj Moskvo kaj el ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de Siberio. Sed de kie ajn ili venis, la saman stampon ili portis. La saman optimistan rigardon al la morgaŭa laborkapablo kaj samajn "niĉevó"-principojn en ĉio, pri kio ili sin okupis. Se oni analizus tiun multspecan popolmaterialon kaj provus apartigi la ŝafojn for de la kaproj, mi timas, ke la plejmulto apartenus al la lastaj. Ĉar certe estas plejparte malbonaj elementoj,

kiuj serĉis sian vojon ĉi tien, inter ili multaj krimuloj forkurintaj el Saĥalin kaj Siberio.

Petropavlovsk, kiu estas la ĉefurbo de Kamĉatko, kiel tia ankaŭ estas la sidejo de la landa registaro. En la bona malnova tempo, t.e. antaŭ la rusa revolucio, guberniestro havis la plej superan potencon. Kiam la ondoj de la revolucio fine atingis tien ĉi, li estis eksigita, kaj bolŝevika komitato estis enoficigita por estri la landon. Tiu komitato do regis en Petropavlovsk, kiam ni alvenis tien. Ĝi portis la gloran nomon "La Kamĉatka Revolucia Komitato", sed malgraŭ tio akceptis nin afable. En la servo de la ruĝa registaro staris kelkaj centoj da oficistoj ĉiaspecaj. La tuto aspektis kiel tuta sistemo de komisionoj de la mondmilita tempo, kie klaketadis skribmaŝinoj kaj troviĝis sekcioj por ĉio. Pri kio ili cetere amuzis sin en tiuj sekcioj, mi ne scias kaj ankaŭ ne havis emon esplori tion.

Por konservi la ordon en la urbo ekzistas polica korpuso kun ĉ. dekdu membroj. Kelkaj el tiuj ĉiam iris postene en la ĉefstrato. Ili vere aspektis tre respektindaj kun siaj grandaj sabroj, revolveroj kaj ruĝaj zonoj. Ilia plej grava komisiono ŝajne estis konfiski por propra konsumo alkoholon sur tiuj rusaj ŝipoj, kiuj alvenis. Povis esti sukcesaj kaptoj je centoj da litroj sur unu sola ŝipo, sekve la ofico kiel policano certe estis tre aspirinda.

Al la enfluejo de la Kamĉatka rivero

Dum la restanta parto de la somero ni entreprenis ekskursojn en diversaj direktoj tra la regionoj ĉirkaŭ Petropavlovsk, studadis la bestaran kaj la plantaran regnojn kaj faris kolektojn. Ĉar ĉiu el ni havis sian specialan taskon, ni dividis nin dum la vojaĝoj en apartajn partiojn, kaj tiel okazis, ke mia edzino, mi kaj Ernst Hedström en la aŭtuno forlasis Petropavlovsk per ŝipo por veturi nor-den kaj dum monato studi la bestaran vivon en la delta lando ĉe la enfluejo de la plej granda rivero de Kamĉatko.



Mia edzino kun kelkaj kamĉatkaj floroj. (Fotis la aŭtoro)

Niaj kamaradoj Eric kaj Elsie Hultén kaj René Malaise ĵus antaŭe startis per motorboato suden al Aĥomten golfo por respektive botanikaj kaj zoologiaj esploroj.

Unue ni estis veturontaj per la rusa militŝipo "Magnét", kiu dum kelka tempo estis kuŝanta en la haveno de Petropavlovsk kaj iron-ta rekte al Ust-Kamĉatsk. Sed la tagon antaŭ la ekiro de la ŝipo, maristo venis kun sciigo de la ŝipestro, ke li ricevis aliajn ordonojn, kiel oni ŝajnigis, kaj ke la ŝipo nun iros al la Komandorinsuloj kaj poste rekte al Vladivostok. Laŭ onidiro la kaŭzo estis tute alia. Granda parto de la ŝipanaro forkuris en Petropavlovsk kaj multaj el la restantoj minacis fari same, se la ŝipestro ne promesis al ili iri tien, kien ili volis, nome al la Komandorinsuloj kaj poste returne al Vladivostok. Li estis devigita cedi al ilia postulo por ne seniĝi je homoj. Belega militŝipo! Sur la Komandorinsuloj estas facile interŝanĝi al si bluvulpajn felojn por alkoholo, el tio la deziro de la ŝipanoj tien veturi.

Ni do estis trompitaj je Magnét. Nia espero nun estis la lasta ŝipo en la jaro, "Jana", ankaŭ ĝi rusa. Kiam ĝi fine alvenis meze de septembro, mi elserĉis la ŝipestron kaj sciigis lin, ke ni deziras veturi per la ŝipo al Ust-Kamĉatsk, kondiĉe ke la ŝipo en la revojaĝo de-nove haltos en tiu loko por venigi nin. Tion la ŝipestro konfirmis per manpremo kaj sia honora vorto kaj ni enŝipiĝis.

La estimata leganto, kiu je vaporŝipaj vojaĝoj alkutimiĝis suriri ĵus kolorŝmiritan kaj elegantan ŝipon, kie regas ordo kaj pureco, ekmirus je la ekvido de tia rusa ŝipo, kiu ennaĝas en la havenon de Petropavlovsk. La tuta ŝipkorpo estas rusta kaj ne kolorŝmirita dum jaroj. La ferdeko estas plenŝarĝita per ĉio inter tero kaj ĉielo. Tie staras fiŝbareloj premiĝantaj kun brasikaj kapoj kaj ajlokestoj. Sen brasiko kaj ajlo ruso nome ne povas vivi longe. Kelkaj malfeliĉaj bovinoj staras ligitaj inter la rubaĵoj, aŭ destinitaj por esti manĝataj

dum la vojaĝo aŭ kunportataj de iu novkulturonto. En la lasta kazo ili estas plej bedaŭrindaj, ĉar ili devas esti sen stalo, eĉ se li travintros ĉe la bordo de la Nordpolusa maro. Porkoj kutime apartenas al la vivanta provianto surŝipe kaj kelkatempe rajtas iri liberaj. Ili ja ne precize kontribuas al la purigado.

Sed ankoraŭ mi ne parolis pri la pasaĝeroj. Tiuj tamen malornamis plej multe. Se oni elektus la plej aĉajn vagabondajn tipojn el la eŭropaj havenkvartaloj, rezultus proksimume tia kolekto da homoj el nekredeble miksita deveno, kiuj interbatalas tie ĉi pri loko, fiŝbarelaj kaj bestaĉoj.

La permesata nombro da pasaĝeroj estis nelimigita, kaj io alia cetere estas neeble en ĉi tiuj regionoj, kiam ankoraŭ iras nur kelkaj malmultaj ŝipoj en ĉiu sezono. Kelkfoje la ŝipestro rifuzas aron da homoj enŝipiĝi. Li deklaras, ke estas plenplene. Tiam ekestas tumulto. La virinoj ploras kaj krias, la viroj blasfemas. La fino estas, ke li elĵetas ŝnurŝtupetaron kaj lasas ilin grimpi la ŝipon, dum benoj kaj blasfemoj tranĉas la aeron. Oni prenas homojn samkvante kiel ordinaran ŝarĝon. Kaj preskaŭ ĉiuj estas vaguloj, kiuj kunportas ĉion, kion ili posedas. Tio tamen ordinare trovas lokon en kelkaj fokfelaj sakoj, la kutimaj valizoj en ĉi tiuj regionoj. Ĉiuj tiaj ferdekaj pasaĝeroj devas mem serĉi al si kuŝejon, kie ili nur povas. Se ekzistas, loko en la holdo, ĝi unue estiĝas okupita, poste venas la savboatoj kaj fine la libera ferdeko. Oni kuŝas kaj dormas kie ajn inter siaj ĉifonoj kaj kunligaĵoj.

Se la ŝipo venas de norde, oni ordinare havas felan sakon, disŝiritan boacan felon aŭ iun ursfelon, sur kiu oni povas kuŝi, se ĝi venas de sude oni devas kontentiĝi je kelkaj sakĉifonaĵoj. Se pluvas oni rampas sub gudrotukon. Kiaj aspektas la necesejoj, pri tio oni ne parolu.

Oni povus kredi, ke la manĝa demando inter tiel multaj homoj

estus iom malfacile aranĝebla. Sed ĝi efektive estas tre simpla. La tuta demando estas solvita, se nur kunestas la tekruĉo. Venante el Vladivostok oni ĉiam kunhavas kelkajn dikajn bulkojn. Iom da ajlo oni ankaŭ ĉiam povas akiri, se oni nur sin tenas en amika rilato kun la ĉinoj en la kuirejo, kaj io plua ne estas necesa.

Tia estas la vivo sur tiuj ŝipoj, kiuj kelkajn fojojn dum la some-ro vizitas ĉi tiujn malproksimajn bordojn. Ili eliras de Vladivostok. Oni facile povas imagi tiun sennoman mizeron, kiu estiĝas, kiam tia ŝipo en nebulo, ventego aŭ mallumo ĵetiĝas sur la rokan kaj malbone kartografitan marbordon, kio okazas ĉiun someron.

Jana ĝuste estis ŝipo el la supre priskribita tipo. Ĝi estis ironta al la Golfo de Barono Korff por venigi homojn kaj fiŝojn laŭlonge de la bordo en tre multaj lokoj. Petropavlovsk estis tia unua haveno de post Vladivostok. Tial ĝi ankoraŭ ne estis tiom plensarĝita, ke ni ne povis akiri lokon en la holdo. Alie ni kutimis specialigi nin pri la savboatoj dum niaj vojaĝoj. Tie oni ordinaro povis aranĝi tre hejmece, kaj krome oni havis avantaĝon ĉe ŝiprompiĝo. En la holdo ni devis loĝi sur breto. Estis proksimume $\frac{3}{4}$ metra alto ĝis la plafono, kiu estas el fero, pri kio oni ricevis doloran memorigon ĉiufoje, kiam oni leviĝis rapide.

Nia akompanantaro tie sube estis amaso da rusoj, sed ankaŭ grupo da ĉinaj kulioj. La lastaj kunestis por servi kiel havenlaboristoj, t. e. por prizorgi la en- kaj elŝarĝadon en la havenoj. Dum tiuj tri tagoj, kiom daŭris la vojaĝo, ni havis okazon studi la du popol-specojn. Estis treege interese.

La rusoj trinkis teon, fumis cigaredojn, diskutis politikon kaj mal-laŭdis Kamĉatkon, kiu povus esti konvena restadejo por sovaĝuloj sed ne por civilizitaj homoj. Ili tamen dormis dum la plejparto de la tago.

La ĉinoj estis la plimulto tie sube. Kiam ili ne estis komanditaj je

iu laboro, ili kutime ludis kartojn. Tiam ili sidis en rondo sur breto kun la kruroj krucigitaj en ĉina maniero. Renversita tino servis kiel ludtablo. Sur ĝi staris stĉarina kandelo. La ludkartoj konsistis el kartonaj slipoj, proksimume du cm. larĝaj kaj dek cm. longaj, sur kiuj estis presitaj ĉinaj signoj. Tujuje nin frapis la mortsimila seriozeco, kiun montris la ludantoj. Grupo de svedaj havenlaboristoj, ludante kartojn, batas la tablon per la pugno, blasfemas kaj diskutadas, ke estas aŭdeble longan distancon. La ĉinoj sidadis silente kaj ŝanĝis siajn kartojn, metis kaj ordigis. Alumetoj verŝajne servis kiel ludmarkoj. Mallaŭte oni interparolis. La plej multaj fumis siajn tipajn pipojn kun malgrandaj kapoj, kiujn ili senĉege plenŝtopis kaj bruligis per la kandelo.

Kiam ili daŭrigis dum duona horo, kelkaj el ili komencis fariĝi laŭtvoĉaj unu al la alia. Kvankam ne komprenante eĉ unu vorton el iliaj diroj, oni ne povis erari pri tio, kion ili opiniis. En momento ĉiuj konfuzo interbabiladis, tiel ke neniu povis aŭdi eĉ unu vorton el la diroj de la alia. Sed tio ne daŭris longe. Unu el ili ekkaptis ĉiujn kartojn, kiuj kuŝis sur la tino, kaj furioze disĵetis ilin en ĉiuj direktoj.

La brulantan kandelon li forĵetis en la holdon. Ĉiuj interatakiĝis kiel aro da koleraj kokoj kaj evidente superŝutis unu la alian per ĉiuj insultaj vortoj de Ĉinio. Sed fariĝis alia ludo. Ruso, sur kies kapon falis la brulanta kandelo, venis furioza kiel furio kaj intermiksiĝis en la ludon. Li provis apartigi la batalantojn por kapti tiun, kiu ĵetis la kandelon, sed li ne sukcesis. Kelkaj aliaj rusoj venis por helpi, sed nur alvokinte la ŝipan subestron, oni per komunaj fortoj sukcesis apartigi la flavulojn. Ne fariĝis plu kartludado en tiu vespero.

Ankaŭ estis interese vidi, kiam la ĉinoj ricevis manĝaĵon. Unu el ili estis iuspeca estro de la aliaj. Kelkajn fojojn dum la tago li venis el la kuirejo kun du grandaj siteloj plenaj de manĝaĵo. Unu ordinare

enhavis rizon, la alia supon. Ĉiu ĉino alvenis kun sia gamelo kaj siaj bastonetoj por plenigo. Kiam ĉiuj kune ensorbis la manĝaĵon, sonis kvazaŭ kiam porkoj manĝas. Oni nur aŭdis unisonan sorbadon. La rizon ili manĝis per la bastonetoj.

Matene ili sin lavis tre zorge kaj la plejmulto brosis la dentojn. Tage ili kunkudris truojn en siaj vestoj aŭ interbabilis, sed supozeble ne pri politiko. Ili ŝajnis feliĉaj kaj kontentaj je la ekzistado kaj ofte ridis.

Dum la vojaĝo al Ust-Kamĉatsk, kiel nomiĝas la loko ĉe la enfluejo de la Kamĉatka rivero, ni dum la tuta tempo tenis nin sufiĉe ekstere sur la maro, tamen ne je pli longa distanco ol ke ni povis vidi la vulkanojn kaj la neĝmontegojn laŭlonge de la marbordo.

Post unu tagnokto ni atingis fiŝkaptan lokon, Semljaĉik, kie haltadis la rusa ŝipo "Tomsk" ŝargante fiŝon. La loko alie estis plej konata pro varma fonto, kiu havas grandan famon povi kuraci sifilison. Tra la tuta jaro homoj restadas tie por bani.

Ŝajnas neeble por du rusaj ŝipoj, kiuj estas dispelitaj, tiel renkontiĝi sen pli intima interrilato. La rusoj estas societemaj homoj. Ĉiu ja havis "snakomi", konatulojn, sur Tomsk. Tio ja devas esti sufiĉa kaŭzo por haltado. Sekve Jana ĵetis ankron apud Tomsk, kaj boatetoj naĝis ripetfoje inter la du ŝipoj. La ŝipestro kaj amasoj da pasaĝeroj transveturis al Tomsk kaj trinkis teon. Neniam mi povus revii, ke ŝipo povus esti tiom plenŝargita per homoj kiel tiu. La homoj staris kiel prempakitaj haringoj sur la ferdeko.

Nur post ses plenaj horoj oni finbabilis kaj Jana levis la ankron. La tempo ne multe valoras ĉi tie malproksime en la sovaĝa Oriento. Sur tiu sveda ŝipo, per kiu ni vojaĝis al Japanio, oni kalkulis ĉiun minuton en la havenoj kaj ĉio iris en febra rapideco.

La proksiman tagon la sensacio por ni estis rigardi la plej grandan vulkanan konuson de la mondo, la senkompare belegan Klu-

ĉevskaja. Ĝi tamen ankoraŭ estis proksimume 150 km malproksima kaj nur estis vidata kvazaŭ en nebulo.

Nur en la mateno de la tria tago la ŝipo ĵetis ankron kelkajn kilometrojn ekster la enfluejo de la granda Kamĉatka rivero. La lando interna estis nuda kaj senarbara — la granda delta lando de la rivero. Per lorno oni povis distingi arojn da grizaj domoj. Kelkloke ankaŭ du-tri fumtubegojn. La grandaj japanaj konservajaj fabrikejoj estis.

La albordiĝo ĉe Ust-Kamĉatsk kaj nevola travintrado

Nur post balanciĝado sur la ondoj dum unu tagnokto kaj duono ekster la rivera enfluejo, la vetero trankviliĝis tiom, ke albordiĝo estus pripensebla. Suriri la bordon en Ust-Kamĉatsk ĉiam estas tre riska entrepreno. La bordo estas tute libera kaj sen ia ajn haveno. La giganta rivero, kiu post kurbiĝanta kaj torenta fluado tra la lando nun larĝa kaj potenca elverŝas sian akvon en la maron de Bering, formas la enirejon al la albordiĝa loko. Internen tra la rivera enfluejo do ni devas iri. Kie la ondoj kaj huloj de la maro renkontas la amasiĝintajn akvojn el interne de la lando, la tuto prezentas vidaĵon de nura bolanta sorĉkaldrono. Kiam la motorboatoj trairos tiun danĝeran lokon, ofte okazas, ke ili ne obeas la direktilon, renversiĝas kaj malaperas kun homoj kaj ĉio en la ondoj.

Jam estis ĉirkaŭ vespero, kiam ni fine kune kun ĉiuj pasaĝeroj kaj entukpakaĵoj surbordigotaj nin trovis en granda pramo, kiu trenata de la motorboato de Jana, direktiĝis al la incitita enfluejo de la rivero. Al ĉiuj homoj oni disdonis naĝan zonon por la trapaso. Kun streĉita sento ni alproksimiĝis al la danĝera punkto. La ondoj estis mallongaj kaj altaj kaj la fluo tre forta. La peza pramo malpliigis la rapidon de la motorboato tiom, ke ĝi nur rampadis antaŭen en la kontraŭfluo. Efektive estis terura situacio dum kiam ni antaŭenklopodis tra la enfluejo de la rivero. Se la motoro haltus, ni certe estus perditaj. Sed la afero iris feliĉe, kaj ni enspiris pro trankviliĝo, kiam ni estis interne sur la rivero. Neniam dum mia vivo mi vidis tiom da

fokoj, kiom en ĉi tiu rivera enfluejo. Ili suprenigis siajn kapojn ĉie kaj scieme rigardis nin.

Sur la suda riverbordo situas la granda vilaĝo Ust-Kamĉatsk. Ĝi konsistas el amasiĝo da grizaj domoj kaj konstruaĉoj krom multege da terkabanoj kaj surfostaj domoj. La tuto faris ekstreme malagrablan impreson, kiun plifortigis tiu amaso da vilaĝanoj, kiuj rapidis al la bordo por renkonti. Efektive ni intencis tendumi sur ĉi tiu flanko de la rivero, sed la ekvido de ĉiuj, kiuj fariĝus niaj najbaroj, kaŭzis, ke ni tuj decidis tendumi sur la alia flanko.

Post kiam la pramo estis senigita je sia enhavo kaj postlasita, ni do per la motorboato transveturis al la alia flanko, kie situas la grandaj konservajaj fabrikejoj. Komencis krepuskiĝi kaj pluvi kaj estis malvarma, neagrabla aŭtuna vespero. Ni elŝarĝis niajn havaĵojn kaj surbordiĝis por serĉi konvenan lokon, kie ni povos konservi ilin. Kelkaj scivolaj homoj kolektiĝis ĉirkaŭ ni, inter ili altkreska kaj dika viro en blua vesto kaj kun ŝraŭbtenilo en la mano. Virbovo minace alproksimiĝis al la societo. "Look out for the bull, Madam!" (Atentu la virbovon, sinjorino) la altkreska viro kriis al mia edzino. Pretigante la vojon por la kolerega virbovo, ni interŝanĝis kelkajn vortojn. "Va fanden hör jag, taler di svenska?" (Diable, kion mi aŭdas, ĉu vi parolas svede?) aŭdiĝis de la bluvesta viro, "Mi nomiĝas Anderson kaj estas el Kristiania (Oslo)". Estis neatendita kaj agrabla surprizo kaj krom tio konatiĝo, per kiu ni havos kaj utilon kaj amuzon.

Anderson nun alvokis kelkajn ĉinojn, kiuj devis prizorgi, ke nia pakaĵo estu metata sub bona gardo dum la nokto, kaj li tuj invitis nin al vespemangŝo en sia domo. Tie ni senprokraste estis prezentataj al sinjorino Anderson, eta bonvola japanino, kiu tuj ricevis ordonon surtabligi ĉiom, kiom kapablis la domo, kaj tio ne estis malmulte, malgraŭ ke la familio vojaĝos al Japanio la sekvontan tagon kaj havis preskaŭ ĉion enpakita.

Kiam Anderson prezentis sian edzinon al ni, li ekskuze aldiris: "Jes, mi ja laciĝis ĉiam manĝi en restoracio, tial mi prenis edzinon. Ŝi kuiras tiel bonan manĝaĵon." Pri tio lasta ni baldaŭ vidis pruvon kaj ni povis konsenti tutkore.

La gesinjoroj Anderson pasigis la somerojn ĉi tie en Ust-Kamĉatsk kaj la vintrojn en Japanio. Anderson tie estis ekde la komenco de la fabrikejoj kaj pririgardis, ke la maŝinoj ne malfunkciu. Li estis iuspeca maŝinestro kaj per daŭra kaj fidela servado li akiris grandan estimon kaj bonajn enspezojn. Li diris, ke li nun ne tre aktive partoprenas la laboron, sed plejparte ĉirkaŭiras kun ŝraŭbtenilo riproĉante siajn japanajn subulojn.

Anderson montriĝis granda ŝercemulo kaj rakontis dum la paso de la vespero pri siaj sortoj kaj spertoj. Li travivis multon kaj i.a. servis kiel maŝinisto dum tri jaroj sur rusaj ŝipoj. Sed li ĉesigis tion. Ŝajnis al li, ke la rusoj estas tro malbonaj maristoj kaj tro ofte "ankras per la kilo". Li trovis, ke la devizo de la rusoj tie ĉi en Kamĉatko estas: "Skóro ni náda" (estas nenia urĝo) kaj "Niĉevó, patóm ..." (ne gravas, poste ...). Bedaŭrinde tiuj esprimoj perdas sian amuzan pinton en la traduko, sed tiuj inter la legantoj, kiuj komprenas la rusan lingvon, certe ŝatos ilin. Pli poste ni povis ĉiel konstati ilian ĝustecon. Ni devis ridi ĝis malsaniĝo dum la vespero je ĉiuj spritaĵoj de Anderson. Pli malfrue en la vespero li komencis deklami kantojn el "Fritjofs saga" (La legendo pri Fritjof)*, kiun li sciis parkere de komenco ĝis fino, kaj li kantis kelkajn svedajn kanzonetojn, kiujn li prezentis kun granda entuziasmo. Bedaŭrinde sinjorino Anderson ne povis taksi la koncerton, sed ni des pli ĝuis.

Nia bona mastro, kiu rigardis nin kiel samlandanojn, nun havigis al ni loĝejon por la nokto kaj la sekvontan tagon li prizorgis ke

* Romantika eposo de la fama sveda poeto Esaias Tegnér (1782-1846).

kelkaj ĉambroj senpage estis metataj je nia dispono por tiu tempo, kiam ni intencis loĝi en Ust-Kamĉatsk.



Gesinjoroj Anderson. (Fotis la aŭtoro)

Feliĉe la vojaĝo de Anderson al Japanio prokrastiĝis kelkajn tagojn pro ventego, kaj ni havis okazon dum ankoraŭ kelkaj vesperoj ĝui lian bonhumoron. Sed kiam kvietiĝis la ventego, Anderson kun edzino iris en pramon, kiu estis trenata al la atendanta japana ŝipo, kaj poste ni neniam plu vidis ilin.

SinJORINO Anderson timegis antaŭ la marvojaĝo, kaj ĝi fariĝis pli terura ol ŝi povis imagi. Post kelkaj tagoj la ŝipo nome dum tifono ĵetiĝis sur iun el la rokaj Kurilinsuloj kun siaj pli ol 500 pasaĝeroj.

Ili tamen havis la unikan feliĉon albordiĝi ĉe insulo, kie la japanoj tute ĵus instalis radiostacion, kaj per helpo de tiu oni alvokis ŝipon, kiu savis ilin post 15 terurplenaj tagnoktoj.



Japana konservaja fabrikejo apud Ust-Kamĉatsk (The Nichiro Co.).

La konservajaj fabrikejoj, kiuj kuŝas sur la norda bordo de la rivero, apartenas al la rusa-japana societo Denbigh & K-io. Ili konsistas el du kompleksoj, situantaj je interspaco de du kilometroj laŭ la marbordo. Ili okupas du milojn da japanaj laboristoj en la somero kaj estas funkciigataj en plej moderna maniero. Sude de la rivero estas plue du gigantaj fabrikejoj je interspaco de 15 kilometroj, nuntempe apartenantaj al la sama japana societo, nome "The Nichiro Co, ankaŭ ili okupantaj du milojn da laboristoj. En la vintro la fabrikejoj estas senhomaj.



Salmoj ĉe la konservaĵa fabrikejo de Denbigh. (Fotis A. Sandberg)

Interne de kelkmejla radio de la rivera enfluejo kreskas neniu arbaro. Tie etendigas marĉa malaltaĵo, distranĉita de sennombraj riverbranĉoj. Granda parto estas nekovrita tundro, la restaĵo maksimume surkreskita de salikaj aŭ alnaj densarbetaĵoj, sed ekzistas neniu efektiva arbo. La granda lago Nerpiĉe Ozero, kiu havas iom salecan akvon kaj estas same granda kiel Avaĉa Golfo, ampleksas grandan parton de la malaltaĵo. Sed ĉiuflanke krom oriente al la maro tiu marĉejo estas limigita de la montegoj, kiuj kuŝas je distanco de 30 ĝis 40 kilometroj, kaj se estas klara vetero, oni vidas Kluĉevskaja je 120-kilometra distanco.

Apud la du grandaj fabrikejoj de Denbigh kuŝas supermoderna kaj tre forta japana senfadena telegrafstacio, finkonstruita kelkajn

semajnojn antaŭ nia alveno. La intenco estas, ke ĝi gardu la japanajn fabrikejojn kontraŭ la bolŝevikoj kaj en okazo de atako dum la vintro ĝi povu alvoki la japanajn militŝipojn, kiuj postenas en Petro-pavlovsk. La pasintan jaron okazis elrabadoj de la flanko de la rusoj, sed nun la japanoj sin sufiĉe armis kontraŭ la eblo de nova rabado.

En tiu interrilato estas menciinde, ke la japanoj post la fino de la rusa-japana milito perforte havigis al si rajton je salmokaptado laŭlonge de la bordoj de Kamĉatko. Tamen ili ne rajtas fiŝkapti en la riveroj, nur en la maro, pro kio la japanoj dungis ruson kiel ĉefon por la fabrikejoj apudriveraj.

Per helpo de Anderson, kiel dirite, ni sukcesis akiri bonegan loĝejon. Ni tuj komencis la ekskursojn kaj kolektadojn. Estis jam en la fino de septembro, kaj ĉio portis la signon de la aŭtuno. Sur la tundro empetroj kaj vakcinioj estis maturiĝintaj, kaj aroj da migrantaj birdoj strekflugis de norde. Sur la tundro restis karadrioj kaj numenioj. Malgrandaj stilzbirdoj diversspecaj loĝadis laŭlonge de la riveraj kaj lagaj bordoj. Krom la mevoj tamen kolimboj kaj anasoj el diversaj specoj estis la plej karakterizaj birdoj. Inter la anasoj la pompa histrioniko estis unu el la plej oftaj.

Ursoj troviĝis apud Nerpiĉe Ozero, je kelkhora vojiro de nia bivakejo. Ni ĉirkaŭvagis vaste sur la tundroj kaj veturis per boato kaj kanoto en la sennombraj riverbranĉoj. La rezulto de niaj esploroj estis kontentiga, kaj ni ĝojis, ke ni ankoraŭ dum kelka tempo havos okazon ekkoni tiun unikan pejzaĝon kaj ĝiajn loĝantojn.

Tiam subite atingis nin la sciigo de la ŝipestro de Jana, kiu haltadis dum du semajnoj por ŝarĝado kaj nun estis preta por ekveturo, ke ni devas tuj surŝipiĝi, ĉar la ŝipo verŝajne ne haltos en Ust-Kamĉatsk dum la reveturo de norde. Ni ricevis la sciigon tuj antaŭ la ekiro de motorboato al la ŝipo kun kelkaj pasaĝeroj. Enpaki ĉiujn

niajn kolektojn en kelkaj minutoj estis neeble. Anstataŭe mi kunveturis en la motorboato kaj demandis la ŝipestron, kion li komprenas sub sia honora vorto. Li senkulpigis sin laŭeble, sed tamen asertis, ke li ne povas plenumi sian promeson. Se fariĝus ventego, li ekirus jam dum la nokto, se restus kvieto, li haltadus ankoraŭ du tagojn por ŝarĝado. Ĉagrenitaj pro tio ke ni estas trompitaĵoj, ni tamen devis nin prepari por ekvojaĝo. Ni mendis motorboaton por la 6-a h. de la venonta mateno kaj enpakis niajn kolektojn kaj ceterajn apartenaĵojn dum la nokto.

Streĉa nokto estis por ni. Ni sciis, ke ni estus fortranĉitaj de la revojaĝo al Petropavlovsk, se ni maltrafus la ŝipon Jana, kiu estis la lasta ŝipo de la jaro. Tio signifus travintradon ĉi supre, ĉar la sola veturebla vojo al Petropavlovsk tra la interno de la lando estis 800 km longa, kaj ni malhavis vintran ekipon.

Ĉirkaŭ noktomezo komenciĝis la ventego. Ĝi venis muĝante de la maro, kiu en momento leviĝis ŝaŭmante blanka. Almenaŭ du-tri fojojn ĉiuhore dum la nokto mi eliris por rigardi, ĉu la ŝipo restas. Dum la tuta nokto la lanternoj estis videblaj tie ekstere tra la mallumo. Ili moviĝis supren kaj suben, malaperis kaj ekvidiĝis denove, tute laŭ la ruliĝadoj de la ŝipo en fortaj ondoj. Sed ĝi kuŝis ĉe ankro. Sendiskute la situacio certamaniere similis al la nokto post la ŝiprompiĝo apud Kabo Lopatka.

Fine tagiĝis, kaj tiam fariĝis klare al ni, ke ne povas esti penso pri tio, ke ni provu elveturi al la ŝipo. La tuta maro ruliĝadis blanka, kaj de la rivera enfluejo la gigantaj ondoj leviĝis ĝis terura alto. Estis timiga kaj tragedia vidaĵo. Ĉirkaŭ la 6-a h. venis la japana maŝinestro, kiu kondukos nin al la ŝipo, kaj deklaris, ke estus certa morto por ni kaj la motorboato, se ni provus elveturi al Jana.

Sed kial restas Jana? Ĉu pro ni? Ĉu la ŝipestro eble pentis kaj intencas plenumi sian promeson kaj resti, ĝis kiam ni povos enŝi-

piĝi? Sed ĉirkaŭ la 8-a h. ĝi komencis moviĝi, kaj kun teruro ni vidis ĝin iri al la maro en norda direkto.

Ni nun staris 800 km de Petropavlovsk, fortranĉitaj de la reiro. Sovaĝa montega regiono kaj arkta vintro nin apartigis de la ĉefrestadejo. Sed ni decidis streĉi ĉiujn fortojn por venki ilin ambaŭ.



Ursidoj trenas relveturilon apud Ust-Kamĉatsk. (Fotis A. Sandberg)

Irus alia ŝipo al Petropavlovsk ĵus antaŭe, se ne estus okazinta akcidento. Ĝi estis la bela trimasta komerca skuneto "Avaĉa". La tagon post nia alveno al Ust-Kamĉatsk mi vidis skunon luktanta kontraŭ la ventego ekstere sur la maro. Mi ne pli atente pensis pri la afero, sed la postan tagon ĝi kuŝis suprenĵetita sur la tundron. Ĝi venis de la Ĉukĉo-duoninsulo kaj Alasko kaj estus elŝarĝinta iom da varoj en Ust-Kamĉatsk kaj poste irinta al Petropavlovsk.



La Kluĉevskaja vulkano vidata de Ust-Kamĉatsk. (Fotis Osorlin.)

La situacio estis tre senesperiga. Skiojn kaj ceteran vintran ekipon ni havis en Petropavlovsk. Jam estis en la komenco de oktobro, kaj alproksimiĝis la kamĉatka vintro. La domo, en kiu ni loĝis, estis somera dometo konstruita en japana stilo kun ŝovfenestroj. Nun komencis la neĝado, kiu sternis sian blankan kovraĵon sur la tundro. Sed ĝi ne venis kviete kaj bonkonduite kiel hejme en Svedlando, sed en ŝtormo vipanta. Ĝi kirle penetris tra la fendohavaj fenestroj en nian loĝejon kaj metiĝis amase sur la planko. La temperaturo interne iĝis la sama kiel ekstere, tuj kiam oni ĉesis hejti. La lavakvo ĉiam estis glaciiginta en la matenoj. Pasis multaj monatoj, antaŭ ol ni sukcesis akiri dormsakojn el felo.

Ni tamen plejeble bone eluzis la situacion. Unu el niaj pli longaj kaj interesaj ekskursoj estis tiu al la norda bordo de Nerpiĉe Ozero, kie ni havis bivakon dum unu semajno. Tie ni faris plurajn novajn kaj interesajn konatiĝojn en la bestara regno.

Je la unua fojo mi tie renkontis la blankan akcipitron de Kamĉatko. Estas impona birdo. Ĝi estas tutblanka je la koloro kaj same granda kiel asturo. Mi tre bone memoras, kiam mi renkontis ĝin unuafoje. Estis pluva oktobra mateno. Mi iradis ekstere sur la tundro. Jen forleviĝis lagopo, jen karadrio. Subite mi ekvidis aron da lagopoj flugantan. Terurite ili sin ĵetis malsupren en kelkajn arbustajojn. Tiam mi ekvidis, ke granda blanka birdo siblante venas tuj post ili. Sed ĝi ne povis sekvi ilin en la arbustajon, sed altiĝis kaj faris kelkajn cirklojn en la aero, rigardante por kaptotaĵo. Poste ĝi rezignis la ĉason kaj direktiĝis al mia loko. Mi enrampis sub arbuston. Ĝi daŭrigis rekte al mi, ricevis kontraŭpafon kaj rulfalis teren. Poste mi plurfoje vidis la blankan akcipitron ĉasantan lagopojn en la tundra regiono, sed ĝi estis malofte vidata.

Iom poste renkontis min stranga ĉasaventuro tute apud la akcipitra loko. Malfrua vespero estis kaj tiel mallume, kiel povas esti, kiam la tero estas neĝokovrita. Mi estis survoje hejmen post longa irado kaj tre laca. En la arbustaro okazis. Mi iris enpense kun la pafilo surdorse. Subite mi preskaŭ falpuŝiĝis je granda besto, kiu kurleviĝis kun muĝa sono kaj preskaŭ morttimigis min, tiel nepreparita mi estis. Mi saltis kelkajn paŝojn malantaŭen, alŝultrigis la pafilon kaj malŝarĝis ĉiom, kiom estis en ĝi, nome du kugletaĵojn, kontraŭ la monstro, ne sciante kio ĝi estas. La fajro ŝprucis el la tubo en la mallumo, kaj la besto silentiĝis. Kun du novaj kartoĉoj en la pafilo mi nun singarde alproksimiĝis. Granda nigra objekto estis vidata sur la neĝo, sed ĝi ne moviĝis. Veninte ĝis kelkmetra distanco

de ĝi, mi frotbruligis alumeton por pririgardi, kio ĝi estas. Imagu mian surprizon, kiam montrigis granda foko.



Hatasawa kaj Koike, du japanaj ĝentilhomoj. (Fotis la aŭtoro)

La klarigo de la mistero estas jena. La granda Nerpiĉe Ozero staras en komuniko kun la maro per dek verstojn (unu versto=1.060 m.) longa rivero. La fokoj ofte supreniras tra tiu rivero al la lago, el tio la nomo, kiu signifas "La foklago". Sed nun kelkfoje okazas, ke la rivero kovriĝas per glacio, kiam ankoraŭ ekzistas grandaj glaci-truoj en la lago, kie la vento facile disŝiras la glacion. La fokoj tiam restas en la lago, ĝis kiam ankaŭ ĝi frostigas. Kaj jen ili sin trovas en bela situacio. La ŝvelondado de la maro estas ĉiam aŭdata, kaj la terlangoj, kiu disigas de la maro la lagon, ne estas tre larĝa. Allogate de la bruado ili komencas rampadi tra la arbustaro kaj trans la

tundron por atingi la maron. Ĝuste tian frosteligitan fokon mi renkontis. Ĝi nur iom devojiĝis. Sed certe ne estas amuze, esti foko en arbaro.

La bestara vivo cetere estis malriĉa sur tiuj tundroj. Kelkaj malgrandaj brunaj musoj loĝis sub la neĝo. Intertempe ili suprenvenis sur ĝin, kie ili kelkfoje perdis siajn truojn, tiel ke ili ĉirkaŭvagadis sur la malmola krusto kaj fariĝis facila kaptaĵo al la nikteo kaj la blanka ĉasfalko, kiuj krom la blanka akcipitro regadis super la tundroj, la unua nokte, la du lastaj tage. La unuan ekzempleron de tiu impona blanka falko mi pafis sur la mastpinto de la skunruino.

Kelkaj korvoj kutimis ĉiutage flugadi laŭlonge de la mara kaj riveraj bordoj, avide pririgardante, kion la bordoj povus proponi. Mevoj, kolimboj kaj unuopaj anasoj ankaŭ apartenis al la ĉiutagaj gastoj, sed cetere ni devis etendi la ekskursojn trans la limojn de la tundro kaj de la delta lando por ekvidi ion novan.

La tutan monaton de oktobro kaj parton de novembro ni ankoraŭ loĝis en nia somera domo. Sed poste fariĝis tro malfacile. Kiam ni vekiĝis matene, ni devis komenci elŝovelante la neĝon el la ĉambro kaj dishakante la glacieron en la akvositelo. Fine sukcesis al ni trovi loĝejon iom pli indan al homoj en la japana radiostacio, kie du ĉambroj estis neloĝataj. Tie kiel najbarojn ni havis kvar japanajn radiotelegrafistojn kun iliaj servantoj. Inter la unuaj Masahiko Koike fariĝis nia speciala amiko. Krome en la sama domo loĝis la ruso Arkadi Miĥajloviĉ kun edzino, ĉiurilate tipa ruso kun aparte varia estinteco (policano, orserĉinto, felkomercisto, barbiro-ĥirurgo).

En la rusa vilaĝo transe de la rivero niaj specialaj konatoj estis la norvego Hansen kaj lia juna rusa edzino kaj la ruso N. P. Sokolnikoff, eksguberniestro super la Ĉukĉo-duoninsulo kaj la Anadyr-regiono kaj pli poste super la Komandor-insuloj. Nune la bolŝevikoj eksigis lin de lia ofico. Tiu lasta estis la plej klera kaj simpatia ruso,

kun kiu mi konatiĝis dum la tuta ekspedicio. Hansen ankaŭ estis tre afabla homo, kiu montris al ni grandan bonvolon. Li akiris riĉecon kiel komercisto, sed perdis ĉiun sian monon, kiun li havis en rusaj bankoj.

Iun tagon en novembro unu el la radiotelegrafistoj enkuregis al ni preskaŭ perdinte la spiron kaj rakontis, ke li ekaŭdis alarmsignalojn de sur la maro kun la jena enhavo: "S. O. S. Jana helpless, rudder lost." (S. O. S. Jana senhelpa, direktilo perdita.) La loko de la akcidento enkaŭ estis sciigata, kaj ni konstatis, ke tio estas apud unu el la nordaj Kuril-insuloj, la ordinara loko, kie la tifonoj furiozas plej severe. Post longe ni eksciis, ke ĝi devis ĉirkaŭdrivi senhelpa en 11 tagnoktoj, ĝis kiam amerika ŝipo alvenis kaj posttrenis ĝin. "Tion spertis la ŝipestro pro tio, ke li trompis vin", aldiris la japano.

Alian tagon ni ekvidis la unuan hundsledon. Estis granda sensacio, kaj ni ĉiuj kuris eksteren por rigardi ĝin. La veturo iris rapide kiel sago.

El klimata vidpunkto Ust-Kamĉatsk estas treege malbona loko, kompare al Kabo Lopatka kaj la tuta okcidenta marbordo. De oktobro ĝis aprilo neĝoŝtormo, la timata "purgo" de Kamĉatko, estas preskaŭ ĉiutaga gasto sur tiuj tundroj. Kelkfoje la neĝomulto kirliĝas tiel dense, ke oni ne povas vidi unu metron antaŭ si, kaj la ventego estas tiel forta, ke oni ne povas spiri kontraŭ ĝi, eĉ ne teni sin stare. Kelkfoje la neĝo estas subtile diserigita kiel faruno kaj kirle eniĝas ĉie, foje sentata kiel akraj pingloj, tiel ke oni ne povas teni malferme la okulojn. Ordinare estas 10 ĝis 15 gradoj sub nulo dum la neĝoŝtormoj, sed preskaŭ pli terura estas la "malseka purgo", kiam la temperaturo sin tenas ĉirkaŭ la frostpunkto. Feliĉe tio ne estas tre ordinara. Ve al tiu, kiun trafas tia malseka purgo malproksime de homejo. Ĉiu vestaĵo trapleniĝas per malseka neĝo. Oni sentas sin ĝisoste malseka. Sed kiam ĉesis la neĝoŝtormo, ĉiam venas

la malvarmego, kaj kiom glaciĝa ĝi tiam estas sentata, ne estas eble priskribi. Oni fakte rigidiĝas pro malvarmo, eĉ se ne estas pli ol 20 ĝis 30 gradoj sub la frostpunkto.

La neĝoŝtormoj ofte dum pluraj tagoj seninterrompe malhelpis al ni fari ekskursojn aŭ pli longajn vojaĝojn.



*La japana radiostacio post la glacia bombardado de la maro.
(Fotis la aŭtoro)*

La radiostacio ekestis ĉirkaŭita de tiel altaj neĝamasoj, ke la hundoj ofte promenis rekte sur la tegmenton. Kelkfoje la tuta fronto de la domo povis esti plene neĝkovrita, tiel ke oni devis elfosi la pordojn.

Dum la tuta tempo ni portadis planojn, ke en la paso de la vin-

tro ni provos penetri al Petropavlovsk. Sed dum estis neĝostormo ĉiun kaj ĉiun duan tagon, la ŝancoj pri sukceso estis tre malgrandaj. Ni tial decidis atendi ĝis la postvintro, kiam la tagoj plilongiĝos kaj la neĝostormoj laŭdire plimaloftiĝos.



*La frapondoj kelkfoje superverŝis la tutan terlangon.
Komparu ĝian grandecon kun tiu de la homoj! Maldekstre nia vintra loĝejo.
(Fotis A. Sandberg.)*

En soleco ni festis nian unuan kristnaskon en Kamĉatko. Mi devis kuri pli ol dek kilometrojn por havigi malgrandan salikarbuston, kiu fariĝis surogato por kristnaska abio. Ni vestis ĝin per kotono kaj sukcesis akiri kelkajn kandletojn. Mia edzino bakis kristnaskajn kukojn per tiuj malgrandaj rimedoj, kiuj estis je dispono. Rizkaĉon ni havis, sed la lesivitan gadon ni devis anstataŭigi per salmo. Kristnaskan atmosferon ni tamen estigis. Sed estis stranga kristnasko, kiun ni festis en japana radiostacio sur la senhoma tundro ĉe la bordo de la Maro de Bering.

La pensoj flugis kaj hejmen al Svedlando kaj al la kamaradoj en Petropavlovsk. La lastaj almenaŭ povis havi pinon kiel kristnaskan arbon. Dank'al la komplezemo de la japanoj ni rajtis paroli kun ili per la "senfadena" en la sama ĉambro kaj tiu de la krozŝipo Iwami en Avaĉa Golfo. Ni reciproke deziris bonan kristnaskon ĉiu en sia ekstremo de la lando kaj bedaŭris, ke ni ne povis ĝin festi kune.

La novjaron, kiu estas la plej granda festo de la japanoj, la ĝis sesdeko atinganta japana kolonio, kiu travintris sur la tundro, solenis per brua festeno. Al ĝi multaj rusoj el la vilaĝo estis invititaj, kaj ili venis multnombre, ĉiuj veturantaj per siaj hundsledoj. La festeno konsistis plejparte el manĝo kaj trinko kaj hura-krioj kaj finiĝis tiel ke preskaŭ ĉiuj rampis au ŝanceliĝis eksteren al siaj atendantaj hundjungitaĵoj, kiuj devis prizorgi, ke iliaj posedantoj alvenu hejmen. Ke ne al pli ol kelkaj unuopaj homoj frostdifektiĝis braĵoj kaj piedoj en tiu nokto, estis granda miraklo, kiu tre honoras la hundojn.

Iom poste en la novjaro ni komencis la preparojn por la longa vojaĝo al Petropavlovsk, kiun ni decidis entrepreni per skioj. Unu hundsledon kun malmulto da hundoj ni intencis kunhavi por necesa pakaĵo, kiel tendo, dormsakoj, scienca ekipoj, armiloj, provianto ktp. Sed ne estis facile havigi tiujn objektojn, kiujn ni neeviteble bezonis por la vojaĝo.

Niajn skiojn ni havis en Petropavlovsk kaj tial ni estis devigataj mem fari tiajn. Sed la plej granda malfacilaĵo estis akiri lignon. Ne ekzistis uzebla arbo en distanco de kelkaj mejloj. Fine mi ekvidis sur la skuna rompigaĵo kelkajn difektitajn kajutpordojn kaj sukcesis elpreni kelkajn tabulojn el ili, kiuj estis uzeblaj. Feliĉe ili ne necesis esti tre longaj, ĉar ni intencis fari kamĉatkanajn skiojn, konsiderante ilin plej konvenaj por nia celo.



La skuna ruino, kiun ni elrabis je skio-ligno. (Fotis la aŭtoro)

Tiuj skioj havas longon de proksimume unu metro kaj duono kaj larĝon de du decimetroj, kaj sur la suba flanko ili estas kovritaj per foka felo kun posten direktitaj haroj. Kompare al la svedaj skioj ili havas la malkonvenecon, ke ili ne glitas tiel rapide, sed ili ankaŭ ne glitas malantaŭen sur deklivoj, eĉ se oni ne uzas bastonojn. Ili plue havas la avantaĝon, ke ili ne algluiĝas en degela vetero kaj estas speciale konvenaj, kiam oni volas antaŭenŝovi hundsledon, pro tio ke ili ne glitas malantaŭen. Ili ankaŭ estas pli bonaj, kiam oni devas fari vojon al la hundoj en malfirma neĝo. Ili estas necesa apartenaĵo al hundsledo, sur kiu ili okupas malgrandan lokon dank'al sia nelongeco. Ĉe vojaĝoj per hundsledoj ili do estas konsiderinde su-

peraj al svedaj skioj. Sed kiam temas pri nura irado de unu loko al alia, svedaj skioj sendube estas pli konvenaj.

Per la plej simplaj iloj ni nun ĉarpentis tri parojn da skioj. Ne estis facila tasko, precipe por mi, kiu devis fari du parojn, al mia edzino kaj al mi. Sed kiam ni fine pretigis ilin, ni opiniis, ke la rezulto estas tre bona. Sed nun venis la konsiderinde pli malfacila ĉarpenta provo: konstrui hundsledon.

Denove ni vizitis la skunan rompigaĵon, kaj rabis la plej bonajn pecojn kun rajtiga permeso de ĝia posedanto, kiu donis al ni plenan liberecon elrabadi la ŝiprompigaĵon. Tion li tiom pli facile povis fari, ĉar post la glacia bombardado de la maro la ŝipo estis plene frakasita en rubojn kaj nun tute senvalora.

Post kiam estis solvita la malfacila demando kolekti lignon, ni pruntis hejmen hundsledon kiel modelon. La intenco estis fari ĝin laŭ precize sama tipo kiel tiu de la kamĉatkanoj. La kamĉatkana hundsledo ("narta") estas genie konstruita veturilo, se oni esceptas, ke mankas bona bremsaranĝo. Ĝi estas tipa arbara sledo kontraste al tiuj de korjako kaj lamutoj, kiuj estas tundraj sledoj. Kiel estas videble laŭ la bildoj, ĝi estas longforma kaj mallarĝa kaj tre malalta, destinita serpentumi antaŭen laŭ neireblaj vojoj tra arbaro. Sed plej kurioze rilate la sledon estas ke ekzistas eĉ ne unu najlo aŭ ŝraŭbo en ĝi. Ĉiuj artikoj anstataŭe estas kunligitaj per rimenoj el kruda fokfelo, kiu faras ĝin fleksebla laŭ ĉiu direkto. Sur la du longaj glitiloj sin trovas ĉe ĉiu flanko po kvar vertikalaj fostoj, sur kiuj la sledfundo kaj la ĉirkaŭa korbo sin apogas. La unua arko, kiu antaŭe kuntenas la du glitilojn, estas destinita por flankenigi arbustojn k. s. kaj por akcepti kaj mildigi puŝojn kontraŭ arboj kaj aliaj objektoj. La dua arko, kuniganta la unuan paron de la fostoj super la sledo, tute simple estas la tenilo de la sledo. Tiu veturilo prizorgas la

tutan vintran komunikadon en Kamĉatko, se ni esceptas la boacsledon de la nomadaj popoloj.

Ni bezonis multajn tagojn antaŭ ol estis pretigita la sledo, sed la vintraj tagoj ne estis tre valoraj en tiu neĝoŝtorme mordata loko.

Nun venis la plej granda malfacilo de ĉiuj, havigi tirbestojn al la sledo. Ordinara hundjungitaro estis ekstreme multekosta je tiu tempo en Ust-Kamĉatsk.



*La vilaĝo Ust-Kamĉatsk kun koreanoj ekster sia subtera kabano.
(Fotis la aŭtoro)*

Antaŭ mallonga tempo ni faris tre agrablan kaj valoran konatiĝon, nome la japana vintra ĉefo en unu el la grandaj japanaj fabrikoj sude de la rivero. Lia nomo estis Minoru Hatasawa. Li ofte

invitis nin al sia restadejo per la plej kortuŝe afablaj leteroj en angla lingvo, miksitaj kun rusa kaj japana, kaj sendis sian hundekspreson por venigi nin. Ni akceptis la invitojn kaj restis plurfoje dum kelkaj tagoj ĉe li. Ni interkonsentiĝis ke li estas "la plej afabla gastiganto de l'mondo". Li ne sciis limojn de sia bonvolo. Li regalis nin per la plej delikataj konservaĵoj, kaj se ni esprimis nian plaĉon pri io, li tuj donis al ni pli grandan kvanton el ĝi. Se ni interesate rigardis ion en lia ĉambro, li tuj volis donaci ĝin. Entute li volis fordonaci ĉion al ni. Fine ni nek kuraĝis rigardi nek montri al io kaj devis ekiri hejmen, por ke li ne donacu al ni la tutan fabrikejon.

Mi rakontis al li pri nia decido provi per skioj veturi la 800 km longan vojon al Petropavlovsk. Li ektimis antaŭ la plano kaj konsideris ĝin egala al morto, precipe por "madame". Li faris ĉion por nin averti. Ni rajtus loĝi senpage dum la tuta vintro en lia fabrikejo. Porvivaĵon inkluzive brullignon kaj servistojn, ja, kion ajn ni postulus, ni ricevus senpage. Li nur bezonos sendi senfadenan telegramon al sia ĉefo en Japanio, kaj la afero estos aranĝita. Li tuj volis eksidi por skribi la telegramon. Ni sincere dankis lin pro lia afableco sed diris, ke nia decido estas neskuebla. Ni tamen trankviligis lin per tio, ke ni ankoraŭ ne startos en kelkaj semajnoj. Kiam li konsciis, ke ĉiuj persvadoj estas vanaj, li komprenis, ke li farus al ni la plej grandan utilon helpante nin pri la ekipo. Li nun ekiris por eltrovi tirhundojn, kaj ne pasis longa tempo, antaŭ ol li kolektis ses hundojn, kiujn li donacis al ni. Tio estis tre valora helpo, sen kiu ni eble ne estus povintaj starti.

Kun la plej grandaj malfaciloj mi sukcesis havigi dormsakojn, peltojn, boacfelajn botojn kaj aliajn necesajojn por vintra vojaĝo en Kamĉatko. Niajn kolektojn kunigitajn dum la aŭtuno kaj la vintro ni enpakis en zinkajn kestojn kaj deponis en magazeno.



Hedström en sia plej sovaĝa stadio. (Fotis la aŭtoro)

Poste ni telegrafis al la kamaradoj, ke ni intencas starti per skioj al Petropavlovsk. En la vespero antaŭ la starto, Hatasawa mobilizis ĉiujn niajn japanajn amikojn, kaj deputacio el japanoj venis al ni por fari lastan provon igi nin rezigni la entreprenon. Ili promesis ĉion, se ni nur restos. Ili ankaŭ prizorgos, ke ni ricevu senpage nutraĵon al ĉiuj tirhundoj dum la resto de la vintro, se ni nur res-

tos. Hatasawa kaj Koike havis larmojn en la okuloj, kaj estis kortuŝe vidi iliajn malegoistan bonvolon kaj amikecon. Ili fakte kredis, ke ni nepre pereos en neĝoŝtormo kaj malvarmego, estos formanĝitaj de sovaĝaj bestoj aŭ atakataj de sovaĝaj homoj. Kaj ili timtremis aŭdante ke ni devos dormi ekstere en la neĝo. Hatasawa volis donaci al ni ĉion, por ke estu komforte al ni dum la vojaĝo. I.a. li volis doni al ni tri kampajn litojn kaj proponis, ke lia ĉarpentisto faru tablon kun tri metrojn altaj kruroj por meti en la profundan neĝon, sur kiu ni komforte povos manĝi. Nur kun malfacilo mi igis lin lasi tion kiel ankaŭ sendi barelon kun petrolo, kiu ŝajnis al li bona por verŝi sur la brullignon, kiam ĝi estas malsekega en la arbaro.

Per skioj tra Kamĉatko La starto el Ust-Kamĉatsk

La lastan tagon de februaro ni surpakis la sledon kaj adiaŭsalutis al niaj amikoj en Ust-Kamĉatsk. La japanoj kredis, ke ni iros rekte en la faŭkon de la morto, la rusoj skuis la kapon, sed kelkaj kamĉatkanoj ĉeestantaj kredis, ke ni sukcesos. Ĉirkaŭ la 12-a h. ni jungis la hundojn al la sledo kaj ligis la skiojn al la piedoj, kaj la 800 km. longa kaj sortovaria vojaĝo komenciĝis. Ni veturos sur krudaj voĵetoj kaj sen indiĝena akompananto ni trakrozos grandan parton de lando, kies internon ni ne konas. Ni interrilatigis kun indiĝenoj, kies lingvon ni nur supraĵe komprenas, devos fidi al hundoj, al kiuj ni ankoraŭ ne kutimiĝis, kaj antaŭ ĉio batalos kontraŭ la neĝoŝtormoj kaj la malvarmo de la kamĉatka vintro. En la adiaŭa momento ni ja sentis la superpotencan opinion de la komunumo pri la neebleco efektiviĝi la entreprenon, sed decidemo kaj energio certe ankaŭ povos ion fari, mi pensis.

Hatasawa lastmomente petis, ke mi sendu al li kurieron per la plej rapidaj hundoj, se nin atakus sovaĝaj homoj, tiam li tuj sendos ĉiujn siajn japanojn kun forta armilaro al nia helpo.

Ni direktis la vojaĝon al la frostiĝinta Kamĉatka rivero, kaj ni mansignis adiaŭon al niaj amikoj. La radiotelegrafisto Koike signalis "feliĉan vojaĝon" al ni. Kaj per tio nia longa kaj nevola travintrado en Ust-Kamĉatsk finiĝis. Novaj sortoj kaj spertoj nin atendis.

Dum longa tempo estadis malbona vetero tie malsupre sur la tundro apud la maro. Sed en tiu tago, kiam ni startis, la suno radiis belege, kaj estis brila tago kun nur 15-grada malvarmo. Ni nun vi-

dis la maron je la lasta fojo dumlonge. Blankaj glacimontoj lumis malproksime sur la maro. Sur la frostiginta rivero iris veturita hund-vojo, kaj tiun ni sekvis.




*La tirhundoj devas ĉiam dormi eksterdome en la neĝo.
Rimarku ke kelkaj estas tute superneĝitaj. (Fotis la aŭtoro)*

Mi do unue petas prezenti niajn kvarpiedajn akompanantojn. Ok hundoj estis, el kiuj du tamen ne apartenis al ni, sed estis lasotaj en vilaĝo, kiun ni trapasos. Ili tamen poste venis en nian posedon. Kiel gvidanton ni havis "Kapitanon", nigran kaj seriozan hundon, kiu evidente havis pli sudan devenon ol Kamĉatkon, ĉar ĝi havis pendantajn orelojn kaj tre mallongan hararon. Ĝi aspektis kiel sveda buĉista hundo. Plue estis Griza, kiu estis malsukcesinta miksaĵo inter vertago kaj kamĉatka hundo. Ĝi kunigis la persistecon de ver-

tago kun fenomenaj fortaco, kiu lasta ege igis nin indulgi al ĝi la mallongajn krurojn. Post ĝi venis Sera, maljuna veterano, kiu estis eluzita kaj malbone traktita. Ĝi estis timema kaj laboris nebone. Pare kun ĝi iris Muŝika, la plej honesta, el ili ĉiuj, granda kaj forta hundo, al kiu la laboro estis ĉio. Ĝi neniam fuĝis kaj ĉiam estis ekscitita afable. Jen venis Tommik, tre maldikeca hundo, kiu havis neniujn specialajn ecojn. Sed poste venis unu, pri kiu ni ĉiam hontis, renkontante hundjungitaron. Ĝi nome estis nur duone tiel granda kiel la aliaj kaj havis ankaŭ ĝi vertagajn krurojn. Ĝi ĉiam aspektis tre riproĉanta, kiam oni surmetis la jungilon, kio ja ne estis tre stranga. Ĝi estis la plej manĝavida el ĉiuj kaj fulmrapide englutis ĉiun manĝaĵon. Ĝi implikiĝis en jungilaron kaj tirŝnuron pli ol iu alia kaj okazigis multajn haltojn kaj malbelajn vortojn.

Kiam ĝi implikiĝis kaj ni devis halti por remeti ĝin en ĝustan lokon, post kiam ĝi ricevis kelkajn vipobatojn pro sia mallerteco, la gvidhundo preskaŭ ĉiam sin ĵetis sur ĝin kaj donis al ĝi efektivan punadmonon, tiel ke mi ofte devis defendi la vertagon. La gvidhundo ne volis sperti ian ĉikanon. La sesa estis karbonigra, eluzita hundo de ekstreme malbona karaktero, kiu ofte estis ŝanĝinta posedanton. Ĝi ĉiam provis elturniĝi kaj laboris nur, kiam ĝi sciis, ke ĝi estas observata. Ĝi eĉ ne hezitis ŝteli el la manĝaĵo de la kamaradoj, kiel ofte ĝi nur povis. Se ĝi povis ŝteli el la sledo, kiam neniu tion vidis, ĝi ankaŭ tion faris sen hezito. Kiam oni poste ĝin renkontis, ĝi ŝvingis la voston kaj montris sin afekte sindonema. Ĝi ĉiam havis malbonan konsciencon kaj estis distinge krimula tipo. Se ĝi estus homo, ĝi estus konata polica kliento. La hundoj estis jungitaj antaŭ la sledo en Kamĉatka maniero, t. e. duope laŭlonge de komuna meza ŝnuro. Kaj tirŝnuroj kaj jungiloj estis faritaj el netanita fokfelo. En la lando ekzistantaj du tipoj de hundjungilaĵo estas videblaj sur la apuda bildo.


Dum la unua tago ni ne kalkulis pri pli longa vojaĝo ol ĝis la rusa vilaĝo "Ĉornij Jarr" (La Nigra Sablodeklivo), situanta je 15 verstoj de Ust-Kamĉatsk. La plej grandan parton de la vojaĝo ni veturis sur la neĝokovrita glacio de la Kamĉatka rivero. Kiel gvidstelon ni havis antaŭ ni la Kluĉevskajan vulkanon, kies piedon ni baldaŭ atingos.



*La du tipoj de hundjungiloj troviĝantaj en Kamĉatko.
(Laŭ Johelson.)*

La sledo estis iom tro peza kaj la hundoj ankoraŭ ne kunekzer-citaj, tiel ke la veturo ne iris tre brile la unuan tagon. Sed en la mal-lumiĝo ni tamen alvenis al la vilaĝeto, kie loĝas ekskluzive "starov-geri", t. e. malnovkredantoj. Tio estas rusoj, kiuj apartenas al sekto havanta, krom siaj religiaj opinioj diferencaj al tiuj de la ortodok-suloj, ankaŭ multajn strangajn kutimojn. La malnovkredantoj ekz. salutante neniam premas la manon de homoj, ili neniam fumas nek permesas al aliaj tion fari en sia domo. Kvankam ili estas rusoj, ili neniam trinkas teon nek manĝas kune kun aliaj kaj el sama vazo, el kiuj aliaj manĝis. Hundoj neniam rajtas veni en iliajn domojn. Kontraŭe brutoj kaj katoj ŝajnas havi vizitpermeson, ĉar en tiu do-

mo, kie ni havis noktloĝejon, bovido estis la unua, kiun ni renkontis malfermante la pordon. Proksimume duona dekduo da katoj ankaŭ sin trovis en ĝi. La vilaĝo havis tre malbonan reputacion. Laŭ oni-diro ĝi estus loĝata de amaso da forkurintaj krimuloj. Sed el tio ni nenion rimarkis kaj estis akceptataj gastame kaj afable kaj dormis bonege sur la planko kune kun la gemastroj, iliaj infanoj, la bovido kaj la katoj. Sed por sekuro ni havis la ŝarĝitajn Browning-pistolojn en dorspoŝo.



*Tirhundo, kiu leviĝas el sia malvarma lito, kiam mi vokas ĝin.
(Fotis la aŭtoro)*


Neniu vojaĝanto en Kamĉatko, ĉu li estas indiĝeno aŭ eksterlandano, ĉu eŭropano aŭ aziano, bezonas timi ne ricevi noktloĝejon en vilaĝo. Eĉ se li estus tute nekonata en la vilaĝo kaj eniras domon

hazarde kaj petas permeson resti ĝis la venonta tago, estus nepenseble, ke oni rifuzus al li, kondiĉe ke la domo ne estas jam plena de gastoj. Sed oni devas memori, ke tia gastvizito ne kaŭzas grandan ĝenon al la gastigantoj. Ĉiu vojaĝanto kunportas sian liton t. e. la dormsako. Tiu estas konstruita kiel longforma sako kaj konsistas el tri tanitaj kaj kunkudritaj boacaj feloj. Ankoraŭ pli varma ĝi fariĝas, se oni uzas montŝafan felon. Lupfeloj ankaŭ estas bonegaj, nur tro multekostaj, kaj feloj de junursoj ankaŭ taŭgas. La harara flanko estas al interne. La plej uzata dormsako estas el boaca felo, ĉar ĝi estas plej facile akirebla el la grandaj boacgregoj de la nomadoj. En tia sako oni senĝene povas ekkuŝi por dormi en 40-grada malvarmo sen mortfrostiĝo. La dormsako estas la plej grava ekipaĵo dum vintra vojaĝo tra Kamĉatko. Sen ĝi oni estus perdita, se subite la neĝoŝtormo faras abruptan haltigon por la penetrado antaŭen kaj devigas al tranoktado, kie oni tion tute ne deziras.

Se la mastro de iu domo rifuzus al fremdulo loĝejon, li poste estus komplete skandalita, tio estus konsiderata kiel io tre malbona, kaj la novaĵo estus rakontata vaste ĉirkaŭe. Se komenciĝas neĝoŝtormo, dum oni sin trovas kiel gasto en iu domo, oni nur restas ĝis kiam ĝi pasis. eĉ se ĝi daŭrus unu aŭ kelkajn semajnojn. Oni estas regalata per manĝaĵo kaj trinkaĵo kaj dividas la plankan areon kun la domanaro dum la noktoj. Kiam oni poste daŭrigas la vojaĝon, oni dankas kaj ekiras. Pagon la gastigintoj ordinare ne volas akcepti. Sed se oni volas aĉeti etaĵon aŭ deziras ian laboron farita, tiam ili scias postuli pagon tiel ke sufiĉas. La kamĉatkanoj kaj la rusoj ofte kontentiĝas diri adiaŭ, eĉ se ili loĝis en la domo kelkajn semajnojn. Danki pro tiel natura afero ŝajnas al ili nenecese.

Tia estas la gastamo en Kamĉatko. Ĝi estas unu el la plej belaj ecoj de la kamĉatkanoj. La klarigo al tiu senlima gastamo kuŝas en tio, ke la gastiganto scias, ke venontfoje estos li, kiu vojaĝos kaj be-

zonos loĝejon. Kredeble ankaŭ kuŝas en la homa naturo, ke oni ne elpelas fremdulon, kiu en neĝoŝtormo venas sentante malvarmon kaj malsaton kaj serĉas rifuĝon.



Hundsledo. (Laŭ modelo.)

La manĝaĵo, per kiu oni estas regalata en tia dometo, ĉiam estas la sama. Matene, tagmeze kaj vespere estas salmo, en la plej simplaj kazoj sunsekigita (jukolo), alie salita aŭ duone putriĝinta kaj tia-okaze kuirita aŭ fritita en urso graso. Kelkfoje oni ankaŭ en la vintro povas ricevi freŝan fiŝon, kie troviĝas vintre neglacikovrita rivero en la proksimo aŭ se oni klopodas veturi al malproksima rivero. Vivando kelkfoje ankaŭ troviĝas sur la menuo, kvankam ne ofte en la vintro, se la vilaĝo ne kuŝas proksime de la restadejo de la boacbredantaj popoloj.

Kiel trinkaĵon ĉiuj popoloj de Kamĉatko uzas teon, ordinare la plej simplan specon de brikteo, kiun oni ja ne povas nomi bongu-

sta, ankaŭ se ĝi ne konsistas el infuzaĵoj kaj balaaĵoj el la restoracioj de Ruslando kaj Ĉinio, kiel asertas konkurantaj komercistoj de aliaj tespecoj. Tiu teo, kiu estas kunpremita en malmolajn tavolojn je la granda de briko, kvankam rimarkinde pli maldikajn, estas la sola savanto inter la naturpopoloj de tiu lando. Ĝi estas tre granda komercaĵo, kiu el la deponejoj de la komercistoj estas distribuata tra la tuta lando per hundsledoj, motorboatoj kaj kanotoj. Unu tavolo da brikteo estas unuo konata de ĉiu kaj estas uzata en granda amplekso kiel mono en Kamĉatko. Teon oni trinkas en teruraj kvantoj. Kiel trempaĵon oni ĉe la kamĉatkanoj, speciale en la orienta flanko de Kamĉatko, ordinaro ricevas panon. En la okcidenta flanko oni ofte devas kontentiĝi je sekigita salmo. Ĉe tiuj, kiuj havis bonan ĉason, oni ordinaro ricevas sukeron al la teo, sed la granda plejmulto el la indiĝenoj de Kamĉatko ne uzas ĝin, kvankam ĉiuj ŝatas ĝin. Ĝi estas konsiderata kiel lukso.

Ni jam diris adiaŭ al niaj gastigantoj kaj estis komencontaj la duan migrotagon. Rekompence por la gastamo mi fotografis la familion ekster la kabano kaj promesis pli poste sendi al ili la fotojn. Sed tion mi neniam estu farinta. Kiel fajro tiu fakto disvastiĝis antaŭ ni ĝis Petropavlovsk, kaj en ĉiu venonta vilaĝo preskaŭ ĉiu kamĉatkano atakis min petante ke mi fotografu lin kun edzino, infanoj kaj hundoj. Sed mia provizo de plakoj kaj filmoj estis tre limigita, kaj mi forĵetis neniun nenece. Krom la gastiganto en la plej multaj vilaĝoj neniu el la aspirantoj estis "eternigita", kiu ne meritigis sin iamaniere, ekz. kontribuis al la kolektoj aŭ donis al mi hundnutraĵon, Kelkaj tamen meritiĝis sin nur per sia aspekto. Ke ili ne ricevis promeson pri la bildo pli frue ol post unu jaro neniom influis. La tempo havas, kiel mi jam menciis, nenan valoron en tiu lando. La indiĝenoj ĉiam alkitimiĝis devi atendi minimume unu jaron, kiam ili mendas ion de komercisto, kion li ne havas en sia stoko. Se li tiam

iel miskomprenis la mendon, daŭras ankoraŭ unu jaron. Sed tio absolute nenion signifas.


Ni nun daŭrigis la vojaĝon kun direkto al la proksima vilaĝo, la malnova Nijne Kamĉatsk, kiu antikvatempe estis la ĉefurbo de Kamĉatko. Sed en tiu tago la malfacilaĵoj komenciĝos. Kiam ni vekigis matene, neĝetis iom kun malforta vento. Tamen sub neniuj kondiĉoj ni volis esti haltigataj en la komenco kaj eĉ ne pripensis sekvi la bonvolan konsilon de niaj gastigantoj, ke ni restu ĉe ili ĝis kiam ĉesos la neĝado. Anstataŭe ni startis kun bona humoro esperante ke ni atingos al Nijne Kamĉatsk, antaŭ ol la hundpiedsignoj estos forviŝitaj, ĉar kelkaj sledoj veturis tien post kiam falis la lasta neĝo. Ni ne veturis pli ol kelkajn verstojn, kaj la neĝo komencis kirliĝi ĉiam pli dense kaj la vento plifortiĝis. Estis evidente, ke fariĝos neĝoŝtormo. La sledsulkoj, kiuj la pasintan tagon estis glataj kaj veturitaj, nun estis malaperintaj sub futealta neĝo, kiu pli kaj pli altiĝis. La hundoj spiregis kaj laboradis, sed laciĝis rimarkeble laŭ ĉiu momento kaj fojon post fojo volis halti kaj ripozi. Hodiaŭ Hedström estis en vico veturigi. Ni nome alternis. Iom pli bone iris, kiam mia edzino kaj mi per la skioj preparis sulkojn por la hundoj. Tiam nek la sledo nek ili eniĝis tiom profunde. Sed pasis la duona tago, ni nur veturis dek kilometrojn, kaj la neĝo ankoraŭ ŝutiĝis teren kun normalpliigita rapido. La malnovaj sledsulkoj, kiel dirite, estas forviŝitaj, sed ni sciis, ke la vilaĝo kuŝas apud la Kamĉatka rivero. Tial estis necese sekvi tiun, kaj feliĉe ĉesis la senesperiga tundro kaj komenciĝis la betula arbaro, sama nodeca kaj tuberplena betularbaro, kia en la ĉirkaŭo de Petropavlovsk. Pro tio ni ne povis perdi la direkton. Sed komencis krepuskiĝi kaj la neĝoŝtormo kreskis. Neniu vilaĝo estis aŭdebla — en Kamĉatko oni nome ĉiam aŭdas vilaĝon, antaŭ ol oni ĝin vidas. Ĉiuj ni estis blankaj kiel neĝhomoj. Aspektis senespere, kaj Petropavlovsk preskaŭ ŝajnis kvazaŭ io nereala kaj nea-

tingebla. Sed ni estis preparitaj ke venos kontraŭaĵoj kaj malfacilaĵoj, kaj ni decidis ke ni ne perdu la kuraĝon.

Do ni ankoraŭ pli instigis la hundojn provante kaj batojn kaj bonajn vortojn. La lastaj certe ne efikis. La hundoj ankoraŭ ne havis sufiĉe da tempo por korligiĝi al ni. La eta vertagaĉo pleje nin incitis. Ne utilis esti afabla nek severa al ĝi.

Fine la hundoj ne plu kapablis. Ili nur ekkuŝis kaj volis dormi. Ni lasis ilin ripozi sufiĉe longan tempon, plivigligis ilin per unu pece-to da fiŝo kaj denove pelis antaŭen. Mia edzino iris unua kaj faris sulkojn. Hedström kaj mi ŝovis la sledon al la hundoj. Post cent metroj ni denove devis ilin riprozigi. Estis nun preskaŭ senlume, kaj je ĉiu minuto pligrandiĝis la neĝamasoj. Jen ree ekiri kaj novajn cent metrojn. La hundoj verdire vadis tra la neĝo, kaj ni devis streĉi ĉiun forton por antaŭenigi la sledon. La demando nun sole estis: ĉu ni devos tranokti en la neĝo aŭ ĉu la fortoj sufiĉos ĝis la vilaĝo. Kiam ni preskaŭ rezignis la esperon veni plu antaŭen, subite aŭdiĝis malproksima hundbojo. Ni aŭskultis kiom ni povis en la neĝoŝtormo, sed nenio plu estis aŭdebla. Sed la hundoj perceptis la tonon, kaj tio estis plej grava. Ili same bone kiel ni sciis, ke ĝi signifas ripozon kaj manĝaĵon kaj multajn hundkamaradojn, kaj ili nun klopodis pli ol antaŭe. Sed sen nia helpo ili ne kapablis treni la sledon, kiu preskaŭ efikis kiel neĝoforŝovilo en la malfirma neĝo. Kaj ni kaj la hundoj estis plene elĉerpitaj de klopodo, kiam fine kelkaj lumoj ekvidiĝis. La centoj da sledhundoj de la vilaĝo ekaŭdigis akceptan bojadon, kaj per la lastaj fortoj ni atingis la vilaĝon. Ĝismorte lacaj ni elserĉis la loĝejon de la estono Norrit kaj enloĝiĝis en lia bonkonstruita dometo. Nur kelkajn fojojn poste teo gustis tiel bone kiel en ĉi tiu vespero. Ni eltrinkis unu glason post la alia, kaj ankoraŭ hodiaŭ mi memoras la bongustajn freŝajn tritikbulkojn, kiujn la dommastrino bakis por nia alveno.

La edzo estis grandkreska kaj fortika viro, kiu iam estis maristo kaj ankaŭ ĉirkaŭvelis la bordojn de Svedlando kaj suferis ŝiprompiĝon ekster Helsingborg. Tie li havis multe da plezuroj kaj i. a. post-lasis kelkajn fianĉinojn. La svedoj prizorgis lin kaj li ĝuis grandan gastamon, kiun li nun volis repagi al ni. Kaj por tio li efektive havis okazon, ĉar la neĝostormo daŭris dum tri tagoj, dum kiuj li nutris nin kaj niajn hundojn en neriproĉebla maniero.



*La pastro, kiu ludis al ni per gramofono svedajn vulgarkantojn.
(Fotis la aŭtoro)*

Dum la restado en la vilaĝo ni ankaŭ vizitis 80-jaran, indiĝenan kamĉatkan pastron, kiu sciis multe por rakonti pri Kamĉatko en antikvaj tempoj. La multaĝa blankhara maljunulo havis gramofonon por sin amuzi kaj rakontis kun ĝojego ke li posedas kelkajn svedajn diskojn. Ni ne tre multe kredis je tio, sed tamen eksidis por aŭdi, kio povus veni. Ni preskaŭ faldiĝis pro rido, kiam ni ekaŭdis kelkajn svedajn vulgarkantojn. La pastro sidis atente aŭskultante kaj kredis verŝajne, ke estas io efektive ekstrakvalita. Iu dano, kiu estis mekanikisto ĉe unu el la grandaj konservaĵaj fabrikejoj apud Ust-Kamĉatsk, donacis ilin al la pastro.

Nur kiam la neĝoŝtormo post kelkaj tagoj ĉesis furiozi, oni povis vidi, kiel aspektas la vilaĝo. En nenia rilato ĝi diferenciĝis de aliaj kamĉatkanaj vilaĝoj. Kunpremaĵo da grizaj trunkdomoj, disŝutitaj senorde ĉirkaŭ monteto. Malgranda preĝejo meze de la vilaĝo. Aparte en grupo por si apud la rivero la balaganoj, t. e. sekigejoj por salmo. Ĉie sledhundoj estis ligitaj, kaj kelkaj longharaj bovinoj kaj ĉevaloj ĉirkaŭiris libere.

La preĝejo en la malgranda vilaĝo estas restaĵo el la grandepoko de la loko kaj pro tio ornamita per granda nombro da orumitaj ikonoj, bildoj ktp. Okaze estis festotago dum nia vizito, kaj la blankhara pastro faris diservon. Strangan impreson faris vidi la indiĝenojn de la vilaĝo, tamen plejparte virinojn kaj infanojn, vestitajn per siaj feloj starante aŭskulti la diservon. Ĝi konsistis el tio, ke la pastro, kiu estis vestita per la plej bela or- kaj arĝentbrodita kapuĉo, kun fenomenaj rapideco legis el libro kun iu malnoverusa teksto tiel rapide ke lia lango "falŝanceliĝis" preter la vortojn. Dum li de temp' al tempo ekspiris, lia helpanto, la t. n. "psalomŝĉiko", kantis kelkajn monotonajn kantojn. Poste la pastro daŭrigis denove kun sama rapideco. Kelkfoje li faris paŭzon kaj aspergis iom da incenso sur la indiĝenoj. Tiam tiuj krucesignis kaj kliniĝis. Kelkaj genufleksis. Post

iom pli ol unu horo la diservo estis finita, kaj la indiĝenoj rapidis eksteren al siaj hundoj. Tie ili certe sentis sin pli hejme. Mi estas konvinkita, ke nek la pastro nek iu el la aŭskultantoj komprenis ion el la legita. La kamĉatkanoj estas laŭnome greke katolikaj, kaj do estis diservo en tiu spirito, kiu okazis ĉi tie. El la aliaj du naturpopoloj, korjako kaj lamutoj — la unue menciitaj estas idolanoj kaj la lastaj laŭnome greke katolikaj, kvankam ili efektive konservadas multe el sia ŝamanismo.

En la vilaĝo ankaŭ loĝis kelkaj koreanoj kaj kompreneble ankaŭ kelkaj ĉinoj. Tiu lasta stranga popolo ŝajnas farti egale bone sub la ekvatoro kiel sub la polusa cirklo. Ankoraŭ mi ne trovis grandan lokon en Kamĉatko, kie ne troviĝas ĉino.

Al Kamaki kaj Kluĉi

Nur en la kvara tago ni povis daŭrigi nian vojaĝon al la etapa celo, la 40 verstojn malproksima kamĉatkana vilaĝo Kamaki. La hundoj kaj ni estis sufiĉe ripozintaj. Koreano estis veturinta tuj antaŭ ni kaj farinta sledsulkon, kiun ni sekvis. Inter Niĵne Kamĉatsk kaj Kamaki la granda Kamĉatka rivero fluas parte larĝa kaj malrapida tra malalta lando, parte ĝi trapenetras altan montaron en longa kaj mallarĝa interkrutejo. Tie la rivero estas rapidflua kaj malfrue kovriĝas per glacio, kaj tre multaj personoj avertis nin, ke solaj ni ne traveturu tiun interkrutejon. La montaj muroj abrupte krutas ĉe ambaŭ flankoj, kaj kelkfoje lavangoj kutimas forbalai de la montega krutaĵo dikajn arbojn kaj pereigi preterpasantajn hundsledojn kun homoj kaj ĉio. Tion ni aŭdadis ĝis tede, kaj kiam ni penadis antaŭen tra la interkrutejo, kun certa respekto ni tenis nin meze sur la rivero. En la tagmezo ni aranĝis al ni tepaŭzon ĉe la bordo. La hundoj tuj kurbigis sin ringe kaj ekdormis, dum ni kolektis brullignon, kaj baldaŭ ni havis varmigan fajron. Je teakvo ni degelis neĝon. Tio estas unu el la oportunaĵoj ĉe la vintraj vojaĝoj en la tiea lando, ke oni neniam bezonas embarasiĝi pri akvo, kie ajn oni tendumas. La tesaketo, entenanta teon, emajlajn tasojn, biskvitojn kaj sukeron, ĉiam kuŝas facile alligita supre de ĉio en la sledo, por ke oni ne bezonu mallaĉi tiun je la tepaŭzo. La tekruĉo, la "ĉajnik", ĉiam havas sian specialan lokon, pendante en la malantaŭa parto de la sledo. Mi ankoraŭ ne menciis tiun memkompreneblan fakton, ke oni havas la tutan pakaĵon fortike firmligita sur la sledo,

tiel ke nenio povas defali, kiam la sledo renversiĝas aŭ rulturniĝas du-tri fojojn sur kruta deklivo. Tio ordinare okazas plurfoje dum la tago, sed nenion signifas por la sledo nek por la hundoj. Oni ricevas nur neĝobanon, se oni ne sukcesas desalti en ĝusta tempo.

La tepaŭzo en la tagmezo estas unu el la plej agrablaj interrompoj. Trinkinte du-tri duonlitrajn tasojn da bolanta teo, oni sentas sin kvazaŭ nova homo. Se oni estis frostrigida kaj elĉerpita pro peno, oni fariĝas varma kaj vigla. De la bonvola mastrino en nia lasta restadejo ni ricevis ĵusbakitan tritikpanon kiel vojmanĝaĵon. Ĝi nun estis frostiĝinta kiel glacibulo kaj tiel malmola, ke oni povus mortbati per ĝi bovon. Hedström kaj mi nin distingis fraptrancante per la hakilo elegantajn pantavolojn, kiujn ni moligis antaŭ la fajro, kaj kiuj poste gustis tute kiel freŝbakitaj. Ili ja estis eĉ varmaj. Se oni havas lokon kaj emon, oni do povas kunporti kelkajn sakojn da tritikpanoj, bakitaj en novembro, kaj poste manĝi freŝan kaj ĵusbakitan panon ĝis en aprilo, kiam komenciĝas la degelado.

Kiam mallumiĝis, ni nur atingis duonvoje por Kamaki, kaj la hundoj estis lacegaj. Do nur estis necese elekti konvenan tendlokon. Ni tiam troviĝis iom interne de la interkrutejo kaj baldaŭ trovis, kion ni serĉis. Ni forŝovelis la neĝon per nia ligna fosilo, pensante ke ni atingos malsupren ĝis la tero, sed la skibastono montris dumetran profundon, do tio ne estis peninda. Ni elprenis la tendon el la sledo, hakis tendostangojn, kaj baldaŭ la tendo estis starigita. Post tio ni muntis la tendfornon, malgrandan, hejmfaritan, kiu pezis unu kilogramon kaj havis la saman modelon kiel tiu, kiun uzas ĉiuj zibelĉasistoj dum la vintro en la tiea lando. Ĝi estis aranĝita kun disprenebla tubo, kiu en kunpakita stato estis enŝovata en la fornon kaj alie estis kunmetata kaj elstaris tra truon en la tenda vando. Ni metis iom da branĉetaĵo sur la neĝon en la tendo kaj sur ĝin la dormsakojn. Hakinte sufiĉe da brulligno kaj liginte la hun-

dojn al la ĉirkaŭaj arboj, ni enrampis en nian bonegan tendon. Jen ni bruligis stĉarinan kandelon, pinĉfiksitan en supre fendita bastoneto, kiun ni enigis en la neĝon. Jen kandelingo, kiu neniam renversigis kaj estis lokebla kien ajn en la tendo. La forno baldaŭ fariĝis brulruĝa kaj pli kaj pli profundigis en la neĝo, eĉ kiam ni metis du longajn transversajn trabojn sub ĝin. Fariĝis varme kiel en ĉambro, kaj oni demetis la peltojn. Ekstere la temperaturo montris -16 gradojn C. Ni gratulis nin ke ni ne havas 40-gradan malvarmon en la unua nokto. Sur la forno, kiu samtempe estis kuirforno, mia edzino nun kuiris kafon, malfalsan kaj fortan, ĉar tio estis nia unua tendejo en la longa vico al Petropavlovsk kaj samtempe nia unua vintra tendejo. Antaŭe ni ĉiam uzis niajn japanajn krudsilkajn tendojn, sed ni timis, ke tia ne povus elteni en la neĝostormoj, kaj tial ni kunprenis la svedan por tiu vojaĝo.

Estis varme kaj agrable en la tendo, kaj oni povis sidi vestita kiel en ordinara ĉambro, skribi taglibron en kvieto kaj trankvilo ktp. Nur la maldika ŝtofvano apartigis nin de la malvarmo ekstera, sed tion ĝi faris bone, tiom longe kiom oni hejtis. Tuj kiam oni ĉesis hejti, fariĝis kiel ekstere.

Post kelkaj horoj estis tempo eliri por manĝigi la hundojn. La sledhundoj en Kamĉatko nur ricevas nutraĵon unu fojon en ĉiu tagnokto kaj ordinare en la vespero post finita laboro. Sed oni ne donu la manĝaĵon al ili pli frue ol kelkajn horojn post la fino de la laboro. Se ili ricevas la manĝaĵon tuj, kiam ili spiregantaj kaj lacigitaj atingis la celon de la taga vojaĝo, ili ja englutas ĝin same avide kiel pli poste, sed tiam ili ordinare elvomas ĝin. La nutraĵo de la tirhundoj tra la tuta jaro konsistas el precize la sama por ĉiuj manĝoj, nome salmo. Estas mirinde, ke ĝi povas vivteni sin per tiu senvaria manĝaĵo. Dum la vintro la plejmulto ricevas absolute nenion krom salmo kaj neĝo, la salmo ordinare sekigita kaj kelkfoje putra. Dum

la somero povas okazi, ke ili hazarde trovas raton aŭ ion alian, se ili okaze liberiĝus, sed tio estas malofta. Ĉiu hundo devas dum laboro havi tutan salmon ĉiutage.



Fojnŝarĝaĵo en Kamĉatko. (Fotis Eric Hultén.)

Ni kunportis en la sledo fiŝojn por kelkaj tagoj. Nome oni devas esti ĉiam preparita por neĝoŝtormo. Kiam mi aliris al la sledo, kaj la hundoj rimarkis, ke mi komencas elpreni la jukolon, ekestis terura tumulto. Ĉiuj hundoj estis malsataj kiel lupoj kaj ili bojis kaj ŝiris sovaĝe siajn ĉenojn. Agrabla laboro estas manĝigi ilin, kaj pli dankajn manĝogastojn oni certe ne povas trovi. La plej ordinara maniero estas, ke oni stariĝas meze inter ili kaj ĵetas po unu fiŝon al ĉiu hundo. Ordinare ili kaptas ĝin jam en la aero kaj englutas ĝin

en fenomene mallonga tempo kun ostoj kaj ĉio. Restas absolute nenio. Se hundo postlasus iom el sia porcio, ĝi estas malsana. Oni ĉiam devas ligi ilin tiel, ke ili ne atingas unu la alian, alie ekestas sangaj interbataloj por la manĝaĵo.

Post kiam ni ĝissate manĝis je kafo kaj ĵusbakita pano kaj jukolo, kiu estas la ordinara vojaĝa provianto kaj el sama speco por hundoj kaj homoj, ni enrampis en la dormsakojn. Kiel dirite, estis la unua vintra nokto, ke ni dormos sur la neĝo, kaj ni diris bonan nokton unu al la alia ne sen ia sciema animstreĉo, ĉu ni vekiĝos en la proksima mateno frostmortintaj aŭ ne. Ni havis la tendon proksimume tie, kie la kamĉatkanoj plej multe kriis pri lavangoj, kaj ni ankaŭ ekdormis kun espero, ke ni ne bezonos esti forviŝataj dum la nokto. Kredeble mi ne bezonas atentigi pri tio, ke oni kuŝas tute vestita kaj plue volonte surmetas ĉiom da unuopaj vestaĵoj, kiujn oni hazarde kunhavas.

La sorto estis al ni tre bona, kaj ni vekiĝis vivaj, eĉ se treege frost-rigidaj. La termometro en la tendo montris -22 gradojn C. Post kiam unu el ni sin oferis kaj elrampis la unua el la dormsako — vera "hundlaboro" en la malvarmego — kaj ekbruligis fajron en la forno per splitoj kaj ligno pretigitaj en la antaŭa vespero, ni havis ordinaran ĉambrotemperaturon post 20 minutoj kaj povis ĝui varman teon kaj la lastan freŝan panon.

Jen ni unue kunmetis la kuirilojn, jen la dormsakojn. Poste ni elĵetis la brulruĝan fornon en la neĝon, kie la maldika lado malvarmiĝis en kvin minutoj, ni malkonstruis kaj kunvolvis la tendon, kaj ŝarĝis ĉion sur la sledon. Post tio ni jungis la hundojn, alligis ilin al la tirŝnuro, kaj fine ni surmetis la skiojn. Se la hundoj estas bonaj kaj sufiĉe ripozintaj, ili ĉiam bojas pro fervoro kaj kuras kun vervo, kiam oni kondukas ilin al la sledo. Poste ili staras bojante kaj ŝirante la tirŝnuron, pro kio oni devas certe fiksligi la sledon, ĝis

kiam oni estos preta por starto. La vertago kaj Sera montris neni-an entuziasmon en ĉi tiu procedo, sed la aliaj estis viglaj, kiam ni komandis la startvorton "nuká".



Giganta maraglo.

Neĝis iom dum la nokto, tamen ne tiom, ke konsiderinde malhelpis. Tial la veturo iris sufiĉe bone en la komenco, sed diversloke la neĝo kunbloviĝis amase, kie la peza sledo fiksiĝis.

La pejzaĝo estis sovaĝa kaj bela. La altaj montoj ambaŭflanke de la rivero, estis kovritaj de betularbaro. Granda blankŝultra maraglo alflugis kaj eksidis sur maljunan arbon sur la montega krutaĵo rigardante nin. El ĝia alta vidpunkto ni certe aspektis kvazaŭ etaj formikoj, rampantaj antaŭen jen malsupre sur la neĝo.

Ofte ni devis helpi al la hundoj treni la sledon, kie la neĝo kunbloviĝis amase. Ni prenis la ordinaran tepaŭzon meze de la tago. En la krepusko mi ekvidis malproksime post ni kvar nigrajn punktojn, kiuj moviĝis en direkto al ni. Per la lorno mi povis konstati, ke estas hundsledoj. Mi konjektis, ke estas kvar japanaj oficiroj de la krozŝipo Iwami, kiuj vojaĝis de Petropavlovsk tra la lando al Ust-Kamĉatsk kaj nun estas revojaĝantaj. Ili alproksimiĝis rapide per siaj unuaklasaj hundoj, kaj post duonhoru ili nin atingis. Ĝuste estis la japanoj kaj ilia gvidanto. Ni renkontiĝis en Ust-Kamĉatsk, tial fariĝis halto ambaŭflanke. La japanoj sidis envolvitaj per tiom da peltaĵoj, ke nur kun plej granda peno ili povis sin movi. Ili vidis niajn skisulkojn kaj esperis renkonti nin. Kun japana ĝentileco ili esprimis sian admiron pri nia sentima decido traveturi Kamĉatkon per skioj, kion ili antaŭe kredis ŝerco, sed nun vidis seriozon. Precepe ili admiris "madame" kaj asertis, ke japana virino neniam povus elteni tiajn penadojn. Tion lastan mi ankaŭ kredas vera, ĉar la japaninoj ĝenerale estas fremdaj je ĉia sporto.

La japanoj ĝentile proponis al mia edzino anticipe vojaĝi per unu el iliaj sledoj, sed malgraŭ ke ŝi estis laca, ŝi rezignis tion favore por la hundoj. Anstataŭe ni transmitis kelkajn pudojn el nia ŝarĝo (1 pud=16 kg.) sur iliajn sledojn kaj plifaciligis tiamaniere la laboron al niaj hundoj. Ni disiĝis, interkonsentinte, ke ni renkontiĝos pli malfrue vespere ĉe la kamĉatkano Stepan Andrejanoviĉ, kies domon ni intencis "inundi" ĉiuj kune.

Fine ni trapasis la interkrutejon kaj venis en arbaran regionon.

Nun ni ankaŭ forlasis la riveron, kiu tie faras multe da kurboj, kaj enveturis en la arbaron por rekte tranĉi tiujn kurbojn. Nun ni povis sekvi la freŝajn postsignojn de la japanoj. Kiam ni disiĝis de ili, ni konjektis, ke restos dek verstoj al Kamaki. Sed ni laboradis antaŭen horon post horo, kaj neniuj vilaĝoj estis videblaj. La hundoj estis lacegaj kaj nur volis halti. Aspektis mallume en duobla senco. Subite montriĝis lumo tre malproksime, kaj kun ĝojo ni pensis pri teo kaj varmo, kiuj nin atendis. Sed kiel ni veturis kaj laboris, ni neniam proksimiĝis al la lumo. Tiam je unu fojo ĝi leviĝis super la arbopintojn, kaj je nia senlima malespero ni konstatis, ke estas stelo. Fine ni estis tute konvinkitaj, ke ni devos dormi ekstere ankaŭ en tiu nokto, kiam subite malproksima hundbojo aŭdiĝis. Sed estis jam la dekunua horo, kiam ni fine estis akceptataj de la komuna bojado de ĉiuj hundoj en la vilaĝo.

Ni enpaŝis al Stepan kaj trovis, ke li estas afabla, kamĉatkana maljunulo. Ankaŭ gastama li estis, kaj ni estis regalataj per teo kaj bonorda porcio da viando.

La japanoj ĵus ekkuŝis por dormi sur la planko en unu el la ĉambroj. Ĉe la kapkuseno ĉiu havis sian revolveron. Ĉar ili estis alvenontaj al Petropavlovsk konsiderinde pli frue ol ni, mi kaptis la okazon sendi per ili leteron al la kamaradoj.

Kamaki estis la unua efektive kamĉatkana vilaĝo, kiun ni renkontis, kaj ni restis la postan tagon por rigardi ĝin pli detale. De la vilaĝo oni havas liberan vidon al la granda Kluĉevskaja vulkano, kiu nun, kiam ni venis sepdek kilometrojn pli proksime al ĝi, kreskis je impona aperaĵo, kiu superregis la tutan regionon. Ekde la piedo ĝis la verto ĝi estis neĝokovrita, kaj la fumkolono kiel pinto altiĝis ĉielen. La alia granda vidindaĵo estis la estingiginta giganta vulkano Ŝiveljuĉ. Ĝi ne havas same noblan formon, kiel ĝia alta najbaro, sed

kuŝas tie kiel granda kaj senorda maso, disfendita kaj rompigiinta, terura monumento en lafo super la morto de giganto.



Kamĉatkanaj infanoj. (Fotis la aŭtoro)

Pri la vilaĝo mi ne perdos multajn vortojn. Ĝi estis precize simila al Niĵne Kamĉatsk kaj la ceteraj vilaĝoj kun malbone konstruitaj dometoj, balaganoj, longharaj bovinoj kaj sennombraj koleregaj hundoj. La lastaj en vilaĝo de 15 ĝis 20 dometoj kutime atingas la

nombron de du ĝis tri cent. Ĉiu vira individuo super 15 jaroj havas sian propran jungitaron de dek hundoj.

La plejmulto de la viraj vilaĝanoj forestis kiel ordinare dum la vintro. Ili estas en la arbaroj ĉasante zibelojn. Krom virinoj kaj infanoj nur la maljunuloj estis hejme. Ili kunhelpas je diversaj aferoj, sed prefere plejeble malmulte, ĉar ili estas tre maldiligentaj. Ofte ilia laboro estas limigita je tio, ke ili hejmen veturigas lignon kaj fojnon. Kontraŭe la virinoj ne devas esti mallaboremaj. Ili kuiras manĝaĵon, portas akvon, prizorgas la bestojn kaj faras entute ĉiun penigan laboron. Sur ilin ja ankaŭ falas la tuta pezo de la gastamo. Certe ne estas tre ĝojige kuiri manĝaĵon al domo, kiu ĉiam estas plena de gastoj, kiuj povas resti seninterrompe du semajnojn kaj pli, se la hazardo malice volas. Kaj kiam ili forvojaĝis, eble tuj venas novaj sledoj kun homoj. Se la gastoj jen ne estas bone regalataj en iu domo, baldaŭ tuta Kamĉatko tion scias. Sed estas la plej granda fiero de kamĉatkano, ke lia domo ofte estas vizitata de gastoj. Li volonte fanfaronas pri tio, kaj ofte mi aŭdis miajn kamĉatkanajn gastigantojn esprimi sin proksimume jene: "Mi havas gastojn sen interrompo dum la tuta vintro. Ili kuŝas tiel dense kiel salmoj sur mia planko en la noktoj, kaj ĉirkaŭ la domo ĉiam staras hundoj amase. Ne scias mi kial ĉiuj enloĝiĝas ĉe mi. Apud aliaj domoj oni malofte vidas hundojn." Certe li sciis same bone, kiel mi, ke ili enloĝiĝas ĉe li, ĉar li manĝigas ilin pli bone kaj havas pli grandan plankon.

La kamĉatkanoj ordinare sentis sin tre flatitaj, kiam ni enloĝiĝis ĉe ili. Estis pruvo de aprobo al iliaj bonaj manĝaĵoj kaj mastreco, kiam ĉe kamĉatkano loĝis "Expedizia", kio estis la kutima nomo de ni, ĉu ni aperis solaj aŭ pluraj kune. Kaj ve al ni, se ni je unu okazo enloĝiĝis en unu domo kaj je posta vizito en alia. Tiam la unua gastiginto ekestis ĝismorte ofendita. — Kion malbonan li povas esti

farinta, ĉar Expedizia ne volas loĝi ĉe li? Li ja havis freŝan ursvian-don kaj salmotrutojn kaj terpomojn je deserto. Kaj li ja donis nutraĵon al iliaj hundoj. "Kaj kial ili enloĝiĝas ĝuste ĉe Gregorij? Li ja kutime manĝas fiŝon kaj havas pli da blatoj ol ni. Mi tute ne scias, kion mi faris."

Tiajn ĉagrenojn oni povis eksciti, se oni pro ia kaŭzo ŝanĝis loĝejon je du sinsekvaj vizitoj. Ŝanĝi de unu domo al alia dum sama vizito en la vilaĝo estas nepenseble. Tiam la gastigintoj mortus pro ĉagreno. Tamen ni ne ŝanĝis loĝejon multfoje kaj neniam sen efektiva kaŭzo. Sed kiam oni ripetfoje ricevis teon kun cimoj kaj blatoj en la feĉo, tiam ni komencis paroli pri ŝanĝo.

La balaganoj en Kamaki estis el alia tipo ol tiuj, kiujn mi vidis antaŭe. Ili apartenis al tipo, kiun mi poste trovis la plej ĝenerala en la valo de la Kamĉatka rivero, sed kontraŭe forte diferenciĝis de tiu de la okcidenta marbordo. Unike por tiuj estas, ke la provizejo nur ampleksas parton de la supra areo de la surfosta konstruaĵo kaj ne la tutan kiel ĉe la okcidenta marbordo.

De Kamaki al Kluĉi, la granda vilaĝo ĉe la piedo de la vulkano, estis 60 verstoj. Kompreneble ni ne povis per niaj hundoj kaj kun nia peza ŝarĝo fari tiun veturon en unu tago. La plej mallonga vojo tien ne iras sur la rivero, kiu serpentumas en grandaj kurboj, sed tra tundroj kaj betularbaroj. Kiel ŝirmon kontraŭ neĝoŝtormoj oni konstruis du malgrandajn kabanajn por vojirantoj inter tiuj vilaĝoj. Tiaj kabanoj, kiuj troviĝas ĉi tie kaj tie inter malproksimaj vilaĝoj, ofte konsistas el ternestoj. Ili ĉiam estas nomataj "jurtoj", eĉ se ili transformiĝis je malgrandaj trunkdomoj. Antaŭ la rusa revolucio, kiam guberniestro kaj liaj oficistoj prizorgis la landon, ĉiu vilaĝo devis subtenadi certajn jurtojn, kaj en kelkaj lokoj, kiuj estis speciale elmetitaj al la neĝoŝtormoj, eĉ tien veturigi brullignon kaj jukolon. Nuntempe, kiam foriĝis la timo pro puno, neniu zorgas pri tiuj jur-

toj, kvankam ili estas same bezonataj nun kiel antaŭe. Kelkaj disputriĝis, aliajn oni pecon post peco dishakis je brulligno. Kelkaj malmultaj vilaĝoj, kiuj prudentiĝis, tamen subtenadas ilin. Ni esperis, ke ni povos tranokti en iu el la jurtoj sur la vojo al Kluĉi.

En brila sunlumo ni forlasis Kamaki kun hundnutraĵo por tri tagoj. La vojaĝo iris trans tundrojn kaj frostigintajn marĉejoj. Fojon post fojo ni fiksiĝis en profunda neĝo. Hedström kaj mi helpis al la hundoj antaŭenigi la sledon, mia edzino iris antaŭe kaj faris sulkojn per siaj skioj. Ni admiris la konvenecon de la kamĉatkaĵoj, kiam oni devis puŝi la sledon. Dum la paso de la tago ni renkontis du hundsledojn, kiuj venis de Kluĉi. Bonege! Ni ricevis veturitajn sledsulkojn. Kiam du sledoj tiel renkontiĝas en la dezerto, estas tute nepenseble, ke oni nur preterpasas unu la alian kaj daŭrigas. Se iu farus tiel, li certe estus rigardata frenezulo. Ne, ambaŭ sledoj haltas, kaj la du veturigistoj babilas iomete. Estas multo, kio povas esti interesa por scii. Antaŭ ĉio estas "Kuda?" kaj "Otkuda?" (Kien? kaj De kie?). Estas ja neeble daŭrigi la veturon, ne sciante, kien la renkontanto vojaĝos. Ĉu oni iros por ĉasi zibelon, ĉu oni trovis ursan neston, ĉu veturi por faruno, aĉeti pafilon aŭ ion alian interesan. La hundoj ordinare ekatakas sin reciproke, kaj faras tion senescepte, se oni ne minacas ilin per la ferpinta bremsbastono, la "ostol", ĝuste kiam oni renkontiĝas. Antaŭ ol oni haltas kaj babilas, oni ĉiam veturigas la du hundsledojn unu preter la alian, tiel ke la hundoj ne povas interbatali. Ambaŭ renkontantoj estis kamĉatkaĵoj kaj aspektis treege sovaĝaj kun siaj ventmorditaj vizaĝoj kaj vilaj felvestoj.

Vespere, kiam komencis krepuskiĝi, ni staris kun niaj hundoj kaj skioj meze sur granda tundro. Nigraj nuboj leviĝis sur la ĉielon, kaj estis necese trovi konvenan tendlokon. Sur la libera tundro ni ne povis havigi brullignon, tial ni devis pluiri. Malproksime neklare

videtiĝis malhela makulo, kiu en la lorno montriĝis malgranda alnarbareto. Tien ni direktis la veturon.

Sed estis malfacile por la hundoj elteni ĝis la celo. La vertago kaj Sera kompletigis la ĉagrenon, nun kiel multajn aliajn fojojn. Sera, la maljuna eluzita hundo, laboris bonorde maksimume dek minutojn post kiam ĝi estis punita kaj poste fuŝis, sed tiel lerte, ke daŭris longe ĝis kiam mi malkovris ĝin. Ĝi estis tiel ruza, ke ĝi iris kun la tirŝnuro, streĉita, sed ne tirante pli forte ol kiom estis necese por streĉi la ŝnuron. Sed tio ne estas sufiĉe. Kelkfoje ĝi ŝajnis tiel lerte, ke ĝi iris klinante sin malrekte, kiel faras hundo, kiam ĝi laboras tre forte. Sed kiam ni faris paŭzon, kaj ĉiuj aliaj hundoj estis senspiraj kaj anhelis kun la lango pendanta el la buŝo, ĝi spiris kviete kiel post ordinara promeno, Pri la vertago ni ne parolu. Ni tamen decidis mortpafi ilin ambaŭ, kiam ni alvenos al Kluĉi, kaj havigi du pli bonajn. Ili tute detruis al ni la paciencon, kaj mia edzino diris, ke Al neniam kredis, ke mi povus diri tiom da malbelaj vortoj, kiom mi faris, kiam mi ĉiun duan tagon gvidis la hundojn. Sed mi konsolis min, ke ankoraŭ estas nedecidite, kiu estis la unua en tiu rilato, ĉu Hedström aŭ mi.

En la alnarbareto ni ripetis la saman tendmanovron kiel ĉe la rivera trafluejo kaj travivis ankaŭ tiun nokton. Tamen ni havis la malĝojon vekigante trovi pli ol unu futon da nova neĝo, kio estingis la esperon atingi al Kluĉi antaŭ la vespero. Kiam mi eliris en la mateno, nenio estis videbla de la hundoj. Ĉiuj estis malaperintaj, sed mi sciis, kie mi ilin havas. Kiam mi vokis ilin, la neĝokovraĵo ĝibigis en ok lokoj, kaj svingante la voston ili deskuis al si la neĝon. La hundoj ĉiam fosas al si kavaĵon, kiam ili ekkuŝas por dormi. Jen ne estas bezonata tre multe da neĝo, por ke ili estos tute entombigitaj. Estas al ili varme kaj agrable sub la neĝo kaj ili sin ŝirmas kontraŭ la glacia vento.

Baldaŭ ĉio kuŝis sur la sledo, la hundoj estis aljungitaj kaj la skioj surestis. Sed la hundoj ekhavis severan penon por antaŭenigi la sledon en la profunda neĝo. Hedström estis en vico veturigi. La leganto tute ne kredu, ke tio estis la plej facila. Kontraŭe. Kiu veturigis, tiu havis duoblan penon ol la aliaj. Li havis veran "hundlaboron" en duobla senco. Krom tio ke li neniam povis sidi sur la sledo, kiu estis tre peze ŝarĝita, li devis ripetfoje puŝi la sledon, evitigi ke ĝi renversiĝu, malimpliki la hundojn, kaj krome krei ĝis raŭkiĝo al la plej maldiligentaj. Certe ekzistas malmultaj aferoj, kiuj tiom tentas la paciencon, kiom veturigado per malbonaj hundoj. En la proksima vilaĝo la jungitaro devos esti plibonigita per du bonaj bestoj, pri tio ni estis firme decidintaj. Ĉia honoro al la bona Hatasawa, sed li estis ĝisfunde trompita de siaj rusaj konatuloj. Meti hundojn ankaŭ estas inter la plej malfacilaj aferoj, kiujn oni povas entrepreni. Se oni aĉetas unuope, oni preskaŭ senescepte estas trompata. Kompreneble oni tiam ricevas la plej malbonan, kiun havas la vendanto. Se oni kontraŭe aĉetas tutan jungitaron en unu fojo, oni ĉiam havas ŝancon ricevi almenaŭ kelkajn bonajn hundojn. Neniu "kajur", gvidanto, nome povas daŭre elteni posedante malbonajn tirhundojn, kaj se li vendas sian tutan jungitaron, kun plej bona volo li ne povas trompi la aĉetanton pri ĉiuj.

La pejzaĝo konsistis plejparte el tundroj, alterne kun malgrandaj salikaj kaj alnaj arbaretoj. Subite la silenton rompis sono, kiun oni tute ne atendus ekaŭdi en tiu dezerta montega kaj tundra regiono. Estis la sono de la kancigno. Ĝi venis el la aero. Mi baldaŭ ekvidis la cignojn el kiuj ok malleviĝis sur la tundron. Ke ili ne metiĝis sur la neĝon, mi estis tre certa. Devas troviĝi iu senlacacia akvo tie. Mi kuris tien per skioj kaj trovis senlacacian branĉon de la Kamĉatka rivero. En ĝi kuŝis minimume kvindek kancignoj. Vere estis strange vidi la blankajn birdojn en tiu neĝa pejzaĝo. Ili tre bone akordis kun

la neĝo ĉirkaŭ ili. Kiam ili ekvidis min, la koloj rektiĝis kvazaŭ bastonoj, kaj ili naĝis tien kaj reen. Mi alproksimiĝis ankoraŭ pli. Tiam unu post unu komencis leviĝi de sur la akvo, longe vipante per la flugiloj la riveran surfacon, antaŭ ol ili povis levi la pezan korpon. Fine ĉiuj, krom la plej sentimaj, flugis en la aero. Tiuj lastaj fornaĝis. Estiĝas brua vigleco, kiam ĉ. 50 cignoj ekflugas. En grandaj cirkloj ili flugis super la tundro kaj la rivero per malrapidaj flugilmovoj kaj malleviĝis denove sur la akvon je kelkaj verstoj pli malproksime.

Sed la cignoj ne estis solaj sur la rivero. Kelkaj anasaroj ankaŭ forleviĝis. Estis klanguloj kaj sovaĝaj anasoj. Tiuj birdoj kun ankoraŭ unu, la mergeto, travintras en Kamĉatko en tiaj vintre neglakikovritaj riveroj. Ili ne timas la mordan malvarmegon, sed restas dum la tuta vintro. La akvo ne frostiĝas depende de varmaj fontoj, kiuj enfluas en la riveron. Ĝi ne frostiĝas, eĉ se la temperaturo estas sub -40 gradoj C.

Du agloj sidis sur gigantaj poploj apud la rivero, kaj nikteo silente forŝvebis de la loko. Ili certe havas bonegan motivon restadi ĉe tiaj riveroj.

Mia edzino kaj Hedström nun estis tre malproksime kun la sledo, ĉar mi diris al ili, ke ili ne atendu por mi. Mi ofte kutimis fari malgrandajn ekskursojn, kiam estis io interesa por rigardi kaj mia ĉeesto ne estis necesa. Baldaŭ mi tamen reatingis ilin. Ni decidis fari la tepaŭzon, tuj kiam ni estos trapasintaj la tundron pro tiu simpla kaŭzo, ke ekzistis sur ĝi nenia brulligno. La arbaron ni vidis ĉe la horizonto dum la tuta tempo, sed kiel ĉiam, kaj antaŭe kaj poste, la tundro estis pli grandspaca, ol oni kredis. Nur posttagmeze ni atingis la sopiratan arbaron, kiu en Kamĉatko tiel ofte estas la savo dum la vintraj vojaĝoj. Se oni nur atingas la arbaron, multo estas gajnita. En neĝoŝtormo ĝi ĉiam donas ŝirmon. La forto de la ventego

estas rompita, kaj la malvarmego ne tiel akre mordas tie interne. Kaj antaŭ ĉio oni povas havigi brullignon por varmiga fajro.

Apenaŭ ni atingis la arbaran randon, kiam ni ektrovis malgrandan nefrostiĝintan rivereton, kaj tie ni haltis por tekuirado. Estas agrable havi teakvon tuj kaj ne bezoni degeligi neĝon.

Kiam ni denove ekiris post la tepaŭzo, la hundoj estis pli ol ordinare viglaj. Eĉ la vertago kaj Sera, la du pendigindaj kanajloj bonvolis tiri bonorde. Ni preskaŭ kuraĝis esperi, ke ili subite decidis komenci novan vivon de laboro kaj plenumo de siaj devoj, kio verdire ne estus tro frue. Sed ne estis tiel bone. La kaŭzo estis tute alia. Ili flarsentis kamaradojn kaj putran salmon en la proksimo. Efektive post dekminuta vojaĝo tra la arbaro tute neatendite nin renkontis multe da hundbojoj kaj malgranda trunkdomo.

El tiu eliris maljuna ventmordita aĝulo, vestita per boacfelaj botoj kaj lia kapo estis kovrita per vila ĉapo el vulpfelo. Estis la maljuna ĉasisto Vasilij, kiu pli ol 20 vintrojn loĝis en tiu jurto. Li estis konata en la tuta valo de la Kamĉatka rivero kiel la plej lerta vulpĉasisto. — Li nome specialiĝis je vulpo kaj neniam ekiras por ĉasi zibelon. La tutan vintron li pasigis en tiu jurto, kiu situas eksterordinare bone por lia celo. Nome ĝi kuŝas tute apud sistemo de vintre nefrostiĝintaj riveroj kaj kanaloj, kie anasoj kaj cignoj estas multnombraj. Kaj ĉi tie vulpoj ĉirkaŭvagas en la vintro, embuskante por la birdoj. Sed la maljuna ĉasisto, kiu dediĉis sian vivon al vulpkaptado, scias la arton trompi tiujn ruzajn bestojn. Tion oni povis vidi en liaj ruzmienaj okuloj. Ili aspektis same ruzaj kiel tiuj de lia ruĝa ĉasaĵo, sed ekbrilo de bonhumoro kaj boneco ankaŭ lumis el ili. Ni tuj amikiĝis. Interne de la kabaneto estis varme kaj agrable, kaj la teakvo boladis sur la forno, kiu estis precize egala al la nia, nur iom pli granda. Estis dia sento enveni en varman ĉambron, kaj la maljunulo ne ŝajnis malĝoja pro nia vizito. Li ĉiam havas teakvon preta

al ĉiuj pretervojaĝantoj, kaj ĉiuj estas bonvenaj. Ke ni ĵus trinkis teon, ne malebligis ke ni malplenigis ankoraŭ kelkajn duonlitrajn tasojn. En Kamĉatko oni povas trinki kiom ajn da teo, kaj se oni eniras en iun dometon nur por prizorgi urĝan aferon kaj montras intencon tuj foriri, oni ofte renkontas la esprimon: "Bess ĉaj nilŝa." (Sen teo neeble.) Figure parolite la tekruĉo aŭtomate ŝoviĝas super la fajron, kiam oni malfermas la pordon, se ĝi ne staras jam tie.

Nu, tie ni do sidis babilante kun la maljunulo ĉe la vaporiĝanta teo. Mi kredas, ke mi forgesis mencii, ke apartenas al bona konduto ĉe la tablo, trinki la teon kiel eble brulvarmega. La kamĉatkanoj estas fenomenaj tiurilate. Kiam ni interfratiĝis iom kun la amiko Vasilij, li komencis miri, kiaj homoj ni efektive estas. Li aŭdis laŭ nia rusa parolo, ke ni ne estas rusaj. Tute subite li demandis, ĉu ni estas "amerikanski". Kiam ni neis tion, li konstatis duonlaŭte por si mem, ke ni ne estas ĉinoj nek japanoj nek koreanoj. Li faris sensukcesan provon nomante nin tataroj ja sen ia intenco ofendi — kaj tiam jam elĉerpis siajn konojn pri la popoloj de la mondo. Kiam ni poste rakontis al li, ke ni venas de lando, nomata Svedlando, tio ne tre interesis lin, ĝis kiam mi rakontis, ke troviĝas vulpoj ankaŭ tie. Sed tiam la maljunulo ekflamis pro fervoro, kaj mi devis rakonti longan historion pri la vulpoj hejme en Svedlando kaj kiel oni ĉasis ilin. Kiam mi plue rakontis, ke ankaŭ mi pafis kelkajn vulpojn, mi plivaloriĝis rimarkeble en lia estimo, kaj li eksplikis la ĉefajn trajtojn de sia metodo. Li neniam pafis vulpon, sed ĉiam kaptis ilin per salmo. Por mem ne fari postsignojn en la neĝo, kiam li elmetis la salmojn, li uzis sian kanoton, faritan el kavigita popla trunko, kaj ĉirkaŭpadelis laŭ la riverbranĉoj kaj elmetis ilin sur la bordoj, kie la vulpoj volonte vagas embuskante por la birdoj. Li ankaŭ instruis al ni kelkajn sagacajn artifikojn, kiel oni pretigu ilin por ke la vulpo ne suspektu ruzon de satano. Kiam la interparolado pri la vulpĉaso

estis finita, mi sentis min feliĉa ne esti vulpo en tiu riversistemo. La maljuna ĉasisto havis du knabojn, kaj dum ni interparolis, tiuj envenis kun du leporoj. Ili ĵus esploris la kaptilojn. Cetere tiuj du iris en la vulplernejo de sia paĉjo.

Ni decidis resti ĉe la maljunulo ĝis la sekvonta tago, kaj tio estis feliĉa decido, ĉar mallonge post la mallumiĝo denove aŭdiĝis la nuntempe tiel bone konata por ni terura muĝo, de la proksimiĝanta neĝoŝtormo.

Pli poste en la vespero mi sukcesis riĉigi la kolektojn per deko da malgrandaj roduloj kaj kvar sorikoj. Kiam mi metis ilin en miajn alkoholajn konservujojn la maljunulo ne povis ne esprimi sian malkontentecon pri mia maniero misuzi la alkoholon.

Vespere ni ekkuŝis sur la planko kaj plenŝtopis la fornon per ligno. Antaŭ ol la maljunulo sternis sian dormsakon, li plenumis ian familian preĝon antaŭ la eta ikono en la plafonangulo, ripetfoje faris la krucsignon, kliniĝis kaj elparolis kelkajn nekompreneblajn vortojn. Mi vekigis kelkajn fojojn dum la nokto pro malgrandaj sorikoj, kiuj kuris trans mian vizaĝon. Ili tamen estas multe pli simpataj ol la cimoj, kiuj alie kelkfoje ĝenis la dormon, tamen ne tiel ofte, kiel oni povus atendi.

Matene estis la sama senespera vetero, kiel en la antaŭa vespero. Se oni elŝovis la kapon tra la pordo de la jurto, oni fakte ricevis frapon en la vizaĝon de la purgo. Sed dum la antaŭtagmezo ĝi kvietiĝis, kaj mi ĝuste preparis min por ĉasekskurso per la kavigita trunko de la maljunulo kun la knaboj kiel remistoj, kiam ĉiuj hundoj subite ekbojis, kaj tri hundjungitaroj alkuris al la jurto de la sama direkto, de kiu ni venis. Estis du ĉinoj kaj unu tatara, tri malfeliĉaj mizeruloj, kiuj aspektis altgrade kompatindaj. Ili estis el Ust-Kamĉatsk kaj ili forlasis Kamaki la antaŭan matenon esperante ke ili atingos tiun jurton en la vespero de la sama tago. Sed meze sur la

tundro la purgo trafis ilin, kaj ili sidis kvazaŭ alnajlitaj, post kiam ili ĉirkaŭvadis dum iom da tempo vane serĉante la vojon. Sed plej malbonŝance nur unu el ili havis dormsakon. Ili havis tendon, sed ili ne kapablis starigi ĝin sur la tundro en la ventego, kaj ili pasigis la nokton kuŝante kune sur la neĝo kun la tendo sternita super si kaj kun la sledoj kiel ventŝirmilo. Ke ili ne mortfrostiĝis, estis miraklo. Sed la du ĉinoj ne estis tre vivaj. Ili estis tute frostrigidaj kaj fariĝis tiel raŭkaj, ke ili apenaŭ povis eligi iun sonon. Ni prizorgis iliajn hundojn, kaj ili mem kuregis rekte al la forno, kie la teakvo estis tre oportuna. Ili vigliĝis post kelkaj tasoĵ da bolanta teo, kaj tuj kiam mi certiĝis, ke estas nenia priviva danĝero, mi startis kun la du knaboj de la vulpĉasisto.

Per lertaj manoj ili padelis senbrue la longan kaj mallarĝan kanton tra serpentaj fluejoj kaj riverbranĉoj kun kristale klara akvo. Nur tie sur la akvo oni povis vidi, kiel potenca estas la neĝotavolo, kiu kovras la teron. Ĝi estis proksimume du metrojn profunda kaj volviĝis en la plej molaj formoj ĉirkaŭ la turniĝantaj kanaloj. Kiam la rivero ie kurbiĝis, ni subite ektrafis kelkajn klangulojn aŭ mergojn, kiuj duonfrenezaj pro timo ekflugis, kaj per la pafilo mi mal-suprenigis kelkajn. Dum pluraj horoj ni glitis senbrue en nia trunco. Ni refoje suprenpelis la kantcignojn kaj la agloj forlasis siajn arbopintojn.

Vespere estis malvaste en la kabano. Ni estis naŭ, sed malgraŭ ke ni reprezentis kvar diversajn popolspecojn, la harmonio estis tre bona. Dum ni vespermanĝis, sekigitan ursviandon kaj jukolon, la ĉinoj rakontis pri siaj antaŭaj hundaventuroj en Kamĉatko, kiam ili kaptiĝis en neĝoŝtormo kaj la manĝaĵo elĉerpiĝis por ili mem kaj por la hundoj, kiel ili estis devigitaj manĝi hundviandon kaj aliajn aventurojn samspecajn. Gajaj kiel infanoj ili estis kaj ridis tiel, ke ĉiuj 32 dentoj estis videblaj, kiam ili rakontis ion gajigan. La ĉinoj

estas unika popolo. Ili traartifikas sin ĉie kaj estas ĉiam feliĉaj, se ili nur povas labori. Mi admiras kaj estimas ilin. La nokton ni pasigis kiel anĉovoj en skatoletoj.

La posta tago estis brile bela. Morda malvarmo ja estis, sed blua ĉielo kaj neniuj vento. Pli bonon oni ne povas deziri. Ni do ĉiuj interkonsentis, ke ni startu tuj post la matena teo. De tiu jurto la vojo al Kluĉi estas 20 verstojn longa kaj iras dum la tuta tempo tra arbaro. Ni, kiuj estis kurontaj per skioj, kompreneble ne povis pripensi akompani la ĉinojn kaj la tataron. Sed ni havis la paŝosignojn de iliaj 30 hundoj kaj tri sledoj, kiujn ni povis sekvi, kaj pro tio mi estis ĝoja, ĉar alie ni devus mem plugi novan vojon en la profunda neĝo.

En la betularbaro ni faris novan konatiĝon kun birdo. Estis la surnio (*Surnia ulula*). Mi aŭdis ĝiajn logsonojn de pluraj lokoj en la arbaro, kaj ni sukcesis meti du ekzemplerojn al niaj kolektoj. Eta pego de la plej malgranda speco (*Dryobates minor immaculatus*), rimarkeble pli blanka ol nia sveda kaj nur ekzistanta en Kamĉatko, devis akompani la surniojn sur la longa vojo al la sveda Riksmuseet (Ŝtata muzeo naturscienca).

Inter la betuloj nun je la unua fojo komencis unuope aperi larioj (*Larix dahurica*), antaŭsigno de la densaj larikarbaroj, al kiuj ni pli poste alvenos. Ĉi tie troviĝis etaj sitoj (*Sitta europæa albifrons*); kaj pompa urogalo (*Tetrao parvirostris kamtchaticus*) forleviĝis kun granda krakbruo. Ĉiuj hundoj bojante ekpostkuris ĝin kaj tute forĝesis, ke ili estas tirbestoj. Feliĉe la sledo frapiĝis kontraŭ arbo kaj renversiĝis. Alifoje oni povas sperti malagrablaĵon, kiam la hundoj ekvidas ĉasaĵon. Se ili sur libera tundro subite ekvidas kurleviĝantan leporon kaj oni hazarde elslediĝis por ion aranĝi, ili ekkuregas kun la sledo galope, komplete ignorante ĉiujn vokojn. La ĉasado povas daŭri, ĝis kiam oni nur vidas ilin kiel nigran punkton en la malprok-

simo, kaj tiam oni nur povas esperi ke la sledo renversiĝos. Neni- am okazas, ke ili revenas kun la sledo, kiam ili tiel forkuris. Oni tiam devas bele promeni post ili, kio ne estas tre amuze, se oni surhavas sian pezan duoblan vojaĝpelton.

La teakvon ni boligis sur la ardaĵoj de la ĉinoj, t. e. la fajro an- koraŭ ne estingiĝis post ili.

De temp al tempo oni tra malfermaĵo en la arbaro havis ekvidon al Kluĉevskaja, kiu dum la lastaj tagoj estis kaŝita de neĝodensaĵo kaj nuboj. Ĝi nun leviĝis ĝis fabeleca alto. La fumo supreniĝis ver- tikale.



*Kluĉevskaja Sopka, la plej granda vulkana konuso en la mondo,
4916 m. super la maro. (Fotis René Malaise)*

Pli poste dum la tago ni renkontis kamĉatkanon, kiu veturis per senenhava sledo. Li veturis por brulligno. Ni sekve devis esti prok- sime de la vilaĝo. Kaj tute ĝuste: ĝi komencis aŭdigi. Kiam ni nun

sentis nin certaj pri alveno, ni efektivigis nian decidon forsendi la plej malbonajn hundojn al la elizeaj ĉasejoj. Ili apenaŭ meritis la manĝaĵon, post kiam ni forlasis Ust-Kamĉatsk, kaj pli malhelpis ol progresigis la antaŭeniron. Hedström liberigis ilin de la jungitaro, kaj mi pluveturis. Post kelkaj minutoj du pistolpafoj tranĉis tra la aero, kaj la du bestoj estis entombigitaj en la profunda neĝo. Sera estis vera kamĉatka hundo, kiu penegis kaj laboradis dum sia tuta vivo. La vertago venis sur malĝustan lokon en la vivo. Paco al ilia memoro.

Ne daŭris longa tempo, ke ni komencis vidi la domojn de la vilaĝo. Nia loĝejo estos ĉe la ruso Gribov. Lia domo estis unu el la unuaj en la vilaĝo, kaj mi povas aserti, ke tie ni estis bone akceptataj kaj regalataj per kafo anstataŭ teo kaj per freŝaj bulkoj anstataŭ sekiĝita salmo kiel almanĝaĵo. Lia edzino aranĝis grandan bakadon por nia alveno, kiun ŝi atendis jam multajn tagojn. Trinkinte kafon ni rapidis eksteren por rigardi per la lornoj la plej altan vulkanan konuson de la mondo. Ĝi kuŝas ĉirkaŭita de vico da montegoj kaj vulkanoj, kiuj ankaŭ estis tre imponaj, sed ilia grandeco kuntiriĝas ĝis neniom apud Kluĉevskaja. Mi ne provos priskribi ĝian belecon. Mi tamen ne povus doni pli ol palan imagon pri ĝi. Se oni unu fojon vidis ĝin de Kluĉi baniĝantan en sunbrilo kun sia tuta blanka beleco, tiam oni neniam forgesos la bildon, kiom ajn longe oni vivos.

En Kluĉi ni decidis resti kelkajn tagojn. Hedström havis sufiĉe da birdoj preparotaj, kaj mi devis fari kelkajn preparajn aranĝojn por la somero, ĉar mi intencis ĉi tie havi la ĉefan restadejon dum parto de tiu.

Kluĉi estas unu el la plej grandaj vilaĝoj de Kamĉatko. Ĝi havas ĉ. 500 loĝantojn, plejparte miksitajn kamĉatkanojn, sed ankaŭ multajn rusojn, ĉinojn kaj koreanojn. Sufiĉe multaj tataroj kaj aleutoj ankaŭ loĝas tie. Ĝi havas sufiĉe grandan preĝejon kaj estas tre bele

situanta ĉe la piedo de la vulkano. La Kamĉatka rivero fluas neĝovrita de glacio dum la tuta jaro, ekster la vilaĝo, tiel ke oni povas fiŝkapti dum la tuta vintro.

Kluĉi estas la plej grava komerca loko interne de la lando. La fela komerco en la tuta Kamĉatka valo havas sian sidejon tie. Pluraj grandaj felfirmoj havas deponejojn en la vilaĝo. La plej grandaj estas "Hudson Bay Company" kaj "Olaf Swenson Co". La lastan posedas svedo-amerikano kun tiu nomo. Lia nomo estas konata kaj respektata en ĉiu kabano en la tuta Kamĉatka duoninsulo. En ĉiu jaro Swenson venas de Seattle per sia ŝipo, ŝarĝita per ĉio, kio estas imagebla por la bezonoj de Kamĉatko. Parto de la ŝipo estas vera butikoj, kie ĉio estas aĉetebla. Kaj kiam la indiĝenoj envenas en tiun, ili volonte aĉetas ĉion, kion ili vidas, t. e. tiom, por kiom sufiĉas iliaj feloj. La felojn — zibelajn, vulpajn, lutrajn, ursajn ktp. — taksas Swenson, kaj poste la ĉasistoj povas aĉeti kiel en ordinara butikoj. Ili havas grandan emon superi sian pagkapablon vidante ĉiujn belajn objektojn, kiujn Swenson kunportis de Ameriko kaj kiuj tute ne konsistas el nur pafiloj, kartoĉoj kaj kaptiloj. En la naĝanta vendejo oni povas aĉeti ĉion inter tero kaj ĉielo, de motorboato ĝis kudrilo, de maĉgumo ĝis rikoltmaŝinoj. Sufiĉe solventaj aĉetantoj ricevas krediton ĝis mirige grandaj sumoj. Ili ĝoje vendas la felon de la urso, antaŭ ol ĝi estas pafita.

Tiamaniere Swenson iras de loko al loko ĉirkaŭ la bordo. La famo pri lia alveno disvastiĝas kun granda rapideco kaj ĉiam alvenas antaŭ li. En pli eminentaj lokoj, kiaj Ust-Kamĉatsk, li elŝarĝas grandajn kvantojn da varoj, kiujn poste liaj lokaj agentoj distribuas kaj ŝanĝas por feloj. Kiam li en tiu honesta maniero "senfeligis" Kamĉatkon, li daŭrigas supren al la Anadyr- kaj Ĉukĉolandoj. Se permesas la tempo, li faras rondveturon al la polusmara bordo kaj revenas en la malfrua aŭtuno al Seattle, malplena je varoj sed kun milion-

valoroj el felaĵoj. La tutan tempon dum la vojaĝo li igas sin informata pri la fluktuantaj mondprezoj sur la fela merkato per sia propra "senfadena".

Post tiu deflankiĝo ni estas pretaj por rigardi tiun motorboaton, kiu transportas la varojn de Swenson al la vilaĝo. Ĝi kuŝas superneĝita apud alia tia, cetere konkuranta boato, sed nia mastro, kiu estas maŝinisto sur unu, rakontas, ke ambaŭ estas provizitaj per svedaj motoroj, Bolinder kaj Atlas. Ili ricevis treege bonan ateston pri longedaŭra kaj fidela servo. En tiu konekso oni povas menci, ke la motorboatoj ĉe la grandaj konservajaj fabrikejoj apud Ust-Kamĉatsk grandparte estas provizitaj per svedaj motoroj.

En tiel granda vilaĝo kiel Kluĉi ĉiam estas vigla vivo. Hundsledo venas kaj iras en ĉiuj direktoj. Jen startas komercisto por longa vojaĝo kun la sledo plena de varoj, jen kamĉatkano hejmenigas brullignon el la arbaro aŭ veturas kun granda fojnŝarĝo, tirata de dek hundoj. Ĉasistoj venas hejmen de ĉasado je ursoj aŭ montŝafoj, kun la sledoj ŝarĝitaj per viando kaj feloj. Sur la dommuroj gigantaj ursfeloj estas alnajlitaj por sekigado.

Dum vizito ĉe rusa familio, en la vilaĝo mi ricevis pluan pruvon, ke la tero estas pli malgranda ol oni ĝenerale supozas. Mi sidis foliumante sen intereso fotografajan albumon, kaj subite mi preskaŭ falis de la seĝo pro miro trovante la portreton de unu el miaj amikoj kaj studentkamaradoj en Stockholm. La mistero ricevis sian simplan klarigon de la mastrino, kiu estis el Finnlando kaj parenco lia.

En la pasinto mi intence evitis paroli pri politiko, ĉar mi opinias, ke tia mizeraĉo ne apartenas al Kamĉatko. Sed ĉi tie en Kluĉi, samkiel en ĉiuj aliaj pli grandaj vilaĝoj, la rusoj rebaptis la malnovan honorindan vilaĝan konsilantaron kun ĝia "starosta" (plejaĝularo) je "Kluĉia Revolucia Komitato" kaj devigis la kompatindajn

kamĉatkanojn, kiuj eĉ ne scias, kio estas revolucio, hisi ruĝajn flagojn sur siaj domoj. La tago post nia alveno al la vilaĝo estis festotago, kaj lumis ruĝe sur ĉiuj dometoj. Fariĝis stranga kontrasta efekto kontraŭ la neĝoblanka, fumiĝanta vulkano.



Nia eta ursido faras promenon. (Fotis la aŭtoro)

Dum nia vizito en Kluĉi mi pligrandigis la kolektojn per stranga blua formo de la asturo. Sed ni ankaŭ havigis vojaĝan akompananton de tre neordinara speco. La tagon antaŭ nia starto kelkaj kamĉatkanoj revenis de ursĉasado. Ili mortpafis gigantan ursinon en la ternesto kaj tie trovis du etajn ursidojn, kiujn ili kunportis hejmen. Unu mortfrostiĝis survoje de la arbaro, sed la alia vivis. Ĉino alvenis kaj raportis la okazaĵon. Mi aĉetis la kuriozan etan figuron, al kiu ankoraŭ iom ŝanceliĝis la piedoj. Ne strange, ĉar ĝi la saman tagon venis el la sovaĝejo per hundsledo. Ĝi ankoraŭ estis tiom mal-

granda, ke ĝi nur trinkis lakton. Ĝi tuj lernis trinki el botelo. Mi decidis provi konduki ĝin viva al Petropavlovsk kaj havigis saketon el boaca felo, en kiun ĝi laŭte protestante estis metata. Kiam mi demandis al la ĉirkaŭe starantaj kamĉatkanoj, ĉu ili kredas, ke ĝi eltenos dum eble tutmonata vojaĝo en tiu malkomforta maniero, ĉiuj unuvoĉe respondis "jes" en la plej konvinka maniero. Ĝi ankaŭ poste montriĝis la plej nemortema besto, kiun mi povis imagi, kvankam ĝi ne estis pli granda ol kato.



La ursido kaj la hundo Kuma estis bonaj amikoj. (Fotis la aŭtoro)

La zibelĉaso

En Kluĉi, samkiel en ĉiuj aliaj vilaĝoj, kiujn ni trapasis, la plej multaj viroj forestis por ĉasi zibelon.

La vivrimedoj de la kamĉatkanoj estas ĉaso kaj fiŝkaptado. Lastatempe ankaŭ bredado de hejmaj bestoj komencadis iĝi pli grava.

La ĉasado precipe koncernas zibelon, urson, vulpon, lutron, ermenon, plue sovaĝajn boacojn kaj montŝafojn. Por amuzo oni ĉasas leporon kaj marmoton. Gulon kaj lupon oni ĉasas, kiam oni ilin hazarde trovas.

Inter la supre menciitaj bestoj la zibelo estas la plej grava. Post ĝi venas la urso. Zibelo kaj salmo estas la Alfa kaj Omega de Kamĉatko. Sen ili la lando estus loĝata nur de la boacbredantaj nomadpopoloj. Tiuj du bestoj ankaŭ allogis tien supren tiom da rusoj kaj aliaj popoloj kaj igis ilin spiti severan kaj negastaman klimaton. La zibelo ja allogis la ŝipojn de Swenson kaj de la aliaj grandaj felfirmoj, kaj kaŭze de la zibelo la motorboatoj somere trenas pramojn, ŝarĝitajn per ĉiuspecaj varoj, supren laŭ la Kamĉatka rivero.

Estas mirinde, ke la mastrumado de preskaŭ tuta lando povas dependi de tiu malgranda besto, kies felo estas pure luksa artiklo. Vintre oni apenaŭ parolas pri io alia ol zibelo. Sennombraj t. n. "mjelkija kommersanty" (malgrandaj komercistoj) tiam vojaĝas tra la lando laŭ ĉiuj direktoj per siaj hundsledoj, ŝarĝitaj per la plej nerezisteblaj varoj, kiel gramofonoj, poŝspeguloj, sinjorinaj ŝuoj kun altaj kalkanumoj, tabako, alkoholo, bombonoj, sukero, maĉgumo kaj ŝtofaĵoj. Kelktempe tiuj malgrandaj komercistoj povas esti

tiom multnombraj, ke ĉiu domo de negranda vilaĝo loĝigas la sian. Granda procento el ili estas ĉinoj, kaj tiu popolo, unika kaj difavorata pri komerco, kolektas multajn zibelfelojn inter la ĉasistoj. Granda parto de tiuj ĉirkaŭvojaĝantaj felkomercistoj estas agentoj de la grandaj societoj, sed multaj laboras por si mem.



Kamĉatkanaj zibelĉasistoj. (Fotis la aŭtoro)

Oni povas diri ke la zibelo estas la monunuoj en Kamĉatko. Ĉiuj komercoj estas likvidataj per feloj, la sola pagilo, kiun havas la indiĝenoj. Komence ĉiam sonis al mi kurioze, kiam la kamĉatkanoj demandis kiom da zibeloj niaj pafiloj kaj lornoj kostis, sed poste mi tiel al kutimiĝis, ke mi neniam pensis pri tio. Iun fojon mi vidis, kiam kamĉatkano aĉetis kanoton de najbaro. Li pagis unu zibelan felon

kaj rericervis vulpan felon kiel ŝanĝmonon. En lernejo de unu el la vilaĝoj la jarkotizo por knabo estis unu zibela felo kaj por knabino unu vulpa felo. Preskaŭ ĉiuj komercoj en la lando tiel estas likvidataj per feloj.

Pro tio povas esti interese pli detale ekkoni, kiel la kamĉatkanoj akiras sian monon, t. e. la multekostaj feloj, kiuj poste estas distribuataj tra la mondo por fine resti en la elegantaj salonoj de la urbejoj.

La zibelo estas mustela besto proksimume samgranda kun sveda mustelo kaj vivas en betul- kaj pinglarbaroj. La kamĉatkanoj ĉasas la zibelon ekde la malfrua aŭtuno, post kiam la neĝo falis en oktobro, ĝis en la monato de marto. La aŭtuna ĉasado, kiun oni entreprenas, antaŭ ol falis profunda neĝo, ordinare okazas surĉevalo, almenaŭ en la valo de la Kamĉatka rivero. Oni tiam ekiras kun ĉiuj necesaj iloj: pafilo, skioj, tendo, provianto, kaptferoj ktp., ĉio ŝarĝita sur la sama ĉevalo, sur kiu oni mem sidas. La kamĉatkanoj ne ĝenas sin ŝarĝante 4 ĝis 5 pudojn krom si mem sur la rajdbesto, kiu nur estas nerimarkeble pli granda ol islanda ĉevalo. Unu aŭ du zibelhundoj akompanas la ĉasantaron. Oni nun ekiras al regiono, kiu ĉiam kuŝas multtagan vojaĝon de la vilaĝo, ofte unu- aŭ du-semajnan vojaĝon. Tie oni starigas tendon en konvena loko, se oni ne jam antaŭe havas malgrandan terkabanon tie aŭ preferas en rapido fari tian. La ĉasantaro ĉiam konsistas el minimume du personoj; ofte el pluraj. La tutan ĉasakiraĵon oni egale dividas, ne konsiderante, kiu ĉasis plej multe. Tial oni ofte je la demando, kiom da zibeloj ricevis kamĉatkano dum la vintro, aŭdas la respondon "kvin kaj duonan" aŭ "sep kaj kvaronan zibelojn".

Post proksimume monata restado en la arbaro la neĝo fariĝis tiel profunda, ke la ĉevaloj nur malfacile povas fari al si vojon, kaj oni reiras al la vilaĝo por festeni per la kaptitaj zibeloj kaj por prepari

sin por la efektiva vintra ĉasado, kiu okazas helpe de hundsledoj. Ordinare la kamĉatkano ripozas kaj festenas kelkajn semajnojn, antaŭ ol li startas. Kiam jen li fine ekiras, la sledo estas plenŝarĝita, krom la cetera ekipo, per jukolo al la hundoj kaj al li mem. Dum la vintra ĉasado jukolo kaj teo estas la ĉefa manĝaĵo de la ĉasisto. Kiam oni nun alvenis al la ofte tre malproksima jurto aŭ tendloko, kies pli precizan pozicion oni volonte tenas en sekreto al la ceteraj ĉasistoj de la vilaĝo, oni aranĝas al si tie por pli longa tempo. La malgrandan tendforon oni muntas en la tendo aŭ la jurto, la hundojn oni ligas al la ĉirkaŭaj arboj, la jukolon metas en rapide konstruitan surfostan budon, por ke la hundoj ĝin ne atingu, se ili sin forŝirus ktp. Tiel oni estas preta por komenci la ĉasadon, kaj ĝi okazas en jena maniero.

La fokfelkovritaj skioj — io inter skioj kaj neĝoŝuoj — estas allataj al la piedoj, kiuj estas vestitaj per boacfelaj botoj. La "kamlejka" (neĝoĉemizo) estas surtirata sur la vestoj, la pafilon oni ĵetpendigas sur la ŝultro per ĝia fokfela rimeno, kaj prenas en la manon lignan ŝpaton kun longa tenilo. Kelkajn zibelkaptferojn oni kunportas kaj iom da leporviando por surmeti kiel allogaĵon. Poste oni iras por liberigi unu aŭ du hundojn de iliaj ligiloj. Ili forte bojas pro ĝojego. Ne estas la ordinaraj tirhundoj, kvankam ili foje povas esti uzataj kiel tiaj, sed speciale dresitaj zibelhundoj. La plej lertaj estas el lamuta raso. Jungaĵo estas surmetata sur ilin, precize egala al la tirjungaĵo, kaj stranga longforma ujo fokfela, el kiu elstaras fasko da maldikaj bastonoj, estas fiksata al la jungaĵo per rimeno. Tiu ujo entenas la zibelreton.

Nun la du ĉasistoj ekiras frumatene, antaŭ ol farigas plena taglumo. La zibelo estas nokta besto kaj ĵus finis sian ĉasadon je leporoj, ratoj kaj birdoj. Nun estas necese trafi ĝiajn noktajn spurojn. Foje la ĉasistoj povas iri tagon post tago ne trafante ilin. Sed se ili

havas bonan ŝancon, ili baldaŭ ektrovas ĝiajn grandajn, vulpsimilajn piedsignojn. La hundoj ekflamiĝas pro fervoro. Ĝis tiam ili iris trenante la zibelreton. Nun ili liberiĝas de tiu kaj svingante la voston malaperas laŭ la spuroj. La kamĉatkanoj haltas kaj interparolas, kien povas esti iranta la "sobeliŝka" kaj poste kursekvas la hundojn laŭ la spuro.



*Zibelĉaso. Rimarku la reton, kiu estas etendita ĉirkaŭ la deblovitaĵo!
(Fotis A. Sandberg)*

Subite malproksime aŭdigas la kolera voko de la hundoj. Oni aŭskultas, forlasas la spuron kaj iras rekte al la sono. Ĉe maljuna deblovita arbo la hundoj bojas kaj fosadas plenĝoje. La vosto svingiĝas senĉese, kaj estas evidente, ke ili laboras "con amore". Ili apenaŭ havas tempon atenti siajn alvenantajn mastrojn.

Kiam tiuj atingas la lokon, la hundoj devas trankviligi sin iomete. La ĉasistoj ekzamenas la lokon kaj rezonas kun kompetenteco,

kiel oni ĝin prenu. La zibelo iris sub la deblovitaĵon kaj supozeble sidas kaŝita en iu kava parto de la maljuna arbo. Rezultatas, ke oni decidas etendi la zibelreton ĉirkaŭ la deblovitaĵo. Oni mallaĉas la fokfelan ujon kaj elprenas la reton. Bastonoj por starigi en la neĝon jam troviĝas sur ĝi, kaj en momento la arbo estas ĉirkaŭbarita de reto, alta apenaŭ unu metron.



Zibelo, kiu ne vivos multajn sekundojn plu.

Nun unu ĉasisto stariĝas preta kun la pafilo, kaj la alia kun la hundoj komencas fosi per sia ligna ŝpato. De temp al tempo li frapas la maljunan arbon per la ŝpato. Kaj unu-du-tri, subite la malgranda rabobesto elkuregas — kiel fulmo. Per kelkaj longaj saltoj ĝi kuras persekutata de la hundoj, kaj blindigita de la taglumo ĝi ne rimarkas la reton, sed kuregas rekte kontraŭ ĝin kaj per tio en la faŭkojn de la hundoj. Se nun estus ordinaraĵoj tirhundoj, tiuj forkurus kun sia akiraĵo kaj formanĝus ĝin, sed tiuj hundoj estas dresitaj nur mortigi la zibelon kaj poste forlasi la ĉasaĵon farinte sian devon. Jen oni kunmetas la reton, kaj daŭrigas serĉante novajn spurojn, se ne fariĝis tro malfrue en la tago.

Sed tiel komforte, kiel en ĉi tiu kazo, malofte estas. La zibelo ne estas ĉiutaga kaptajo, kion oni povas kompreni pro tio, ke ĝia felo estas pagata per 200 ĝis 600 kronoj laŭ la kvalito. Ofte oni devas fosi tutan tagon sen rezulto. Kiam venas la vespero, tiam oni postlasas hundon, kiu fidele sidas gardante tra la tuta nokto. Se la ĉasisto havas bonŝancon, la hundo povas veni meze de la nokto al la eble 5 kilometroj de tie situanta tendo kun la zibelo en la buŝo. Sed ofte la rezulto estas, ke la ĉasisto ekvidas truon, kie la besto elŝteliĝis, surgrimpis arbon kaj malaperis.

Kiam la zibelo eniris en starantan kavan arbon, kio ofte okazas, la ĉasisto devas iamaniere elpeli ĝin, tiel ke li povas pafi al ĝi. Per la hakilmartelo li frapas la arbon, kaj kelkfoje okazas ke la ĉasaĵo elkuras. Sed ofte la zibelo restas malgraŭ frapoj kaj alia bruoj. Tiam la kamĉatkano elektas radikalan rimedon. Li ekbruligas la arbon. Kiam la fumo fariĝas tro ĝena interne, la kompatinda besto fine elkuregas. La kamĉatkano dum la tuta tempo sidas kun pretigita pafilo, kaj tuj kiam la zibelo sin montras, ekkrakas lia pafo.

Se la kamĉatkano nur trovas spurojn ne povante ilin disklarigi, li elmetas kelkajn kaptferojn el la sama tipo, kiel niaj vulpkaptferoj,

sed konsiderinde pli malgrandaj. Kiel allogaĵo lepora kaj urogala viandoj estas tre bonaj. Starigi zibelkaptferojn, tiel ke oni ion ricevos en ili, estas arto, kiun oni ne lernas per unu fojo. Se oni sukcesos, tio postulas ĝisfundan konon pri la kutimoj de la besto. Sed ekzistas kamĉatkanoj, kiuj estas majstroj de tiu arto.

Tiu supre priskribita maniero ĉasi zibelon, estas la plej ordinara, sed tre ofte la ĉasisto ne posedas zibelhundon kaj tiam, devas mem ĉirkaŭiri serĉante spurojn. Tio speciale koncernas la rusajn ĉasistojn.

Krom per kaptfero oni ankaŭ povas kapti zibelon per maŝo. Tion oni ekz. faras malfruaŭtune, antaŭ ol la riveroj frostiĝis. Tiam oni faligas arbon kaj metas ĝin kiel ponton super la rivero. La maŝimplikilo estas tiel aranĝita, ke la zibelo kaptiĝas transkurante sur la arbo al la alia flanko de la rivero. Baraktante kun la ŝnuro ĉirkaŭ la kolo ĝi falas en la akvon kaj dronas.

Antaŭ ol la kamĉatkanoj lernis uzi kaptferon, ili uzis iuspecan hejmfaritan enfalilon, tiel aranĝitan, ke la zibelo, tuŝante la allogaĵon, dekroĉis trunkon, kiu surfalis kaj mortpremis ĝin. Tiu metodo nun estas malpermesita, kio tamen ne malhelpas, ke ĝi estas uzata.

Zibelĉasisto, kiu estas diligenta kaj ĉasanta dum la plejparto de la vintro, ĝenerale ricevas inter 5 kaj 15 zibelojn en la sezono, tute laŭ abundo, bonŝanco, lerteco kaj energio.

Je Kristnasko ĉiuj ĉasistoj hejmen venas el la arbaro, ĉar tiam oni devas festeni. Ofte la unua zibelo estas vendata por alkoholo. Sen tio ili ne povas soleni la Kristnaskon. Sed ofte ne nur la unua zibelo iras tiun vojon. Kiam oni solenadis hejme Kristnaskon dum kelkaj semajnoj, oni denove ekiras al la zibelarbaroj.

Kiam la ĉasistoj hejmen venas post la vintra ĉasado, ili preskaŭ ĉiam kunportas sufiĉe da aliaj ĉasaĵoj krom zibeloj. Ĝenerale ili ri-

cevis multajn vulpojn, kiuj estas kaptataj per kaptferoj. Ili plejofte estas ruĝaj sed ankaŭ ekzistas en aliaj kolorvariaĵoj, kiel nigra vulpo, krucvulpo kaj arĝenta vulpo. En la norda parto troviĝas la blanka polusa vulpo. Bluvulpoj ne troviĝas sur la duoninsulo mem, sed des pli multnombre sur la Kupra insulo kaj sur la insulo de Bering ekster la orienta marbordo de Kamĉatko.



Kamĉatkaj zibeloj

Preskaŭ ĉiam la ĉasisto ankaŭ ricevis lutron. Tiaj troviĝas en preskaŭ ĉiuj riveroj de Kamĉatko kaj estas kaptataj ĉiam per kaptfero.

Ermenojn oni ankaŭ kaptas per fero, kaj leporojn oni kutimas kapti per maŝo proksime de la bivakejo. La lastaj estas ordinare trege multnombraj kaj tretas efektivajn vojojn en la neĝo.

La gulo kaj la lupoj estas pli maloftaj ĉasaĵoj. La unua estas ĝisekstreme malamata de la kamĉatkanoj. Se oni postlasas ie pli grandan

ĉasaĵon por iri preni ĝin en la posta tago, oni povas esti preskaŭ certa, ke la gulo dum la nokto alestis kaj plene elrabis la lokon. Kiam la kamĉatkanoj ekvidas ĝian larĝan spuron en la neĝo, ofte venas spontanee: "Proklátaja rosomáha!" (Malbenita gulo!) La felo de gulo en la merkato nur iomete superas tiun de ordinara ruĝa vulpo. Ĝi ne eliras al la monda merkato, sed la komercistoj volonte ĝin aĉetas kaj poste siavice interŝanĝas ĝin por pli bonaj feloj inter korpakoj, lamutoj kaj ĉukĉoj. Tiuj popoloj uzas ĝin por garni siajn felvestojn.

Se montŝafoj kaj sovaĝaj boacoj sin trovas en tiu regiono, kie okazas la zibelĉasado aŭ ne tro malproksime de tie, la kamĉatkanoj volonte ĉasas tiajn por ricevi viandon kiel variaĵon kun la jukolo kaj kiel nutraĵon al la sledhundojn. Tiujn oni uzas tre malmulte dum la zibelĉasado, kaj ili devas plejparte stari ligite ĉe siaj arboj. Ili tiam bezonas nur minimumon da manĝaĵo. La ordinara porcio, kiam ili ne laboras, estas duona fiŝo ĉiutage, sed ofte ili ricevas eĉ malpli.

Fine ne malofte okazas, ke oni dum la vagado en la arbaro per helpo de la zibelhundoj subite trovas ursan neston, je kio per bastonegoj kaj hundoj oni vekas kaj elpelas ĝiajn loĝantojn kaj "ekspedas ilin al pli bonaj ĉasejoj". La sezono de la ursĉasado alie estas la printempo kaj la malfruaŭtuno.

Dum tiu tempo, kiun la kamĉatkanoj vintre pasigas en la arbaroj, ili devas vivi severan vivon. Tiuj, kiuj estas tiel prudentaj, ke ili konstruas terkabanon, almenaŭ havas sufiĉe da varmo. Sed por konstrui jurton estas necesa minimume kelktaga forta laboro, kaj ĉar tio ne tre plaĉas al la kamĉatkanoj, la plejmulto pro nura malvigleco preferas loĝi en tendo. Ĝenerale oni kunhavas malgrandan fornon, sed ekzistas multaj, kiuj prefere dum la tuta vintro suferas la malvarmon, ol ke ili havigas tian, kvankam ĉiuj interkonsentas, ke havi fornon estas bonege. Nur antaŭ proksimume 20 jaroj la

tendformoj komence estis enkondukataj, kaj nun ili estas disvastigitaj tra la tuta lando.

Ofte okazas dum la vintro, ke la ĉasistoj devas pasigi unu aŭ du tutajn semajnojn en la tendo, dum ekstere furiozas la neĝostormo. Tiam estas necese, ke oni bone fiksas la tendon kaj kolektis bruligon, tiel ke oni ne bezonas eliri. Por eŭropano estus terure pasigi unu aŭ du semajnojn interne de malgranda tendo sen ia distraĵo. Mi almenaŭ scias nenion pli enuigan ol resti senokupa, se mi estas tute ripozanta. Sed la kamĉatkano ĝuas la malvigladon kaj sentas sin neniel deprimita kuŝante en dormsako tutan semajnon seninterrompe. Ordinare ili estas minimume duope en la tendo, kaj ili tiam alternas enmeti lignon en la fornon. La kuirado estas tiel simpla ke oni povas fari ĝin rekte el la dormsako. Ĝi konsistas nur el surfor-nigo de la tekruĉo, kiun oni povas plenigi per neĝo el la tendoplan-ko. La jukolo ĉiam estas preta. La plejparton de la tago ili dormas. Vekiĝante ili iom rodas la salmon, trinkas kelkajn tasojn da teo kaj ree endormiĝas. Kiam ili venontfoje vekiĝas, ili konstatas, ke la ve-tero estas la sama, diras ion malbelan, turnas sin al la alia flanko kaj ekdormas denove. La kompatindaj tirhundoj, kiuj estas ligitaj ekste-re en la neĝostormo sen alia eblo sin ŝirmi krom superneĝado, ofte devas resti sen manĝo en multaj tagoj.

Dum tiuj vintraĵaj ĉasadoj ĉiuj kamĉatanoj ricevas reŭmatismen. Cetere ne ekzistas plenaĝa kamĉatkano, kiu ne suferas de ĝi.

Laŭlonge en la Kamĉatka valo al Petropavlovsk

La 17-an de marto ni forlasis Kluĉi. La hundaro estis rimarkeble plibonigita post la lasta vojaĝotago. Mi akiris du bonegajn hundojn en jena nekredebla maniero. Post kiam la kamĉatkanoj vane provis vendi al mi la plej sentaŭgajn hundojn unu post la alia, mi demandis al ruso, kiun mi vidis iam antaŭe, ĉu li volas vendi al mi du bonajn tirhundojn. "Ne, sed vi povas ricevi du senpage", estis lia respondo. Mi unue kredis, ke li estas freneza, sed ni tamen kune iris al liaj hundoj. Dek fortikaj sledhundoj, iom pli grandaj ol la ordinaraĵoj, salutis min per furiozaj bojoj. La maljunulo eniris inter la hundojn, de kiuj li ŝajne estis tre bona amiko, se oni juĝu laŭ la vostonoj, kaj malligis la ĉenojn de unu blanka kaj unu nigra. Poste li transdonis al mi la du hundojn en iliaj ligiloj kun la vortoj: "Bonvolu. Vi ricevas ilin senpage. Per ĉi tiuj vi iom pli facile venos al Petropavlovsk." La viro ne estis freneza, nek pli li ŝercis. Estis pura homamo, kiu diktis lian decidon. Mi akceptis la du hundojn, kiujn nur kun plej granda malfacilo mi fortis konduki, kiam ili volis en alian direkton ol mi, kaj ligis ilin ekster la domo de la maljunulo. Mia edzino kaj mi eniris por paroli kun li. Lia nomo estis Nikolaj Ivanoviĉ Boltenko, kaj li estis tre simpatia kaj interesa homo. Naskita inter la ĝardenoj apud la Nigra Maro li elkreskis en la gubernio de Jakutsk en nordorienta Siberio. Dum sinsekvo da jaroj li estis grandkomercisto en tiuj regionoj kaj pli poste ĉefo de pluraj orserĉistaj ekspedicioj en orienta Siberio. Nun jam kelkajn jarojn li loĝis en Kluĉi kiel ĉefo de granda rusa felfirma. Li mem faris multajn kaj

longajn karavanvojaĝojn per hund- kaj boacsledoj kaj sciis, kia estas veturado per malbonaj hundoj, kaj pro tio li nun ĝojis povi nin helpi. Li timis, ke post la neĝoŝtormoj la plej granda malfacilaĵo por ni atingi al Petropavlovsk estos havigo de hundnutraĵo en la vilaĝoj. "Se nenio alia helpos, donu al la kamĉatkanoj plenpugnon de tiu ĉi tabako por unu manĝigo", li diris donante al mi samtempe grandan pakajon de ĉerkesa tabako. "La kamĉatkanoj freneze ŝatas ĝin. Sed ne donu al ili pli ol unu plenpugnon je ĉiu fojo".



La korjakoj, kiuj deziris muŝagarikojn. (Fotis la aŭtoro)

Kvankam ni havis vivantan urson kiel pasaĝeron sur la sledo, ni nun konsiderinde pli rapide antaŭeniris ol pli frue. La du novaj hundoj, el kiuj unu estis gvidhundo, laboris unuaklase. La eksa gvid-

hundo estis degradita je ordinara tirhundo, kredeble je ĝia granda ĉagreno, ĉar ĝi poste iris kun kapo pendanta dum kelka tempo. Ĝi ne obeis bonorde la komandovortojn kaj iris malbone sen vojsignoj. Ĝia plej granda merito efektive estis tio, ke ĝi ĉiam senprokraste sin ĵetis sur kaj punis tiun mizeran kunfraton, kiu impligis la tirŝnuron aŭ faris ion alian, kio malhelpis la antaŭeniron.

En la nokto post la starto de Kluĉi ni dormis en alnarbareto, kie ni havis plej grandan klopodon trovi brullignon ne putran. Ni ape-naŭ sukcesis fari fajron por la teakvo. Ni havis malfacilan tagon kun profunda kaj malfirma neĝo, kaj sen la du novaj hundoj ni ne estus farinta tiujn 30 verstojn, kiujn ni nun trapasis. La ursido murmuretis en sia sako kaj vekis la plej viglan intereson inter ĉiuj tirhundoj, kiuj fojon post fojo aŭskultante turnis la kapon dum ili laboris. Ankoraŭ neniu el ili vidis lin, ĉar mi timis, ke ili tiaokaze ekhavis tioman intereson por li, ke ili forgesus tiri.

Kiel provianton al la ursido ni kunportis grandan pecon da lakto, t. e. frostiĝinta lakto. Tamen li ne manĝis rekte de ĝi. Tio estus tro granda postulo. Li ja ne estis "glaciurso". Anstataŭe ni dehakis pecon de la lakto kaj degeligis ĝin en siteleto antaŭ la fajro. Se la lakto estis tro varma aŭ tro malvarma, kiam ĝi estis alportata, li koleriĝis kaj ne trinkis eĉ unu guton. Sed kiam ĝi estis oportuna, li eltrinkis sian porcion per unu sola tiro kaj poste kontente murmuris. Poste kun laŭta malkontento li estis remetata en sian felsakon kaj ŝarĝata sur la sledon. En tiu movebla ursnesto li poste kuŝis, ĝis kiam ni tranoktis.

En la vilaĝo Uŝki, kien ni post kelkaj tagoj alvenis ĵus antaŭ alproksimiĝanta neĝoŝtormo, ni unufoje renkontis kelkajn el la kamĉatkaj nomadoj, korjako kaj lamutoj. Ili venis malsupren de la montegoj por vendi kelke da lutraj kaj zibelaj feloj. Ili estis vestitaj per feloj de la piedoj ĝis la verto kaj aspektis kiel malfalsaj infanoj

de la sovaĝejo. Ili demandis por alkoholo kaj muŝagarikoj. Ankaŭ tiujn lastajn ili uzas kiel ebrigiĝaĵojn. Ili invitis nin akompani ilin supren sur la montegojn kaj fari viziton en iliaj feljurtoj. Sed ĉi-foje ni ne havis tempon. Anstataŭe ni promesis veni la sekvontan vintron.



La aino Sávanoh, la plej granda ŝercemulo de Kamĉatko.

En akompano de la sovaĝuloj mi plue renkontis viron, kun kiu mi treege amikiĝis kaj de kiu mi poste havis kaj grandan utilon kaj multe da plezuro. Kiam mi unuafoje vidis lin, min frapis lia stranga aspekto. Li havis karbenigrajn harojn, grandajn nigrajn okulojn, grandan rondforman "terpoman" nazon kaj terure fortan, nigran barbohaŭton. Plue ĉiam rideton sur la lipoj. Se iu minacus mortbati min, mi tamen ne povus diri, al kiu popolo li apartenas. Li parolis la plej komikegan rusan lingvon. Kiam mi konatiĝis kun li kaj ni

interparolis kelke da tempo, li malkaŝis sin jene: "Maja ni ruski. Maja japonski." (Mi ne ruso. Mi japano.) Estas do kurioza japano, mi pensis kaj plu parolis kun li. Subite li diris: "Maja ni japonski, maja ainski." (Mi ne japano, mi aino.) Jen, li estas aino, do apartenas al tiu stranga formortanta popolo en norda Japanio kaj sur Saĥalin. Sed ili kutimis ĉiam porti longan barbon. Tiun li forrazis. Li ĉiam estis nomata "málenki Sávanoh" (malgranda Sávanoh) diference al lia pli maljuna frato, kiu havis la nomon "balŝój Sávanoh" (granda Sávanoh). Tiuj du fratoj estis la solaj ainoj en Kamĉatko.

Neniam en mia vivo mi renkontis pli grandan ŝercemulon ol tiun etan Sávanoh. Se li nur malfermis la buŝon, li ridigis kiun ajn kunularon. Ĉiam li havis ian ŝercon por diri kaj prezentis ĝin en la plej kurioza rusa lingvo. Vintre li okupis sin pri negocado kun la indiĝenoj. Precipe li specialigis sin je korjako kaj lamutoj, kun kiuj li estis en treege amika rilato. Li ĉiam rajtis ŝanĝi al si pli da zibeloj ol la aliaj komercistoj kaj estis tre fiera pro tio. Mi tuj ekvidis en li la ĝustan viron kiel akompananton dum nia vojaĝo al la korjako kaj lamutoj en la sekvonta vintro kaj proponis al li, ke ni faru akompanion. Li tuj fervoriĝis por la afero kaj senprokraste promesis esti al nia servo.

Ni nun estis alvenintaj mezen de la pinglarbara regiono. La proksima vilaĝo, Kosyrevsk, kuŝas volvekovrita en alta larikarbaro ĉe la bordo de la Kamĉatka rivero. En malgrandan domaĉon de la men-ciita vilaĝo eniras telefona fadeno. Tie ĉi estas la ekstremo de la telegrafa kaj telefona linio de Petropavlovsk. Mi eniris por inspekti la domon kaj trovis tie terure babileman ruson, kiu elverŝis sian tutan vivhistorion, antaŭ ol mi sukcesis veni eksteren. Poste li venis por nin honorviziti, vestita per malnova, eluzita kaj tromalvas-tiĝinta rusa poŝtovicista uniformo kun brilaj butonoj. Li volis montri, ke li estas rusa oficisto kaj vaste fanfaronis pri siaj pli malpli altaj

poŝtoficistaj okupoj en diversaj rusaj urboj antaŭ la revolucio. Mi petis, ke li iru telefonvoki por Petropavlovsk al mi kaj montru, por kio li taŭgas nun anstataŭ rakonti ĉion, por kio li taŭgis antaŭatempe.



La poŝta kaj telegrafa stacio de Kosyrevsk. (Fotis A. Sandberg.)

Li malaperis kun promeso veni al nia restadejo kaj sciigi, tuj kiam li ricevos interkomunikon. Sed li neniam montris sin post tiu komisio.

Ni nun havis antaŭ ni tre malfacilan distancon. Al la proksima vilaĝo, Tolbaĉik, ne estis malpli ol 83 verstoj. Unu jurto troviĝas sur la vojo. Estis longa etapo por ni, kiuj ne povis antaŭeniri rapide kun nia multpeza sledo. Ni kalkulis je tri vojaĝotagoj sed devis esti pre-

paritaj fiksiĝi en la neĝo kaj havi hundnutraĵon por unu semajno. Kaj tio ankoraŭ plipezigis la sledon.

Sed ŝajnis neeble aĉeti hundnutraĵon en la vilaĝo. Neniu havis. Ĝi ĵus elĉerpiĝis en ĉiu domo. Tiun respondon mi ricevis ĉie, kiam mi venis la unuan fojon. En Kamĉatko nome oni devas esti konata de tiu, kun kiu oni traktas; se ne, estas preskaŭ neeble finaranĝi ion. Mi estis devigita alpreni kaj la kameron kaj la ĉerkesan tabakon por elpremi tiujn 50 salmojn, kiujn mi bezonis por la vojaĝo al la proksima vilaĝo. Sed kiam mi kunkolektis tiun provizon, la kamĉatkaĵoj unu post unu komencis sin direkti al nia restadejo por "pazna-kómica", kiel oni diras (konatiĝi). Ili longe sidis tordpremante siajn felĉapojn, sed fine venis "Ĉu la Expedizia ne volus fotografi la tutan familion?" Mi ricevos tiom da jukolo kiom mi nur volas. "Sed kiel vi povas havi tiom da jukolo en la vilaĝo hodiaŭ, kvankam ekzistis eĉ ne unu fiŝo hieraŭ, kiam mi volis aĉeti de vi?" mi demandis — "Jes, ni ja ne estis konatoj tiam."

Ni startis kun nia peza sledo, ricevinte precizajn informojn pri la vojo, kiu iris alterne tra larikarbaroj kaj trans tundrojn. Post forta neĝoŝtormo en la antaŭa tago la vetero nun fariĝis klara kaj beleĝa kun -24 gradoj C. Al la jurto ni havis 33 verstojn. Ni esperis, ke ni povos pasigi la nokton en ĝi. La hundvojo estis bone veturita kaj ni iris bone antaŭen en la komenco. Veturinte ĉ. 7 verstojn, ni vidis flankvojon elkuranta okcidenten. Se oni sekvus ĝin dum tri tagvojaĝoj supren sur la montegojn, oni atingus la jurtojn de la korjaĵoj kaj la lamutoj. Sed ni daŭrigis laŭ la alia, kvankam ni havis grandan emon flankeniĝi en la unuan.

La bestara vivo en la larikarbaro estis iom alia ol en la betularbaroj. En la branĉaroj de la larikoj ne malofte sin montris la bela ruĝgorĝa pinikolo (*Pinicola enucleator kamchatkensis*). Sitejoj kaj pegoj estis pli multnombraj ol en la betularbaro, kaj urogaloj flug-

leviĝis tre ofte kaj kelkfoje fariĝis nia akiraĵo. La nucifrago (*Nucifraga caryocatactes kamtchatkensis*) aŭdiĝis intertempe, kaj je kelkaj okazoj ni vidis ampelojn. La pafiloj kuŝis preneblaj sur la sledo kaj estis ĉiam ŝarĝitaj. Per ilia helpo ni ĉiutage pligrandigis niajn kolektojn kaj de temp' al tempo havigis al ni bonan rostaĵon en formo de lagopo, urogalo aŭ leporo. La pli grandaj ĉasaĵoj, montŝafoj kaj sovaĝaj boacoj ktp., restadas supre inter la montoj, kaj de ili oni zorge sin gardas, kiam oni veturas per peze ŝarĝita sledo. La ursoj kuŝis en bona dormo je tiu tempo.



*La ĉefpastro de Kamĉatko veturas tra la lando en sia tegita hundsledo.
(Fotis A. Sandberg.)*

En tiu vintro vulpaj kaj zibelaj spuroj estis tre maloftaj. En la pasinta jaro okazis inter tiuj bestoj epizootio, kiu ilin nekredible malmultiĝis. La vulpoj, kiuj alitempe estas treege multnombraj, nun preskaŭ tute malaperis. En ĉiu vilaĝo oni tial aŭdis plendojn pri la malbona ĉaso.

Ni renkontis plurajn hundsledojn, la plejparton veturigis kamĉatkanoj, sed unu ankaŭ ĉino. Li estis la ordinara komercista tipo kaj kunhavis sian butikon en la sledo. Hedström kaj mi seniĝis je fumtabako, kaj li povis starigi la butikon meze en la sovaĝejo. T. e. li malbukis kelkajn rimenojn kaj defaldis la tukon, kiu kovris la varojn. Kaj tie kuŝis la ordinara: poŝspeguloj, bombonoj, maĉgumo, tabako ktp. Mi ekparolis kun la ĉino kaj sciigis, ke antaŭ unu jaro li loĝis en Shanghai. Tiam li ne konis Kamĉatkon eĉ laŭ la nomo. Sed jen li malpaciĝis kun sia kompaniano kaj saltis sur rusan ŝilpon en la haveno. Nur hazarde post kelkaj semajnoj li elŝipiĝis en Petropavlovsk, kaj nun li kiel komercvojaĝisto sidis sur sia hundsledo, vestita per felo, kaj mem direktis siajn hundojn. Verdire li nur sciis kelke da komercistaj kaj hundaj terminoj en rusa lingvo, kaj plue "ĥaraŝó" kaj "niĉevó", sed per tio oni bone helpas sin. Kiam elĉerpiĝas la vortoj, oni ekuzas la gestan lingvon.

Je tagmezo ni atingis multaĝan maljunulon, kiu sola sin trenis antaŭen. Li iris apud sledeto, kiun tiris tri hundoj. La sledo estis ŝarĝita per jukolo, unu tendo, unu dormsako, unu hakilo, "ĉajnik" kaj unu tesaketo. La kompatindaj hundoj tiris kaj trenis kun la lango pendanta el la buŝo kaj spiregis per ĉiuj fortoj. La maljunulo lamis apude. Ke li estas ruso kaj ne naskita kamĉatkano, tuj estis videble. Mizera homa sorto, mi konjektis. Ĉiu aŭ ĉiu dua ruso, kiun oni renkontas en Kamĉatko, povas rakonti teruran kaj malĝojigan historion.

Ni renkontiĝis je la tetempo, haltis kaj faris fajron kune. La ru-

soj ŝatas prezenti siajn suferojn al ĉiu ajn, kiu volas aŭskulti. Kaj antaŭ ol la teakvo ekbolis, li jam estis rakontanta la siajn. Antaŭ kelkaj jaroj li feliĉe loĝis en Nikolajevsk apud la Amurrivero. Sed tiam venis la japanoj dum la revoluciaj interbataloj kaj okupis la urbon. En la ĝenerala konfuzo liaj edzino kaj infanoj estis murdataj, kaj li perdis ĉion, kion li posedis. En senespero li volis pendigi sin, sed la ŝnuro disŝiriĝis. Tiam li havis intencojn mortpafi sin, sed la japanoj forprenis ĉiujn pafilojn. Jen venis kunsuferanto kaj rekuragiĝis lin kaj kunprenis lin al Kamĉatko. Sed li suferis mizeron kaj malsaton nehumane. Nun li kun siaj tri hundoj, la solaj amikoj, kiujn li havis en la vivo, iros al varma fonto, kiu kuŝas 170 verstojn de Kosyrevsk. Tie li kuŝos kaj sin banos dum kelka tempo por forigi la reŭmatismen, kiu doloris en la tuta korpo. Li loĝos en tendo apud la fonto.

Kiam mallumiĝis, ni veturis nur la duonan vojon al la jurto, sed la plenluno leviĝis kaj sternis sian malvarman lumon sur la dezerto. Fariĝis morde malvarma vintra nokto. Ni tute ne volis dormi ekstere kaj penegis por atingi la jurton. Ŝajnis kvazaŭ la hundoj farus la samon, ĉar ili laboris kun duobla energio. Pli poste mi sciigis, ke ili ĉiam kuras duoble pli bone en lunlumo ol alitempe.

Kiam malfrue en la nokto ni alvenis al la jurto, ni estis tiel elĉerpitaj, ke ni nur kun plej granda peno fortis kolekti sufiĉe da bruligno por varmigi nin kaj kuiri teon. Kaj plejeble baldaŭ ekdormis ĉiu en sia dormsako.

La proksima vespero trovis nin kaŭrantaj en la tendo kaj aŭskultantaj je la plej malagrabla el ĉiuj vintraj muzikoj en Kamĉatko, je la tondro de la neĝoŝtormo, sed la postan vesperon ni tamen atingis Tolbaĉik. Sed tiam ni ankaŭ konsumis pli da fortoj ol ni devis kaj ni ne multe valoris. Efektive jukis al ni la kruroj pro laceco. La sledo renversiĝis almenaŭ dekdu fojojn en la profunda neĝo, kaj la hun-

doj evidente malkuraĝiĝis pro la senĉesaj renversiĝoj, ĉar ili iris kun kapoj pendantaj preskaŭ la tutan tagon. Ni benis la plankon de la kamĉatkano Ivan Viktoreviĉ, kie ni dormis dum la nokto.

Matene ni havis tiel rigidajn krurojn, ke ni devis resti unu tagon, kvankam estis bela vetero. La kamĉatkanoj alkuris el ĉiuj domoj por rigardi nin. Kaj ĉiuj miris, ke "madame" povas elteni tiajn malfacilaĵojn. La ursido ekhavis gajan tagon en la vilaĝo. Ĝi rajtis esti libera dum la tuta tago kaj faris vere akrobatajn saltojn en la ĝojo ne sidi en sia senluma sako. La bovino en la domo ĵus naskis bovidon, do la eta Miŝka, kiel ni nomis la ursidon, liberiĝis de sia glacipeco kaj povis trinki tiom da dolĉa lakto kiom ĝi volis. Ĉi tie samkiel en ĉiuj aliaj domoj, kie troviĝis tia, la bovido estis membro de la familio. La kamĉatkanoj neniam konstruas stalon al siaj brutoj, maksimume ĉirkaŭbaron aŭ malbonan domaĉon, sed neniam tian, kia konservas la varmon. Do kiam la bovinoj naskos fruprintempe, dum ofte estas 20- ĝis 30-grada malvarmo ekstere, la kamĉatkanoj je la kriza tempo devas gardi tagon kaj nokton por povi tuj kuri endomen kun la bovido, kiam ĝi estas naskita. Se oni ne zorge atentas, oni matene nur trovas glacibulaĵon. Kiam la bovido envenis en la domon, ĝi estas ligata en angulo kaj ricevas iom da fojno, sur kiu ĝi povas kuŝi. Kiam ĝi bezonas elpuriĝi, tiu kiu estas plej proksime, ĉiam alkuras kaj servas per malplena konservaĵa skatolo. En domo, kie ni foje loĝis, oni havis kvar bovidojn en la manĝejo. Ne okazis, ke unu manĝo pasis sen tio, ke iu subite ekkriis kaj alkuris kun konservaĵa skatolo preta en la mano.

La vilaĝo Tolbaĉik aspektis proksimume kiel ĉiuj aliaj vilaĝoj, kiujn ni trapasis. Unu domo en la vilaĝo havis tute malfermitajn fenestrojn kaj pordojn. La familio transloĝiĝis al la najbaro dum semajno, por ke la blatoj en la domo mortfrostiĝu. Ili tiel terure plimultiĝis dum la lasta tempo, ke la familio fakte estis elpelita de

la "tarrakanoj". "Sed se ĉi tiu malvarma vetero nur daŭros kelkajn tagojn plu, ili certe mortfrostiĝos", asertis la mastro de la fibestetaro. Devas esti terure en la malvarmega vintro esti elpelita de fiinsektoj. Sed la kamĉatkanoj trovis tion tute natura kaj miris, pro kio mi ridis.

Survoje al la posta vilaĝo, la 50 verstojn malproksima Ĉapina, je la unua fojo en Kamĉatko ni renkontis la picĉarbaron. Ĝi estis granda kaj bela, preskaŭ kiel nia sveda, kvankam oni povis vidi, ke ne estas precize samspecaj piceoj (*Picea ajanensis*). Estis por ni kvazaŭ rememorigo pri la hejmlando, kaj ni ĝuis nepriskribeble veturante antaŭen, eĉ se la tereno estis tre malebena. Kelkloke la pejzaĝo estis frapante simila al Svedlando, kaj kiam alvenis la tempo por tetrinkado, ni elpakis niajn lastajn grajnoj de kafo kaj faris festenon en la arbaro. Kaj birdeto, la nigra paruo (*Parus ater*), malfalsa infano de la picĉarbaro, kiun oni ankaŭ renkontas en niaj svedaj picĉarbaroj, nun aperis unuafoje.

Neniam estis tiel agrable starigi la tendon en la vintra malvarmo kiel en ĉi tiu vespero. Sur la neĝo en la tendo ni sternis dikan tavolon da picebranĉaĵoj, kaj tie mirinde bonodoris. Sekan brullignon oni trovis ĉie. Estis vera festo en tiu vespero kaj ni surtabligis ĉiujn frandaĵojn, kiujn ni havis. Mia edzino bakis karbobulkojn (faruno, akvo kaj salo, kunmiksita je kaĉo kaj frititaj en multe da graso). Mi asertas, ke ili gustis pli bone ol iam faris la plej delikataj tortetoj. Kvazaŭ por pli intensigi la animstaton solenan, la ĉielo montris ĉiujn siajn stelojn, kiuj briletadis, kiel ili nur povas en malvarma vintura nokto. Tiun vesperon la pensoj flugis foren al la picĉarbara lando malproksime.

En la vilaĝo Ĉapina la hundoj estis nutrataj per io, kio nomiĝas "kisla". Ĝi konsistas el acida kaj preskaŭ putra salmo, kiu estas traktita en la jena komforta kaj por la kamĉatkano tre plaĉa maniero.

Oni fosas profundan kavon kaj ĵetas en tiun kelkmil salmojn tute kiaj ili estas, kiam ili estas kaptitaj. Ofte ili eĉ vivas. Kiam la kavo estas plena, la aperturo estas kovrata per tero. La enhavo de la fosaĵo nun suferas fermentan kaj putran procedojn, kaj la resultaĵo fariĝas ununura kaĉo, kiu haladzas je distanco de kilometroj, kiam la fosaĵo estas malfermata en la vintro. Oni elprenas la "kisla-n" per sterkoforkego. Niaj hundoj ankoraŭ ne gustumis tiun delikataĵon, kaj komence ĉiuj energie rifuzis ion manĝi. Ili dancis kiel kato ĉirkaŭ poto kaj flaris. Sed fine la malsato venkis ilin, kaj ili komencis manĝi iomete, kaj iom post iom kelkaj lernis eĉ ŝati ĝin. Antikvatempe la kamĉatkanoj mem manĝis tian nutraĵon, sed nuntempe ili ĝenerale ĉesis fari tion. Sur la okcidenta marbordo de Kamĉatko ĝi tamen ankoraŭ ekzistas en unuopaj vilaĝoj, kaj la postan vintron mia edzino kaj mi foje estis regalataj per "kisla".

En tiaj vilaĝoj, kie la rivero fluis libera dum la vintro, oni ordinare nutris la hundojn per frostigita, freŝa fiŝo. La frostigitaj salmoj estis amase konservataj en la provizejo precize kiel brulligno. Ili ankaŭ estis traktataj kiel brulligno, tiel ke oni ĉiam uzis hakilon por fendi ilin. Mi rememoras unu fojon dum la posta vintro, kiam estis -40 gradoj C. dum preskaŭ unu semajno — cetere la plej malvarma semajno, kiun ni havis dum la tuta ekspedicio. Mi volis fendi salmojn al miaj hundoj, sed ili estis tiel rigide frostitaj, ke la hakilo ne povis tranĉi ilin. Ili preskaŭ estis kiel ŝtonoj, kaj kiam fine prosperis al mi difendi ilin kaj mi donis po duonan fiŝon al la hundoj, la plej aĝaj el ili, kiuj ne havis tre bonajn dentojn, per plej bona volo ne povis venki la glacipecojn. Mi devis dishaki ilin je pecetoj, antaŭ ol ili povis gluti ilin.

En la vilaĝo Ĉapina ni renkontis malfeliĉan ruson, kiu en iu mirinda maniero akiris tre bonkvalitan kameron. Li havis plakojn, paperon kaj ĉiujn ingrediencojn por rivelado, ĉio el bona kvalito, sed

li plendis, ke li neniam ricevas bildojn, kiam li fotografas. La kompatindulo ankaŭ havis lernolibron pri fotografado, sed tio malmulte helpas, kiam oni estas analfabeto. Li petis pri kelkaj instrukcioj, kaj tiam montriĝis ke li ĉiam rivelis en fiksbanoj kaj fiksis en rivelbanoj. Tiam certe estas malfacile ricevi bildojn.



La vilaĝa vokto (plej maldekstre) kun gefiloj kaj genepoj.

En tiu vilaĝo okazis io tre neatendita. Per aranĝo de nia amiko Novograbenoff en Petropavlovsk la tiea supera bolŝevika komisaro sendis telegramon al ĉiuj vilaĝoj sur la vojo al Petropavlovsk kun la jena teksto:

”Laŭlonge de la Kamĉatka rivero kuras per skioj tri membroj de la Sveda Scienca Ekspedicio survoje al Petropavlovsk. Ĉar la tasko de la Ekspedicio estas esplori Kamĉatkon, la Revolucia Komitato de Petropav-

lovsk deziras, ke ĉiuj vilaĝoj, kiujn la Ekspedicio vizitos survoje, donu al ĝi helpon kaj disponigu hundsledojn senkoste.

L a r i n.

Prezidanto de la Revolucia Komitato.”

Estis bonega revolucia komitato. Tiaj ekzistu multaj. Sed nun estis nur la demando, ĉu la lokaj sekcioj en la vilaĝoj de tiu bona komitato atentis la telegramon.

En Ĉapina ni ne volis postuli hundsledon, ĉar la 55 verstojn longa vojo al Maŝura iris tra picĉarbaro, kaj tiun ni volis studi kaj ĝui malrapide. Sed en Maŝura mi vizitis la plejaĝulon de la vilaĝo kaj petis lin teni pretaj du sledojn por la sekvonta mateno, kaj al tio li ne kapablis diri alie ol jes. Por esti tute certa, ke li ne malobservu sian promeson, mi lasis starigi lian tutan familion kun bopatrinoj kaj genepoj ekster la domo kaj oferis 4¹/₂ x 6-filmon al la societo.

En torenta rapideco ni nun per tri hundsledoĵ veturis al la proksima vilaĝo, Kirganik, kie ni konatiĝis kun la plej rapidema veturigisto de Kamĉatko, la maljuna Curkin. La famo pri liaj grandfaroĵ jam antaŭ longe atingis nin. Por li kaj liaj hundoĵ 150 kilometroj en unu tago estis bagatelo. Li havis sian specialan sekreton prizorgi siajn tirbestojn, kiun li instruis al neniu. Kiam en la proksima tago ni startis de lia vilaĝo al la granda vilaĝo Milkova, malproksima nur 12 verstojn, mia edzino ekhavis la plezuron veturi post liaj famaj hundoĵ kaj kun Curkin kiel veturigisto. Kiam ni aliaj veturis la duonan vojon, ni renkontis lin returne de Milkova. Liaj hundoĵ fakte flugis laŭ la tero.

En la granda kaj bonfarta vilaĝo Milkova kun 8 500 loĝantoĵ troviĝis multnombre ĉevaloj kaj bovinoĵ kaj sennombraj tirhundoĵ. En la domo de la riĉa kamĉatkano Korgunoff, kie ni ĝuis grandan gastamon, ni konatiĝis kun maljuna blankbarba rusa bravulo, kiu ha-

vis pli ol 80 jarojn. Li sciis unu svedan vorton, kaj ĝi estis "filbunke" (densa kazeiĝinta lakto). Tiun li lernis de svedo kun la nomo Sandelin, kiu loĝis en Petropavlovsk antaŭatempe. Por tiu svedo la tuta amo al la gepatra lando estis resumita en la vorto "filbunke", kio estis la plej bona, kion li memoris el Svedlando. Li ankaŭ ĉiutage ĝuis ĝin en sia nova hejmlando.



La granda vilaĝo Milkova. (Fotis la aŭtoro)

Dum ni iris por rigardi la vilaĝon, serĉis etnografiaĵojn en la dometoj kaj konatiĝis kun la popolo, ni havis post ni longan voston da kamĉatkanidoj kiuj volis rigardi la strangajn homojn. Je tia okazo viro alkuris senspire vokante "mister" per ĉiuj fortoj. Mi kredis, ke almenaŭ lia edzino estis mortanta, sed nenio alia estis ol tio, ke li

pafis grandan montŝafon, kies kapon kun belaj kornoj li proponis al mi.

En Milkova mi ektrovis birdon, kiun mi ne atendis renkonti en la interno de la duoninsulo. Estis pagofilo (*Pagophila eburnea*), absolute neĝeblanka birdo kaj gasto de la Polusmara bordo, kiu estis ventpelita tien ĉi.



La hundsledoj estas kondukotaj trans la senglacian riveron.

Inter la vilaĝoj Verĥne Kamĉatsk kaj Ŝaromsk ni trafis la nefrostigintan Kamĉatkan riveron, kiu tie fluas neĝovrite dum la tuta jaro. Estis necese transpasi kun tri hundsledoj kaj 28 hundoj. Po unu kanoto estis lokita ambaŭflanke de la rivero. La kamĉatkanoj en nia akompano respondumis, ke ni povos transpasi ne bezonante naĝi.

En la unua boato ili per stango puŝis trans la riveron kaj venigis la alian. Reveninte ili kunligis la du boatojn laŭlonge kun flanko ĉe flanko. Post tio du sledoj estis elŝovataj kaj metataj transverse sur la kunligitajn kanotojn kun apartenantaj 20 hundoj. Niaj hundoj, kiuj ne estis alkutimiĝintaj je tiaj riverveturoj, bojis sovaĝe, kaj ni devis perforte puŝi ilin en la kanotojn.



La sledo estas metata transverse sur du kunligitajn kanotojn,

Jen ni debordiĝis. La fluo kaptis la boaton, kaj estis necese tuta-tempe teni la pruan kiom eble rekte kontraŭ la fluo por ne ekdrivi. Kiam ni proksimigis la alian bordon, la hundoj volis salti sur la teron, sed tion ni devis nepre malebligi, alie ni renversiĝus. Tre mirinde tio okazas relative malofte je tiaj transportoj. Tamen ŝajnis pli hazardo, ke ĉio iris feliĉe.



*Hedström kaj mi iras en la akvon kun la hundoj kaj la malplena sledo.
(Fotis Dagny Bergman.)*

Unu malgrandan vilaĝon post la alia ni pasis. Kelkaj revoluciaj komitatoj disponigis sledojn, aliaj ne. Sed ni ne malĝojis pro tio, ĉar la vetero nun konsiderinde pliboniĝis, kaj estis plezuro skikuri tra la arbaroj. Post la fino de la ĉasa sezono nun fariĝis sufiĉe granda trafiko inter la vilaĝoj, ke ni ĝenerale ne bezonis mem plugi sulkojn por la sledo. Nun la kamĉatkanoj veturis al la pli grandaj vilaĝoj aŭ al Petropavlovsk kaj aĉetis, kion ili bezonis por la tuta venonta vintro. Iun tagon ni do renkontis societon de 22 hundsledoj, ĉiuj ŝarĝitaj per varoj, plejparte faruno.

Ni pasis la Ganalskan tundron, timatan pro siaj neĝoŝtormoj, trans kies multmejlana neĝomaron la plej mallonga vojo estis signita

per stangoj helpe al la vojaĝantoj. Ni envenis inter grandiozajn montegojn kun mallarĝaj trapasejoj. La suno lumis sur ĉiuj pintaj montsuproj, kie paŝis montŝafoj kaj sovaĝaj boacoj.

Sed subite ni trovis nin antaŭ rivero, kiu ĵus malligis siajn glaci-katenojn kaj nun en torenta rapideco baris nian vojon. Estis meze en la sovaĝejo, kaj kompreneble ekzistis neniuj kanotoj. Post kiam ni vane serĉis iun neĝoponton, restis nenio alia ol iri returne aŭ en la akvon. Sed kiel ni povos transporti la sledon kun la hundoj? Ni el-serĉis la plej malprofundan lokon kaj deŝarĝis la sledon sur la bordo. Poste ni demetis la felŝtrumpojn kaj la boacfelajn botojn kaj surtiris ordinaraĵajn ledajn botojn, kiujn ni havis sur la sledo. Hedström kaj mi nun prenis ŝarĝon sur la dorson kaj skibastonon en la manon kaj paŝis en la akvon. Ĝi estis tiel glacie malvarma, ke oni preskaŭ demordis al si la langon. La akvo ne atingis tute ĝis la talio, sed estis malfacile teni la ekvilibron en la fluo kaj sur la glataj ŝtonoj. Ni atingis la alian bordon, sed hu, kiel estis malagrabla. Demetinte la portaĵon ni reiris por provi transigi la sledon kaj la hundojn. Sed tio ne estis facila afero, ĉar ĉiuj hundoj timegis iri en la akvon kaj bojadis pro teruro. Perforte ni entiris ilin kaj ili devis naĝi, dum la malplena sledo postsekvis. Kiam ni survenis la alian bordon, ekestis treega skuado inter la hundoj. Niaj piedoj estis sentataj kva-zaŭ glacipecoj, kaj ni devis salti piedal piede dum momento, antaŭ ol ni denove ekiris en la akvon.

Mi ŝparis al mia edzino la malvarmegan travadon portante ŝin transen. Pendis el hareto ke mi ne glitfalis ĉi-foje. Tiam ni estus spertintaj agrablaĵoj! Transveninte mia edzino faris fajron, kaj kiam Hedström kaj mi transpaŝis la riveron ankoraŭ du fojojn por la lastaj aĵoj, mi kredas, neniuj fajroj pli bone plaĉis. La hundoj ankaŭ rajtis veni proksimen al ĝi, kaj evidente ĝuis la varmon. Post tiu for-tostreĉo ni estis preskaŭ elĉerpitaj, kaj nur kun plej granda peno ni

en tiu vespero atingis la vilaĝon Malka, kie ni ekloĝis ĉe la kaŭkaziano Afaj Alexandroviĉ. Li regalis nin per kafo, kiu gustis bonege post la glacibano. Cetere estis lia dometo, en kiu loĝis la kvar bovidoj, sed tamen estis loko por ni ĉiuj. En tiu vespero la hundoj ricevis iom da ekstra regalaĵo por ke ili ne perdu la kuraĝon. La eta ursido, kiu estis neordinare kriema dum la tago, sed transpasis la riveron kun sekaj piedoj, ricevis sian kutiman liberecon vespere kaj alpromenis por konatiĝi kun la bovidoj. Ili staris flarante unu la alian iomete. Poste la ursido respektoplene iris returne. Ĝi trovis, ke estas grandaj kaj timigaj bestoj, kaj anstataŭe provis ekfari konatecon kun kato, kiu ŝoviĝis ĉirkaŭ la ĉambro. Sed ĉe tiu ĝi atingis eĉ pli malgrandan sukceson.

De kiam ni ektrovis la telefonan linion en Kosyrevsk, en preskaŭ ĉiu vilaĝo mi provis telefoni al Petropavlovsk por paroli kun la kamaradoj, sed nur en la vilaĝo Ganala, situanta ĉ. 140 verstojn de la urbo, mi sukcesis atingi ĝin. Sur la mikrofono ni legis L. M. Ericsson, Stockholm. Pasis ok monatoj, post kiam ni renkontis la kamaradojn, do ni havis multe por rakonti unu al la alia. Ĉio statis bone en la urbo.

La senkostaj hundsledoj malpliĝis, ju pli ni proksimiĝis al Petropavlovsk, kaj ni rekomencis uzi la skiojn. Iun tagon ni renkontis rusion, kiu havis strangan ŝarĝon sur la sledo. Estis ordinara dormsako el boaca felo, kiu estis kunligita ĉe unu fino kaj evidente ion entenis. Estis — terpomoj. Li plenigis la dormsakon en varma ĉambro kaj zorge alligis la aperturon kaj poste povis veturigi ĝin longan vojon en 20- ĝis 30-grada malvarmo sen tio, ke la terpomoj frostiĝis. Sendiskute originala maniero. Tio estas la sola taŭga maniero transporti terpomojn inter du vilaĝoj en la vintro.

Ju pli proksime ni venis al nia celo, des pli grandaj iĝis niaj ĉiutagaj marŝoj, kaj la lastan tagon ni startis je la 7-a h. matene de la

vilaĝo Korjaka. Tiam restis por ni 46 verstoj al Petropavlovsk, sed ni estis firme decidintaj ne tranokti pluan fojon, sed daŭrigi ĝis ni atingos la celon. Estis brila sunluma tago, la lasta de la longa vojaĝo, kaj vespere fariĝis lunlumo. La lacecon ni preskaŭ ne sentis en tiu tago.



Kun la sledoj de la bolŝevikoj survoje al Petropavlovsk. (Fotis la aŭtoro)

Ĉirkaŭ la deka horo vespere, kiam restis 6 aŭ 7 km., aŭdiĝis la knaro de skioj sur la malmola neĝokrusto. Ni haltis kaj aŭskultis. Subite ni ekvidis tri figurojn glitantaj tra la arbaro. Ne povis esti aliaj ol niaj kamaradoj, Malaise kaj la Hultén-oj, kaj ni ekaŭdigis reciprokajn bonvenigajn kriojn en la lunlumo. En momento ni ĉiuj estis en unu amaso, kaj post 8-monata disiĝo la ĝojo pro la revido

estis granda kaj elkora. Hedström kaj mi eĉ estis regalataj per po unu cigaro, kiu ne gustis malbone, kaj mia edzino per kunportitaj kukoj. Ili rigardis la hundojn kaj aŭskultis la ursidon en ĝia sako. Malrapide ni nun marŝis antaŭen inter blankvestitaj altaĵoj kaj montoj, kaj baldaŭ videbliĝis la lumoj de la urbo. Ĉirkaŭ la 11-a h. en la nokto de la 16-a aprilo ni ligis la hundojn ĉe nia propra domo en Petropavlovsk kaj eniris. Per tio la 800 verstojn longa vojaĝo estis feliĉe finita post 1½ monataj penadoj. Severa tempo estis, sed trege interesa, kaj por miaj esploroj ĝi havis grandan signifon.

Kaŭze de tiu vojaĝo mi decidis lokigi la laboron de la somero al la valo de la Kamĉatka rivero kun ĉefa tasko esplori la bestaran mondon de la betulaj, larikaj kaj piceaj arbaroj, sed ĉar tiu ĉi libro nur pritraktu la vintrajn vojaĝojn, ni nun faras grandan salton trans tiujn somerajn veturojn kaj malfruaŭtune denove nin trovas en Petropavlovsk.

La sledvojaĝo al Norda Kamĉatko La starto el Petropavlovsk

Mi havis la intencon kun helpo de mia edzino dediĉi tiun vintron al studoj pri la boacbredantaj nomadpopoloj, la korjakoj kaj la lamutoj, en norda kaj meza Kamĉatko. Mi deziris ankaŭ ekkoni la kamĉatkanojn ĉe la okcidenta marbordo de la duoninsulo, kie malgranda restaĵo de tiu popolo ankoraŭ ne estas rusigita, kiel ĉie alie en Kamĉatko, kaj i. a. ankoraŭ parolas sian propran idiomon. Kompreneble mi krome intencis daŭrigi la studojn pri la bestara vivo.

El la du supre menciitaj nomadpopoloj precipe la lamutoj estas tre malmulte konataj. Ili estas tungusa gento, kaj pri la lamutoj en Kamĉatko ne troviĝas multaj informoj en la literaturo. La kaŭzo estas antaŭ ĉio, ke estas ekstreme malfacile traŭri al iliaj loĝejoj. Ili loĝas en la montegaj regionoj de meza kaj norda Kamĉatko. Se oni provas penetri al tiuj montegaj regionoj en la somero, oni renkontas rapidfluaĵajn riverojn, marĉojn kaj densejojn. Dum la vintro marĉoj kaj riveroj estas frostigintaj, sed tiam la neĝoŝtormoj kune kun la montega tereno estas la plej malfacilaj baroj. Tamen estas pli facile atingi ilin dum tiu tempo ol dum la somero. Kiel nomadoj la lamutoj ja krom tio ne havas konstantan vivlokon sed transloĝiĝas ĉiame.

La korjakoj de Kamĉatko ankaŭ ne estas multe pritraktitaj en la literaturo, sed ili ŝajnas ne diferenci konsiderinde de tiuj korjakoj, kiuj loĝas norde de la duoninsulo kaj kiuj estas ĝisfunde studitaj kaj konataj per la valoraj verkoj de la rusa esploristo Johelson.

Mi tiam konsideris plej grave dediĉi la plejmulton de la tempo al la lamutoj, kies boacbredadon profesoro K. B. Wiklund petis min speciale studi.

La unua kondiĉo por povi efektiviĝi tiun ampleksan vintroprogramon estis unuaklasa hundaro, ĉar nur per helpo de tia estas eble dum vintro translokiĝi tra vastaj regionoj. Mi fidis al tiuj hundoj, kiujn mi somere aĉetis en Kluĉi. La planita vojaĝolinio okupas distancon de pli ol 2000 km., kiu tamen konsiderinde plilongiĝis.



*Petropavlovsk vidata de Avaĉa Golfo. En la fono la Korjatskaja vulkano.
(Fotis René Malaise)*

La demando nun sole estis, ĉu mi povos fari tiun longan sledvojaĝon sen indiĝena akompananto aŭ ne. Se mi havus kun mi kamĉatkanon, mi devus havigi ankoraŭ unu hundjungitaron, ĉar sur ĉiu

sledo estas loko por pleje du personoj kun ekipo, kiam koncernas longan vojaĝon. Tio konsiderinde plialtigus la kostojn, ĉar je tiu tempo hundjungitaro kostis ĉ. 1000 kronojn kaj indiĝeno ne estas dungebla dum la vintro por malpli ol 400 aŭ 500 kronoj monate. Al tio aldoniĝas nutraĵo por la hundoj, kaj ĝi estas multekosta afero. Do fariĝus plikosto de 3 ĝis 4 mil kronoj. Tioman sumon mi ne povis elspezi, kaj fine ni decidis vojaĝi solaj, kvankam mi devas konfesi, ke estis iom timiga sento pensante pri la multnombraj neĝoŝtormoj, la longeco de la vojaĝo kaj la cirkonstanco, ke ekzistas neniuj fidindaj landkartoĵoj. Sed la avideco je novaj esploroj kaj aventuroj loĝis tro forte kaj venkis ĉiujn dubojn pri la feliĉa rezulto de la vojaĝo.

Ni nur atendis por la alveno de la neĝo. Ĝi venis pli malfrue ol ordinare en ĉi tiu aŭtuno, ja, kiom longe oni povis rememori, ĝi ne venis tiel malfrue. La tagoj estis malvarmaj kaj serenaj sen ia neĝofalo. La tero jam delonge estis malmole frostiĝinta kaj la lagojn kovris glacio.

La hundoj staris ĉe siaj palisoj kaj evidente ankaŭ sopiris je la neĝo.

Iun tagon ni volis kurekzerci la hundojn sur la glacio de la apudalago. Ni havis kelkcent metrojn da senneĝa tero tien tra la urbo. Tuj kiam ni altrenis la sledon, la hundoj komprenis, pri kio estas la demando, kaj furioziĝis pro raviĝo. Ili bojegis pro ĝojo, tiris kaj ŝiris siajn ĉenojn. Ni havis ĉian penon malhelpi al ili forkuri, dum ni jungis la sledon. Kiam mi poste komandis starton, ili ekkuris tiel rapidege, ke estis komplete neeble bremsi la sledon, malgraŭ ke estis senneĝa tero kaj tri homoj sidis en la sledo. En furioza rapido la veturo iris antaŭen laŭ la strato. Tiam venis kompateginda porko pace promenante iom apud la vojo. La tuta hundaro kiel bando da lupoj sin ĵetis trans la fosaĵon sur la sensuspektan porkon. Tiu

ne havis tempon kompreni la seriozon de la situacio, antaŭ ol ĉiuj hundoj sin ĵetis sur ĝin kaj provis kapti al si pecon da porkaĵo. Ni enkuris en la grupon kaj provis per la piedoj forbati la hundojn, kiuj neniel atentis ĉiajn alvokojn. Se la sledo ne estus fiksiĝinta je telefona stango kaj ankre liginta ilin, ni certe ne sukcesus savi la vivon de la porko. Sed nun ni savis ĝin per komunaj fortoj, kaj kompatige blekante ĝi sin direktis hejmen. Du hundoj disŝiris siajn jungilojn kaj persekutis la porkon, sed estis kaptitaj. Kolerega virinaĉo elkuris el la domo, kien rifuĝis la porko, kaj postulis kompenson por la besto, sed kiam alvenantaj rigardantoj konstatis, ke la domaĝoj estas kompare malgravaj kaj la porko cetere "niĉevó", ŝi kvietiĝis kaj iom post iom sin retiradis. La postan tagon mi vidis la saman porkon esploranta rubejon, do ĝi ŝajne ne ricevis seriozan difekton.

Antaŭ nelonge jam unu el la hundoj sola ekspedis porkon, kaj, kio estis pli malbona, sola formanĝis ĝin. Sed estis malgrandulo, kaj la maljunulino ricevis keston da keksoj anstataŭ la perdita lardo kaj ni disiĝis kiel amikoj.

La ekipon ni jam delonge pretigis, sed la neĝo ankoraŭ ne venis. Tiam ni eksciis, ke ĉe la vilaĝo Savoiko, nur 28 verstojn de Petropavlovsk, venis tiom da neĝo, ke oni povas veturi per hundoj tie. Por ne perdi pli da tempo mi decidis transporti la sledon kun ĝia ŝarĝo per ĉaro, al Savoiko, kien kondukis sufiĉe bona vojo. Mi sekve luis ĉevalon kaj ĉaron kun apartenanta viro, kaj la hundsledo kun ĝia ŝarĝo estis metata sur la ĉaron. Ĉe ties malantaŭa parto ni fiksas du longajn lignostangojn kaj al ili ligis la hundojn, kvin ĉe ĉiu flanko.

Post tio ni adiaŭdiris al la hejme restontaj kamaradoj, kiuj akompanis nin ĝis parto de la vojo, kaj al kelkaj japanaj oficiroj, kiuj estis venintaj por adiaŭsaluti, kaj la ĉaro fortintadis en direkto al Savoiko.

La hundoj, kiuj staris ligitaj la tutajn someron kaj aŭtunon, ne-

priskribeble ĝuis, ke ili povas sin movi. Tamen ili ĉiuj miskomprenis sian pozicion malantaŭ la ĉaro, kaj ĉiuj dek kredis, ke ili tiru la veturilon. Ili penegis kaj tiris per ĉiuj fortoj, tiel ke la ĉevalo bezonis labori preskaŭ neniom.



La gvidhundo Ĉernogubka. (Fotis la aŭtoro)

Nun okazis la mirindaĵo, ke la saman tagon, kiam ni startis, la neĝo komencis veni. Kiam ni trapasis la duonon de la vojo, neĝadis sufiĉe dense.

Post la krepuskiĝo ni alvenis al Savoiko. La rivero, kiun oni devas transpasi, estis frostiĝinta, kaj la rusoj volis transveturi ĝin kun ĉevalo kaj ĉaro en la mallumo sen antaŭa kontrolo, ĉu ĝin la glacio povos teni. Sed tiel ne fariĝis, kaj verdire estis feliĉo, ĉar tuj apud la

alia bordo estis senlacia fendo, kaj mi devis longe iri serĉante, antaŭ ol mi trovis lokon, kie ni povis transiri. Sed ĉevalo kaj ĉaro devis resti sur la suda riverbordo.

Kiam ni vekigis matene, la tero estis blanka, kaj ni forlasis la vilaĝon kun la hundoj antaŭ la sledo. Antaŭ ol ni daŭrigas, mi petas prezenti la novajn tirbestojn, kiuj estos niaj akompanantoj kaj ofte nia savo dum la venonta vintro.

Nur tri restis de la antaŭa vintra vojaĝo. Estis Muŝika, la plej honesta inter ili ĉiuj, plue Kapitano, li kiu estis gvidhundo en la komenco de la antaŭa vintra vojaĝo, kaj Bjela, unu el la hundoj, kiujn mi ricevis donace en Kluĉi. La sep ceteraj estis novaj. La gvidhundo de la jungitaro nomiĝis Ĉernogubka, retenema sed tre inteligenta hundo, kiu bonorde sciis la komandovortojn kaj krome havis grandan kapablon trovi la vojon, kiam ĉiuj postsignoj estis forviŝitaj. Pare kun ĝi iris Bussi, afabla kaj tre laborema hundo, kiu nur havis tiun mankon, ke ĝi tro uzis la fortojn en la komenco de la tago kaj poste ne kapablis tiri tre multe. La duan paron de antaŭe okupis la du jam menciitaj Muŝika kaj Bjela. En la sekva paro iris Laska kaj Magnaŝka. La unua estis batalema hundo, kiun oni neniam povis plene fidi. Ĝi ne malofte provis fuŝi en la laboro, kiam ĝi kredis sin neobservata. Magnaŝka (Longharulo) estis unu el niaj plej agrablaj kamaradoj dum la vintra vojaĝo. Ĝi havis kvazaŭ hidrargon en la korpo kaj neniam povis esti senmova. Krom tio ĝi estis tute ekscese afabla, kaj kiam ni aliris al ĝi, ĝi ĉiam volis salti al nia vizaĝo kaj leki nin. Kiam ĝi nur ekvidis mian edzinon aŭ min je longa distanco, ĝi komencis salti pro ĝojego. Ĝi laboris tre energie kaj neniam fuŝis, sed kaŭze de sia granda vigleco ĝi ofte implikis la tirŝnuron. Krome ĝi ne havis konsciencan kaj neniam sin ĝenis ŝteli hundfiŝon el la sledo, se ĝi nur trovis okazon. Sed ĝi trovis nenion

malmoralan en tio, ĉar ĝi faris tion same volonte, se iu rigardis, kiel se ĝi estis sola, kaj tio ja estis simpatia trajto.



La hundoj pretaj por la starto. (Fotis la aŭtoro)

La sekva paro konsistis el Topĉik kaj Opala. Topĉik supozeble estis la plej forta el ĉiuj niaj hundoj. Ĝiaj piedoj estis preskaŭ duoble fortikaj ol tiuj de la aliaj. Ĝi ankaŭ laboris kiel ĉevalo. Por ĝi la laboro estis ĉio. Ĝi donis sian tutan forton por antaŭenigi la sledon kaj malŝatis ĉiujn elturniĝojn kaj flankensaltojn. Ĝi neniam implikis la tirŝnuron kaj neniel interesiĝis por la plej freŝaj spuroj de ĉasajoj, kiujn ĝi krucigis. Kontraŭe ĝi neniam toleris, ke iu el la kamaradoj ĝenis ĝin, ĉu en la laboro aŭ dum la libertempoj, kaj grumblis, se iu tretis ĝiajn piedojn. Ĝi ankaŭ grumblis al la nigraj kornikoj,

kiam ili venis tro proksime al ĝi kaj volis kolekti restaĵojn post ĝiaj manĝaĵoj. Ĝi ne ŝatis, kiam ni rapidis sed plej preferis tiri po unu mejlon en horo. Unu ĝia orelo pendadis post interbatalo. Opala estis tre granda kaj forta hundo, kiun ni havigis kiel anstataŭanton por alia, kiu difektis la kruron komence de la vojaĝo. Ĝi laboris ekstreme malbone. Mi neniam gajnis ĝian konfidon, kaj kiam mi havis ĝin du semajnojn, ĝi elŝiriĝis, kuris antaŭ la sledo kaj baldaŭ estis ekster vido. Poste mi neniam vidis tiun hundon kaj ankaŭ ne sopiris ĝin. La loko restis vakanta unu monaton kaj duonon, post kio ĝin okupis Karnauŝka, granda kaj brava hundo, kiu bone laboris.

En la lasta paro plej apud la sledo venis Pjostri kaj Kapitano. La unua komence estis bonega, sed post kiam en interbatalo ĝi estis mordata je la kruro, ĝi neniam povis labori bonorde. Ĝi aŭdis tre malbone kaj estis la sola inter la hundoj, kiu neniam montris sindonemon. Je kelkaj okazoj ĝi eĉ provis mordi min, la plej malbona, kion tirhundo povas fari al sia mastro. Kapitano jam estas konata de la lasta vintra vojaĝo. Ĝi estis speciale interesata de leporaj spuroj kaj ĉiam ricevis ektiron, kiam ĝi pase provis flari je tia spuro.

Ĉar mi mem kondukis miajn hundojn dum la tuta longa vintrovojaĝo, mi havis okazon ĉiutage studi ilin. Estis interesa konstato, ke neniu el la dek hundoj similis la alian. Same malsimilaj kiel homoj ili ĉiuj estis je ecaro kaj karaktero.

Oni ĉiam lokigas la hundojn laŭ tiu principo, ke la plej bonaj iras plej antaŭe kaj la pli malbonaj pli proksime de la sledo. Iri plej proksime de la sledo ĉiam estas malagrabla por la hundoj, kaj se iu el la plej antaŭaj provas fuĝi, oni iom postenigas ĝin. Tiam ĝi havas la mastron pli proksime kaj laboras pli bone.

La tirrimenoj de ĉiu hundparo estas fiksitaj ĉe la komuna tirŝnuro je interspaco de unu klafto. La tuta tirŝnuro do estas kvar klaftojn longa.



La arkta varmbanejo. Rimarku la sinbanantan indiĝenon!
(Fotis A. Sandberg)

Nun estis mia plano, kun elirpunkto de la vilaĝo Kosyrevsk entrepreni antaŭenmarŝon al la montegoj kaj la nomadoj. Sed ni ha-

vis bonan vojdistancon trairotan antaŭ tio. Kosyrevsk nome situas pli ol 500 km. de Petropavlovsk.

En la vilaĝo Naĉika neĝoŝtormo malfruigis nin tutan semajnon. Post kiam tiu ĉesis, fariĝis serena kaj morde malvarma vetero. La temperaturo malaltiĝis sub 40 gradojn C.

Je mallonga distanco de la vilaĝo kuŝas varma fonto, kie la kamĉatkanoj eĉ konstruis malgrandan budon. Ni veturis tien por nin bani iun tagon. Alveninte al la fonto ni trovis du hundsledojn antaŭ ni, ligitaj je ioma distanco. La malgranda arkta varmbanejo estis kovrita de neĝo kaj glacio kaj aspektis tute ne varma. Ni eniris. Malgranda bruldifektita tendforno staris en angulo. Fajro brulis en ĝi, kaj surestis tekruĉo. Kelkaj vestoj kuŝis sur benko. En la baseno sin banis kelkaj kamĉatkanoj.

Kiam mi tuj poste min banis, estis -36 gradoj en la aero kaj en la akvo +39 gradoj. Estis agrabla sento rampi en la akvon. Kiam oni sufiĉe longe kuŝis en la akvo, oni estis tiel travarmigita, ke oni povis stari nuda tre longan tempon en la morda frosto sentante nenion da malvarmo. Sed oni devas sin gardi ke oni ne trempas la kapon, ĉar tiam la haroj glaciigas. Dum de- kaj surmeto de la vestoj estis agrable havi fajron en la forno.

La kamĉatkanoj tre ŝatas tiujn varmajn fontojn, kiuj en Kamĉatko havas grandan reputacion kiel sanigaj fontoj. Ili estas supozataj povi kuraci preskaŭ ĉiujn malsanojn. En la pasinto mi menciis, kiel la fonto apud Zemljadik havas famon tra tuta Kamĉatko, ke ĝi povas kuraci sifilison. Iu ajn kuracista flegado en la interno de Kamĉatko ne ekzistas, escepte tiun, kiun povas prezenti iuj blufantaj ĉarlatanoj, sed estas la varmaj fontoj kiuj konsistigas la universalan sanigilon por ĉio. Se oni ricevis ian vundon sur la korpo aŭ hakis al si la kruron, tio estas kuracata en la varma fonto tiel bone kiel reŭmatismo. Pro tiu lasta malsano tamen estas plej ofte vizitataj la

fontoj. Ĉiu kamĉatkano, kaj viro kaj virino, suferas de reŭmatismo. La viroj akiras ĝin dum la vintra ĉasado, kiam ili monatojn seninterrompe loĝas en tendoj, la virinoj en la malegale hejtitaj domegoj.

Marto kaj septembro estas konsiderataj kiel tiuj monatoj, kiam la akvo de la varmaj fontoj efikas plej forte. Se oni okaze havas difektitan fingron je tiu tempo, oni nur bezonas ĝin trempi por momento en la akvon kaj ĝi resaniĝas, ĉiuj asertis, sed mi neniam vidis tiun miraklon. En la monato de marto, kiam ankoraŭ regas plena vintro, la kamĉatkanoj do kutimas vojaĝi per siaj hundoj al tia varma fonto. Plejofte ĝi troviĝas je multaj tagvojaĝoj de la plej proksima vilaĝo. En la neĝo ĉirkaŭ la fonto ili starigas siajn tendojn, kaj poste ili kutimas resti tie kaj sin bani du-tri semajnojn en unu fojo. Grandan parton de la tago ili pasigas en la varma akvo, kaj dum la noktoj, kiam ofte estas pli ol 30-grada malvarmo, ili dormas en siaj tendoj. Mi supozas, ke tiun reŭmatismen, kiun ili eble banforigas en la fonto dum la tagoj, ili reakiras dum la noktoj en la tendo. Sed neniam mankas, ke preskaŭ ĉiu kamĉatkaliano povas rakonti pri iu kazo, kiam li mem aŭ iu membro de lia familio en nekredible mallonga tempo estis sanigata de ia terura malsano per varma fonto.

En la vespero, antaŭ ol ni forlasis Naĉika, alvenis longa vico da hundsledoj al la vilaĝo el la Kamĉatka valo survoje al Petropavlovsk. Subite Malaise aperis en nia bivakejo. Ni ne renkontiĝis post kiam ni disiĝis ĉe Ĉapina en la postsomero antaŭ kvin monatoj. Malaise lasis kreski harojn kaj barbon kaj aspektis treege sovaĝa, sed ni tamen rekonis lin, kaj la ĝojo estis granda ambŭflanke. Ni havis nur unu nokton por kunestado kaj sufiĉe por rakonti unu al la alia, do ni ne multe dormis en tiu nokto. Post nia disiĝo en la postsomero Malaise estis ĉe la granda lago Kronoki. Post la reveno de tie li restadis en la pinglarbaroj de la supera Kamĉatka valo. Nun li estis sur-

voje hejmen al Petropavlovsk kun du luitaj hundsledoj, ŝarĝitaj per altvaloraj kolektoj, inter ili kelkaj unikaj birdoj, unu zibelo, kiun li mem kaptis, unu lutro kaj multaj aliaĵoj, ĉio en frostigita stato.

En la proksima mateno ni diris adiaŭ unu al la alia por ankoraŭ longa tempo. Malaise daŭrigis kun siaj akompanantoj al Petropavlovsk, ni en la kontraŭa direkto.



La aŭtoro en kamĉatka vintrovesto. (Fotis Dagny Bergman)

Post unuhora veturo mi ekvidis beston sur la hundspuraro ĉ. unu verston de ni. Per la lorno mi kredis rekoni gulon. Ĝi iris flarante la spurojn. Kiam ni estis proksimume 500 metrojn de ĝi, la hundoj kaj la gulo preskaŭ samtempe ekvidis unu la alian. La gulo komencis kuri foren laŭ la hundspuraro, kaj mi povas aserti, ke rapidemo

kaptis la hundojn. Ili tute forgesis, ke ili havas post si peze ŝarĝitan sledon kun du pasaĝeroj, kaj bojante per ĉiuj fortoj ili ekkuregis galope post la gulo. Mi lasis al ili liberan kuron, ĉar la tero estis nebarita kaj ebena. Ni ŝajne gajnis je la gulo, kiu trovis plej bone plirapidiĝi je galopego. Kelkajn ekscitigajn minutojn la persekuto daŭris, sed jen ni venis al rivero, kiu fluis senglacia laŭ unu bordo. La gulo kuris trans neĝoponton, kaj niaj hundoj, kiuj estis tute furiozaj pro ekscito, volis postkuri la saman vojon. Nur kun plej granda peno renversante la sledon mi sukcesis haltigi ilin por elserĉi sekuran lokon, kie ni povis transpasi. Dume la gulo antaŭvenis kaj baldaŭ estis malaperinta en la arbaro, tiel ke ni devis rezigni la persekutadon.

Post tiu vigliga interamuzaĵo ni devis trapenetri montecan betularbaron kaj iom post iom alvenis al la rivero ĉe nova loko, kie troviĝis cignoj kaj anasoj. Tie ni faris agrablan kaj bone hezonatan tepaŭzon, dum la neĝo falis dense kaj kontraŭkutime kviete. Fariĝis pli ol unu decimeton alta neĝo sur la sledo, dum ni kuiris kaj trinkis nian teon.

Vespere la hundoj perdis la neĝokovritan vojon, kaj dum pluraj horoj ni ĉirkaŭvagadis en la mallumo ne trovante ĝin, ĝis kiam ni tuj antaŭ noktomezo je nia granda ĝojo ekaŭdis la hundojn en la vilaĝo Malka, kaj gvidate de la sono ni povis elserĉi la vilaĝon.

La hundoj, kiuj estis la solaj nedormantoj en la vilaĝo, salutis nin per senĉesa bojado. Ni elserĉis la domon de la kaŭkaziano Afaj Aleksandroviĉ, kiun ni vizitis la pasintan vintron, kaj sukcesis timigante veki tataron, kiu estis servisto ĉe li. Afaj mem estis forvojaĝinta je tiu okazo. Lastfoje, kiam ni ekloĝis en lia domo, li havis kvar bovidojn en la manĝoĉambro. Nun tiuj forestis, sed anstataŭe amaso da katoj ĉirkaŭkuris en la ĉambro. La tataro neniam kuraĝis el-

lasi ilin pro la hundoj, kaj tial estis terura haladzo de kato en la domo.

La proksiman nokton ni pasigis en malgranda agrabla jurto, kie ni renkontis tri kamĉatkanajn zibelĉasistojn. Ili kunhavis frostigitan zibelon, kiun ili pafis dum la tago. Ni havis agrablan vesperon kune, kaj kiam ni vekiĝis estis antaŭ-Kristnaska vespero. La kamĉatkanoj ekiris arbaren, kaj ni daŭrigis nian vojaĝon kaj vespere alvenis al la vilaĝo Ganala, situanta ĉi-flanke de la vasta Ganalska Tundro.



Mia edzino kaj la hundsledo proksime de la vilaĝo Malka.

Nelonge post ni alvenis ne malpli ol 15 hundsledoj. Ĉiujn veturigis "kommersanty", kiuj nun komencis sian unuan longan komerc-

vojaĝon por la vintro. La sledoj havis maksimuman ŝarĝon el ĉiuj specaj varoj. La komercistoj estis rusoj, tataroj, ĉinoj kaj koreanoj.

Vespere ni intencis soleni nian Kristnaskan vesperon tute sen ceremonie. Ni kunportis Kristnasksakon en la sledo kun nuksoj kaj sekvinberoj, donaco de kelkaj svedaj maristoj, kiuj haltis en Petropavlovsk kun sia skuno. Sed dek komercistoj enloĝiĝis ĉe la sama kamĉatkano kiel ni, kaj ĉar ĉiu kunportis alkoholon por "ŝmiri" siajn gâstigantojn kaj konvenigi ilin por negocoj, la kondiĉoj por nia Kristnaska festo estis tre malbonaj, kaj ni ŝparis nian Kristnaskpakaĵon, konsolante nin, ke ni povos soleni la venontan Kristnaskon en Svedlando, ne suspektante ke anstataŭe ni solenos ĝin en la kanalo de Suez. Dum la Kristnaska nokto ni loĝis preskaŭ same malvaste kiel en la jurto de la vulpĉasisto dum la antaŭa vintro.

La pensoj flugis hejmen al Svedlando, returne al la pasinta Kristnasko sur la tundro apud Ust-Kamĉatsk kaj antaŭen al la venonta. Ni ankaŭ pensis pri tio, kiel statas por la kamaradoj en Petropavlovsk.

La kamĉatkano, ĉe kiu ni loĝis, havis kun ni 12 gastojn kaj apartenantajn 110 hundojn, kiujn gastigi. En la aliaj dometoj de la vilaĝo loĝis la ceteraj kvin komercistoj. Sed nia gastiganto havis la plej bonan domon en la vilaĝo kaj renomon pri plej bona nutrado de gastoj kaj hundoj, kaj lia domo ankaŭ estis vera gastejo. Dum ni restis tie, konsumiĝis 110 salmoj ĉiutage por la hundoj. Sed jen li ankaŭ povis esti fiera rilate al siaj najbaroj, kiuj malofte havis gastojn.

La alian tagon niaj Zeiss-lornoj rikoltis veran triumfon en la vilaĝo. Ganala estas ĉirkaŭita de altaj kaj krutaj montegoj. Mi eliris kaj pririgardis la montojn ; per mia lorno kaj ekvidis proksimume 50 montŝafojn (*Ovis nivicola*), kiuj akre desegnis sin sur la blanka neĝo sur montega pinto. Nur per la okuloj oni povis nenion vidi. La kam-

ĉatkanoj alkuris por rigardi. Niaj lornoj cirkulis inter la flavuloj, kiuj rekte de la dompordo povis vidi la "baranojn". "Tia lorno estus havinda", estis la ĝenerala esprimo, kaj ne nur la komercistoj sed ankaŭ la kamĉatkanoj volis aĉeti ilin. Se ni mem ne bezonus ilin, estus la psikologia momento por ilin vendi.

Post Kristnasko ĉio pli kaj pli bone progresis al ni. Mi jam havis sufiĉe da tempo por vere amikiĝi kun miaj hundoj, kiuj dekurinte de si la grasecon de la somero nun ankaŭ ekhavis en bona ordo siajn muskolojn. Ni feliĉe transversis la vastan Ganalskan tundron, vizitis malnovajn konatojn en la diversaj vilaĝoj, transiris la nefrostiĝintan riveron apud Verĥne Kamĉatsk kun sledo kaj hundoj sur du kunligitaj kanotoj kaj morde malvarman tagon enveturis en la grandan vilaĝon Milkova, akceptataj de la bojego de ĉ. mil tirhundoj.

Liginte la hundojn ni eniris en la domon de la kamĉatkana komercisto Korgunoff, kie ni havis nian restadejon en la pasinta vintro kaj nun estis bonvensalutataj kiel malnovaj amikoj kaj konatoj. La maljunulo baldaŭ venos hejmen, rakontis la maljunulino, kaj ili havas abunde da jukolo al la hundoj. "Nur deprenu la peltojn kaj eniru kaj trinku teon. Kiel teruran malvarmon ni ricevis", diris la maljunulino. Post tio mi diris kelkajn vortojn al mia edzino. Dika grizhara viro, ĵus elveninte, ekaŭskultis, malfermis la buŝon kaj diris en plej pura sveda lingvo: "Diable, kion mi aŭdis, ĉu vi ne parolis svede?" — "Ĉu vi estas svedo?" mi demandis. — "Jes, dank'al Diablo, ke mi estas svedo, kiam mi estas naskita en Gnesta kaj nomiĝas Jansson", estis la respondo.

Ekestis demandado kaj rakontado ĉe la teglasoj. Jansson devis rakonti sian tutan historion, kaj kiel li trafis en ĉi tiun vilaĝon. Ĝi estis, kiel oni povas kompreni, tre varia. Jansson estis vaste konata tra tuta Kamĉatko. Ke ni ne aŭdis pri li, dependis de tio, ke neniu

sciis, ke li estas svedo. Ili kredis, ke li estas amerikano. Antaŭatempe li loĝis en Petropavlovsk pli ol dudek jarojn. Dum parto de tiu tempo li estis bakisto, dum la resto drinkejmastro. Kiel tio lasta li fariĝis konata kaj ŝatata en la plej granda parto de la lando, ĉar Jansson estis malavara animo. Li gajnis sufiĉe da mono dum tiu tempo, sed jen li edziĝis al rusino, kaj tion li neniam estu farinta. "Se vi ne jam estus edzo, mi donus al vi bonan konsilon: neniam edziĝu al rusino. Tio ĉiam finiĝas malbone", diris Jansson. Iom post iom li tamen feliĉe eksedziĝis, estis en Ameriko kelkajn jarojn kaj reiris al la marista vivo. Fine li kunveturis kiel kuiristo sur la skuno de Swenson dum ĝia lasta veturo, kiam ĝi ekflamis kaj forbruliĝis sur la maro; parenteze dirite kune kun niaj remenditaj plakoj kaj kinofilmoj. Li tamen savis sian vivon sed perdis ĉion, kion li posedis. Kune kun la ceteraj ŝiprompiĝuloj li denove albordiĝis en Ameriko. Sur unu el la aliaj skunoj de Swenson li poste transveturis al Ust-Kamĉatsk. Tie li aĉetis ok hundojn kaj unu sledon kaj nun estis survoje al la okcidenta marbordo de Kamĉatko por enloĝiĝi dum sia maljunaĝo ĉe Karlsson, lia malnova amiko kaj samlandano, kiu vivis en Kamĉatko pli ol 30 jarojn. Nun Jansson nur volis fari flankenekskurson al Petropavlovsk, antaŭ ol li transvojaĝos al la okcidenta marbordo.

Jansson estis viro de pli ol kvindek jaroj, kiu evidente suferadis malfacilaĵojn dum sia vivo. Li volis atendi la finon de siaj tagoj en Kamĉatko, kie li evitis impostojn kaj alian mizeron. "Kaj mi tiel freneze ŝatas salitan salmon", li deklaris. De sia junaĝo li ne estis en Svedlando kaj ne kredis, ke li iam revidos ĝin. "Sed", li diris iom melankolie, "mi ja ne plu havas konatojn tie hejme kaj certe ne rekonos min en Gnesta. Sed salutu de mi al la maljuna Svedlando, kiam vi venos hejmen".

Jansson ricevis kun si salutojn al Petropavlovsk, kie mi garantiis al li elkoran akcepton en la domo de la ekspedicio. Ĉar laŭ nia

vojaĝplano ni haltos ĉe Karlsson sur la okcidenta marbordo iam dum la printempo, ni diris "ĝis revido", kaj tiel disiris niaj vojoj.

Ni deziris atingi la preĝejvilaĝon Tolbaĉik por ĉeesti la Kristnaskon de la kamĉatkanoj, okazontan post kvar tagoj. En Kamĉatko oni ankoraŭ kalkulas laŭ la malnova rusa stilo, kiu malfruas nian kalendaron per 13 tagoj. Sed tien ni havis kvar tagvojaĝojn, kaj do dependis de tio, ĉu la vetero estos bela, ĉu ni alvenos en tempo aŭ ne.



Ĉe la terkabano ni renkontis 16 hundsledojn survoje al Milkova por festi la Kristnaskon. (Fotis la aŭtoro)

La hundoj estis en bonega stato. Ili senĝene kuris la mejlon en unu horo, malgraŭ ŝarĝo de preskaŭ 1000 kilogramoj kaj du pasa-

ĝeroj. Ni pasis sen aventuroj la vilaĝojn Kirganik, Maŝura kaj Ĉapina, sed devis ofte daŭrigi longe post la krepuskiĝo. La gvidhundo multfoje helpis min, kiam mi perdis la vojon en la mallumo.

Inter Maŝura kaj Ĉapina ĉe la terkabano mezvoje ni renkontis societon de 16 sledoj. Ili ĉiuj estis survoje al Milkova por tie festi la Kristnaskon. Estis tutaj familioj kun idoj kaj infanoj. La virinoj kaj la infanoj kiel ordinare sidis kovritaj per feloj, tiel ke ili ne povis sin movi. Sur preskaŭ ĉiu sledo troviĝis pli malpli granda bareleto. Kion ĝi entenis mi ne bezonas rakonti.

Al Ĉapina ni alvenis malfrue vespere en komenciĝanta neĝado. Ankaŭ la tutan nokton neĝis, kaj matene ŝajnis tute ne agrable. La neĝo kuŝis profunda ĉie, kaj daŭre neĝadis. Nia gastiganto absolute malkonsilis pluveturon. Sed tamen ni startis, ĉar ni nepre volis atingi al Tolbaĉik. Iris treege peze, kaj mia edzino devis plugi vojon per la skioj. Ĉirkaŭ tagmezo ni troviĝis ĉe Nikolke, nia somera bivakejo meze en la picĉarbaro. La bela rivero fluis senglacia, same kiel dum la tuta vintro, sed la kamĉatkanoj metis ponton super ĝi. Kiam ni alvenis al Nikolke, la hundoj kaj ni estis tute lacigitaj, kaj longa paŭzo estis necesa. Ke ni ne atingos al Tolbaĉik antaŭ la vespero, pri tio ni nun estis certaj. Sed en la sekvonta antaŭtagmezo ni esperis atingi tien.

Sur nia malnova tendloko el la somero ni faris fajron, kaj je la unua fojo depost Petropavlovsk ni kuiris kafon. Unu monato pasis, de kiam ni trinkis ĝin. Kiel ĝi gustis, mi ne povas priskribi. La neĝo falis dense kaj kviete, kiel hejme en Svedlando, kaj la piceojn plene ŝarĝis la pezo de la neĝo. La sola sono, kiu interrompis la silenton tie en la arbaro, estis kiam tuta neĝamaso ŝoviĝis malsupren de iu tro ŝarĝita branĉo.

Ni ne estis longe veturintaj antaŭ la fino de la mallonga vintrotago, kaj ĉar ĉiuj vojsignoj estis malaperintaj kaj la hundoj kaj ni ĉiuj estis elĉerpitaj, nun estis necese trovi konvenan lokon por tranoktado, kio ankaŭ prosperis al ni post ioma serĉado.

La kristnasko de la Kamĉatkanoj

La sekvantan tagon, la Kristnaskan vesperon de la kamĉatkanoj, ni alvenis al Tolbaĉik tute konvene por ekspiri momenton, antaŭ ol komenciĝos la Kristnaska festo. Multe da homoj estis en la vilaĝo. Multaj alvenis el aliaj vilaĝoj, kaj ĉiuj havis gastojn. La kamĉatkanoj volonte kunvenas je Kristnasko en vilaĝoj, kie troviĝas preĝejo kaj pastro, kaj tiuj ne estas tre multaj. Ĉiuj ĉasistoj ankaŭ revenis el la arbaroj, kaj multaj feloj estis ŝanĝitaj por alkoholo, ĉar nun estis Kristnasko, kaj nun oni volis festeni.

Kiam ni eniris en la domon de Ivan Viktoreviĉ, afabla maljuna kamĉatkano, la domanaro ĝuste estis ŝanĝanta vestojn por iri en la preĝejon. La virinoj surmetis multkolorajn silkajn robojn kaj ŝanĝis siajn hejme faritajn boacfelajn botojn kun ursfelaj plandumoj je aĉetitaj ŝuoj kun altaj kalkanumoj, kiuj dum la irado ŝajne kaŭzis al ili grandan suferon. Kelkaj eĉ havis glacedajn ŝuojn. La viroj vestis sin per jako, kaj kelkaj eĉ per redingoto. La plej elegantaj surmetis amelitan kolumon el celuloïdo kun apartenanta multkolora banto, kiu neniam volis sidi ĝuste. Sur la piedoj ili ĝenerale havis aĉetitajn ledajn botojn anstataŭ siaj hejme faritaj. Sur la botoj la efektivaj dandoj havis brilajn kaŭĉukajn galoŝojn. Poste neniu povis diri, ke la kamĉatkanoj ne estas elegantuloj.

El la preĝejo sonoris la sonoriloj. Oni finpretigis sin, kaj el ĉiuj dometoj fluis viroj, virinoj kaj infanoj. Eĉ la suĉinfanojn oni kunportis, kaj en la dometoj restis neniu krom la bovidoj. La malgranda ĉarpentita preĝejo, kiu kompreneble ne havis sidlokojn, baldaŭ estis

plenŝtopita per homoj. Ĉie interne brulis vaksaj kandeloj, kaj la tuta preĝejo estis plena de incenso. Ĝi estis riĉe dekorita per ikonoj kaj ĉiaj ornamaĵoj. La pastro, kiu ankaŭ estis kamĉatkano kaj ĵus hejmenvenis de la zibelĉasado, ĉar li ne ricevas salajron kaj devas mem vivteni sin, staris antaŭ la altaro, vestita per sia kun katolika pompo ornamita robo.

La diservo daŭris plurajn horojn kaj estis malmulte interesa por eksterulo. Por la kamĉatkanoj ĝi supozeble estis eĉ malpli interesa, kaj ian profiton de la tuto ili neeble povas havi. La diservo, samkiel tiu en Niĵne Kamĉatsk pasintjare, nome konsistis el tio, ke la pastro kun kapturiga rapideco laŭtlegis el libro, tiel rapide, ke ŝajnis kvazaŭ estus la ĉefaĵo, ke neniu havu tempon ion kompreni. La komunumo senĉese faris la krucsignon. "Psalomŝĉiko", psalmokantisto, de temp'al tempo kantis iom kaj legis pecon kun la sama kapturiga rapideco kiel la pastro. Kelkfoje la pastro malsupreniris en la komunumon swingante la incensilon kaj intertempe la komunumo partoprenis en alterna kanto.

Tio estis la diservo de la antaŭ-Kristnaska vespero. Kiam ĝi finfine ĉesis ĉiu iris al sia hejmo, vespermanĝis kaj bonkondukte ekkuŝis por dormi, ĉar sekvontmatene okazos Kristnaska frumeso je la 7a horo.

Jam je la 5-a horo la leviĝo komencis en nia domo. La homoj sin vestis same kiel en la hieraŭa vespero, kaj post komuna tetrinkado kun eksterordinare bongusta pano oni denove marŝis al la preĝejo. La diservo ŝajnis esti fidela kopio de tiu en la vespero kaj de ĉiuj antaŭaj kaj postaj, kiujn mi aŭdis. Poste nova tetrinkado.

En la Kristnaska tago la pastro havis la taskon ĉirkaŭiri en akompano de sia psalomŝĉiko al ĉiu domo en la vilaĝo, portante krucon kaj stariĝante antaŭ la ikono, kiu troviĝas en ĉiu dometo, kun la ordinara rapideco laŭtlegi kelkajn preĝojn, dum la psalomŝĉiko in-

termite kantas. Dum tiu ago oni ekbruligas vaksan kandelon, kaj la tuta familio kolektiĝas malantaŭ la pastro.

Tiu diservo daŭras maksimume kvin minutojn. Poste apartenas al bona moro, ke oni regalas la pastron per iom da manĝaĵo kaj per glaso da brando. El tio rezultas, ke la pastro kaj lia akompananto, kiuj ne havas kutimon rezigni la glason, plirapidigas la malgrandan ofican servon por povi des pli baldaŭ atingi la brandon. Tamen neniam venus al ili en la kapon komenci sen kelkfoja trudpeto de la gemastroj, kiuj ekz. bedaŭras, ke ĝi ne estas sufiĉe forta. Tiun ĝentilaĵon la pastro kvitas eltrinkante la glason ĝis la fundo kaj deklarante, ke ĝi estas tute ĝusta. Kiel almaĉaĵon li prenas pecon da viando kaj iom da salita brasiko, kaj poste oni dankas kaj kliniĝas kaj riverencas, dum la pastro kaj la psalomŝĉiko digne elpaŝas kun robo kaj kruco por rekomenci la saman historion en la sekvanta domo. Ĉar unu preĝejvilaĝo konsistas el 15 ĝis 20 kaj la plej grandaj el 70 ĝis 80 domoj, la leganto povas fari kalkulon pri la rezulto de tiu ĉirkaŭirado.

Kiam la pastro venis al nia domo, li antaŭe jam vizitis kelkdekon. Kun konservita digno li enpaŝis kaj stariĝis antaŭ la ikono. La psalomŝĉiko lin sekvis, ja iom ŝanceliĝante, sed tamen iris. Dum la pastro rapide legis, la psalomŝĉiko komencis laŭte singulti. Li tamen ne ĝenis sin pro tio kaj faris nenion por mallaŭtigi la sonon. Sed kiam li volis ekkanti tio sukcesis malbone, kaj la infanoj komencis subridi. Unu-du-tri, kaj ĉio tamen estis finita sen granda skandalo, kaj la du sinjoroj transiris al la glaso, ne atentante ke ankoraŭ restis multaj domoj. Kiam ili poste forlasis la domon, mi vidis, ke ankaŭ la pastro devis iomete ekvilibriĝi por povi teni la krucon en ĝusta pozicio. Apartenas al bona moro, ke la mastro ekpafas kelkajn fojojn, kiam la pastro forlasas la domon.

Post unu horo mi estis eksterdome por iomete prizorgi miajn

hundojn. Tiam la du viroj ĝuste elŝanceliĝis el dometo, sed nun ili neniom plu kapablis. Ankoraŭ kelkaj domoj restis, sed fariĝis neniu vizito plu, ĉar subite la psalomŝĉiko falis kapaltere en neĝamason. Li provis stariĝi, sed falis denove en la neĝon, ke li fariĝis tute blanka en la vizaĝo. Post kiam li iom rampis kvarpiede, li sukcesis restariĝi. Kaj la pastro kaj la psalomŝĉiko ŝanceliĝis ĉiu en sian domon.

Post nelonge oni sendis informon de la pastro, ke la vespera diservo ne okazos. La kaŭzon oni ne bezonis sciigi.

Cetere la Kristnaska tago estas dediĉita al vizitoj en la najbaraj dometoj. Sed nur la viroj iras tiun tagon. Tiam ili estas vestitaj per siaj kaŭĉukaj galoŝoj kaj redingotoj kaj aspektas terure severaj. En ĉiu domo staras tablo kovrita per manĝaĵoj el ĉiuj specoj. Tie oni vane serĉas por jukolo kaj putra salmo. Estas sovaĝa ŝafo, urogalo, salmotruto kaj aliaj delikataĵoj kaj alkoholo, 96-procenta japana, diluita per akvo. Kiam oni manĝis kaj trinkis ĝissate, komenciĝas tetrinkado kun freŝaj bulkoj kaj poste bombonmanĝado. La bombonoj estas el sama speco en ĉiu dometo, ja, entute ĉio en unu dometo estas precize la samo, kiel en alia. Neniu volas esti malpli bona ol la najbaro. Dum la tuta tago estas kontinua fluo de homoj en la dometoj, kaj la konversacio ĉefe temas pri tio, kiujn domojn oni jam vizitis kaj kien oni iros, kaj kiuj estis tie kaj kien ili iros. Alterne kun tiu fekunda interparolado entrudas en la gastojn la mastrino kiom eble da manĝaĵo kaj la mastro kiom eble da alkoholo. Pri avareco ne estas demando, kaj oni manĝas kaj trinkas, ĝis kiam la stomako preskaŭ krevas. Kaj ve al tiu, kiu preterlasas iun domon. Tion li devas remaĉi dum longa tempo. Vespere de la Kristnaska tago la sekvo estas, ke ĉiuj viraj loĝantoj de la vilaĝo, kiuj atingis iom sufiĉe maturan aĝon, estas "piano", kiel oni diras ruse, t. e. ebriaj. Jam posttagmeze multaj devas okupi la dormsakon.

La sekvantan tagon la virinoj estas en vico fari vizitojn. La manĝotablo ankaŭ nun staras plenplena de frandaĵoj, kaj teon oni trinkas sen ĉeso. La interparolo turniĝas ĉirkaŭ la sama temo, kiel dum la hieraŭa tago, sed krom tio, kie oni aĉetis sian silkan jupon, siajn ŝuojn kaj kiom ili kostas ktp. Kaj kompreneble reciprokaj ĝentilaĵoj, kiel bona la manĝaĵo estas flanke de la gastoj, kaj kiel malbona ĝi estas flanke de la mastrino. Kiel la leganto vidas, estas certaj similecoj inter la civilizita homo kaj la salonvestita sovaĝulo.

Sed ankoraŭ la Kristnasko ne estas finita. En la tria tago venas la plej granda spektaklo. Tiam oni maskovestas sin en la plej nere-konebla maniero kaj tute kovras la vizaĝon per ia tuko, kaj jen la vizitoj komenciĝas denove. Ordinare estas nur la junularo, kiu partoprenas en tiuj vizitoj. Duope aŭ trioje ili eniras iun domon. Tie ili sidigas sin kaj eldiras neniun sonon. Nun estas la intenco, ke la domanaro divenu, kiuj ili estas. Ordinare la viroj estas maskitaj kiel virinoj kaj male. Se oni ne sukcesas malkovri, kiuj ili estas, ili iras al la sekvanta domo, sed se oni sukcesas, ekestas granda ĝojego. Ili forigas la tukojn de antaŭ la vizaĝoj kaj estas regalataj per teo kaj bombonoj.

La tutan trian tagon oni pasigas per tia spektaklo, kaj vespere kutime estas "veĉorka" (balo) en iu el la domoj. Tien kolektiĝas tiom, kiom trovas lokon, kaj la aeron oni povus tranĉi. Eluzita gramofono raspe eligas iun muzikaĵon, aŭ oni venigis tirharmonikan ludiston el iu najbara vilaĝo, se ne troviĝas iu en la vilaĝo. Malgranda libera loko estas lasata sur la planko, kaj sur tiu nun turniĝadas la paroj. Diversaj rusaj dancoj estas, kaj oni daŭrigas ĝis en la mateno. La varmego estas tropika, kaj la dancantoj malsekas de ŝvito. Sed tio ne gravas. De temp'al tempo oni malfermetas la pordon kaj enlasas iom da 30- aŭ 40-grada malvarmego.

La oficiala programo de la Kristnaska festo estas plenumita, kaj

post la tria tago oni povas fari, kion oni deziras. Kutime estas "veĉorka" ĉiun vesperon ĝis Novjaro. La nova jaro estas salutata per pafoj. Sed la feston oni volonte kalkulas ankoraŭ sufiĉe da tempo, kaj nur unu semajnon post Novjaro la ĉasistoj denove ekiras por ĉasi zibelon, kaj en la vilaĝo la vivo ree moviĝas en siaj normalaj reloj.

Post tritaga festenado ni frumatene forlasis Tolbaĉik por iri al la 83 verstojn malproksima vilaĝo Kosyrevsk, la estonta elirpunkto de nia vojaĝo al la montegoj. Tiun tagon komenciĝis periodo de malvarmego, kiu fariĝis la plej severa, kiu nin trafis dum la tuta ekspedicio. Mia termometro ĵus antaŭe detruigis. En Tolbaĉik mi tamen sukcesis prunti hidrangan termometron de ruso, kaj tiu montris, kiam ni startis, -32 gradojn C.

La suno brilis kaj estis belega vintrotago. Ni vojaĝis tra belaj larikarbaroj, blankaj de prujno. Samgrade kiel malleviĝis la suno, malaltiĝis ankaŭ la temperaturo, kaj jam posttagmeze la hidrargo estis frostiĝinta. Ĉe tre forta malvarmo la neĝo ne estas "katka", t. e. la sledo glitas malbone. Grincas kaj fajfetas sub la glitiloj, kaj la hundoj devas labori duoble por antaŭenigi la sledon. Apenaŭ malsupren laŭ la deklivoj ĝi volis gliti per si mem.

Nia espero estis atingi jurton, situantan 50 verstojn de Tolbaĉik. Sed ŝajnis mallume por tio, ĉar la hundoj tute laciĝis pro la malglata vojstato. Mem ni devis de temp'al tempo kuri apud la sledo por teni nin varmaj. Por neniu prezo ni volis tranokti sub libera ĉielo kaj plupelis la hundojn. Je paŭzo ni kuraĝigis ilin per peco da fiŝo, kaj kiam fine leviĝis la luno, ili plivigliĝis kaj iris sufiĉe bone antaŭen. Malfrue en la vespero ni efektive atingis la jurton. Neniu palaco povus esti pli bonvena.

Ni estis tute rigidaj pro frostoj. Nun estis necese unue akiri brulignon por la fajro. Ne estis facila tasko en la lunlumo trovi ion se-

kan, sed ni ne bezonis tre multe tuj. Plej grave estis kolekti tiom, ke ni povos kuiru al ni ion varman, poste ĉio irus pli facile. Ni kuiris kafon, kaj mi memoras, ke mi trinkis tri duonlitrajn tasojn. Poste oni denove estis homo kaj povis eliri por kolekti pli da brulligno en la arbaro.

Ni sidis plejeble proksime al la fajro kaj faris niajn notojn por la tago, laŭdante la dian varmon. La kompatindaj tirhundoj kiel ĉiam devis kuŝi ekstere. Tirhundo en Kamĉatko verdire ne havas enviindan sorton. Kiel mi antaŭe menciis, ĝi neniam en sia vivo rajtas veni endomen. Kiel malfacila la neĝoŝtormo eĉ estas aŭ kiel morda la malvarmego, ĝi devas ĉiam kuŝi eksterdome. Kaj tamen ĝi malofte perdas la kuraĝon.

Ĉirkaŭ noktomezo ni enrampis en niajn dormsakojn kaj ekdormis. La laceco estis tiel forta, ke ĝi eĉ neŭtralizis la potencan kafo-dozon. Sed post kelkaj horoj ni vekigis. Estis tiel terura malvarmo, ke ni neeble povis dormi. La termometro en la kabano estis frostiĝinta kaj la kafkruĉo, kiu staris apud la fajrujo plena de akvo, ĝisfunde frostiĝinta. Ni ne povis kuŝi senmove. Ne estis alia rimedo ol ke mi devis denove eliri en la lunlumo por havigi brullignon. Tio estis unu inter la plej malfacilaj aferoj, kiujn mi spertis. La hundoj kun miro ekrigardis, kiam ili vidis min venanta el la kabano meze en la nokto. Supozeble kun timo ili miris, ĉu ili jam leviĝu por iri en la jungilon. Ili al kutimiĝis, ke ili neniam povas prikalkuli, kiam la mastro vojaĝos.

Ni trinkis ankoraŭ kelkajn tasojn da kafo, kaj poste ne penindis provi dormi. Ni sidis apud la fajro kaj subtenadis ĝin kaj parolis, ĝis kiam komencis la tagiĝo. Tiam ni jungis la hundojn. Ni devis preni ilin duope kaj intertempe enkuri kaj varmigi nin iomete ĉe la fajro por ne frostdifekti la fingrojn.

Nun restis ĉ. 33 verstoj al Kosyrevsk, sed fariĝis malfacila tago.

Egale serena kaj bela kiel la antaŭa ĝi estis, kaj neniam mi kredis, ke larikarbaro en prujno povus esti tiel belega.

Kiam ni elvenis sur tundron, malfermiĝis panoramo de tute neĝoblanka vulkanmondo tiel grandioza, ke ni konsentiĝis ke ĝi estas la plej bela, kion ni ĝis tiam vidis en Kamĉatko. Vico da vulkanoj levigis antaŭ ni, kaj meze inter ili tronis la plej potenca el ili ĉiuj, Kluĉevskaja, al kiu ni nun ree proksimiĝis. Ni decidis provi preni kelkajn fotografaĵojn por ricevi memoraĵon, eĉ se palan, pri tiu grandioza vido. Sed tiam la kurtenobturatoro rifuzis funkcii. Tuj kiam estis pli ol 30-grada malvarmo, ĝi laboris ekstreme malbone, kaj ĉe -40 ĝi estis tute sentaŭga. La compound-obturatoro de la alia kamero ankaŭ ne estis tute normala, sed tamen funkciis.

Dum ni manipulis pri la kameroj, kelkaj fingroj fariĝis tute blankaj al mia edzino. Mi frotis ilin per neĝo, kaj feliĉe ili reboniĝis sed mi mem preskaŭ frostdifektis la fingrojn per tio.

La luno jam delonge lumis sur la sovaĝejo, kiam ni fine atingis la sopiritan vilaĝon, rigidaj pro frosto. Tie la spiritoj de la vivo estis revekataj de bolanta teo, kaj ambaŭ ni sentis, ke estas problemo dubinda kiel finiĝus, se ni estus devigitaj pasigi ankaŭ tiun nokton ekstere en la sovaĝejo.

En ankoraŭ kelkaj tagoj daŭris la sama intensa malvarmego. Estis plena senventeco. Kvazaŭ nebulo envolvis ĉion. La kornikoj kaj la pigoj, kiuj dum la vintro ĉiam kolektiĝas en la vilaĝoj, sidis globrondaj kun hirtigitaj plumoj kaj kaŝis la piedojn en la densa plumaro. Ĉiuj tirhundoj de la vilaĝo kuŝis kunvolviĝintaj kaj ne moviĝis. Kiam mi eliris por nutri la miajn, ili ne kurleviĝis saltante kaj bojante kiel kutime, sed kuŝis senmove ĝis kiam mi ĵetis la fiŝon al ili. Neniu en la vilaĝo povis rememori tian malvarmego. Ĉiu laboro estis prokrastita, kaj ĉiu nur atendis pli bonan veteron. La termometroj ĉe tiuj rusoj, kiuj posedis tiajn, ĉiuj estis frostiĝintaj. Sed mi

estas konvinkita, ke estis pli proksime al 50 ol 40 gradoj. Post kelkaj tagoj venis la ŝanĝo. Multe da neĝo falis, kaj la trafiko denove estis barita.

Ni nun atingis la elirpunkton de la vojaĝo al la nomadoj, kaj por ni nur estis trovi la amikon Sávanoh, kiu fariĝos nia gvidanto. Li festis la Kristnaskon en Kluĉi kaj ankoraŭ ne estis reveninta.

Sed iun tagon farante ekskurson per skioj en la ĉirkaŭaĵoj de la vilaĝo, mi tute neatendite trafis kvin hundsledojn, kiuj venis de norde. La unuan veturigis Sávanoh, la aliajn du korjako kaj du lamutoj. La veturo iris malglate por ili en la profunda neĝo, kaj la hundoj spiregis pro klopodo. Sed Sávanoh estis simila al si mem. Samaj brilaj nigraj okuloj kaj sama rideto. Post kiam liaj hundoj estos ripozintaj unu tagon, li estos preta akompani nin.

Al la montegoj kaj la nomadoj

Kiam ni fine estis pretaj por starto, la karavano konsistis el ne malpli ol 17 hundsledoj, ĉar ankaŭ kelkaj aliaj felkomercistoj kaptis la okazon vojaĝi laŭ la irejo de la aino. Ili sciis, ke ili tiam trovos la ĝustan vojon.

Estis tre internacia societo, kiu en tiu januara tago ekvojaĝis de la vilaĝo Kosyrevsk supren al la montegoj en okcidento. Sur ĉiu sledo sidis unu persono escepte la nian, sur kiu ni vojaĝis duope. Ni 18 vojaĝantoj reprezentis ne malpli ol 8 diversajn popolgentojn: jen estis rusoj, kamĉatkanoj, koreanoj, lamutoj, korjako, tataroj, ainoj kaj svedoj. Oni povas rigardi kiel puran akcidenton, ke neniu ĉino ĉeestis. Ili kutimas ĉeesti ĉie. Ĉiu sledo estis jungita per dek hundoj. Tial ekestis tre surdiga bleko, kiam ĉiuj 170 tirbestoj ekbojis en unu fojo.

Malproksime speguliĝis en la aero la montegoj prilumataj de la suno kaj la neĝoblanka Anaunga vulkano superstaris kiel postenanto meze inter ili.

Niaj hundoj estis treege bonstataj post la ripoztempo en la vilaĝo. Dank'al la granda akompanantaro ili ankoraŭ plivigliĝis. Sledhundoj ĉiam laboras pli bone, se multaj sledoj estas en akompano. Sed sur la tundro, tra kiu ni vojaĝis forlasinte la arbaron, la neĝo kuŝis malfirma kaj profunda. La unua hundjungitaro, kiu devis plugi vojon, havis plej penigan laboron, kaj ni devis alterne veturi la unua. Kie la arbaro ree komenciĝis, ni faris paŭzon, ĉar la hundoj baldaŭ laciĝas vadante en profunda neĝo.

Kiam komenciĝis vespero, la arbaro fariĝis pli kaj pli praarbare-

ca. Estis ŝvitiga laboro penetri tra la malebena kaj monteteca tereno. Oni tre baldaŭ deĵetis la felvestojn malgraŭ la malvarmo. Braĵoj kaj kruroj estis en granda danĝero, kiam la sledo flugis antaŭen inter la arboj. Ofte estis necese fulmrapide manovri ĝin jen al unu jen al alia flanko por ke ĝi ne frakasiĝu kontraŭ arbotrunko.

La longa vico de hundoj serpentumis antaŭen tra la senvoja arbaro ĝis tiom mallumiĝis, ke estis neeble vidi kiel veturi. Tiam subite montriĝis el inter la arboj antaŭ ni flamanta fajro. Tiuj, kiuj havis la plej rapidajn hundojn, nome antaŭveturis, trovis oportunan tranoktejon inter la altaj larikarboj apud rivero kaj kuntiris grandan ŝtiparon. Tie nun haltis ĉiuj ceteraj. Sur ĉiu sledo troviĝas hakilo, kaj baldaŭ la arbaro resonis de hakilfrapoj kontraŭ sekaj lariktrunkoj. Baldaŭ flamis ankoraŭ unu ŝtiparo ne malproksime de la unua. Por ne bezoni degeligi neĝon, ni elhakis truon en la pli ol duonmetre dika glacio, kaj multege da tekruĉoj baldaŭ pendis super la fajro.

Ni havis agrablan vesperon ĉirkaŭ la bivaka fajro. Oni rakontis amuzajn historiojn, kaj la ridadoj resonis en la arbaro. Kiel kutime Sávanoh estis la centra punkto, kaj en sia treege komika rusa lingvo li rakontis la plej mirindajn historiojn pri siaj grandfaroj, dum oni trinkis teon, manĝis jukolon aŭ sekigis vestojn tramalsekajn de ŝvito.

La ĉielo estis stelklara kaj promesis bonan veteron por la morgaŭa tago. Sekve ni ne okupis nin pri starigo de la tendo sed bivakis en maniero, kiun mia edzino kaj mi poste uzis dum la tuta resto de la vintro. Ni tute simple sternis iom da branĉetaĵoj sur la neĝo ĉirkaŭ la fajro kaj poste metis la dormsakojn sur tion. La tuta socio nun aranĝiĝis kiel la radioj en cirklo ĉirkaŭ la du estingiĝantaj fajroj kaj ekdormis ĉiu en sia dormsako.

Pli poste en la nokto nin vekis la komuna bojego de ĉiuj 170 hundoj. La kamĉatkaj hundoj havas unikan kapablon bojegi bele, se mi

povas diri tiel. Ili efektive kantas, kaj kiam unu komencas, ĉiuj aliaj levas la nazon laŭ lupa maniero kaj partoprenas en la koncerto. La tono ĉiam estas plenda kaj melankolia, kaj se oni estas sola en la sovaĝejo kaj estas vekata de tiuj tirataj bojegoj, oni facile eksentas korpremecon. En la kantaj bojegoj, kiujn la tirhundoj, precipe en malvarmaj lunlumaj noktoj, elkrias super la dezerto, mi ĉiam kredis legi la pravigitajn akuzojn de generacioj da tirhundoj al la homo pri mistraktado, nesufiĉa nutrado kaj malbona varto.

Jam antaŭ la tagiĝo la plej matenviglaĵaj komencis moviĝi kaj fari fajron. Ĉerta forto de karaktero estas postulata por rampi el la varma dormsako en 30-grada frosto, precipe se ankoraŭ ne estas lumo. Oni volonte kuŝas atendante iomete, antaŭ ol oni elrampas, kaj oni kutime alternas leviĝi unua por fari fajron. Poste ne estas malfacile elrampi el la felsako.

Ni povis ĝoji je brila sunluma vetero, sed kompanse estis morda malvarmo. Sekve oni "vojdis" la sledojn antaŭ la starto, t. e. oni ŝmiris la glitilojn per varma akvo helpe de laneca ledopeco, kiun oni rapide glitigis sur ili post kiam la sledo estis renversita. La glitiloj fariĝis malmolaj kiel vitro per la akvo, kiu glaciigis samtempe kiam oni ŝmiras ilin. La diferenco estas tuj rimarkebla.

La supreniĝa deklivo komencis iĝi sufiĉe peniga, sed eĉ pli malfacila estis la densa arbaro kun ĉiuj siaj deblovitaĵoj. Kiel mi jam menciis, la societo konsistis plejparte el felkomercistoj kaj iliaj por transporto de varoj dungitaj indiĝenoj. Nun penvaloris al ĉiu veni la unua al la unua lamuta jurto por havi la plej grandajn ŝancojn pri la zibelfeloj. Sed kiam la vetkurado daŭris grandan parton de la tago, Sávanoh arogante deklaris, ke por li estas egale, ĉu li venas la unua aŭ la lasta. Li tamen ricevos egale multajn zibelojn. Li konis siajn lamutojn.

Multaj satanaj artifikoj estas uzataj de tiuj konkurantaj felaĉetan-

toj por superi unu la alian. Unu el la pli efikaj kaj malicaj estas, ke la antaŭestanto distranĉas je pecoj kelkajn sekigitajn salmojn kaj je konvenaj interspacoj ĵetas tiajn post si en la hundvojo. La hundoj de la sekvanta jungitaro nepre trovas la fiŝpecojn, ekbatalas pri ili, kuras en unu amason kaj implikas ĉiujn tirŝnurojn, tiel ke la veturigisto devas halti kaj disordigi ilin. Kiam ili kuris mallongan distancon plu, ripetiĝas la sama afero, dum la malfeliĉa komercisto ekhavas pli kaj pli furiozan humoron. Alian fojon en neobservata momento li ŝmiras ursgrason sub la glitiloj de la sledo de sia antagoneŝto. Ĝi estas egale efika.

Fariĝis ĉiam pli malfacile penetri antaŭen, des pli alten ni surpriziĝis. Je unu okazo kvazaŭ pendis el hareto, ke mi ne frakasis al mi la piedon kontraŭ arbotrunko. Pli poste dum la tago okazis akcidenta minaco. Al mia edzino unu okulo preskaŭ estis detruata de akra, seka branĉo, kiu gratŝiris sangantan vundon unu milimetron super la dekstra okulo. Aspektis kruele. La tuta okulo fariĝis sanga, kaj ni devis degeligi neĝon je varmeta akvo por forlavi la sangon. Se la branĉo estus trafinta unu milimetron pli malsupre, la okulo estus perdita.

En la tepaŭzo mi rimarkis je mia teruro, ke mi difektis unu glitilon. Tamen ĝi ne estis rompita, kaj mi esperis, ke ĝi eltenu ĝis vespero, tiel ke mi ne bezonu okupi tempon per riparo, meze en la tago. Mi poste veturigis tiel gardeme, kiel permesis la cirkonstancoj, kaj la glitilo eltenis ĝis vespero, kiam per helpo de Sávanoh, hakilo kaj tranĉilo mi sukcesis provizore ripari ĝin.

Vespere ni bivakis sub montega deklivaĵo en sama maniero, kiel en la pasinta nokto, kaj la leviĝanta suno trovis nin jam longe survoje, klopodantaj supren kaj kurantaj malsupren laŭ unu montodorso post la alia.

Ni nun estis meze inter la montegoj. Dufoje dum la antaŭtagme-

zo ni devis volvi la dikajn ferĉenojn de la hundoj ĉirkaŭ la glitiloj, maljungi la hundojn kaj ligi ilin malantaŭ la sledo por povi malsupreniri la montegajn krutaĵojn. Pluraj homoj devis kunhelpi por ĉiu sledo.

Subite la hundoj komencis intense plirapidigi la takton. Ili tute furioziĝis kaj bojegante kuris antaŭen galope. Ni konjektis, ke ili flaras boacojn, kaj ne daŭris longe, kiam ni ekvidis du malgrandajn punktojn, kiuj moviĝis malproksime. Per la lorno mi konstatis, ke estas du boacsledoj, veturantaj en direkto al ni. La hundoj ankoraŭ ne ekvidis ilin, sed ili flarsentis ilin. Baldaŭ ili ekrimarkis nin, kaj ni vidis ilin farantaj grandan flankeniron. Boacsledo kaj hundsledo nome neniam povas renkontiĝi. Tiam postrestas de la boacoj nur ruĝa makulo kaj kelkaj kornoj, ostoj kaj felŝiraĵoj. La du nomadoj sin gardis veni proksime al la karavano, kaj ni daŭrigis nian vojaĝon. Sed nun fariĝis vera turmento konduki la hundojn. Ekscititaj kiel ili estis, ili kuris en furioza rapideco, kaj oni vidis, kiel ili fojon post fojo serĉesploris por ĉasaĵo. Sed ĉi-foje ili ne vidis la boacojn.

Sur ĉiu pli longa malsuprenira deklivo oni estis en vera danĝero pri la vivo, kaj ni plurfoje miris, ĉu ni alvenos vivaj al iu jurto. La hundoj tre malmulte atentis la komandovortojn. Ili nur volis antaŭen. Oni veturis kontraŭ arbojn, posttrentiĝis pendante, frapis brakojn kaj krurojn kontraŭ arbotrunkoj kaj devis dum la tuta tempo bremsi kiom oni nur kapablis. Malgraŭ ke estis 20-grada malvarmo kaj mi veturis en ordinara jako kaj sen ĉapo, mi ŝvitis kiel en la tropikoj. La haroj estis blankaj de frosto. La dekstra brako, kiu prizorgis la bremsbastonon, efektive doloris.

Fine ni elvenis sur altebenaĵon, kie blovetadis agrable. Tie oni povis ripozi sur la sledo kaj ne bezonis bremsi, dum la hundoj kuregis en plena rapideco. Sed baldaŭ revenis la krutaĵoj. En montega krutaĵo je la unua fojo mi devis rezigni kaj lasi la kurantan hund-

jungitaron por savi la vivon. Mi vidis, ke ni frakasigis kontraŭ granda arbotrunko, ĉar estis nepenseble flanken direkti la sledon kun tiu rapideco, kiun ĝi havis. Mia edzino kaj mi elĵetiĝis ĉiu al sia flanko kaj ruliĝadis en la neĝo. La sledo kuris kontraŭ la arbotrunkon, sed feliĉe ne rekte al ĝi sed iom flanke. La antaŭa arko krevis kaj la sledo ĵetiĝis renverse kun la glitiloj en la aero. Tio haltigis la kuron. Se la sledo kaj la hundoj daŭrigus kelkcent metrojn plu, ĉio estus perdiĝinta, ĉar tie faŭkis abismo. Frostotremado trakuris mian korpon, kiam mi poste rigardis malsupren tie kaj pensis pri la sorto de la hundoj kaj de la sledo, se ili ne estus haltigitaj per la renversiĝo.

Post kiam ni trankviliĝis iomete kaj ekspiris post la teruro, mi devis amuziĝi riparante la sledon. Sávanoh helpis min nun kiel ĉiam. Estis necese havigi novan antaŭan arkon. Ni dehakis sufiĉe dikajn betulon, faris fajron kaj surmetis la tekruĉon, sed ne por tetrinkado ĉifoje. La betultrunkon ni fleksebligis tenante ĝin super la fajro kaj poste kurbigis je U-formo. El la sledo ni elprenis kelkajn malmolajn, netanitajn fokfelajn rimenojn kaj metis ilin en la varman akvon de la tekruĉo, kie ili baldaŭ tute moliĝis. Per akrepinta tranĉilo ni poste faris la necesajn truojn en la arko, kaj per la plej artifikaj nodoj tiu estis fiksata sur la loko de la malnova, preta akcepti novajn puŝegojn.

La jurto nun devis esti ne tre malproksime, kaj tute subite la hundoj, kiuj nun kvietiĝis iomete, ĉiuj komencis bojegi denove kaj ekkuri galope. Ili ekflaris la boacgregon, sed nun la vojo estis ebena, kaj mi lasis ilin kuri tiel rapide kiel ili deziris. Ne daŭris longe ĝis kiam ni ekvidis etan malaltan feljurton, senlime bele situantan apud rivero, kaj post momento ni alvenis al la unua lamuta tendaro post 1½-monata vojaĝo de Petropavlovsk. Mi estis tute lacekonsumita kaj la tuta korpo tremis post tiu terura streĉo, kiun mi spertis dum la lastaj horoj.

En la tendaro de la lamutoj



Kelkaj loĝantoj en la unua lamuta jurto. (Fotis la aŭtoro)

El la malalta jurto fluis amaso da felvestitaj homoj, grandaj kaj malgrandaj, ĉiuj kun samaj karakterizaj mongolvizaĝoj. Ĉiuj estis vestitaj per vilaj feloj kaj scivole rigardis nin tra siaj mallarĝaj okulfendetoj. La feljako de la virinoj estis superŝutitaj per perlarj brodaĵoj kaj pendkovritaj per metalaj ornamaĵoj, tintiloj kaj sonoriletoj, kiuj ektintis je ĉiu paŝo.

Post kiam la hundoj estis fortike enĉenigitaj, la lamutoj en balbuta ruslingvo invitis nin eniri kaj trinki teon.

En la duonlumo interne la indiĝenoj sidis ĉirkaŭ la fajro en la

mezo de la jurto, kaj viroj kaj virinoj fumante siajn pipojn. Ni salutis ilin kaj estis proponataj eksidi sur la sternitajn boacajn felojn, kiuj servis kiel planko.

Ĉiuj scivole pririgardis nin. Precipe mia edzino vekis grandan intereson inter la virina parto de la jurtanaro. Ili rakontis, ke okazis nur unu fojon antaŭe, ke virino vizitis ilin. La viroj ĝenerale parolis ruse sufiĉe bone, sed la virinoj regule nur sciis kelkajn vortojn. Sávanoh prezentis nin per la jenaj vortoj: "Jevó ni kommersánt, jevó Expedizia, jevó jurta ŝíbko daJjóko za morje." (Li ne estas komercisto, li estas ekspedicio, lia jurto kuŝas terure malproksime trans la maro.)

Interne la jurto konsistis el tri tendetoj el boaca felo. La nombro de tiaj internaj tendoj aŭ "pologoj" dependas de la nombro de la familioj. Ĉiu familio nome havas sian propran. Tage la antaŭaj flankoj de tiuj tendoj estas fikslevitaj.

La mastrino de tiu interna tendo, kie ni lokiĝis, alprenis malpuran lignan kesteton, en kiu kelkaj tasoj, glasoj kaj pladoj kuŝis envolvitaj en preskaŭ nigra ĉifontuko, kiu iam estis blanka. Ŝi metis tiujn sur ladan pleton, tute similan al ordinara simpla sveda kafpleto, kaj enverŝis teon el giganta kupra kaldrono. Sur la pleton mia edzino ŝutis amason da keksoj el papersako. En malpli ol unu minuto ili estis for. El ĉiuj flankoj de la jurto oni venis por gustumi ilin.

Post kiam ni trinkis multajn tasojn da teo, la virinoj venis kun sekaj boacfelaj ŝuoj por ke ni ne bezonu sidi en niaj propraj malsekaj. Tiun kutimon prezenti sekajn ŝuojn ni poste renkontis en preskaŭ ĉiu lamuta jurto.

Post kelka tempo ni estis regalataj per manĝaĵo. Matene, tagmeze kaj vespere ĝi konsistas el la samo, nome kuirita boaca viando. La viandpecoj estas alportataj en lignaj trogoj, kaj la fingroj devas servi kiel forkoj, la ponardo por detranĉi la pecojn. La lamutoj ĉiam

kuiras la viandon sen salo. Pro tio ĉiu vojaĝanto kunportas malgrandan salujon, en kiun li trempas la viandpecojn, antaŭ ol li manĝas ilin.



La lamutoj ĉiam uzas la fingrojn kiel forkojn. (Fotis la aŭtoro)

Niaj kunvojaĝantoj, la felkomercistoj, jam komencis siajn zibelnegocojn, kaj tie ĉi kaj tie en la jurto oni vidis, kiel la zibelaj feloj estis ekzamenataj kaj prezoj fiksataj. Tiuj lastaj ordinare variis inter 150 kaj 200 japanaj jenoj, t. e. laŭ sveda mono respektive 300 kaj 400 kronoj. Tiu sumo neniam estis pagata per moneroj, ĉiam per komercaĵoj. Por sugesti la lamutojn, ke ili ricevas altan pagon por la feloj, oni kelkfoje povas pagi ankoraŭ pli ol la menciitan sumon, sed tiam des pli altigas la prezon de la varoj. El la varoj certe teo kaj

tabako ludas la plej gravan rolon. Fokfelaj rimenoj por kaptŝnuro, jungiloj kaj aliaĵoj ankaŭ estas gravaj artikloj. Krome la lamutoj ofte aĉetas farunon por karbobulkaj kaj keksojn kaj bombonojn. Samkiel ĉiuj aliaj naturpopoloj ili kompreneble ŝatas alkoholon. Sur la sledo de unu el la komercistoj mi vidis 40 alkoholbotelojn.

Vespere la antaŭa flanko de la internaj tendoj estis mallezata, kaj ĉiu familio eniris en la sian. Stĉarinaj kandeloj kiujn la lamutoj aĉetis de la komercistoj, estis ekbruligataj, kaj mia edzino kaj mi ekŝidis kaj interparolis kun niaj gemastroj. Sed antaŭ ol mi emigis ilin kun intereso respondi miajn demandojn, mi devis rakonti al ili multe pri niaj familiaj rilatoj, pri nia lando kaj kiel aspektas tie. Ili estis treege interesataj kaj speciale volis scii, kiaj ĉaseblaj bestoj k. s. ekzistas tie. Ili sieĝis nin per ĉiaj demandoj, kaj la okuloj elstaris el la kapo, kiam mi rakontis, ke ni ankaŭ havas specon de lamutoj en la norda parto de nia lando, kiuj vivas per bredado de boacoj, kaj loĝas en jurtoj. Mi devis rakonti multe pri la laponoj, kaj kiam mi montris kolorigitan karton ilustritan kun lapontendoj kaj aktoj, ili pririgardis ĝin kun senlima intereso, kaj ili eldemandis min pri ĉiuj detaloj. La akjo de la laponoj ne elvokis ilian aprobon. Ili ridante komparis ĝin kun la kanoto de la kamĉatkanoj kaj miris, ke oni povas ien veni per tia trogo. Ili petis min, ke mi montru al la laponoj veninte hejmen, kiaj aspektas la sledoj de la lamutoj, tiam ili eble povus lerni fari similajn. Kaj kiajn vestojn ili havas. La virinoj ja ne portas perlojn. Devas esti malabunde da zibeloj tie. Kaj ĉiajn aliajn pripensojn ili faris. Sed post tiu vespero ni estis bonaj amikoj, kaj tiu suspektemo, kiun ili komence montris rilate al ni, malaperis tute kaj plene. Poste ili volonte respondis ĉion, pri kio mi demandis ilin.

La nokton ni pasigis en la internaj tendoj, kie fariĝis tre malvasta loko.

Jam antaŭ tagiĝo, la indiĝenoj komencis moviĝi, kaj baldaŭ ni ĉiuj sidis ĉirkaŭ la bolanta matenteo.



Lamutaj boacoj. (Fotis la aŭtoro)

La jurto situis en valo. Ĉie ĉirkaŭe estis altaj blankaj montegoj kun deklivoj kovritaj de larikarbaro. Sur tiuj montoj sin paŝtis la boaca grego. Tuj post la tetrinkado kelkaj lamutoj alligis al si skiojn — eĉ pli mallongaj ol tiuj de la kamĉatkanoj kaj sur la suba flanko tegitaj per la mallongharara felo de la kruroj de la boaco — kaj ekkuris supren al la montego por peli la gregon malsupren al la jurto. Post mallonga tempo oni povis distingi kontraŭ la blanka neĝo sur la montega deklivo malhelan ondiĝantan rubandon, kiu moviĝis malsupren de la montego en direkto al la jurto. En la lorno oni povis vidi flanke de la kurbiĝanta grego du malgrandajn punktojn: la

du lamutojn. Sed hundojn ili ne uzis kiel helpon ĉe la manovrado de la grego, kiel faras niaj laponoj. Tio tiom pli mirigis min, ĉar en ĉiu lamuta jurto ĉiam troviĝis pluraj ĉashundoj, kiuj ĝuis grandan famon pro ĉaslerteco kaj inteligento. Sed nek la lamutoj nek la korjakoĵoj ilin uzas kiel helpon ĉe la prizorgado de la boaca grego.

Atendante la gregon, ni eniris en la jurton kaj varmigus nin ĉe la fajro. Subite ni ekaŭdis tintilojn sonorantajn — ili sonoris tiel melodie bele en la malvarmego. Ni rampis el la jurto. Kaj jen ili venis flue, milo da grandaj, belaj boacoj, rimarkinde pli grandaj ol niaj laponaj boacoj. La plej multaj estis grizaj, kelkaj tre helaj, aliaj neĝoblankaj kaj pluraj makulitaj.


La tirhundoj, kiuj estis ligitaj ĉe arboj kaj arbustoj en la proksimo komencis boji kaj salti. Precipe la miaj, kiuj vidis boacojn je la unua fojo, estis tute furiozaj kaj tiris kaj ŝiris siajn ĉenojn. La lupa naturo aperis, kaj mi estas certa, ke ili sin ĵetus sur boacon, se ili elŝiriĝus.

La boacoj ne tre atentis ilin — ili al kutimiĝis al bojantaj hundoj. Sed la lamutoj min petis pririgardi, ĉu ili estas firme ligitaj. La tuta granda grego inunde kovris la lokon ĉirkaŭ la jurto, kaj la boacoj montris tre malgrandan timon. Oni eĉ povis tuŝi kelkajn per la mano. Kiam mi fotografis ilin, kelkaj volis aliri kaj priflari la kameron. Amaso da boacoj aliris tute al la jurto serĉante por urino. Ili avide manĝis la neĝon, kie tia estis eligita. Ofte pluraj premiĝis por atingi tiajn makulojn. Kiam ili fariĝis tro trudiĝemaj kaj komencis mordeti je la jurto kaj la provizoj, kiuj estis amasigitaj tie ekstere, la lamutoj forpelis ilin, sed ili tuj revenis.

Nun estis necese kapti nombron da tir- kaj rajdbestoj, ĉar kelkaj lamutoj veturos al alia jurto kelkajn mejlojn de tie. Ĉiuj viraj lamutoj en la jurto partoprenis. Kelkaj pelis la boacojn tien kaj reen, dum aliaj per ĵetmaŝo kaptis la deziratajn bestojn. Kun miregiga lerteco

ili ĵetis la 10 klaftojn longan fokfelan rimenon en tiun kornaron, kiun ili deziris. Ili bezonis duonan horon por kapti la boacojn.

Poste oni altrenis la boacsledon. La lamuta boacsledo estas kompleta artaĵo. Ĝi estas gracila, eleganta kaj mirinde fortika. Ĉio estas farita el betulo. Samkiel sur la hundsledo oni vane serĉas por eĉ unu najlo aŭ ŝraŭbo. Ankaŭ ĉi tie ĉiuj artikoj estas kunligitaj per rimenoj, ne el fokfelo kiel sur la hundsledo sed el mallargĝaj, krudaj boacfelaj rimenoj. Per tio ĝi farigas fleksebla kaj malrigida kaj malgraŭ sia gracileco nekredeble fortika kaj samkiel la hundsledo ĝi estas riparebla kie ajn en la arbaro. La bildo plej bone montras, kiel aspektas la sledo, kaj mi bone povas kompreni, ke la lamutoj devas trovi, ke la akĵo de la laponoj estas kriplaĵo.



Lamuta boacsledo. (Fotis la aŭtoro)

Antaŭ la sledo oni jungis du boacojn unu apud la alia. La jungilo estis tre simpla, nur granda maŝo el larĝa fokfela rimeno, kiu estas metata ĉirkaŭ la kolon kaj inter la antaŭajn piedojn. Kondukrimeno iris al la kapo de ĉiu boaco, kaj per tiu oni povis direkti al unu aŭ alia flanko. La vipo konsistis el vergo kun akra butono ĉe la pinto kaj la bremsilo el peco de boaca korno kun fera pinto, kiu pendas sur la ekstera flanko de la dekstra glitilo, ĝuste kie oni metas la piedon. Ĝi estas tiel konstruita, ke oni nur bezonas meti la piedon sur ĝin por ke la ferpinto sin boru en la neĝon kaj bremsu.

Poste oni alkondukis du rajdboacojn, kaj metis la plej beletajn selojn el boaca felo sur ilin. La lamutoj nome uzas la boacon kiel rajdbeston, kutimo, kiu estas tre malofta inter boacbredantaj popoloj kaj krom inter la ceteraj tungusoj nur ekzistas inter la karagasoj kaj la sojotoj en la Sajanaj alpoj de Centra Azio. La seloj estas metataj sur la boacoj rimarkinde pli antaŭe ol sur ĉevalo. Oni sidas preskaŭ super la antaŭaj piedoj, kio estas videbla sur la bildoj, kaj direktas per kondukrimeno. Neniaj piedingoj ekzistas. Por kunhelpi ĉe la ekvibrado oni tial, precipe la virinoj, uzas longan bastonon. Oni rajdas paŝe aŭ trote sed neniam galope. La boacoj ne eltenas tiel fortan streĉadon, kiun postulas tio lasta. Sed alie ili estas tre persistaj ankaŭ kiel rajdbestoj. 50 km ili senpene iras kun unu rajdanto en unu tago sen malutilo. Mi mem vidis ripetfoje, kiel lamutoj en duona tago rajdis 30 ĝis 40 km kaj la boacoj ne ŝajnis lacigitaj. Mia edzino kaj mi kompreneble provis rajdadon sur boacoj, sed nur mallongajn distancojn ĉirkaŭ la jurtoj. La lamutoj ne volonte lasis nin uzi iliajn rajdboacojn por pli longaj vojaĝoj, ĉar ili konsideris nin tro pezaj por ili.

Kiam do la dezirataj boacoj estis kaptitaj, aljungitaj kaj selitaj, oni kunpelis la gregon for de la jurto, kaj denove ĝi serpentumante surprénis la montegon, ĝis kiam oni bezonos ĝin venontfoje.

Nia plano ne ampleksis restadon dum pli longa tempo antaŭ ol en la sekvonta jurto, kiu havis plurajn aliajn jurtojn en la proksimo. Ni do decidis veturi plu en la sama tago kaj en sama direkto kiel la lamutoj kun siaj boacoj. Nun estas tiel, ke se boacsledoj kaj hundsledoj veturos laŭ la sama vojo, la hundsledoj devas veturi antaŭe kaj la boacsledoj sufiĉe longan tempon poste. Se tiuj lastaj veturas antaŭe, la sekvo estas, ke la hundoj bojegante ekkuras en la freŝaj paŝosignoj de la boacoj kaj per ĉiu forto provas atingi la boacojn.



Rajdanta lamutino. (Fotis la aŭtoro)

Ŝarĝitaj per diversaj etnografiaĵoj, kiujn ni interŝanĝe ricevis en la jurto, ni startis kune kun mia fidela Sávanoh, kiu sidis kantetante pro ĝojo pri la bonsukcesaj zibelnegocoj, kiujn li faris, dum pluraj

el la aliaj komercistoj ne ricevis eĉ unu felon. Lia vizaĝo radiis pro ĝojo kaj la nigraj okuloj brilis, kiam li rakontis al mi, kiom lin envidias la aliaj. Por ankoraŭ pli inciti ilin, de temp' al tempo li prenis zibelfelon kaj svingis ĝin en la aero kriante al la hundoj: "Jen vi vidas, hundoj, kiel aspektas bona zibelfelo." Tion li tamen nur faris kiam liaj konkurantoj estis tiel proksime, ke ili vidis kaj aŭdis ĉion.

Sed tio estis nur en la komenco de la tago, ĉar baldaŭ ni devis pensi pri aliaj aferoj. Sávanoh jam matene kuraĝigis min per tio, ke la hieraŭa vojo estis kvazaŭ tundra kompare kun la vojo al la sekvonta jurto. La koro preskaŭ saltos el la buŝo, tiel peniga ĝi estos, li diris.

Dufoje ni devis deĵungi la hundojn, ligi ĉenojn sub la glitilojn kaj per komunaj fortoj malsupren treni po unu sledon. Sed poste ni venis al la plej terura deklivo, kiun ni renkontis dum la vintra vojaĝo. Kiam ni staris ĉe ĝia piedo, mi ne kredis, ke estus eble per ŝarĝitaj sledoj suprengrimpi tiajn krutaĵojn. Ni prenis po unu sledon. La hundoj, la admirindaj bestoj, ektiregis per ĉiuj fortoj. La langoj pendis el iliaj buŝoj, kaj ili spiregis kiel bloviloj. Iris metron post metro. Se ni cedis por momento, la sledo glitis malantaŭen. Kiam ni fine suprenigis la du unuajn sledojn sur la supron, ni estis malsekaj kiel ĉifonoj, kaj la koro batis tiel ke ni povus timi, ke ĝi krevos. Sed estis neniu tempo por ripozo. Ni ligis la hundojn kaj renversis la sledojn, jen ni devis ŝoviĝi malsupren en la abismon por kunhelpi pri la posta sledo.

Fine ĉiuj estis supre. La vido de tie estis grandioza. Kien oni turnis la okulon, kuŝis neĝoblankaj montegoj kaj vulkanoj baniĝantaj en la sunlumo. Blovetadis nepriskribeble agrable. En tiu varmigita stato, en kiu oni sin trovis, la glacia vento estis sentata same agrable kiel alie kutimas la plej varmetaj someraj ventetoj. Kion oni pleje bezonis, estis malvarmetiĝo, kaj mi manĝis neĝon sen ĉeso. Ofte tio

estis la sola maniero malvarmigi sin, se oni ne lavis la vizaĝon per neĝo. Ambaŭ manierojn oni ofte praktikas. Mi veturis longe sen ĉapo post tiu ŝvitbano. La haroj, kiuj estis tramalsekaj, fariĝis blankaj kaj rigidaj de frosto.



Lamuto en sia nefermita felvesto. (Fotis la aŭtoro)

Subite Sávanoh difektis sian sledon. Por ne perdi tempon du fojojn, ni faris tepaŭzon tie, kvankam estis malfacile trovi brullignon.

Antaŭ ol ni estis pretaj, la lamutoj atingis nin per siaj rajdboacoj kaj unu sledo. La hundoj ekvidis ilin la unuaj kaj volis alkuri. Ni devis ligi ilin fortike kaj minaci ilin per fortaj vortoj. La lamutoj haltis kelkcent metrojn malantaŭ ni, ligis la boacojn kaj venis por partopreni en la tetrinkado.

En la krepuskiĝo ni atingis la riveron Bistrajá (La rapida). Sur ĝia bordo kuŝis la jurto, kiun ni serĉis. Sed kiam ni alvenis, mi estis tiel ĝismorte elĉerpita, kiel mi neniam antaŭe estis. La tuta korpo tremis, kaj mi apenaŭ kapablis enĉenigi la hundojn. Poste ni eniris — mia edzino ne estis multe pli bonfarta ol mi — kaj eksidis inter novan aron da lamutoj, egale gastamaj kaj afablaj kiel la antaŭaj. Dum pluraj horoj mi ne kapablis ion manĝi, kaj mi ankoraŭ hodiaŭ memoras, kiel malfacile estis por mi kolekti la lastajn fortojn por eliri kaj manĝigi la hundojn. La kompatindaj bestoj ankaŭ ne estis similaj al si mem. Ili restis kuŝante, ĝis kiam mi metis la fiŝon antaŭ ili. Kelkaj ne elmanĝis sian porcion. Parolante pri hundnutraĵo, samkiel miaj kunvojaĝantoj mi ankaŭ kunportis jukolon el Kosyrevsk por tuta semajno. La lamutoj nome ne volas buĉi boacojn je hundmanĝaĵo. Kelkaj lamutoj tamen tenas propran hundaron kaj tiaokaze havas jukolon, sed ili ĉiam havas malmulte, pro kio estas plej saĝe kunporti tiom, por kiom estas loko.

Kvankam multaj tagoj post tiu estis malfacilaj, tiu tago tamen restas en la memoro kiel la plej peniga dum la tuta ekspedicio. En la nokto ni nur povis dormi kelkajn horojn. Sed nun ni ankaŭ atingis lokon, kiun ni pensis uzi kiel ĉefrestadejon dum iu tempo, kaj tio estis bona.

Apenaŭ ni envenis en la jurton, kiam la lamutoj unuvoĉe petis por rigardi la ilustritan karton pri la laponoj. La famo jam atingis tien. En ĉiuj postaj jurtoj, kiujn ni vizitis, estis same. La akĵo ĉie

vekis la saman malaprobbon. "Kaj kiel malriĉaj ili aspektas, kiuj ne havas perlojn!"

Pli poste en la vespero amiko Sávanoh provis igi la lamutojn danci sian nacian dancon "norgali". Mem majstro pri tiu arto, li sukcesis kolekti ĉiujn en la jurto, kaj en la lumo de la fajrujo ni nun povis okulvidi tiun strangan dancon. Ĝi estas farata tiel, ke la lamutoj, kaj viroj kaj virinoj, aranĝitaj kvazaŭ por rondanco ĉirkaŭ la fajro, staras sur unu loko svingante sin jen al unu jen al alia flanko, eligante unu al la alia iajn bestajn siblajn sonojn, dum ili alterne fermas la okulojn kaj faras grimacojn. La danco, se oni povas ĝin tiel nomi, nek estas bela nek prezentas ian varion, nur kurioza. Estas nekompreneble, ke ili povas elteni tiel longe, kiel ili faras, ne raŭkiĝante. Norgali estas tre ŝatata plezuro ĉe la lamutoj.

La sekvan matenon la komercistoj veturis plu al aliaj jurtoj. Iom post ilia forvojaĝo komenciĝis la plej sovaĝa alkohola orgio, kiun oni povas imagi. Ĉiuj pagis siajn felojn parte per alkoholo, kaj nun oni intencis drinki. Post duona horo ĉiuj viroj en la jurto estis ebriaj. Kelkaj estis el la sovaĝa speco, aliaj kviete endormiĝis, tuj kiam ili ebriiĝis. Iu maljunulo estis speciale malfacila. Li komencis interbatalon kontraŭ la aliaj, elingigis la ponardon kaj tute furioziĝis. La ŝaŭmo staris al li ĉirkaŭ la buŝo, kaj li ĉirkaŭkuris kiel sovaĝulo. Subite li saltis rekte en la fajron. Ni ĉiuj alkuris kaj elgiris lin. Poste la virinoj kaj tiuj viroj, kiuj ne estis tute senkonsciaj, alprenis dikajn fokfelajn rimenojn kaj ligis lin ĉe piedoj kaj manoj, tiel ke li ne povis moviĝi. Poste li devis kuŝi kiel pakaĵo, kaj fine li endormiĝis.

Mia edzino kaj mi uzis parton de la tago por ekskurso per skioj al proksima jurto, dum la mastroj fordormis al si la ebriecon. Kiam ni revenis posttagmeze, la plej multaj revigligiĝis. Unu el la pli aĝaj lamutoj, kiu havis kvietan temperamenton, prilaboris sian magian tamburon kaj kantis monotonajn lamutajn melodiojn. La tutan res-

ton de la tago kaj la duonon de la nokto li okupis sin pri tio sen ĉeso. Magia tamburo ĝustadire ne apartenas al la lamutoj. Laŭ la nomo ili estas kristanoj kaj oficiale konfesas la greke katolikan kredon. En ĉiu jurto pendas malgranda ikono, kaj ili ofte faras la kruco-signon antaŭ ĝi. Sed en koro kaj animo ili estas fidelaj al sia malnova ŝamanismo, t. e. la arto per helpo de spiritoj ŝanĝi la pason de la okazaro. Ilia ĉefa instrumento je tio estas la magia tamburo. Per ties helpo ili elvokas la spiritojn.

La maljunulo fariĝis pli kaj pli petola, des pli longe li frapis sian tamburon. Fine li devis surmeti sian specialan ŝamanan veston. Ĝi konsistas el speciala ŝamana pelto kun multaj perloj kaj felbrodaĵoj kaj felkufo, ĉirkaŭ kiu pendas longaj perlornamitaj feltufoj, kiuj malebligas al la portanto ion vidi. Ĉar li oficiale estis kristano, li sentis sin iom ĝenita sidi antaŭ ni elvokante spiritojn en tiu maniero kaj deklaris pli ol dudek fojojn, ke reale nur estis antikvatempe, kiam oni ĉi tiel frapis la tamburon. Nuntempe nur maljunuloj faras tion, kaj nur kiam ili estas ebriaj, li aldiris sincere. La mastrino en tiu interna tendo, kie ni loĝis, ankaŭ sentis sin treege ĝenita pro la maljunulo kaj deklaris ripetfoje, ke ili donace ricevis la magian tamburon de la korjako kaj ke ĝi estas tute identa kun la balalajko de la rusoj. En ĉiuj lamutaj jurtoj, kiujn ni poste vizitis, ni ĉiam trovis kaŝitan magian tamburon, kiun ili tamen prefere volis, ke oni ne rimarku.

Post kelkaj tagoj ni vojaĝis kune kun du lamutoj al alia jurto. Ĝi kuŝis sur vala deklivo duonan tagvojaĝon de la restadejo ĉe Bistraja kun ravaj perspektivoj en ĉiuj direktoj. Ĉi tie ni renkontis la plej simpatian lamutfamilion el ĉiuj, kun kiuj ni konatiĝis supre inter la montegoj, kaj tie ni ankaŭ restis dum pluraj tagoj. La famo pri ni jam antaŭ longe atingis ilin, kaj ili diris, ke ili dum pluraj tagoj atendis viziton de la vojaĝantoj el malproksime.



Maŭra. (Fotis la aŭtoro)

Nia alveno al la jurto tamen estis ne tre respektinda, ĉar kiam ni pasis la lastan malsupreniran deklivon, ni en akra kurbo faris elegantan rulfalon meze antaŭ la okuloj de la lamutoj. La hundoj nur pensis pri boacoj kaj neniel atentis niajn provojn malrapidigi la kuron. Sed ni tamen estis egale elkore akceptataj. Ni ekloĝiĝis en interna tendo, kie loĝis la lamuto Ivan Petroviĉ kun sia edzino Maŭ-

ra kaj ilia kvinjara fileto Ilja. Jam antaŭ ol ni eltrinkis la unuan te-
tason, ili petis rigardi la ilustritan karton. Ĝi nun servis kiel ia re-
komenda letero.

Ŝajnas al mi kaj malĝojige kaj ridinde, ke tiuj kompatindaj felves-
titaj sovaĝuloj, kiuj havas neniun interrilaton kun la civilizacio, estu
devigitaj lasi sin bapti de tiuj karikaturoj de pastroj, kiuj troviĝas tie
kaj tie ĉi en la vilaĝoj kaj en neniu rilato staras sur pli alta nivelo ol
la sovaĝuloj. Kial la lamutoj ne havu rajton frapi sian magian tam-
buron, kiel faris iliaj prapatroj de nememoreblaj tempoj, kaj kial ili
ne havu rajton konservi siajn proprajn nomojn, kiuj sonoras de
sovaĝejo, anstataŭ esti baptataj je Ivan Petroviĉ de duoncivilizita
kamĉatkano aŭ ruso? Tio pli konvenas al sinjoro en redingoto kaj
kaŭĉukaj galoŝoj ol al liberaj kaj sendependaj sovaĝuloj, kiuj vivas
per viando kaj estas vestitaj per feloj ĝis sur la korpa haŭto. Mi opi-
nias, ke la misio faris bonon en multaj lokoj, sed ĉi tie inter la mon-
tegoj ĝi ne faras tion. Kiam. la reprezentantoj de la nova kredo star-
ras tiel malalte, kiel ili faras en Kamĉatko, ili ne povas vekti respek-
ton inter siaj prozelitoj kaj devas unue misii sin mem, antaŭ ol ili
komencas je aliaj.

Nu bone, Ivan Petroviĉ tamen estis interesa kaj simpatia homo,
kaj en tri tagoj mi turmentis lin per trudiĝemaj demandoj pri la vivo
de la lamutoj kaj pri la detaloj de la boaca bredado. Mia edzino, kiu
ĉie gajnis la korojn de la virinoj, igis ilin rakonti pri la severa vivo
de la virinoj, pri iliaj malĝojoj kaj plezuroj, pri iliaj geedziĝoj kaj
entombigoj. Maŭra estis ne nur la plej bela sed ankaŭ la plej sim-
patia el ĉiuj lamutinoj, kiujn ni renkontis. Ŝi ankoraŭ staris en la
plena belĉarmo de sia junaĝo kaj ne ricevis tiujn sulkojn sur la viza-
ĝo, kiujn alie la severa vivo frue faras al la homoj en tiuj regionoj.

Ni travivis multajn interesajn aferojn en tiu jurto. Ni ricevis ek-
konon pri la ĉiutaga vivo de la lamutoj, faris rajdajn ekskursojn sur

la dorso de boaco kaj akompanis niajn gemastrojn en iliaj boacsle-
doj por vizitoj al proksimaj jurtoj. Ni ekhavis fortan impreson de tiu
sendependa kaj feliĉa vivo, kiun vivas tiuj nomadoj. Ili posedas ĉion
necesan krom teo kaj tabako.



Mia edzino kaj lamutino sur la boacodorso. (Fotis la aŭtoro)

La boaca grego estas ilia plej grava posedaĵo. Sed diference de
siaj najbaroj, la korjakoĵoj, ili ne vivas ekskluzive per tiu. La ĉaso es-

tas por la lamutoj grava vivrimedo, kaj ili dividas sian laboron inter tiu kaj la bredado de la boacoj. Sekve ili ne povas teni tiel grandajn gregojn de boacoj kiel la korjako, kiuj preskaŭ ekskluzive vivas per bredado de siaj boacoj kaj preskaŭ nur por plezuro iam ĉasas. Nek la lamutoj nek la korjako iam melkas siajn boacojn, kiel faras niaj laponoj. Kiam mi demandis ilin pri tiu afero, tio vekis kaj miron kaj ridon. La tuta jurto ridis kaj miris, kiel mi povas kredi, ke ili volas fortrinki la lakton por la boacidoj.

Ĉar la lamutoj do ne tenas grandajn gregojn de boacoj — ĉiu jurto ĝenerale havis de kelkaj centoj ĝis maksimume milo da bestoj — ŝajnis al ili domaĝe buĉi pli ol la plej necesan. Se la lamutoj loĝas proksime de riĉa korjako, kiu povas havi eĉ 4 ĝis 5 mil bestojn, ili kutime preferas veturi al tiu kaj almozpetas kelkajn boacojn. Kaj la afablaj korjako, kiuj certe sentas sin iomete fieraj pro sia riĉeco, eliras kaj kaptas tiom, kiom deziras la lamutoj. Ĉio okazas sub amikaj formoj, kaj la lamutoj supozeble faras rezervon al la korjako, kvankam mi neniam vidis tion. Sed la korjako ofte diris al mi post tiaj viandvizitoj: "Jes, tiuj lamutoj, ili ja estas sentaŭgaj. En la tuta vintro ili senĉese veturas al ni por boacoj. Eĉ ne unu boacon el siaj propraj ili volas buĉi, nur pro tio ke ni donas al ili, kion ili bezonas. Oni devus ne doni al ili eĉ unu boacon. Ili ja povus prizorgi siajn proprajn iom pli bone anstataŭ ĉirkaŭkuri ĉasante zibelojn." Sed la venontan fojon, kiam la lamutoj venas, ili tamen estas gastame akceptataj, regalataj per teo kaj viando kaj revenas kun la sledoj plenaj de boaca viando. La lamutoj klarigis al mi la situacion jene: "Tiuj kotaj korjako, ili havas tiom da boacoj, ke oni estus stulta, se oni buĉus iun el siaj propraj." Ambaŭ gentoj malbone parolis unu pri la alia antaŭ mi, kaj mi ekhavis la impreson, ke la amikaj interrilataj formoj inter ili estas el la sama speco, kiel tiuj sinceraj deklaroj

pri la plej granda reciproka amikeco, per kiuj ĉiam finiĝas la plej amaraj diplomataj notoj.



Lamutaj infanoj. (Fotis la aŭtoro)

La ĉiutaga vivo en la jurto estas tre monotona. Oni ĉiam leviĝas frue, ordinaro antaŭ ol estas plena lumo, tiel ke oni vidas la stelojn tra la fumelirejo, se estas serena tago. La plej unua faro estas ekbruligi fajron. Brulligno ĉiam troviĝas interne en la mateno. Poste oni surmetas la tekruĉon, kaj ĉiuj en la jurto sin varmigas per teo. Post tio sin lavas tiuj, kiuj havas emon, kiuj ne estas tre multaj. La lavado okazas tiel, ke ili albuŝigas la bekon de la granda tekruĉo kaj sorbplenigas la buŝon per akvo. Poste ili ŝprucigas la akvon en la manojn kaj iomete lavas la vizaĝon. Kiam mia edzino kaj mi unua-

foje vidis, kiel ili lavas la infanojn, ni ne povis ne ridi. La patrino sorbplenigis la buŝon per akvo kaj poste elsputis unuope ŝprucaĵon rekte en la vizaĝon de la kriaĉanta infano, post kio ŝi frotis ĝin per tufo de sfagno. Kiel mantukon oni uzas tre delikatan kaj molan lignolanon, kiun la virinoj preparas skrapante per akra tranĉilo longajn kaj delikatajn tranĉaĵojn el salikligno. Oni ankaŭ uzas ĝin por viŝi la tetasojn.

Kelkaj el la viroj tuj matene skikuras al la grego por prizorgi ĝin kaj peli ĝin hejmen al la jurto, se oni bezonas bestojn.

La virinoj ordinare eksidas por prepari felojn, laboro, pri kiu ili regule estis okupitaj, kiam ni faris vizitojn. Ili ankaŭ faras ĉiujn vestojn, kaj siajn proprajn kaj tiujn de la viroj, kaj tio estas laboro, kiu okupas grandan parton de ilia tempo. Ĉiuj vestoj estas farataj el feloj. Escepte la ĉapon kaj kelkajn garnaĵojn la vestoj estas ekskluzive el boaca felo. La ĉapojn oni ofte kudras el gula, hunda aŭ, kiam ĝi estu tre eleganta, lutra felo. La someraj vestoj estas el ŝamo, kiun ili faras speciale mola. Kiel estas videble laŭ la bildoj la lamutoj, diference de la korjakoĵoj, havas nefermitajn feljakoĵojn. Tiuj de la viroj estas proksimume de la sama fasono kiel jaketo!

La preparado de la feloj okazas laŭ diversaj manieroj, depende de tio, por kio ili estos uzataj. Sed ĉiu tanado komenciĝas en sama maniero. La sekigitan felon oni sur la karna flanko skrapas pura de graso kaj kuniga histo. Poste oni ŝmiras la karnan flankon laŭ ofte uzata metodo per dekokto de alna ŝelo kaj urino, post kio oni ĝin kunfaldas kaj kuŝigas en iu varma loko tra unu nokto. La sekvontan tagon oni denove gratas ĝin per la skrapilo kaj frotas ĝin detale, per kio ĝi farigas mola kiel ŝtofo kaj estas preta.

Ĉiuj vestoj estas kudrataj per tendenoj anstataŭ fadeno kaj per trieĝaj kudriloj. Ordinaraĵ rondaj kudriloj estas tre maloportunaj ĉe felkudrado.

La sennombraj vitraj perloj sur la vestoj de la lamutoj estas tre alte ŝatataj. En ĉiu jurto, kiun ni vizitis, la virinoj demandis al ni por perloj. Tiu malgranda provizo, kiun ni kunportis, ekhavis rapidegan debiton, kaj ni multfoje bedaŭris, ke ni ne kunportis grandan provizon da perloj el Svedlando. Ili estis la absolute plej bonaj varoj por interŝanĝo, kompreneble se oni ne volis malaltigi sin al komerco per alkoholo. La perlojn oni surfadenigis en longaj vicoj sur tendenojn, kiuj poste estas alkudrataj al la felvestoj. Kiam vesto estas eluzita, oni transmetas la perlojn al nova.

La lamutoj estas tre lertaj tinkturi felojn al siaj vestoj. La virina vesto ĉiam estas ornamita, krom perloj, per granda nombro da mallarĝaj borderaĵoj el diverskoloraj felpecoj. Bele ruĝan koloron oni ricevas per tinkturo el vakcinia suko, alian per alna ŝelo. La franĝoj de la ŝamana ĉapo ekz. konsistas el tufoj el nenaskita foko, tinkturitaj per vakcinia suko.

Kiam la lamutoj veturas malsupren al la vilaĝoj por vizito, vestitaj per siaj belaj felĉapoj, peltoj kaj botoj, la kamĉatkanoj kaj la rusoj ĉiam provas almozpeti tiujn de ili. Kelkaj estas tiom senhontaj, ke ili ebriigas ilin kaj tute simple ŝtelas iliajn belajn, perlornamitajn vestojn kaj poste vestas ilin per kelkaj eluzitaj kaj disgiritaj ĉifonoj. La lamutoj ofte plendis al ni kaj deklaris, ke nuntempe ili ĉiam surmetas la plej malbonan, kion ili posedas, kiam ili vizite veturas al rusoj aŭ kamĉatkanoj.

Ĉiuj virinoj en la jurto de Ivan Petroviĉ fumis. Al ĉiu pipo apartenas pingla purigilo, kiu ordinaro pendas per rimeno ĉe la tabakujo. Ĝi ofte estas inkrustita per kupro kaj samkiel la pipo la propra laboraĵo de la lamutoj. En akompano kun tiu pipa purigilo ofte pendas sur la tabakujo de la viro malgranda pinĉiletsimila aparato, ankaŭ ĝi provizita per inkrustaĵoj. Ĝi estas uzata por eltiri barberojn. La lamutoj simile al la korjakoĵ havas tre malfortan barbkreskon. Ili

ne ŝatas barbon, kaj laŭsekve eltiras la barberojn kun la radiko per tiu pinĉileto.

Kiam mi volis aĉeti tian pinĉileton por la kolektoj, la posedanto respondis al mi, ke ne utilas, ke mi komencas eltiri la barberojn. Tio doloras tiom, ke estas pli bone lasi ilin kreski. Oni devas komenci pli frue. Por efektive kuraci min li volis eltiri kelkajn barberojn por montri kiom doloras.

La tabakujo ofte estis treege bele brodita per perloj. Por ke la tabako pli longe daŭru, oni tranĉas rabotaĵojn el rampa pino, kiuj poste estis diserigataj kaj miksataj kun la tabako.

Preskaŭ ĉiuj viraj lamutoj uzis flartabakon. Por plifortigi la flartabakon, oni miksis ĝin per cindro de poliporo betula, kiujn oni kolektis en la arbaro. Ofte dum niaj komunaj ekskursoj mi vidis mian akompananton subite haltigi la sledon kaj surgrimpi arbon por tia poliporo.

Estis tre interese vidi, kiel sin amuzis la infanoj ekster la jurto. Tre populara plezuro estis glitado sur la genuoj. La infanoj simile al la plenaĝuloj havas botojn el mallonghara boaca felo. La haroj kuŝu dense premitaj al sama direkto kaj la felo estas tre glata. Aspektis tre komike, kiam la etaj felpakaĵoj ekkuris kaj ĵetis sin surgenuie malsupren laŭ malgranda deklivo. La glito iris rapide kaj ofte finiĝis per rulfalo. La etaj tungusidoj verŝajne havis grandan plezuron.

Alia ludo, kiu pli rekte antaŭekzercis ilin por la estonteco, estis ĵeti kaptŝnuron. Tiam ofte knabeto kuris tien kaj reen kun peco de boaca korno en la mano, dum alia provis ĵeti la maŝon ĉirkaŭ la kornon. Sed ordinare oni starigis stangon kun longa rimeno fiksita ĉe la pinto. En la malsupra ekstremo oni pendigis pezaĵon, kaj poste oni ekmovis tiun, kiu tiam desegnis cirklon ĉirkaŭ la stango. Pluraj knaboj nun povis samtempe ĵeti kaptŝnuron post la svingiĝanta pezaĵo.



La kvinjara Ilja jam povis rajdi kiel plenaĝa viro. (Fotis la aŭtoro)

Ivan Petroviĉ ŝatis rakontadi pri sia knabo Ilja, kiu nur havis kvin jarojn, sed tamen povis rajdi sur boaco kiel plenaĝa viro kaj jam kunhelpis gardante la gregon. Li eĉ komencis elmeti kaptilojn la pasintan vintron kaj sukcesis kapti du ermenojn. Por la unu li interŝanĝe akiris tetason, por la alia tintilon al sia rajdboaco. En akompano kun la patro li lastsomere ekvidis sian unuan urson en la arbaro. En la venonta vintro li rajtos komenci iomete ĉeesti ĉe la zi-

bela ĉasado, la paĉjo deklaris kun videbla fiero. Sed la eta Ilja estis escepto, aliaj knaboj komencis rajdi nur je sep jaroj.

Sed Ivan Petroviĉ ne nur fanfaronis pri sia filo, li ankaŭ fanfaronis pri si mem. I a. li rakontis, ke ekzistas neniu lamuto kaj nur unu korjako, kiu povas trinki tiom da alkoholo kiom li ne fariĝante piano. Li povis trinki tri botelojn ($\frac{1}{2}$ l. nediluita en ĉiu) unu post la alia kaj tamen iri firme sur la piedoj. Nur kiam li trinkis 5 aŭ 6 botelojn, li senkonsciigis kaj kuŝis kiel sako. "Aliaj lamutoj ebriiĝas pro nur kelkaj glasoj!", li deklaris aroge.

Kiam vesperiĝis, ni estis regalataj per supo. Ĝi konsistis el distranĉita viando, kuirita en akvo sen salo. Ĝi estis alportata en lavkuvo, el kiu ĉiuj ordinare manĝis senpere. Oni ja povas elpaki siajn proprajn vazojn kaj mem kuiru manĝaĵon en ia jurto, sed kaj la lamutoj kaj la korjako sentas sin ofenditaj de tio kaj rompas ĉiujn amikajn interrilatojn kun la gastoj. Se oni do volas veni en pli intiman kontakton kun ili, oni devas vivi precize kiel ili kaj forlasi civilizitajn kutimojn.

Dum ni kvietigis la malsaton en la lavkuvo, hundo ensaltis sur tri piedoj. Unu antaŭkruro estis ligita al la kolringo. La hundo prezentis kompatindan aspekton, sed ĉirkaŭlamis sufiĉe senĝene. Tiun kutimon mi poste retrovis en preskaŭ ĉiuj jurtoj. Oni fikslevis la antaŭkruron por ke la hundoj ne kuru peli la boacojn. Cetere ĉie en la jurtoj abundis je malgrandaj vilaj hundidoj, al kiuj ĉiuj estis afablaj. La infanoj ludis kun la hundidoj, kaj neniam mi vidis iun piedfrapi aŭ bati ilin, kiel ĉiam faras la kamĉatkanoj.

De temp'al tempo, dum Ivan Petroviĉ kaj mi sidis kaj interparolis, lia edzino venis kaj proponis al ni frandaĵojn en formo de kru- da medolo kaj boaca graso. Mia edzino tre amikiĝis kun ŝi kaj kun la ceteraj virinaj anoj de la jurto, kaj ni ambaŭ akiris multe da etnografaĵoj por niaj kolektoj.

Unu el la plej aĝaj virinoj, kiu nomiĝis Matrona, estante infano vizitis la rusan guberniestron en Petropavlovsk kune kun sia patro kaj kelkaj aliaj lamutoj. Ŝi bonege parolis ruse kaj rakontis multe pri la vivo kaj kutimoj de la lamutoj.

Kiel dirite, la lamutoj laŭnome estas greke katolikaj. Maksimume unu fojon dum la jaro venas pastro, ordinare de Kluĉi aŭ de la okcidenta marbordo, kaj faras ofican rondvojaĝon inter la montoj. Tiam li baptas, geedzigas kaj entombigas por la tuta jaro je kontanta rekompenco, t.e. je zibelaj feloj. Kamĉatkana pastro nome faras nenion senpage.



Lamutinoj en siaj festaj vestaĵoj. (Fotis la aŭtoro)

Sed kiam du lamutoj geedziĝas, ili tamen kutime preferas mem veturi al la pastro. Ofte ili tiam veturas al la granda vilaĝo Tigil en norda Kamĉatko. Multaj parencoj kaj amikoj akompanas ilin. Ili veturas parte rajdante, parte per boacsledoĵ kaj kunhavas grandan

traĵnon. Ĝis en la vilaĝo ili ne povas veturi pro la hundoj, sed haltas tendare je sufiĉa distanco de ĝi. Tie ili starigas grandan jurton, kiun ili kunpakis sur la sledo. Multajn ikonojn oni pendigas tie interne. La geedziĝo okazas en la vilaĝa preĝejo, sed la festeno havas lokon en la jurto. Fariĝas pompa geedziĝo, kiu daŭras en tri tagoj kaj tri noktoj, dum neniu havas tempon por dormo. Jam longe antaŭe oni prizorgos, ke ne manku manĝaĵoj kaj alkoholo. Samkiel ĉe sveda vilaĝana geedziĝo la manĝaĵo ludas plej gravan rolon. Oni tamen ne bezonas manĝi nur la puran viandon. Boacaj langoj, medolostoj, boaca graso kaj aliaj frandaĵoj estas ŝparitaj dum longa tempo, tiel ke ĉiuj povu manĝi, kiom ili nur kapablas.

Ĉiuj estas vestitaj per siaj plej elegantaj porfestaj vestaĵoj, kiuj pezas pro perloj kaj metalaj ornamaĵoj el ĉiuj specoj, de grandaj kupraj ornamaĵoj ĝis malplenaj kartodingoj, pendseruroj kaj pecoj de hundjungiloj. Oni sin dediĉas al ĉiusecaj plezuroj, saltas trans la fajron, dancas norgali, faras luktojn, vetkurojn per boacsledo kaj frapas la magian tamburon tage kaj nokte.

Kiam la festonado estas finita, oni kunpakas la jurton kun apartenaĵoj, kaj la tuta longa karavano sin retiras al la montegoj.

Kiam ni estis ekveturontaj kaj Ivan Petroviĉ ekaŭdis, ke ni intencas pli poste dum la vintro vojaĝi al la okcidenta marbordo, li rakontis, ke li mem multfoje estis tie kaj bone konas la vilaĝojn. Sed odoris tiel malbone en la dometoj de la kamĉatkanoj, ke li kredis, ke estos neeble por ni dormi en ili. La lamutoj, al kutimiĝintaj al freŝa aero, ekhavis kapdoloron en la malplaĉaj dometoj. En la vilaĝo Plairusovo li konsilis al ni enloĝigi ĉe lia amiko Kosigin. Lia domo estas la sola, en kiu oni povas spiri.

Kaj jen ni adiaŭsalutis al la amikoj en la jurto ĉe la Elorman-rivero, jungis la hundojn kaj solaj komencis novan, penigan trans-

montan vojaĝon al alia jurto, pri kies situo mi havigis detalajn informojn.

Ni startis frumatene kaj antaŭkalkulis, ke ni atingos tien en bona tempo antaŭ la mallumiĝo. La tereno estis la ordinara. Deklivo supren kaj deklivo malsupren kaj kiel kuraĝigo inter tiuj iu abismo, ĝis kies fundo ni devis malsupreniri nur por denove suprengrimpi la alian flankon. Sed Sávanoh instruis al mi artifikon, kiam oni sola veturas malsupren laŭ montega krutaĵo. Ĝi estis tiel simpla kiel sagaca, kaj konsistis en tio, ke oni enmetas unu antaŭkruron de ĉiu hundo en la kolringon, kiam oni iras malsupren. Se oni plue ligis kelkajn hundĉenojn sub la glitiloj, oni povas venki ĉiajn ajn abismojn. Se la neĝo krome estas malfirma, ĝi preskaŭ ne povas antaŭeniri mem. Tiamaniere oni evitas la klopodon ligi ilin malantaŭ la sledo. Aspektis treege ridinde vidi dek hundojn tiel malsuprensaltantaj montdeklivon kvazaŭ kripluloj. La unuan fojon, kiam Sávanoh montris sian eltrovon al ni kaj kelkaj aliaj, ni ne povis ne ridegi, tiel komike aspektis. Tiu metodo estis tre oportuna en ĉi tiu tago. Mi poste uzis ĝin dum la tuta vintro, kaj ĝi ofte savis nin el malfacilaj situacioj.

Meze de la tago mi difektis unu glitilon. Necesigis pluraj horoj por ĝin ripari, kaj kiam ni estis pretaj, la krepusko komencis kovri la dezerton per sia densiĝanta vualo. Sed laŭ niaj kalkuloj ne restos longa vojo al la jurto. La hundoj tamen montris neniamajn signojn ke ili flarsentas boacojn, kaj la situacio komencis aspekti malluma, precipe pro tio ke ni kunportis provianton nek al ni mem nek al la hundoj. Tial ni veturis tiel rapide kiel ni kapablis, kaj ankoraŭ ne estis karbonigra mallumo, kiam ni transpasis la lastan montodorsan kaj venis en tiun valon, kie la jurto laŭ kalkulo troviĝu. La neĝo ankaŭ estis tute tretita de boacoj, sed jurton ni ne vidis. Kontraŭe

ni baldaŭ trovis la lokon, kie antaŭ nelonge staris jurto. Tie eĉ ankoraŭ kuŝis kelkaj felsakoj kaj ursfeloj.

Se ni ne estus sciintaj tion antaŭe, ni nun eklernis, ke la lamutoj estas nomadoj. Ili tute simple translokiĝis kun jurto kaj boaca grego. Sed ĝis kie? Jes, tio nun estis preskaŭ egala al ni. Nek ni nek niaj fidelaj tirbestoj emis daŭrigi en la mallumo. Por tio ni estis tro lakekonsumitaj kaj plue ne povis distingi paŝosignojn. Sed plej malbone estis, ke ni ne havis manĝaĵon. Tamen al ni restis nur decidi ki pri tranoktado. Sed unue ni devis havi ion varmigan. La fajron ni ekbruligis sur la malnova fajrujo, sed ne estis facile trovi sekan lignon, ĉar kompreneble ĉio seka estis forbruligita. Post multa klopodo mi tamen trovis tiom, ke sufiĉis por kuiri teon. La kompatindaj hundoj devis ekdormi kun malplena stomako. Ĉe Ivan Petroviĉ elĉerpiĝis la malgranda provizo da jukolo, kaj boacon li ne volis buĉi. Sed en tiu vespero mi promesis al la hundoj, ke ili rajtos satmanĝi je varma boaca viando, tuj kiam ni alvenos al la korjakoj.

Ni sternis ia dormsakojn sur tiuj ursfeloj, kiuj estis postlasitaj sur la jurta loko kaj ekkuŝis por dormi, dum la malsato kriis en la stomako. Ni decidis frumatene elserĉi la lamutojn translokiĝintajn, sekvante la postsignojn de la boaca grego.

Estis malvarma kaj stelklara vintrovespero, kiam ni ekkuŝis por dormi, sed kiam ni vekigis en la tagiĝo, la tuta ĉielo estis nubkovrita, la neĝo turniĝadis ĉirkaŭ ni, diserigita kiel faruno, kaj susuris en la montegoj. Jen agrable! Se ni nur scius, kiom longe estas al la jurto! Baldaŭ ĉiuj paŝosignoj estos forviŝitaj.

Ni eĉ ne prenis tempon por kuiri teon, sed tre rapide ŝarĝis la aĵojn sur la sledon. Ne estis ĝojo aljungi la malsatajn hundojn, kiuj riproĉe rigardis nin kaj miris, kial ili ne ricevas manĝaĵon. Post kiam mi serĉesploris la terenon kaj trovis, en kiu direkto la lamutoj translokiĝis, ni startis en la paŝosignoj de la boaca grego, kiuj ankoraŭ ne

estis plene forviŝitaj. En pluraj verstoj la grego iris antaŭen sur frostiĝinta rivero, poste supren laŭ montega deklivo kaj jen malsupren en valon. Tie la hundoj ekflaris la boacojn, kaj post ankoraŭ duonhora vojaĝo ni ekvidis jurton, ondigantan gregon de boacoj kaj amason da homoj. En plena rapideco ni veturis malsupren al la jurto, ĝuste kiam komenciĝos lamuta vintra festo.

Lamuta vintra festo



Lamuta boaca ofero. (Fotis la aŭtoro)

Korjako kaj lamutoj celebras plurajn festojn dum la vintro, La kaŭzoj de tiuj festoj estas multespecaj, sed la plimulto rilatas al la boaca greĝo kaj ĉe la lamutoj ankaŭ al la ĉaso. Do oni solenas kiel speciale ĝojigan okazaĵon, kiam naskiĝis la boacidoj en aprilo, kiam printempe la suno komencas sin montri pli ofte, kiam oni kaptis la unuan zibelon de la jaro ktp.

Speciale en marto ili volonte faras siajn festojn por ĝoji pri la

alproksimiĝanta printempo. Estis ĝuste tia festo, kiu estis komen-
cota en tiu lamuta jurto, al kiu ni nun alvenis.

La ceremonioj ĝuste komenciĝos. Multaj lamutoj kolektiĝis el
diversaj lokoj, kaj ankaŭ kelke da komercistoj hazarde estis tie.

Kiam ni malsupren veturis al la jurto en plena galopo, ĉiuj lamu-
toj staris kolektitaj sur la libera loko ekstere. Iom antaŭ la grupo
staris boaco, al kies malantaŭaj piedoj estis ligita kaptŝnuro. Lamuto
tenis tiun. Cetere la boaco estis libera. Alia lamuto staris je kelka
distanco de la boaco, tenante lancon en la mano. Estis evidente, ke
la boaco estis oferota.

Ni havis plurajn konatojn inter la lamutaj gastoj, kaj tiuj kompre-
nis, ke ni volas ĉeesti la ceremonion kaj prizorgis, ke oni atendis
kelkajn minutojn ĝis kiam mi havis tempon firme ligi la hundojn.
Poste mia edzino kaj mi aliris al la solena grupo de lamutoj, kiu
konsistis el nur viroj, kaj stariĝis por rigardi la spektaklon.

Subite ĉiuj lamutoj faris la krucosignon kaj kliniĝis. Poste oni per
lerta mano donis al la boaco lancopikon en la koron. Ĝi dum mo-
mento staris senmova, poste ekŝanceliĝis kaj falis al la dekstra flan-
ko kun la vundo supren. Se ĝi falas kun la vunda flanko al la tero,
tio estas rigardata kiel malbona antaŭsigno. Kiam ĝi estis falinta, la
virinoj elvenis el la jurto kun tranĉiloj en la manoj kaj komencis
senfeligi la boacon.

Kiam la felo kun la apartenantaj kapo kaj kornoj estis apartigi-
ta de la korpo, la lamutoj konstruis stablon el kelkaj stangoj, sur kiu
ĝi estis pendigata. Tiajn oferstablojn ni plurfoje renkontis. Je unu
okazo ni trovis tian meze en arbaro. La lamuto en nia akompano
rakontis, ke ĝi estas starigita sur tiu loko en la arbaro, kie la unua
zibelo de la jaro estis pafata. Tiam ili nome ĉiam ofertas boacon por
ke estu bona ĉasakiro dum la daŭro de la sezono.

Kiam la boaco estis senfeligita kaj dispecigita, oni portis la vian-

don en la jurton kaj metis ĝin en la grandajn kuprajn kaldronojn, kiuj pendis super la fajro. Kiam ĝi estis prete kuirita, ĉiuj kolektiĝis en la jurto. Maljuna lamuto prenis pladon kun musko, faris la kru-cosignon, kliniĝis kaj movis ĝin dum multaj strangaj ceremonioj tien kaj reen super la fajro. Post tio li ĉirkaŭiris al ĉiu en la jurto kaj alportis la pladon. Ĉiuj prenis pinĉon da musko kaj ĵetis ĝin en la fajron. Nur post tio oni povis komenci la manĝadon.

Kiam la grandaj potoj kun viando estis malplenigitaj kaj ĉiu sentis sin sata kaj kontenta, oni denove eliris en la liberan aeron. Nun ekestos konkurso per boacsledo, konstanta numero en lamuta vint-ra festo. La boaca grego sin trovis proksime, kaj oni kaptis la bezo-natajn bestojn.

La ne-lamutaj gastoj, t.e. la komercistoj kaj ni, laŭ malnova bona kutimo devis starigi premion. Unu elmetis tavolon da brikteo, dua saketon da biskvitoj, tria paketon da tabako. Ĉiuj premioj estis fik-sataj ĉe la pinto de longa stango. Neniuj unua, dua kaj tria prem-loj ekzistas, sed tiu, kiu venas la unua, ricevas ĉion.

Sep sledoj partoprenos en la konkurso, la plimulto jungita per du boacoj. Korjakoj kaj lamutoj havas specialajn konkursajn sledojn por tiu celo. Ili estas tiel malpezaj, ke oni povas levi ilin per unu fingro. Oni veturu al loko ĉ. kvar verstojn malproksime kaj retur-ne. La sledoj estis aranĝataj, kaj jen oni komandis starton.

Ĉiu vipis siajn boacojn, kiom li kapablis, per sia vergo. Ili ĉiuj prenis galopon kaj baldaŭ estis ekster vido en la montethava kaj arbarplena tereno. Post proksimume 20 minutoj la unua sledo ek-montriĝis, dense sekvata de pluraj. La malpezaj sledoj fakte flugis laŭ la tero. La lamutoj energie vipadis la galopantajn boacojn, kiuj spiregis pro klopodo kun la lango pendanta el la buŝo. Subite unu el la sledoj ricevis ekpuŝon, tiel ke ĝi renversiĝis. La lamuto, kiu veturigis, posttreniĝis iomete en la neĝo, sed sukcesis returni la sle-

don sur la glitilojn, eksidis kaj daŭrigis en sama furioza rapideco. Tiu, kiu venis unua, ne prokrastis depreni la premiojn de la stango.



Pretaj por starto. (Fotis la aŭtoro)

La sekva numero de la festo estis luktado. Du junaj lamutoj deĵetis siajn felvestojn tiel ke ili estis nudaj ĝis la talio. Ke la temperaturo montris dudek kaj kelkajn gradojn sub nulo ŝajne ne ĝenis la du luktantojn. Dum ĉiuj aliaj staris ĉirkaŭe kaj instigis ilin per alvokoj, ili ekkaptis unu la alian ĉirkaŭ la talio kaj luktis kun ĝojo kaj fervoro. Ili estis proksimume egale fortaj, kaj longe estis necerte, kiu el ili venkos. Sed fine unu dum la furioza aklamo de la rigardantoj sukcesis renversfaligi la alian en la neĝon kaj gajni la venkon, kiu alportis al li saketon da bombonoj.

La vesperon oni pasigis en la jurto, kie la programo konsistis el viandmanĝado kaj tetrinkado kaj kiel variaĵo alkoholo kaj bomboj, ĉio je akompanado de la magia tamburo, kiun oni prifrapis ĝis malfrue en la nokto. En la lumo de la fajro oni dancis norgali kaj jen la lamuta vintra festo estis finita.

Al la korjako


En la tago post la festo korjako vizitis la lamutan tendaron. Li veturis per hundoj kaj evidente ne havis alian komision ol tion, ke li volis sidi kaj babili iomete. Kiam la hundoj per forta bojado anoncis al ni lian alvenon, ni eliris el la jurto por renkonti lin. Estis la korjako Akej, posedanto de granda boaca gregoj kaj de jurto en la proksimo. Li estis malgranda kaj tendeneca, havis ledan koloron je la vizaĝo kaj ne estis malsimila al indiano laŭ la vizaĝaj trajtoj. Li havis abruptajn kaj malrapidajn movojn kaj balanciĝis trankvile antaŭen al la jurto, post kiam li ligis la hundojn.

”Priĵatel, ĉu vi havas muŝagarikojn por mi?” estis la unua, kion li demandis, post kiam ni salutis unu la alian. ”Priĵatel” estas la alparolo de la lamutoj kaj la korjako, por ĉiuj. Ĝi tute simple signifas ”amiko”. Li verŝajne kredis, ke mi estas komercisto, kaj ili ofte kutimas kunporti muŝagarikojn kiam ili veturas al la montegoj. La korjako kaj la lamutoj kun fervoro uzas ilin kiel ebriigaĵon.

Ni eniris en la jurton kaj trinkis teon kune. Nia lamuta mastro nun faris prelegon pri ni al la korjako. Ĝi estis farata en korjakalamuta interlingvaĵo, pro kio mi nenion komprenis. Kredeble li rakontis multe da interesaj kaj mirigaj aferoj, ĉar la korjako de temp’al tempo aŭdigis treege bestan, siblan sonon, kiun mi poste trovis signifi precize la samon kiel ”ho, diable”. Pli proksime al ĝia signifo mi ne povas veni.

Dum pluraj tagoj mi pripensis, ke je la unua okazo ni ekiros al la korjako, tiom pli ĉar lastatempe estis malfacile havigi nutraĵon

al la hundoj, kaj mi ne volis, ke ili estu malgrasiĝintaj ĝis tiuj postulantaj vojaĝoj, kiuj atendis. Ni nun havis bonegan okazon ricevi akompananton, kaj mi demandis al la korjako, ĉu li iel malkonsentas, ke ni akompanos lin al lia jurto kaj vizitos lin dum kelkaj tagoj, kaj antaŭ ĉio ĉu li povas promesi bone nutri la hundojn per boaca viando. Li ĉion promesis, kaj kiam ni sidis interparolante dum kelka tempo, li proponis, ke ni ekiru. Ni adiaŭsalutis al la lamutoj, tamen ne je la lasta fojo, aljungis niajn hundojn kaj sekvis la korjakon.



Korjaka familio ekster sia fela jurto. (Fotis la aŭtoro)

Ni vojaĝis trans unu monteton post la alia kovritan de larikarbaroj, kaj pli malfrue en la tago ni alvenis al valo, en kies fundo estis videbla ronda nigra punkto. Estis la jurto de la korjako. Grandan areon ĉirkaŭ la jurto kovris arbetaro. Per sia malplena sledo la korjako atingis longan antaŭspacon kaj estis malaperinta el nia vido. Kun kelkaj ĉenoj sub la glitiloj ni feliĉe malsuprenveturis la mont-

deklivojn. Sed en la lasta deklivo ni faris rulfalon, kaj tio estis tre bona, ĉar tio haltigis la sledon. La hundoj estis tre ekscititaj. La arbetaro nome komencis moviĝi. Ĝi transformiĝis je ondiĝanta boaca grego, kaj la hundoj flarsentis kaj vidis ĝin. Restis proksimume 600 metroj ĝis la jurto kaj la grego. La hundoj nur staris kaj bojis kaj volis alkuri. Mi apenaŭ kuraĝis komandi starton, ĉar mi sciis, ke eĉ per ĉiuj fortoj mi ne povus haltigi ilin. Ili estis sangavidaj kiel lupoj, kaj kiam mi fine lasis ilin kuri kun la sledo, kiu kun ŝarĝo kaj pasaĝeroj pezis 250 kg, ili fakte flugis laŭ la neĝo, kaj rekte al la grego. Unu solan komunan bojegon ili aŭdigis. Mi bremsis per la "ostol", tiel ke la neĝo kirliĝis ĉirkaŭ ni, sed tio neniel helpis. Grupo da korjakoĵoj, kiuj staris ekster la jurto, ĵus kaptis kelkajn boacojn. Ili ne volis, ke la grego estu dispelita, kaj tial tri kuris kontraŭ nin kun la kaptŝnuro preta en la mano. Kiam ni atingis ĝis ĉ. 50 metroj de la plej proksimaj boacoj, ĉiu per fulmerapidaj movoj ĵetis la ŝnuron kontraŭ la alkurantajn hundojn. La du unuaj estis kaptataj en la maŝoj, la postkurantaj kuris en unu amason, kaj fariĝis subita halto. Poste la korjakoĵoj kunhelpis deĵungi kaj ligi la ekscititajn hundojn.

Kiam tio estis farita, ni povis kviete kaj trankvile saluti al ĉiuj prijatel-oj, kiuj troviĝis ekster la jurto. Ĉiuj estis mirige malpuraj kaj aspektis treege sovaĝaj kun siaj vilaj felvestoj kaj ventmorditaj indianvizaĝoj. Kelkaj virinoj kaj tuta amaso da infanoj venis el la jurto. La infanoj estis preskaŭ nigraj pro koto, kaj la virinoj ne multe pli bonaj. Tiuj lastaj ĉiuj estis nudkapaj kaj portis la harojn pendantaj en du plektaĵoj. La viroj portis ilin razitaj ĉe la verto super la frunto. Ĉiuj estis afablaj kaj gastamaj kaj invitis nin eniri kaj varmigi nin per teo.

Sed antaŭ ol ni enrampis en la jurton, ni devis rigardi la boacan gregon de la korjakoĵoj. Ĝi vere estis rigardinda. Laŭ mia taksado ĝi konsistis el du aŭ tri mil bestoj, kaj tamen la mastro asertis, ke es-

tas nur la duono de la grego, kiu estas pelita malsupren de la montoj. La boacoj ne estis tute similaj al tiuj de la lamutoj. Oni tuj povis vidi, ke ili estas pli malgrandaj, kaj plue la mezkoloro estis rimarkeble pli malhela.

La jurto ankaŭ estis multe pli granda ol tiu de la lamutoj, kaj tuj falis al ni en la okulojn tiu granda nombro da sledoj, kiu staris ekster ĝi.



La korjakoĵ tre similis al indianoj je la vizaĝo. (Fotis la aŭtoro)

Jen ni enrampis tra la fela kurteno, sed blindigitaj de suno kaj neĝo, nur post iom da tempo ni povis ion distingi en la duonlumo interne. La lamutaj kaj la korjakaj jurtoj nur enlasas la taglumon tra la fumelirejo. Ĉio estis farita laŭ pli granda skalo ol en la jurtoj de la lamutoj. En la internaj tendoj oni eĉ povis stari tute rekta ne atingante la plafonon. Sed cetere ĉio estis simila.

Kelkaj gigantaj kupraj kaldronoj pendis per du ĉenoj super la fajro, kaj grandaj pecoj de viando superstaris el ili. Kelkaj nejunaj virinoj skrapis felojn tuj apud la fajro. Ili estis tiel malpuraj, ke mia edzino timtremis, kiam ŝi vidis ilin. Cetere en la jurto svarmis malgrandaj vilaj hundidoj kaj nepriskribeble malpuraj duonnudaj infanoj. Tiuj lastaj ludis kun la hundidoj kaj per grandaj pecoj de viando, kiujn mi timis, ke ni poste ricevos por tagmanĝo. Kvankam ni estis tre malsataj, la apetito tute malaperis, tuj kiam ni envenis en la jurton.

En la interna tendo de nia mastro ni eksidis sur la boacajn felojn, atendante la neeviteblan teon. Ni estis ĝojaj, ke la korjako ne manĝas panon je la teo, ĉar kia ĝi aspektus? Plej malfacile estis, ke ĉiuj estis tiel treege afablaj kaj bonintencaj, ke ni ne havis koron eliri al la sledo kaj elpreni niajn proprajn kuirvazojn kaj tasojn. Se oni tion faras, ili nome, kiel mi jam menciis, tiel ofendigas, ke ili prefere volas ke oni forvojaĝu tuj.

Kaj rusoj, kamĉatkanaj kaj lamutoj asertis nin, ke la korjako neniam sin lavas de la lulilo ĝis la tombo. Nun ni jam ne dubis pri tiu aserto. Kiam mi pli poste estis sufiĉe impertinenta intervjui la amikon Akej, nian korjakan mastron, pri tiu delikata demando, li deklaris, ke foje povas okazi somere, kiam brilas la suno kaj oni ŝvitas, ke oni freŝigas la vizaĝon en iu rivero. "Sed ja ne estas io mirinda, ke la korjako neniam sin lavas", li deklaris. "Vi nur vidu la kamĉatkanojn ĉe la okcidenta marbordo. Tie ili nutras la hundojn per

kisla, kaj kiam ili ne havas forkegon sub la mano, ili prenas la kislajn per la manoj. Tion korjako neniam povus fari”, li ekkriis triumfante.



Korjaka patrino kun sia infano. /Fotis la aŭtoro)

Baldaŭ la teo estis preta, kaj la tuta jurto, inkluzive infanojn kaj hundidojn, kolektiĝis en la interna tendo de Akej, kie ni sidigis nin. Ĉiu mastrino kunportis malgrandan lignan skatolon, el kiu ŝi malrapide elprenis tasojn por la teo. Ili kuŝis envolvitaj en ĉifonoj. La tasoj estis metataj sur grandan pleton, kaj unu el la virinoj enverŝis la teon. Antaŭ ol ŝi plenigis tiujn du tasojn, kiuj estis por ni, nia mastrino viŝis ilin per tufo de sfagno, kiu kuŝis en angulo. Per tio ili fariĝis, se eble, eĉ pli malpuraj. Ni kunportis saketon da bombonoj kaj keksoj, kaj mia edzino ŝutis sufiĉe multajn sur la pleton. Certe ŝajnis al ni, ke ili malaperis rapide ĉe la lamutoj, sed estis nenio kompare kun tie ĉi. Mi ne povis kalkuli ĝis dek, antaŭ ol la pleto


estis malplena. Ne sufiĉis, ke ĉiuj plenŝtopis la buŝon per keksoj kaj bombonoj samtempe, ili ankaŭ enpoŝigis tiom, kiom ili nur povis. Kelkaj infanoj malpaciĝis pri la akiraĵo, kaj ĉio finiĝis per laŭta plorado. Post kiam ni trinkis la unuan tason, ĝi estis sufiĉe pura interne, ke ni povis pli ĝui la duan.

Sidante ĉirkaŭ la tetasoj ni havis okazon admiri arton, kiu paliĝus niajn lerneajn knabojn pro envio. La viraj korjako estis veraj fenomenoj kraĉi trafe. Unu-du-tri, dum oni sidis kaj interparolis kun ili, dozo da salivo preterflugis la orelon aŭ la tetason kiel projektilo kaj surteriĝis proksime de la fajro. Ili ne movis la lipojn sed ekĵetis ĝin ne ŝanĝante unu mienon.

La plenkreskaj korjako ordinare trinkis po minimume 4 aŭ 5 tasojn da teo. Kiam la tetrinkado estis finita, la taso estis metataj en siajn skatolojn. Nia mastrino ankoraŭ unu fojon montris sian estimon al ni viŝante niajn tasojn per la sama tufo kiel antaŭe. Sávanoh antaŭvertis nin, ke ili lavas la tasojn kraĉante en ilin kaj poste viŝante ilin per musko, sed tion mi neniam vidis. Tiel necivilizitan lavadon mi vidis nur unu fojon, kaj tio estis en la laŭmoda Marina Palace Hotel en Port Said en Egiptio; kie unu el la nigraj kelneroj ricevis ordonon ŝanĝi arĝentan kuleron, kiu ne estis pura. Li prenis la kuleron, iris en angulon de la eleganta manĝosalono, rapide ĉirkaŭrigardis kaj poste kraĉis en la kuleron kaj viŝis ĝin per la kelnera mantuko. Poste rapidis returne kaj transdonis ĝin kun eleganta gesto.

Estis tre malfacile interparoli kun la korjako en tiu jurto, ĉar nur kelkaj scipovis, kaj tre malbone, la rusan lingvon. Samkiel la lamutoj ili estis tre interesataj de niaj familiaj rilatoj. Ili volis scii, ĉu vivas la gepatroj, ĉu ni havas fratojn kaj fratinojn, kiel ili nomiĝas, ĉu ili havas boacojn, ĉasas zibelojn aŭ estas komercistoj kaj ĉion alian. Ili ankaŭ informiĝis, ĉu vivas korjako en nia lando, volis scii, kiom da

alkoholo oni ricevas por unu zibelo tie, ĉu ni estas idolanoj aŭ kristanoj ktp. sen ĉeso.



Korjokino. (Fotis la aŭtoro)

Ĉiuj korjako, kaj viroj kaj virinoj, portis ĉe si perlornamitan flar-tabakujon, kaj oni oftle vidis ilin enbuŝigantaj tabakmaĉaĵon. Flar-tabako tamen estas multekosta varo, kaj ili estas tiel ŝparemaj, ke ili neniam elspulis la maĉaĵon, kiam ili okaze laciĝis. Tiam ili ansta-

taŭe elprenis ĝin kaj metis ĝin malantaŭ la orelon, precize kiel faras butika komizo per la kraĵono. Post tempeto ili ree enbuŝigis ĝin kaj ĝuis plu. Ofte oni vidis la patrinon regalanta siajn neplenaĝajn filinojn per tabakmaĉajo. La knaboj frue havigas al si propran flartabakujon, kaj mi neniam vidis plenaĝan viran korjakon sen tia ujo. Ke ĉiu havas belan flartabakujon estas honoro. La flartabakon ili faras el mandjura folia tabako, miksita kun cindro.



Por du skatoloj da tabako mi ricevis boacon al la hundoj. (Fotis la aŭtoro)

Post la tetrinkado mi petis al Akej pri aĉeto de boaco al la hundoj. La grego ankoraŭ restis ekster la jurto, kaj li tuj eliris, prenis sian ĵetmaŝon kaj kaptis beston. La boaco estis mortigata en la ordinara maniero per ponarda piko en la koron, post kiam ĝi antaŭe

estis renversita kaj la piedoj estis duope kunligitaj. Poste ni kune trenis la boacon al la hundoj, kiuj saltis kaj bojis je la vido. Du korjajkoj senfeligis ĝin en kelkaj minutoj kaj dispecigis ĝin en dek partojn. Ĉe la interna flanko de la felo troviĝis multnombre larvoj de insekto, la boaca tabano, kiu somere demetas ovojn en la haŭto. La vermosimilajn larvojn la korjajkoj avido elserĉis kaj metis en la buŝon, deklarante, ke ili estas same bongustaj kiel miaj bombonoj. Ankaŭ rekomendo por tiuj! Kelkfoje ili metis ilin en la ĉapon por porti hejmen al la infanoj. Estis ĝuo vidi, kun kia ĝojego la fidelaj hundoj manĝis la varman viandon. Ion tiel bongustan ili eble neniam ricevis, sed post nun ili ricevos ĝin ofte. En malpli ol kvin minutoj ne restis peco da viando de la boaco. Sed tiam la hundoj ankaŭ estis kontentaj kaj dankeme lekis min, kiam mi parolis kun ili. Kiel pagon por la boaco mi donis du skatolojn kun tabako. Akej ekestis tiel ravita, ke li ĉirkaŭiris kaj montris ilin al ĉiuj. Mi ne scias, kion li plej ŝatis, ĉu la skatolojn aŭ la tabakon.

Oni nun repelis la boacan gregon supren al la ĉirkaŭaj montoj, kaj ni reiris en la jurton, unue por esti regalataj per manĝaĵo. Kiel ĉe la lamutoj ĝi konsistas el kuirita boaca viando je ĉiuj manĝoj. La salujon ni kunportis kaj nun povis fari novan sperton, nome manĝi duone krudan viandon. La korjajkoj nome kuiras la viandon nur kvaronhoron aŭ dudek minutojn. Ligna plado kun kelkaj grandaj vaporigantaj viandpecoj estis alportata, kaj ĉiu elingigis sian ponardon kaj kaptis viandpecon per la mano. Per la ponardo oni detranĉis unu viandpecon post la alia de la ostoj kaj metis en la buŝon. La viando estis tenaca kaj interne tute ruĝa. Kiam la korjajkoj ŝiris la ruĝajn viandpecojn per la dentoj, la sango gutis al ili laŭ la buŝanguloj. Eĉ se oni estus malsata kiel lupoj, oni ne povus enbuŝigi unu peceton. Sed oni mirige rapide al kutimiĝas. Post kelkaj

tagoj ni manĝis la duone krudan viandon kun bona apetito, kaj ni ne fartis malbone de ĝi dum nia tuta restado inter tiuj popoloj.

La vivo de la korjako en eĉ pli alta grado ol tiu de ta lamutoj dependas de la boaca grego. Ili ankaŭ dediĉis sian tutan laboron al tiu kaj ĉiam tenas grandajn gregojn. Per malavara mano ili ankaŭ fordonacas malkarege de sia abundo da boacoj al tiuj, kiuj bezonas. Ĉiuj ĉirkaŭe loĝantaj popoloj dum la tuta vintro sen ĉeso veturas al la korjako por boaca viando. Ankaŭ estas multaj ĉinoj kaj rusoj, kiuj negocas per boaca viando. Ili senĉese veturas por viando kaj poste vendas ĝin en la pli grandaj vilaĝoj, kie ĉiam troviĝas multe da homoj, kiuj ne povas veturi la longajn kaj tre danĝerajn vojojn al la montegoj.

Brikteo ofte estas uzata kiel interŝanĝaĵo, sed plej ordinara, kiam temas pri boaca viando, estas alkoholo. Por botelo da alkoholo la korjako volonte buĉas plurajn boacojn. La korjako estas treege avidaj je alkoholo kaj ankaŭ alkutimiĝis, ke ĉiuj kiuj vizitas ilin, kunportas tiun varon. Tial ili komence tre malkontentiĝis, kiam mi rompis tiun tradicion kaj preterlasis ebrigi ilin. Maljuna korjako foje diris al mi, post kiam li longe atendadis: "Vi, kiu estas juna, devus scii, kion bezonas maljunulo. Mi ne povas vivi sen alkoholo."

Kiam la korjako kun siaj grandaj boacaj gregoj kaj jurtoj translokiĝas de unu regiono al alia, fariĝas granda karavano. Tia vojaĝantaro povas konsisti el 30 sledoj kaj pli. La boacoj estas uzataj nur kiel tirbestoj, neniam kiel rajd- aŭ ŝarĝbestoj. La korjako eĉ konsideras kiel pekon rajdi sur siaj boacoj. Ĉar ili estas malpli grandaj ol la lamutaj boacoj ili ankaŭ ne konvenas por rajdo.

Ekster ĉiu korjaka jurto staras granda nombro da sledoj el diversaj specoj. Du el tiuj tipoj estas komplete identaj kun tiuj de la lamutoj, nome la ordinara ĉas- kaj vizitsledo kaj la konkursa sledo. Sed krom tiuj troviĝas ĉe la korjako grandaj ŝarĝosledoj kaj kun kaj

sen barilo ĉe la flankoj kiel sur fojnveturigiloj. Plue kovritaj sledoj por la infanoj en neĝado, kaj kelkaj aliaj. Ĉiuj estas faritaj el betulo kaj kunigitaj per rimenoj. Ili estas treege lerte, ofte preskaŭ arte faritaj.



La korjako Akej kun kaptŝnuro, neĝoŝuoj kaj filoj. (Fotis la aŭtoro)

Granda nombro de la sledoj estas ĉiam ŝarĝitaj kaj enhavas vestojn kaj ilaron, kiujn oni ne uzas ĉiutage. Kiam oni bezonas ilin, oni nur eliras kaj prenas ilin el la sledo, kaj tiamanlere ne bezonas okupi lokon per ili en la jurto. Ekstere en la sledoj ankaŭ kuŝas la mortovestoj.

La nombro da translokiĝoj ĉefe dependas de la provizo je paŝtaĵo por la boaca grego. Kiel konate la boacoj vintre vivas per likenoj,

kiujn ili per la piedoj elskrapas el sub la neĝo. Dum la vintro oni ordinare lokigas la jurtojn en ĉi valo aŭ sur iu tundro. La boacoj evitas la plej altajn montegojn, kie la vento kaj la malvarmo estas plej fortaj. Somere la kuloj estas terure multnombraj sur la tundroj kaj en la valoj kaj donas al la boacoj neniun trankvilon. Tiam oni sin tiras kun la grego supren al la pli altaj montegoj. Sed somere oni devas pli ofte translokigi, kaj tiam oni kompreneble ne povas kunporti la tutan trajnon, kiam oni ne povas uzi la sledojn. Tial ĉiuj pliaĝuloj kaj infanoj restas ĉe iu rivero tra la somero kaj tiam ĉefparte vivas per fiŝkaptado. Nur kelkaj junaj viroj kaj virinoj akompanas la gregon. Sammaniere faras la lamutoj. Kiel mi antaŭe menciis, ili ne, uzas hundojn ĉe la zorgado pri la grego.

Post kelktaga restado en la jurto de Akej ni veturis al Ikava, lia patro, tre maljuna kaj riĉa korjako, kiu loĝis ne malproksime de tie. Kiel adiaŭan donacon ni ricevis de la edzino de Akej kelkajn frostigitajn boacajn langojn por vojaĝa manĝaĵo kaj kelkajn tendenojn kaj pecojn de mallonghara boaca felo por ripari niajn felŝuojn, se ili disŝiriĝos.

Ikava akceptis nin tre sindetene. Li certe suspektis ian artifikon de satano pri nia vizito. Lia jurto estis eĉ pli granda ol tiu de Akej kaj entenis kvar grandajn familiojn. Sed ĝi ankaŭ estis konsiderinde pli malpura ol la alia. La virinoj kiel kutime skrapadis felojn. Unu kuŝis surventre kaj alkudris perlojn al ĉapo. Ili ĉiuj estis tre malpuraj kaj faris malagrablan impreson. Cetere ĉio estis simila. La potoj kun viando pendis super la fajro, kaj la tekruĉo kompreneble tuj surŝoviĝis.

Mi demandis al la maljunulo, kiom da jaroj li havas. Li diris, ke li havas preskaŭ cent jarojn. Li certe troigis je minimume dudek kvin jaroj. La korjakoj neniam kontrolas sian aĝon, kaj nur kiam la

infanoj estas malgrandaj, la gepatroj memoras, kiom da vintroj ili havas.



Korjakoj kaptantaj boacojn per ĵetŝnuro. (Fotis la aŭtoro)

Ni estis regalataj per preskaŭ nigra brikteo kaj tenaca, duone kruda viando kaj ni konversaciis kun la gemastroj, dum ili maĉis flartabakon kaj kraĉis kun la sama fenomenaj celtrafeco kiel iliaj parencoj. Ikava rakontis, ke li antaŭatempe kutimis vagi kun siaj boacaj gregoj en la regionoj ĉirkaŭ Tigil en norda Kamĉatko, sed jen li malpaciĝis kun siaj najbaroj kaj ekiris suden. Li havis fraton tie supre kaj petis min saluti, se mi renkontus lin, ke li, Ikava, havas sian jurton apud la rivero Bistraja kaj ke ĉiuj estas sanaj.

Ikava estis unu el tiuj malmultaj korjako, kiujn mi renkontis, kiu

parolis ruse kompare bone. Sed evidente li ne estis ĉarmita de nia vizito kaj faris ĉiajn malfacilaĵojn por ke ni ne restu longe. Kiam ni ekzemple petis permeson aĉeti boacon, li deklaris, ke li havas ne niun por sendi al la grego, kaj nur kun plej granda klopodo mi povis ricevi stomakon de boaco plenan de sango al la hundoj. Kompreneble ĝi estis frostiĝinta kaj malmola kiel ŝtono, kaj la hakilo preskaŭ ne tranĉis, kiam mi volis disfendi ĝin al la hundoj.



Korjaka boacjungitaro. (Fotis la aŭtoro)

Ĉiuj en tiu jurto estis suspektemaj kaj nesimpatiaj, kaj ni decidis plu veturi jam la sekvontan tagon. Pli poste en alia jurto ni eksciis la kaŭzon de tiu suspektemo. La maljunulo Ikava superstiĉe timis, ke ni ekvidos lian boacan gregon kaj fotografos ĝin. Li timis tiun

satanan aparaton, kiun mi havis, kaj kredis, ke ĝi venigos malfeliĉon sur lian gregon.

Nia plano nun celis al tio, ke ni transversu la centran montĉenon kaj transiru al la okcidenta marbordo. Sed antaŭ tio ni volis viziti la vilaĝon Kluĉi, kie ni devis prizorgi kelkajn aferojn kaj intencis deponi tiujn kolektojn, kiujn ni kunigis. Tiuj jam per diversaj sledoj estis senditaj antaŭe al la vilaĝo Kosyrevsk.

Frue en la posta mateno ni do diris adiaŭ al la korjako por tiu fojo kaj eliris kun direkto al lamuta jurto, kie ni intencis tranokti kaj provos trovi kunvojaĝanton returne al Kosyrevsk.

Ni feliĉe atingis la jurton, sed neniu havis okazon kunvojaĝi. Se ni volas atendi kelkajn tagojn, ni havos akompananton. Sed por tio ni ne havis tempon kaj anstataŭe decidis veturi solaj. Tiu decido estis tiom pli necesa, ĉar mi ne povis havigi nutraĵon al la hundoj, kaj estis tri tagvojaĝoj al la vilaĝo en bona vetero. Nun dum la tuta vojaĝo en la montegoj mi havis rezervon de 15 fiŝoj en la fundo de la sledo. Per duona porcio ĝi povus sufiĉi por tri tagoj. Ni do ne povis resti eĉ unu tagon, sed startis solaj la sekvan matenon survoje al Kosyrevsk. Estis iom timiga sento ne havi akompananton en tiel malfacila tereno, kie ni nur veturis unu fojon. Se ekestus neĝoŝtormo kaj ĉiuj vojsignoj forviŝitaj, ni timis ne trovi la vojon. Sed ni ne havis alian elekton. Kiam ni forlasis la tendaron, la ĉielo estis kovrita de nuboj kaj neĝis tre rimarkinde. Komercisto pasinttage alvenis el Kosyrevsk, kaj ni esperis, ke ni povos sekvi liajn sledsulkojn.

Kiam ni startis, estis kelkaj coloj da nova neĝo en la sulkoj. Ĉirkaŭ tagmezo estis unu futo. Per komunaj fortoj ni klopodis supren kaj malsupren laŭ la krutaĵoj kaj ne prenis tempon por kuiri teon antaŭ posttagmezo. Tiam ni jam transpasis la plej malfacilajn deklivojn kaj atingis ĝis en la larikarbaroj. Tie la vojo preskaŭ seninterrompe iris malsupren, kaj malpli da neĝo falis en la tre bone

veturitajn sulkojn. Sed deblovarbaĵoj kaj branĉoj tre malhelpis nin. Tamen la veturo iris pli bone ol ni atendis, kaj ĉe la krepuskiĝo ni nur havis emon daŭrigi. La hundoj estis pli ol ordinare viglaj, malgraŭ ke ili laboris jam de frua mateno. Ili sendube estis ĝojaj forlasi tiujn malagrablajn montegajn regionojn, kie ili tiom suferadis kaj ofte havis malmulte da manĝaĵo. Aliokaze ili ne estus povintaj kuri tiel volonte kun tiel peza ŝarĝo, kiun ili tiris. La luno leviĝis super la arbosuprojn kaj ankoraŭ pli instigis ilin.

Ni veturis horon post horo, ĝis kiam la hundoj ĉirkaŭ noktomezo subite haltis. Ni ĉirkaŭrigardis en la lunlumo kaj trovis, ke ni estas ĝuste sur tiu loko, kie ni tranoktis la unuan fojon dum la vojaĝo al la montegoj. Precize ŝajnis, kvazaŭ la hundoj estus decidintaj kuri tien. Malgraŭ ke multe, da neĝo falis post la lasta fojo, ili tuj rekonis la lokon. Ni ankaŭ estis tre kontentaj pri la vojaĝa rezulto de la tago, kiu esperigis nin, ke ni atingos al Kosyrevsk antaŭ la sekvonta vespero.

La neĝado ĉesis kaj la ĉielo fariĝis tute stelklara. Estis malvarma februara nokto. Liginte la hundojn mi prenis la hakilon kaj iris por havigi brullignon. Mi trovis sekan larikarbon proksime kaj komencis dehaki ĝin. Je la unua hako la tenilo rompiĝis ĉe la mezo. Jen agrabla situacio! Ni ĝuste sopiris, ke ni provu nin varmigi ĉe bona ŝtipara fajro, sed nun mi devis kontentiĝi kolektante iom da sekaj branĉoj kaj lignetaĵoj, tiom ke ni povis kuiri teon.

Ni forŝovis per la piedoj iom da neĝo, sternis prenon da branĉetaĵoj kaj poste metis la dormsakojn sur tion. La korpo doloris post la penoj dum la tago en la krutaĵoj, kaj daŭris longe, ĝis kiam ni povis ekdormi.

Sekvan matenon la malvarmego mordis. Mia jako, kiu pasintvespere estis malseka kiel ĉifono pro ŝvito, dum la nokto kuŝis en la sledo. Ĝi nun estis rigida pro frosto, tiel ke mi povis pledpilki per ĝi.

Nur kiam mi moligis ĝin longan tempon ĉe la fajro, mi povis surmeti ĝin. Ne penindis sekigi ĝin, ĉar ĝi ja baldaŭ malsekiĝos denove.

Ni devis pasi plurajn negrandajn tundrojn. Tie la sledsulkoj tute kovriĝis per la kirloneĝo, kaj ofte estis tre penige trovi kaj tre peze trabori al si la vojon tra la malfirma neĝo. Plurfoje kiam ni mem ne estis certaj pri la vojo, ni lasis la gvidhundon iri, kien ĝi volis, kaj plej ofte ni venis ĝuste.

Fariĝis pli kaj pli malvarme, kiam proksimiĝis la vespero, kaj je la sunsubiro la temperaturo proksimiĝis al -30 gradoj C. Sur la lasta granda tundro ni devis skikuri apud la sledo, ĉar la neĝo estis malfirma kaj profunda. De tie denove estis videbla la Kluĉevskaja vulkano kun sia giganta fajrofasko. Ĝi aspektis terura en la mallumo kaj la malvarma vintra pejzaĝo. Fine ni denove envenis en la larikarbaron. Tie ni trovis la hundvojsignojn inter Kosyrevsk kaj Tolbaĉik, kiuj estis faritaj dum la tago. Tiam ni sciis, ke restas ĉ. 7 verstoj al la vilaĝo. Sed la neĝo estis malglata pro la malvarmo, kaj la veturo iris eksterordinare malbone antaŭen. La malvarmo plifortiĝis, kaj ni devis kuri longajn distancojn por teni nin varmaj, kaj nur malfrue en la vespero ni tute frostrigidaj alvenis al Kosyrevsk, kie ni enloĝiĝis ĉe malgrandruso, kiu havis sufiĉe da prudento regali nin per kafo anstataŭ teo.

Tra la Jelovka pasejo al la okcidenta marbordo

Post kiam mi prizorgis la transporton de la kolektoj al Kluĉi, ni sekvonttage ekvojaĝis tien tra la vilaĝoj Uŝki kaj Kresti. Post tri tagoj ni eniris en la domon de nia amiko Persson, svedo, kun kiu ni konatiĝis sur la skuno de Swenson, kaj kiu nun sidis kiel la ĉefa reprezentanto de Swenson en Kamĉatko kaj gvidis la felkomercon en granda parto de la lando.

Persson jam antaŭ longe invitis nin viziti lin dum nia vintra vojaĝo, kaj nun ni estis akceptataj per malfermitaj brakoj. Li tuj aranĝis banon, kiu gustis treege bone post la vizito ĉe la sovaĝuloj, tiom pli ĉar ni apenaŭ senvestiĝis dum du monatoj, de kiam ni banis nin en la varma fonto en Naĉika.

La domo de Persson estis treege komforta kaj pura. Li kompreneble regalis nin per kafo. Poste oni kun bona cigaro povis ĝui gramofonan muzikon kaj interparoli. Persson estis Norrköping-ano, kaj ĉar mia edzino kaj mi dum sekvo da jaroj ankaŭ estis tie, ni havis multajn komunajn konatojn kaj multe pri kio paroli. Estis vera festo loĝi en la gastama domo de Persson, kaj li regalis nin kiel princo. Ĉiuvespere ni frandis kaliforniajn fruktojn, ĉokoladon kaj aliajn bongustaĵojn, kaj ŝajnis al ni, ke ni trafis rekte en la ĉielon. Persson ankaŭ priaranĝis, ke mi ne bezonis zorgi pri nutraĵo al la hundoj.

Sed ni havis alion por fari en la vilaĝo ol ripozi. Kolektoj estis pakotaj, plakoj rivelotaj, kaj mi intencis studi la birdan vivon en kelkaj nefrostiĝintaj riveroj en la ĉirkaŭaĵo. Plue estis necese havi-

gi akompananton, kiu povos montri al ni la vojon tra la fama Jelovka pasejo al la okcidenta marbordo.



Ĉirkaŭ la varmiga bivaka fajro. (Fotis la aŭtoro)

Interne de vastaj spacoj la Jelovka pasejo estas la sola ebla punkto en norda Kamĉatko por transpasi la potencan masivon de montoj, kiu apartigas la orientan marbordon de la okcidenta. Sed ĝi estas malbone konata kaj timata tra la tuta duoninsulo pro siaj neĝostormoj, kiuj povas furiozi dum semajnoj sen ĉeso. La malfacilo kun tiu montpasejo estas, ke kvar penigaj tagvojaĝoj estas necesaj por transiri de la lasta homloĝejo de unu flanko al la unua ĉe la alia flanko. Kaj okazas treege malofte dum la vintro, ke pasas kvar tagoj sen neĝostormo en tiuj regionoj. Mi demandis al multaj perso-

noj en la vilaĝo. Kiam ili eksciis, ke mi volas tra la Jelovka pasejo, ili repuŝis per ambaŭ manoj. Sed kamĉatkano, kiu konis la vojon, promesis akompani min por 1000 kronoj. Alia prenis sur sin la taskon, se li ricevus mian dutuban pafilon. Mi estis preta oferi Zeisslornon, sed pli mi absolute ne volis pagi. Fine mi trovis kamĉatkano, kiu konsentis akompani min je akcepteblaj kondiĉoj.

Plenuminte ĉion, kio estis farota en la vilaĝo, ni diris adiaŭ al Persson, en kies gastama domo ni ricevis etan rememorigon pri la benoj de la civilizacio, kaj startis en suna vintra tago al la 90 verstojn malproksima vilaĝo Jelovka, kiu estis la elirpunkto de la transmonta vojaĝo. Ankoraŭ du kamĉatkanoj kaj unu siberiano el Jakutsk uzis la okazon sekvi niajn paŝosignojn. Ili ankaŭ intencis transiĝi al la okcidenta, marbordo.

Blovis malvarma, elnorda vento, kiam ni en la tagiĝo kelkajn tagojn poste forlasis la malgrandan vilaĝon Jelovka. La karavano konsistis el 52 hundoj, jungitaj al kvin sledoj, kiujn veturigis la supre menciitaj viroj kaj mi. Oni kiom eble kaŝis la vizaĝon en la vila felĉapo pro la vento kaj la malvarmo.

Sur ĉiu sledo ni ŝarĝis tiom da hundnutraĵo kiom eble. En distanco de ĉ. 300 verstoj de la vilaĝo Kluci al la granda rusa-kamĉatka vilaĝo Tigil sur la okcidenta marbordo, ni ne povis kalkuli pri plua alplenigo al la hundnutraĵo. Pro la malfacila tereno kaj havante tiom multe da alia ŝarĝo ni ne povis preni pli ol duonon de la fiŝoj, kiujn ni bezonis. Nun kiel ĉiam la kompatindaj tirhundoj suferis kaj devis kontentiĝi per duona porcio malgraŭ duoble peniga laboro ol ordinare. Sed ili havis bonan ripozadon ĉe Persson, povis tie bone manĝi kaj estis en brila stato.

Dum la unua tago ni havis neniujn aventurojn. Ni veturis tra betulaj kaj larikaj arbaroj, kaj kiam la suno estis subiranta, ni jam atingis ĝis la piedo mem de la montegoj kaj haltis tendare sub be-

tulo apud intermontejo. Ni starigis ŝirmtendon kaj havis agrablan vesperon ĉirkaŭ varmiga fajro.

Jam antaŭ la tagiĝo ni elrampis el la dormsakoj en la mordan malvarmegon, kaj la leviĝanta suno trovis nin torde rampantaj laŭ interkrutaĵoj kaj montfendoj ĉiam pli kaj pli supren. La hundoj klopodis kaj spiregis. Senĉese oni devis kuraĝigi ilin per alvokoj ĉe malfacilaj lokoj.



La hundkaravano serpentumas antaŭen al la Jelovka pasejo. (Fotis la aŭtoro)

Ĉiam pli kruta kaj senvoja estis la grundo, ĝis kiam ni fine survenis altebenaĵon, nomatan "Stolbovaja Tundra". Ĉiuflanke ĝi kruatas apike. Nur en du lokoj oni povas pasi supren kaj malsupren. La kamĉatkanoj ofte rakontas, kiel danĝere estas, se onin trafas neĝoŝtormo sur tiu altebenaĵo. La ventego povas esti tiel forta, ke ĝi for-

balaas la sledojn, kvazaŭ ili estus el papero, trans la montplataĵon kaj malsupren en la abismon.



En neĝa valo proksime de la kruco. (Fotis la aŭtoro)

Sed ni estis favoritaj per sunlumo kaj tre klara vido. Ni ripozis sufiĉajn horojn tie supre. La panoramo estis tiel rava kaj grandioza, ke mi kredas, ke ĝi superis ĉion, kion ni antaŭe vidis en Kamĉatko. Sudoriente leviĝis vico da potencaj vulkanoj, blankbrilaj de neĝo. Unu el ili sin levis pli alten al la ĉielo ol ĉiuj aliaj kaj suprenigis kolonon de fumo, kiu dravis suden. Estis Kluĉevskaja, la fiero de Kamĉatko. Oriente oni vidis la estingiĝintan vulkanon Ŝiveljuĉ kun ĝiaj neregulaj formoj. Ĉiuj vulkanoj en tiu direkto estis malnovaj konatoj niaj de la someraj kaj de la vintraj vojaĝoj. Sed okcidente je kelkmejla distanco leviĝis senlime bela kaj multpinta montaro, kiun ni sekvontage transpasos kaj en kies mezo la pasejo situis.

Vespere ni tendumis en sovaĝa valo ĉe la piedo de la multpinta montaro. Nenio krom neĝo nin akompanis.

Antaŭatempe tie staris malgranda trunkdometo, konstruita kiel ŝirmo por la vojaĝantoj dum neĝoŝtormo. De ĝi nur restis kelkaj duone putraj trunkoj. La cetero estis dishakita je brulligno.



La kruco kun la orumita ikono. (Fotis la aŭtoro)

Ĉirkaŭ la bivaka fajro ni diskutis la perspektivojn por la morgaŭa tago, dum ni manĝis nian simplan manĝon de sekigita salmo kaj teo. La plej maljuna kamĉatkano longe sidis fikse rigardante al la trembrila stelplena ĉielo. Poste li diris: "Póslezáftra budet purga." (Postmorgaŭ estos neĝoŝtormo.) Li vidas tion per la steloj, li komprenigis. Jen ni sternis niajn dormsakojn sur la neĝo kaj endormiĝis

kun la plej bonaj esperoj pri bela vetero dum la morgaŭa tago, kiam ni transiros la pasejon.

Ĉirkaŭ tagmezo de la posta tago ni staris tie supre sur la verto apud la kruco kun la ikono, lace konsumitaj de la penoj dum la lastaj horoj.



Ripozo apud la kruco. (Fotis la aŭtoro)

Estis mirinde vidi krucon kun orumita ikono en tiu dezerto de la dezertoj. Sed tiu kruco ankaŭ estas konata tra tuta Kamĉatko. Ĝi estis starigita post terura neĝoŝtorma akcidento, kiu trafis rusan oficiston kun lia akompanantaro. Kaj li mem, liaj indiĝenoj kaj tirhundoj pli malpli difektiĝis. Post kiam ili en tri tagoj kaj noktoj traferis la neĝoŝtormon, ili duone senvivaj, kun manoj kaj piedoj frostdifektitaj sin trenis al homoj per la restantaj hundoj. Poste oni starigis tiun krucon por protekti estontajn vojaĝantojn kontraŭ la ŝtormoj.

Niaj akompanantoj forlasis la sledojn, aliris al la kruco, surgeniĝis antaŭ ĝi kaj ripetfoje faris la krucosignon. Aspektis strange en tiu sovaĝa regiono.

Post kiam ni ripozis tie supre kaj admiris la grandiozajn etendaĵojn de la montegoj, ni daŭrigis la vojaĝon. Nun restis por ni proksimume 90 km. al homoj, sed la vojo kondukis malsupren kelkajn mejlojn kaj restis neniuj suprenirejoj. La neĝo, tie sur la montegaj krutaĵoj, estis tiel premita de la fortaj ventegoj, ke ĝi pli similis glacieron ol neĝon.

La veturo iris en kapturiga rapideco malsupren de la montegoj kaj la plej grava tasko estis bremsi, kiom oni nur kapablis, kaj elvoĵiri de ŝtonblokoj. Kiam fine ni post senbrida malsuprenveturo kaj pluraj renversiĝoj nin trovis sur ebena grundo, mi sentis la brakojn tute paralizitaj post la ĉiama bremsado.

Sed nun ni ankaŭ trapasis la plej terurajn danĝerojn por tiu fojo kaj jam troviĝis sur la okcidenta marbordo, kvankam malproksime de la maro, sed estis ebena vojo tien. Ni kuiris nian teon kun gaja animstato malsupre en la betularbaro kaj poste veturis ĝis longe post la mallumiĝo. Ni volis atingi plejeble longe antaŭ la nokto, ĉar muĝis suspektinde supre en la montegoj — antaŭsigno de la timata purgo.

Sur tundro surkreskita de maldensaj salikarbustoj ni fine restis por la nokto. Fariĝis unu el la plej malfacilaj vintronoktoj, kiujn ni havis en Kamĉatko. Ĉirkaŭ noktomezo komenciĝis la neĝoŝtormo. Sonis kvazaŭ muĝego kaj hurlado ĉirkaŭ ni, kaj la neĝo kirligis en densaj nuboj. Ni ekkuŝis sur la neĝo sen iaj ceremonioj, kaj baldaŭ ni estis tute kovritaj de la kirlneĝo. Ĝi kirlle eniĝis en la dormsakojn kaj enpenetris ĉie. Pri dormo ne estis penso, kaj en la karbonigra mallumo oni nenion povis fari por plibonigi la situacion. Starigi sin estus nepoveble. La ventego puŝfaliĝis nin. Ni nur povis atendi la

tagiĝon. Ni devis kuŝi tenante fermitaj la aperturojn de niaj dormsakoj, kiom ni povis. Estis vere terura nokto. Ĝi neniam volis finiĝi. Mi ankoraŭ memoras ĝin kvazaŭ estus hieraŭ.

Tuj kiam komencis tagiĝi, ni ekmovis nin kaj elrigardis. La kamĉatkanoj kuŝis kovritaj de neĝo en sia felsako. Oni ricevis nubon da neĝo en la vizaĝon kaj ekbaton de la ventego, kiam oni elŝovis la kapon.

La vento blovis al Sedanka, nia plej proksima celo. Kun peno ni ŝovstarigis nin kaj decidis., ke ni provu trairi, antaŭ ol la neĝamasoj fariĝos tro profundaj. Tremante pro frosto kaj kun peltoj kaj dormsakoj plenaj de neĝo, ni komandis levigi la kompatindajn hundojn malsatajn kaj elĉerpitajn, kiuj nun en ses tagoj devis vivi per duona porcio kaj estis sovaĝaj pro malsato. Pri tekuirado ni ne povis pensi, sed samkiel la hundoj ni devis komenci la teruran tagon kun fastanta stomako.

En densa sinsekvo ni veturis plejeble proksime unu de la alia. Mi egale admiris la kapablon de la kamĉatkanoj kiel tiun de la hundoj trovi la vojon en la ŝtormo. Je unu okazo ni survenis frostiĝintan riveron. Ĝi faris kurbiĝon, tiel ke la hundoj estis trafataj elflanke de la ventego. Kaj hundoj kaj sledo estis pelataj alborde de la furioza purgo.

La neĝoŝtormo alterne kreskis kaj velkis. Se oni sin turnis kontraŭ la vento, oni ne povis spiri. Intertempe la neĝo ŝutiĝis tiel dense, ke oni nur vidis la plej proksimajn hundojn. Longajn tempojn ni sidis kaŭre sen povo levi la rigardon, fidante ke la hundoj sekvas la antaŭan sledon. Mi admiris la fidelajn bestojn kaj ĝojis, ke mi povos doni al ili tiom da manĝaĵo, kiom ili deziras, en la unua vilaĝo, kie troviĝas fiŝo.

Ni klopodis antaŭen dum la tuta tago. Vespere ni havis interkonsiliĝon. Ni ĉiuj timis novan tranoktadon kun dormsakoj kaj pel-

toj plenaj de neĝo. Ni decidis peli la hundojn ĝis ekstremo por se eble atingi al Sedanka. Krepuskiĝis. Ni venis sur vastan tundron. La espero trovi la vilaĝon antaŭ la nokto fariĝis ĉiam pli malforta, ju pli mallumiĝis. La hundoj estis ĝismorte lacaj, kaj ni ne estis multe pli fortaj. Ni neniom dormis lastnokte kaj nenion manĝis dum la tago. Plue ni estis trafrostitaj. La espero povi dormi sur planko en dometo viziis en malproksima foraĵo. La hundoj ankaŭ estis senkuraĝaj kaj kun peno antaŭen trenis la pezajn sledojn. Al ili ĉiuj pendis la kapoj.

Sed subite tremeto ekskuis ilin ĉiujn je unu fojo. Ili rektiĝis kaj aŭskultis. Ili aŭdis ion kaj plirapidigis la kuron. Ni apenaŭ kredis niajn orelojn pro ĝojo, kiam ni tuj poste aŭdis hundbojojn tute apude. Lumo ekbriletis. Ni atingis la kamĉatkanan vilaĝon Sedanka kaj estis savitaj. Neniam vilaĝo estis tiel bonvena kiel tiu.

Ni estis bone akceptataj en tiu domo, kie ni enloĝiĝis. La tuta dometo krakadis pro la ventego, kaj ni sentis nin ĝojaj, ke ni trovis rifuĝon. En tiu nokto unu el la hundoj formanĝis sian jungrimenon pro malsato, ĉar en la vilaĝo ne troviĝis peceto da fiŝo por doni al ili.

Sedanka estis la unua vilaĝo de la okcidenta marbordo, kun kiu ni konatiĝis. Ĝi estis tute malsimila al la kamĉatkanaj vilaĝoj sur la orienta marbordo. Por la unua fojo ni nun aŭdis la kamĉatkanajn paroli sian propran idiomon. Kiel mi jam antaŭe menciis, ili ĉie alie parolas ruse. Sed en kelknombro da vilaĝoj sur la okcidenta marbordo, kien la komunikoj ĉiam estis malbonaj, la malnova kamĉatkanana idiomo ankoraŭ konserviĝis.



Nia kamĉatkana gastiganto en Sedanka. (Fotis la aŭtoro)

Ĉiuj homoj estis afablaj kaj helpemaj kaj faris konsiderinde pli simpatian impreson ol tiuj en la vilaĝoj sur la okcidenta marbordo. Certe plejparte dependas de tio, ke ili tiel ekstreme malofte estas vizitataj de aliaj homoj en tiu malproksima vilaĝo kaj tial ĝojas, kiam iu venas.

En Sedanka nin trafis granda novaĵo. La bolŝevikoj, kiuj mal-

longe antaŭ nia forvojaĝo de Petropavlovsk estis forpelitaj el la urbo de la blankuloj kaj forkuris en la arbarojn, okupis la vilaĝon Naĉika, tranĉis la telefonan linion al Petropavlovsk kaj nun regis la du telefonajn fadenojn, kiuj kuris al la Kamĉatka valo kaj la okcidenta marbordo. Ili sendis sciigon al ĉiuj vilaĝoj, ke ili regas la landon kaj admonis la loĝantojn en tuta Kamĉatko marŝi kontraŭ Petropavlovsk kaj elpeli tiun blankan rabistaron, kiu loĝas en la urbo kaj kies sola celado estas per helpo de striknino kaj alkoholo rabi kiom eble da zibelaj feloj. Tiu sciigo antaŭ kelkaj tagoj kiel fulmo trafis ĉiujn vilaĝojn kaj ĝuste nun estis diskutata.

Sedanka estas tre originala vilaĝo. Ĝi kuŝas 50 verstojn flanke de la granda vojo laŭ la okcidenta marbordo kaj estas ekstreme malofte vizitata. Oni rimarkis je ĉio, ke la kamĉatkanoj estis tre malmulte miksitaj kun rusa sango.

Dum tiuj tagoj, kiujn ni restis en la vilaĝo, mi sciigis, ke ni deziras interŝanĝi al ni produktojn de kamĉatkana hejma slojdo. Kiel interŝanĝaĵon ni i. a. havis bombonojn. Unu kamĉatkano post la alia venis al nia restadejo kun diversaj objektoj. Plejparte estis betulŝelaj laboraĵoj el diversaj specoj, kun aŭ sen ornamaĵoj. Plue fajriloj, fiŝoleaj lampoj, modeloj de kanotoj kaj saporoj kaj multe aliaj. La tutan tagon alvenis la kamĉatkanoj, pleje infanoj. Ili ricevis por ĉiu objekto unu aŭ du plenmanojn da bombonoj en mikskoloraj paperoj. Sed ni ne nur sidis kaj akceptis. Ĉiu dometo estis esplorata, kaj kiam ni forlasis Sedanka, ni ricevis pli ol 50 etnografiaĵojn. Mi devis lui ekstran sledon por transporti ilin al la granda vilaĝo Tigil, kiu estis nia plej proksima celo, kaj kie la objektoj estis deponotaj por pli poste iri per ŝipo al Petropavlovsk.

Kiel vojaĝan manĝaĵon ni ricevis donace de preskaŭ ĉiu dometo en la vilaĝo unu aŭ plurajn boacajn langojn. Kiam ili jam honoris nin per pli ol 20 frostigitaj boacaj langoj, mi devis multajn mal-

akcepti. Oni povis vidi je ĉio en la vilaĝo, ke la kamĉatkanoj tute vivas per la korjakoĵ. En ĉiu domo oni manĝis nur boacan viandon, kiun la korjakoĵ devis doni. La fiŝkaptado nome tute malsukcesis en la lasta somero. Kiam la salmokaptiloj estis pretaj, la akvo altiĝis tiel eksternorme, ke ili estis forŝirataj. La tuta vilaĝo estis superakvita, kaj oni remis per kanoto inter la domoj.

Sekvante la Sedanka- kaj Tigil-riverojn ni jen atingis la grandan vilaĝon Tigil, la plej nordan lokon, kiun ni vizitis dum la ekspedicio. Tie ni konsiderinde pligrandigis niajn etnografiajn kolektojn, enpakis ilin en kestojn kaj deponis tiujn ĉe la loka reprezentanto de la Hudson-Bay-kompanio por plua transporto al Petropavlovsk.

Tra mortantaj regionoj laŭ la Oliotska maro

De Tigil restis por ni ĉ. 100 svedaj mejloj (1000 kilometroj) al Petropavlovsk. La pli granda parto de tiu distanco konsistis el unu kontinua tundro. Sur tiu tundro kuŝas 18 kamĉatkanaj vilaĝoj disŝutitaj je interspaco de du ĝis ok mejloj. La pli granda parto de la tundro estas ebena kiel la maro. Oni vidas nenium finon de ĝi. Kelkloke ĝi estas interrompita de iu betularbaro, nepriskribeble bonvena por vojaĝantoj dum la vintro. Aliloke la unuformecon rompas iu monteca tereno. Malaltaj montaĵoj kaj valoj alternas. Laŭ la riveroj, kiuj tratranĉas tiun tundron, tiriĝas strio da salika vegetaĵaro. La tundro etendiĝas de la maro ordinaro kelkajn mejlojn alinterne de la lando kaj estas oriente limita de montĉeno.

La homoj, kiuj loĝas en tiu regiono de Dio forgesita verŝajne apartenas al la plej kompatindaj sur nia tero, kaj vojaĝo tra tiuj mortantaj regionoj laŭ la Oĥotska maro estas korprema. Tie loĝas la lastaj restoj de nacio, kiu baldaŭ estos ekstermita de sur la tero. En aliaj partoj de Kamĉatko la kamĉatkanoj estas tiom miksitaj kun la rusoj, ke ili perdis sian idiomon kaj sian proprecon. Sed en deko da vilaĝoj, kiel mi jam menciis, en ekstreme malalta grado ili sin miksis kun la rusoj kaj ankoraŭ parolas sian propran idiomon. Sed la rusa civilizacio tamen metis sian postsignon ankaŭ sur tiu malgranda popola restaĵo. Ĉiu kamĉatkano, viro, virino kaj infano, suferas de hereda sifiliso, enkondukita de la rusoj antaŭ longe. Tiu malsano jam furiozis terure en tiuj dezertaj regionoj, kie mankas ĉiu helpo de kuracistoj. Krom tio japanoj kaj rusoj konkuras por dro-

nigi la kadukajn kaj mizerajn vilaĝojn en alkoholo, kiun la malsanaj kamĉatkanoj ŝatas pli alte ol ĉion alian.

La sekvo de ĉio ĉi estas, ke la okcidenta marbordo de Kamĉatko en la nuna tempo prezentas malĝojigan bildon de homa mizero kaj detimigan ekzemplon, kiel povas okazi, kiam civilizita nacio ekregas naturpopolon kaj sendas siajn plej malbonajn reprezentantojn por administri ĝin.



Tipa kamĉatkana dometo ĉe la okcidenta marbordo. (Fotis la aŭtoro).

Tra tiu regiono ni estis vojaĝontaj. Mi konfesas, ke ne estis alloga tasko, tiom pli ĉar ni estis absolute dependaj de tiuj vilaĝoj por la proviantado. Ni decidis, ke atinginte la vilaĝon Ĥairusovo, situantan 200 verstojn sude de Tigil, ni forlasos la kamĉatkanojn por kelka

tempo kaj supreniros al la montegoj por daŭrigi niajn studojn pri lamutoj kaj korjako.

Jen ni startis iun tagon por la lasta centmejla vojaĝo el Tigil, kie ni ĝuis grandiozan gastamon ĉe la reprezentanto de la Hudson-Bay-kompanio, Pimenoff. De tiu mi informiĝis, kiuj domoj en la sekvontaj vilaĝoj estas malplej abomenaj por tranoktado.

La unua vilaĝo sur la vojo suden nomiĝas Napana. Vespere ni alproksimiĝis al tiu. Grupo da grizaj, falemaj dometoj estis vidataj je distanco meze sur la tundro, kvazaŭ tien ĵetitaj je hazardo. La hundoj flarsentis la putran fiŝon de la vilaĝo kaj plirapidigis la kuron, kaj baldaŭ ni alvenis, kiel ĉiam salutataj de la kolera bojego de amaso da tirhundoj. Scivolaj indiĝenoj, vestitaj per felĉifonoj, kiujn ili ricevis de la korjako, rapidis eksteren por rigardi nin. Eljunginte la hundojn kaj metinte unu kiel gardanton ĉe la sledo, mi elserĉis tiun kamĉatkanon inter la rigardantoj, ĉe kiu ni tranoktos, kaj jen en lia akompano ni iris al lia dometo tra la kaduka vilaĝo, konsistanta el deko da domoj.

Kiam ni eniris tra la pordo, tiel terura fetoro trafis nin, ke ni preskaŭ falis dorsen. La dometo konsistis el unu sola ĉambro. Mebloj tute mankis escepte de tablo. Kelkaj kestoj servis kiel seĝoj. Sur unu el ili oni povis legi "California Fruits", sur alia kelkajn japanajn literojn. Sur la planko en la anguloj kuŝis kunpuŝitaj vestoj, boacaj feloj kaj difektita gramofono. Kelkaj malsanaj indiĝenoj, apenaŭ kapablaj leviĝi, kuŝis inter la ĉifonoj en alia angulo. Kelkaj duone nudaj infanoj ludis sur la planko per peco da viando. Proksime de la fajrujo kuŝis tute frostigita virboaco por malmoliĝo. La mastrino de la domo, nigrehara kamĉatkanino, timeme alvenis, salutis kaj poste malaperis en la kamenangulo, kie ŝi komencis manipuli per la samovaro. Kamĉatkana dometo sen samovaro ne ekzistas, eĉ se ĉio alia mankas en la domo.



Kamĉatkana belulino. Nia mastrino en Utholok. (Fotis la aŭtoro)

En tiu agrabla ĉirkaŭaĵo oni invitis nin eksidi sur keston ĉe la tablo kaj trinki teon — malfortan brikteon sen sukero, alportatan en nelavitaj tasoĵ. Sed ni igis ilin verŝi la teon en niaj proprajn tasoĵn.

Dum la tetrinkado subite ekbojis ĉiuj hundoĵ de la vilaĝo. Tio signifas, ke venas nova sledo. Laŭ malnova kutimo oni rigardas tra la fenestro por prividi, kiu estas, sed tiam trovas, ke la fenestroĵ

konsistas el kunkudritaj fiŝhaŭtoj, kiuj ja tralastas la lumon, sed tra kiuj estas neeble ion distingi. La najbaro havas fenestron el kunkudritaj ursintestoj, aliaj el fokintestoj. Ili tute ne estas malbonaj sed eltenas nur unu vintron. Krome oni devas esti antaŭzorga, tiel ke oni lokigas la fenestrojn tiel alte, ke la tirhundoj ne povas ilin atingi, ĉar alie oni riskas, ke ili iun belan tagon estas formangĝitaj.



Mi vigligas la hundojn per peco da fiŝo. (Fotis Dagny Bergman)

Mi faris promenadon inter la dometoj por havigi nutraĵon al la hundoj, entrepreno, kiu ofte renkontas malfacilaĵojn. La tuta vilaĝo haladzas de putra fiŝo. Ĉiuj domoj aspektas egale. Sama naŭza fetoro, sama malpureco, samaj mizeroj kaj malsanoj. La kamĉatkanoj estas tiomagrade maldiligentaj, ke ili somere preterlasas fiŝkapti tiom, ke la provizo sufiĉu ĝis kiam la fiŝoj denove aperos, malgraŭ ke ili ne bezonas labori pli ol unu semajnon por sekurigi sian tutan bezonon.

Mallumiĝis, kaj la kamĉatkano ekbruligis sian "ŝirnik-on", t. e. la fiŝolea lampo, ĉar elĉerpiĝis lia petrolo. Ĝi konsistas el fera pelveto, pendigita ĉe la muro kaj plena de ursa aŭ foka graso. Malgranda strio da ŝtofo servas kiel meĉo. Ni eksidis por paroli kun nia mastro. Li mem tre bone parolis ruse, sed lia familio nur scipovis la kamĉatkanan idiomon. Li rakontis, kiel malglata estas la vivo en Kamĉatko, kiel oni devas labori tra la tuta somero pri la fiŝkaptado, kiel malmulte da fiŝoj nun troviĝas, post kiam tien venis la japanoj, kaj kiel malfacile estas akiri zibelajn felojn dum la vintro. "Oni foje devas veturi eĉ du, tri tagojn de la vilaĝo, antaŭ ol oni povas trovi zibelon. Se nur la korjako foriĝus, ja estus tolereble, ĉar ili fortimigas ĉiujn zibelojn. Sed pretere, mi ree devas veturi al la korjako por pli da viando post kelkaj tagoj, mi havas nenion, per kio nutri la hundojn. Ĉiu fiŝo elĉerpiĝis, kaj ankoraŭ restas kelkaj monatoj ĝis printempo. Neniam oni havas kvieton kaj trankvilon. Kiel oni trovu tempon por ĉasi zibelojn, kiam oni devas veturi por viando ĉiusemajne? Tio ja postulas la duonan vintron", li plendis.

Fakto estas, ke la traputraj kamĉatkanoj de la okcidenta marbordo mortus pro malsato, se la korjako ne helpus ilin. La korjako per siaj boacaj gregoj nutras la loĝantojn de preskaŭ la tuta okcidenta marbordo. La kamĉatkanoj veturas tien kaj reen al iliaj jurtoj kaj almozpetas boacan viandon. La bonkoraj korjako ne povas vidi, ke kunvivanto malsatas, kaj buĉas al ili de siaj boacoj. La korjakaj virinoj kudras vestojn el boaca felo al la kamĉatkanoj, kiuj diras, ke ili ne scias kudri, sed pli vere estas tro maldiligentaj por tion fari.

Kiel la supre menciita vilaĝo aspektis ankaŭ la aliaj. Sama nepriskribebla mizero, sama terura mallaboremo. La plej abomena restadejo, kiun ni trafis, estis en la vilaĝo Utholok. Tie ni unuafoje estis regalataj per putra salmo, komplezo, kiun ni ĝentile sed decideme malakceptis. Naŭzis nin bezoni tie restadi. Se la vetero ne

estus malbona kaj la malsato ne estus pelinta nin al la vilaĝo, ni neniam povus resti.

Kelkajn el tiuj sifilisaj vilaĝoj estis tiel abomene viziti, ke ni foje ne kapablis tranokti en ili sed nur havigis nutraĵon al la hundoj kaj provianton al ni mem kaj daŭrigis iun mejlon preter la vilaĝon kaj tranoktis sub libera ĉielo aŭ en terkabano, kiu kutime troviĝas inter du malproksimaj vilaĝoj kiel rifuĝo por vojaĝantoj. En bona vetero, estis pli agrable pasigi la vesperon ĉe varmiga bivaka fajro ekstere en la sovaĝejo, kaj tie la boaca viando kaj la fiŝo gustis senfine pli bone ol en la naŭza aero en kamĉatkana dometo.

Returne al la sovaĝuloj

En Ĥairusovo, unu el la plej grandaj vilaĝoj de la okcidenta marbordo, ni deflankiĝis de nia alsuda vojstreko kaj direktis la hundojn orienten al la montegoj por fari la lastan viziton ĉe la korjako kaj la lamutoj. Mi akiris kamĉatkanan gvidanton al la montegoj kompanse ke mi fotografis lin kaj lian familion. Ili neniam antaŭe estis fotografitaj kaj rigardis tion kiel treege ekskluzivan sorĉaĵon. Koncerne fotografadon ĝenerale en Kamĉatko la korjako estas ekstreme malinklinaj lasi sin fotografi kaj ordinare rifuzas, la lamutoj ĝenerale ne protestas sed ne estas speciale inklinaj. Male la kamĉatkoj estas tre emaj vidi sian propran bildon kaj ne malofte plenumis tre severajn kondiĉojn al mi, por ke mi fotu ilin. Ofte, kiam ĉiuj kamĉatkoj en vilaĝo asertis per Dio, ke ilia lasta jukolo elĉerpiĝis pasinttage, la kamero estis mia lasta rimedo elpremiton, kion mi bezonis. Ekkoninte la kamĉatkojn, mi tial neniam malesperis, kiam ĉiuj en la vilaĝo respondis, ke ili ne havas nutraĵon al la hundoj.

Do ni forlasis la vilaĝon kaj estis survoje. La kamĉatko, kiu veturigis malplenan sledon, ricevis mian edzinon kiel pasaĝeron. Mian sledon mi ŝarĝis per intersanĝaĵoj, kiujn mi havigis al mi en la magazeno de la Hudson-Baykompanio en Ĥairusovo. La plej valora, kion mi havis de tiu speco, estis sufiĉe granda provizo da tabako. Sur preskaŭ la tuta okcidenta marbordo la tabako nome elĉerpiĝis, kaj ĝuste tabako estis la unua, pri kio ĉiuj demandis.

La unua, kiun ni atingis, estis la korjako Jutta. Lia jurto kuŝas

kvin mejlojn de la vilaĝo, kaj ni alvenis al ĝi vespere. Lia boaca grego de kelkmil bestoj estis vidata je iu distanco. Ni estis afable akceptataj de la maljuna viro, kiu ventmordita kaj brunhaŭta kun ŝancelaj malrapidaj paŝoj venis al ni renkonte, felvestita de verto ĝis piedo. De la malsanaj kaj naŭzodoraj kamĉatkanaj vilaĝoj oni sentis kvazaŭ liberigĝon renkonti sanan kaj fortikan popolon, kiu floris de bonstato.



Kaj viroj kaj virinoj estas vestitaj per feloj ĝis sur la haŭto. (Fotis la aŭtoro)

”Vin mi vidas je la unua fojo”, li komencis. ”De kie vi venas? Ĉu vi veturis al mia jurto por havigi boacan viandon?” Mi deklaris al li, ke ni venis de trans la maro, la korjaka nomo de ĉio krom Kamĉatko, kaj ke ni ne volis havi pli da boaca viando ol por manĝigo al

la hundoj, kaj ke ni deziras resti ĉe li, kelkajn tagojn, se li permesas. "Jes, mi neniam forpelas fremdulon. Pri viando al la hundoj vi ne bezonas zorgi. Vi vidas mian gregon tie, sed vi devas sekure ligi viajn hundojn, ĉar morgaŭ ni alpelos la boacojn al la jurto. Eniru kaj trinku teon, estas malvarme eksterdome hodiaŭ." Tiu parolo sonis al mi plaĉa, kaj ni enrampis tra la felkurteno en la jurton kaj konatiĝis kun la ceteraj familianoj. Ĉiuj estis vestitaj per feloj kaj aspektis tre sovaĝaj en la lumo de la fajro, kiu brulis en la mezo de la jurto.

Kiam ni trapasis la ordinaran programon, tetrinkadon kaj viandmanĝadon, jam estis vespero. Ĉiu familio eniris en sian tendon kaj eklumigis sian ursgrasan lampon. Ni restis ĉe la maljunulo kaj interparolis kun li. Li rakontis al ni pri la vivo kaj la konceptoj de la korjako. Speciale interesis nin je tiu okazo aŭdi, kiel ili faras, kiam unu el ilia tribo mortas kaj pri ilia kredo pri la morto kaj la viva estonta. La rusa esploristo Johelson havas la honoron esti la unua, kiu esploris tiujn aferojn.

Kiam korjako mortis, li estas vestata per speciala mortvesto, ornamita per riĉaj perlaj kaj felaj brodaĵoj. Ĉar ofte tuta vintro povas esti necesa por kudri tiujn vestojn kun ĉiuj iliaj ornamaĵoj, ili devas esti pretigataj anticipe, ĉar oni alie ne havus tempon pretigi ilin. Sed ili devas ne esti tute pretaj. Tio estas rigardata kiel peko kaj plifruigus la morton de tiu, por kiu ili estas faritaj. Tial oni lasas kelkajn etaĵojn nefinitaj. La mortvestoj estas sekrete kudrataj de la virinoj, ĝenerale dum la nokto, kiam la viroj dormas. Kiam korjako mortis, tio lasta ĉe lia mortvesto estas pretfarita.

Dum la mortinto ankoraŭ troviĝas en la jurto, neniu rajtas dormi. La virinoj kudras kaj la viroj detenas sin de dormo ludante kartojn, arto, kiun ili lernis de la rusoj.

Kiam la vestoj estas pretkudritaj kaj la mortinto enestigita, oni

jungas liajn proprajn tirboacojn al la sledo, sur kiun la korpo estas metata kaj iu el liaj proksimuloj veturigas lin al tiu loko, kie estos la brulŝtiparo, ĉar la korjakoĵoj forbruligas siajn mortintojn. Jam antaŭe oni tie kolektis sufiĉe da brulligno. La du boacojn oni oferas, por ke la mortinto havu boacojn ankaŭ en la alia mondo. La korpon, vestitan per la belaj vestaĵoj, oni metas sur la ŝtiparon, kiun oni poste ekbruligas. Apud la mortinto oni metas kelkajn objektojn, kiuj estis karaj al li, ekz. liaj pipo kaj flartabakujo kaj kelke da frandaĵoj kiel boacaj langoj, medolostoj ktp. por kunporti sur la vojaĝo en la alian mondon. Sur la brulŝtiparon oni ankaŭ kelkfoje metas donacojn al mortintaj parencoj.



Korjaka ŝamano kun sia magia tamburo. (Fotis la aŭtoro)

La vivo post la morto laŭ la kredo de la korjakoĵoj estas simila al tiu sur la tero. La enirejo al la subtera mondo estas gardata de hundoj, kaj tiu, kiu estis malbona al siaj hundoj kaj multe batis ilin dum

sia vivo, ne estas enlasata en la subteron. Tial, se la mortinto kulpis tiurilate, oni devas kunmeti pecon da fiŝo al la gardantaj hundoj, tiam li eble povas mildigi ilin kaj tamen enveni. Tiu koncepto certe estas la kaŭzo, ke la korjakojoj traktas siajn hundojn tre bone kompare al la kamĉatkanoj, kiuj ĉiam estas kruelaj kontraŭ ili.



La korjako Jutta kaj lia familio ĉirkaŭ la ursgrasa lampo. (Fotis la aŭtoro)

La korjakojoj estas idolanoj. Ili kredas je bonaj kaj malbonaj spiritoj kaj estas konfesantoj de la ŝamanismo, t. e. la arto per helpo de spiritoj ŝanĝi la pason de la okazaro. Ilia plej grava instrumento por tio estas la magia tamburo. Tia troviĝas en ĉiu jurto. Kiam estas festo, malsanulo estas kuracota aŭ io alia grava okazos, oni surpronas sian ŝamanan veston kaj ekfrapas la tamburon por elvoki la spiritojn. Nur malmultaj korjakojoj estas lertaj ŝamanoj. Nia maljuna mastro diris, ke li estas tio, kaj je mia peto li surmetis sian ŝamanan veston. Sur la kapon li metis kufon, ĉirkaŭe garnitan per longa

franĝo el perloj kaj feltufoj. Speciala felpelto kun amaso da ornamtufoj, perloj kaj tintiloj ankaŭ apartenis. Jen la maljunulö komencis frapi la tamburon kaj kanti. Tondris kun vera forto, li iĝis pli kaj pli fervora kaj fine venis en ekstazon. Subite li finis, tute lacigita. Li partoprenis per sia tuta animo kaj nun estis tute konsumita. Sed kion diris la spiritoj, li ne rakontis al ni.

Nun ankaŭ estis malfrue en la vespero kaj tempo iri ripozi. Ni ekkuŝis en niaj dormsakoj ene de la feltendo, dum ekstere la vento muĝfajfis kaj la hundoj ekaŭdigis siajn lamentadojn.

Ni restis dum pluraj tagoj en tiu jurto. La maljuna viro rakontis al ni multajn interesajn aferojn, kaj ni sentis nin bonege ĉe li. Niaj hundoj ĉiutage ricevis sian boacon. Mi tiom amikiĝis kun la maljuna korjako, ke li permesis al mi preni bildon de li en ŝamana vesto, kiam li frapis la tamburon. Kiam ni antaŭ kelka tempo en alia korjaka jurto petis permeson preni tian fotografaĵon, la koncernita viro tiel ofendiĝis, ke li poste apenaŭ volis respondi, kiam mi parolis al li. Li rapidis enigi la grandan tamburon en ĝian felan ujon, deklarante ke ĝi estas la "doktoro" de la korjako.

Mi ankaŭ prenis bildon de la maljuna korjaka paro kaj iliaj du filoj. Estis vespero, kaj mi sekve devis uzi magnezion. Tuj antaŭ ol mi ekbruligis la fulmon, mi konsilis al la korjako ne rigardi al tiu direkto, ĉar ili tiaokaze estos blindigataj de la lumo. Post kiam mi prenis tiujn du bildojn, kiujn mi deziris, la pli aĝa de la filoj, gajhumora dudekjara junulo, petis ke li ricevu grandan kvanton de tiu pulvo kaj li vojaĝos al la plej proksima lamuta jurto kaj diros al la lamutoj, ke ili rigardu rekte al ĝi, kiam li ekbruligas.

Kun lamutoj dum transloĝiĝo



Lamutoj transloĝigas. (Fotis la aŭtoro)

Nur kelkajn verstojn de la jurto de Jutta kuŝis lamuta tendaro. Iun tagon sciigis nin la korjakoĵoj, ke la lamutoj translokiĝos en la sekvonta mateno, se estos bela vetero, Tre volonte ni volis partopreni ilian translokiĝon. Tial ni decidis frue la sekvontan matenon veturi al ilia tendaro.

Fervore dezirante ne veni tro malfrue ni startis tuj post la tagiĝo, post kiam ni englutis iom da teo kaj viando kaj diris adiaŭ al niaj afablaj gemastroj. La hundoj, kiuj ricevis unu boacon ĉiutage kaj estis plene ripozintaj, sin trovis en bonega stato kaj kuris galope preskaŭ la tutan vojon. En malpli ol dudek minutoj ni estis ĉe la celo.

Ni trovis la tutan lamutan tendaron en vikleco. Oni ĝuste mal-konstruis la du jurtojn. Ĉiujn moveblaĵojn oni metis en la paksaĵojn, kiujn portos la boacoj, la jurstangojn oni kunligis, altrenis

sledojn kaj ŝarĝis ilin, finpakitaj sakoj estis aranĝataj laŭ vicoj. La infanoj ĉirkaŭkuris petolante kaj malhelpante. La plej malgrandan, florantan tungusan junuleton de unu jaro kaj duono, oni enŝovis en tre belan, per perloj kaj brodaĵoj ornamitan lulilon, kie plaĉis al li treege malbone se juĝi laŭ la vizaĝaj trajtoj kaj la lamentadoj. Neniu staris senaga, ĉiuj laboris vigle kaj fervore.

Fine ĉio estis enŝarĝita en la sledojn kaj la sakoj prete pakitaj. Nun oni devis kapti la necesajn boacojn kaj ili ne estis malmultaj. 80 paksakoj kuŝis sur la neĝo. Nur al ili estis bezonataj 40 boacoj. Plue oni bezonis 14 tirboacojn kaj 5 rajdboacojn. La grego estis alpelata, kaj jen komencis la kaptado, kiu postulis kelkajn horojn. Je tio asistis kelkaj lamutoj el aliaj jurtoj, kiuj alvenis por kunhelpi je la transloĝiĝo. Ili kunportis po unu hundsledon, kiuj ankaŭ estis uzataj kiel ŝarĝosledoj. Unu lamuto havis la tutan vizaĝon deformita. Unu okulo kaj la nazo mankis. Urso, kiun li vundis, disŝiris ĝin al li.

Kiam fine ĉiuj boacoj estis kaptitaj, oni surmetis la pakselojn, alligis la paksakojn, selis la rajdboacojn kaj aljungis la sledojn. Fine, post multe da kontraŭaĵoj, la tuta karavano estis preta por starto. Estis supermezure bela vido, kiam ĝi ekmoviĝis kaj malrapide paŝis antaŭen sur la tundro, kiu baniĝis en sunlumo.

Ĉe la kapo de la tuta karavano veturis tri hundsledoj. Post ĝi venis kvar boacsledoj kun du bestoj antaŭ ĉiu, jen kvin grandaj ŝarĝosledoj, kie kuŝis la feloj por la jurtoj, ĉiu jungita per nur unu boaco, jen kvin grupoj da ŝarĝoboacoj je respektive 12, 7, 10, kaj 6 bestoj. Antaŭe de ĉiu grupo rajdis lamutino. La diversaj grupoj de ŝarĝoboacoj estis inter si apartigitaj, sed la boacoj de sama grupo estis kunligitaj unu al la alia per rimenoj. La unua ŝarĝoboaco de ĉiu grupo estis alligita al la rajdboaco. Lasta en la vico venis la libera grego. Alifoje ĝi kutime iras antaŭ la tuta transloĝigantaro por trovi

vojon, sed nun la neĝo estis tiel malmola, ke ĝi tamen portis kaj sledojn kaj boacojn.



Du lamutaj knabinetoj. (Fotis la aŭtoro)

La loko, kie la lamutoj intencis starigi sian novan tendaron, estis apenaŭ duonan mejlon malproksime. Ni postrestis post la aliaj, ĝis kiam la tuta longa karavano malaperis el la okuloj sur la ondolina tundro. Tiam mi elĉenigis la hundjungitaron, kaj simile al streĉita risorto ĝi strekkuris galope post la boaca karavano. Ne daŭris longe, ĝis kiam ni reatingis ĝin. Ni faris tion, ĝuste kiam la karavano atingis sian lokon de destino.

Ni ligis niajn hundojn proksime de la estonta jurta loko kaj nun

povis kviete kaj trankvile rigardi, kiel elkreskas la nova tendaro, kaj preni serion da bildoj pri la diversaj momentoj.

Post kiam oni senigis la pakboacojn je iliaj sakoj kaj la rajd- kaj tirboacojn je seloj kaj jungiloj, oni lasis ilin liberaj. Ili tuj kuniĝis kun la cetera parto de la grego, kiu estis fervore okupita per la piedoj forskrapi la neĝon kaj serĉi limenojn sur la nova kaj fekunda paŝtejo.



La skeleto de la nova jurto. (Fotis la aŭtoro)

Oni difinis la lokon por la du jurtoj kaj tuj komencis la laboron aranĝi ilin. Nur la virinoj laboris je tio. Unue oni forŝovelis la neĝon sur la elektita loko. La lamutoj havas specialajn hejmemfaritajn neĝoŝovelilojn por tiu celo. Kiam la neĝo estis bone forŝovita, oni stari-

gis tri fortikajn stangojn en la mezo. Ili poste subportos ĉiujn ceterajn jurstangojn. Jen oni kolektis branĉetaĵojn kaj sternis sur la planko de la estonta jurto. Post tio oni starigis la tutan skeleton de la tendo. Ĉiuj stangoj estis kunportitaj de la antaŭa tendejo. Kiel estas videble laŭ la bildoj, la tegmento de la jurto estas rompita proksimume unu metron super la tero, kie la skeleto konsistas el vertikalaj palisoj. Tiuj estas duope kunligitaj unu kun la alia per rimenoj. La tegmentaj stangoj, kiuj ĉiuj iras al la fumelirejo kaj estas apoŝitaj sur la tri unue menciitaj fortikaj stangoj, eliras de la supra ekstremo de tiuj duopaj mallongaj palisoj, kie ili estas fiksigitaj. Kiam la tuta skeleto estas preta, ĝi prezentas treege fortan sveltoforman, ja efektive elegantan trabaron, kiu certe ne estas eksperimentita en unu fojo. Nun oni metas grandajn tavolojn da kunkudritaj boacaj feloj sur la tegmenton kaj la flankojn. Ili estas fiksitaj per rimenoj tie kaj tie ĉi. Oni komencas, malsupre kaj daŭrigas supren, ĝis kiam la tuta jurto estas kovrita. Ankoraŭ estas nur la virinoj kiuj laboras. La viroj sidas sur la sledoj fumante aŭ amuzante sin per io alia. Kelkaj el ili tamen hejmen portas sekan brullignon. Tio apartenas al la devoj de la viroj. Ne pasis pli ol kelkaj horoj, ĝis kiam la jurto estis starigita, la internaj tendoj instalitaj, boacaj feloj kuŝis sur la planko kaj la tekruĉo pendis super la fajro en la nova loĝejo. Nur la duona tago estis pasinta, kaj ni admiris tiun teknikon, kun kio ĉio estis farita. Ne malpli ol ses familioj kun domo kaj hejmo kaj ĉiuj posedaĵoj, kaj vivaj kaj mortaj, estis translokiĝintaj. La loĝejoj estis malkonstruitaj, disprenitaj je eroj kaj per helpo de 60 boacoj kaj 30 hundoj translokitaj duonan mejlon kaj denove starigitaj. En vero bona laboro dum duona tago.

Regis treege gaja kaj agrabla agordo, kiam ni trinkis la unuan teon en la nova jurto. Ĉiuj estis ĝojegaj esti venintaj al nova loko, kaj

ili konfidencis al ni, ke longan loĝadon en unu loko ili trovas teda. Enestas al ili en la sango la emo migri de loko al loko.



Lamuta boacjungitaro ekster la nova jurto. (Fotis la aŭtoro)

Ĝuste kiam ni sidis kaj trinkis teon, la maljuna korjako Jutta kaj liaj du filoj alvenis veturante per tri boacsledoj. Ili nur venis por viziti kaj trinki teon, proksimume kiel oni hejme en Svedlando iras al kafkunveno. Mi trovis dum la vojaĝoj inter la nomadoj tie supre sur la montegoj, ke ili havas specialan plezuron farante vizitojn unu ĉe la alia. La korjako rakontis, ke ili ankaŭ transloĝiĝis en la sama tago. Tamen ili respondis frumatene, kiam mi demandis, kiam ili transloĝiĝos, ke tion ili ne povas certe diri. Verŝajne ili ne volis, ke ni ĉeestos ĉe ilia translokiĝo.

La lamutoj nun decidis fari reviziton, kaj post kiam multaj tasoĝ da teo estis trinkitaj, kelkaj lamutoj eliris kaj kaptis necesan nombron da boacoj. Mia edzino kaj mi deziris kunvojaĝi en la boacsledoj kaj mi petis la mastron de la jurto, ke li aranĝu du sledojn. Li skuis la kapon dirante, ke la boacoj estas sovaĝaj kaj ke ni facile povus rompi al ni la krurojn. Alivorte li tute ne estis entuziasma por la afero. Sed post kiam mi klarigis al li, ke estas nia propra afero, se ni rompuz la krurojn li iris kaj kaptis tri boacojn. Jen ĉiuj boacoj estis aljungataj, kaj la maljunulo transdonis unu sledon kun du boacoj al mi kaj alian kun unu boaco al mia edzino. "Nu, kiu veturigos la sledojn?" mi demandis. "Tion vi faru mem", diris la maljunulo. Mi nur intencis veturi kiel pasaĝero. Ĉar ni neniam veturigas boacon mem sed ĉiam havis indiĝenon kiel veturigiston, ni trovis tion sufiĉe maltrankviliga sed kompreneble decidis riski la krurojn. Ses jungaĝoj startis antaŭ ni, kaj jen ni ekvipis la boacojn kaj ekveturis.

La korjaka jurto kuŝis ĉ. 5 verstojn fore. La pli granda parto de la vojo estis tundro. La ses sledoj baldaŭ malaperis el niaj okuloj. Niaj kunvojaĝantoj estis treege senĝenaj kaj neniom zorgis pri ni. La boacoj tamen estis bonkonduataj. Komence ili faris kelkajn flankensaltojn, sed jen ili transiris en trotadon kaj obeeme kuris laŭ la paŝosignoj de la aliaj. Baldaŭ la jurto montriĝis, kaj ekster ĝi ni trovis kolektiĝintaj ĉiujn ĝiajn loĝantojn kaj krome la lamutajn gastojn. Ili scivole rigardis al ni, kaj ni faris nian eblon fari senĝenan alvenon sen renversiĝo, kion ni ankaŭ sukcesis. Estis tre kurioza sento eniri en la saman jurton kaj al la samaj familioj, kiujn ni forlasis matene en tute alia regiono. La hejmenvojaĝo iris tiel feliĉe kiel la forvojaĝo, sed estis lacige dum la tuta tempo sidi rajde, kiel oni devas fari sur boacsledo. La hundsledo estas rimarkinde pli komforta. Sur ĝi oni povas sidi kiel oni deziras.

La sekvan tagon ni uzis por fari komercojn kun la lamutoj. Ni interŝanĝe havigis rajdselojn, pakselojn kaj ŝarĝosakojn por boacoj. Ni ankaŭ sukcesis akiri tutajn lamutajn porvirinajn vestojn kun perloj kaj brodaĵoj, kaj somerajn kaj vintrajn vestojn, plue unu porviran veston, somerajn kaj vintrajn botojn por ambaŭ seksoj, diversspecajn ilojn kaj multe da aliaj aĵoj. En alia jurto mi sukcesis aĉeti treege elegantan boacsledon kun jungiloj kaj kondukrimenoj.

Sekvonttage ni adiaŭsalutis la du jurtojn kaj iliajn gastamajn loĝantojn kaj plu vojaĝis. Ni vizitis du aliajn lamutajn jurtojn, antaŭ ol ni revojaĝis al Ĥairusovo, kaj poste ni ne plu vidis lamutojn dum nia vintra vojaĝo.

Laŭ la okcidenta marbordo al Karlsson



*La maljunega kamĉatkano. Rimarku la fenestron el kunkudritaj fiŝaŭtoj.
(Fotis la aŭtoro)*

Antaŭ ol ni forlasis Rairusovon, ni konatiĝis kun la plej malju na loĝanto de Kamĉatko, blankhara maljuna kamĉatkano, kiu laŭdire havis 106 jarojn, kaj tia li ankaŭ ŝajnis. Li estis tute blinda, sed povis aŭdi kaj paroli tre bone. Li parolis multe pri malnovaj tempoj kaj bone memoris, kiam la kamĉatkanoj loĝis en terkabanoj. Li diris, ke antaŭe troviĝis konsiderinde pli da zibeloj kaj ursoj ol

nun, kaj ke la salmo malmultiĝis altagrade. Sed la kamĉatkanoj vivas pli bone nun ol antaŭe. Nun ĉiuj havas bonajn pafilojn, antaŭe oni devis kontentiĝi je lancoj. Ĉio sendube pliboniĝis de tiu tempo, kiam li estis juna, sed ne plu estas la samaj trankvilo kaj paco en la lando kiel tiam.

Ni nun estis difinitive pretaj ekiri sur la vojo hejmen al Petropavlovsk, kiu estis 800 km. malproksima. La unua parto de tiu distanco iris tra malsanaj vilaĝoj, sed iom pli sude ni povis atendi treege agrablan interrompon: la vizito de Karlsson. En la vilaĝo Monomalova, nome de multaj jaroj loĝadis la svedo Karlsson. Tie ni ankaŭ esperis trovi Jansson, kun kiu ni en la fruvintro renkontiĝis en Milkova. Sed inter ni kaj Karlsson kuŝis 400 verstoj kaj 8 kamĉatkanaj vilaĝoj.

Kun ripozintaj hundoj ni do startis de Ĥairusovo direkte al Karlsson. Ni pasis preter Bjelogolovaja, la plej malgranda vilaĝo, kiun ni trafis en Kamĉatko, konsistanta el kvar domoj kaj situanta meze sur la tundro sen iu arbo kiel ŝirmo. La sekva vilaĝo nomigis Morogets-naja. Mi kredas, ke ĝi estis la plej originala kamĉatka vilaĝo, kiun mi vidis. Preskaŭ ĉiu domo havis fiŝhaŭtajn aŭ ursintestajn fenestrojn, kaj kiel lumigaĵo apenaŭ estis uzata io alia ol ursa aŭ foka graso. Ĉiuj parolis kamĉatkane. La mastro de nia restadejo petis pardonon, ke li nur havas kamĉatkanan panon, t. e. sekigita salmo, kiel regalaĵon al la teo. Krom jukolo kaj teo oni regalis nin per frostigitaj beroj de empetroj. Preskaŭ la tuta vilaĝo kolektiĝis en nia bivakejo por rigardi nin. Ili pririgardis nin tiel scivole, kvazaŭ ni estus kuriozaj bestoj en menaĝerio.

En la vilaĝo Sopoĥnaja je la unua fojo ni trovis alian tipon de la balaganoj ol la ordinaran ĉe la okcidenta marbordo. Estis la plej originala tipo, kiun oni trovas menciita en la plej malnovaj priskriboj pri la lando. La provizejo sur la surfosta konstruaĵo havis pira-

midan formon kaj okupis la tutan supran areon. La vilaĝo Mik sude de Soporinaja estis la lasta vilaĝo, kie oni parolis la kamĉatkanan idiomon ĉiutage.



La originala tipo de balagano. (Fotis la aŭtoro)

Iom post iom ni alvenis al la maro, kiun ni ne vidis de tre longe. Sur la tundroj laŭlonge de la marbordo ni plurfoje vidis grandajn gregojn de boacoj. Kelkajn korjakajn jurtojn ni ankaŭ vidis. La hundoj ĉiam plirapidigis la kuron je tiaj okazoj kaj povis kuri galope duonan mejlon seninterrompe, kiam ili flaris aŭ vidis la gregojn. Sed tie sur la libera kaj ebena grundo estis tute agrable, kiam ili flugis antaŭen laŭ la tundro.

En korjaka jurto, kiu kuŝis preskaŭ en nia vojo, ni faris viziton.

Estis unu el la plej grandaj jurtoj, kiujn ni vizitis, kaj ni renkontis amason da korjakoĵoj. Mi demandis al la mastro de la jurto, ĉu li konas Karlsson. Jes, certe li ja konas. Karlsson estis lia speciala priĵatelo, kaj kun fiero li rakontis, ke tiu ĉiam prenas de li sian provizon da boaca viando. Kiam la korjako siavice ion bezonas, li ĉiam aĉetas tion ĉe Karlsson, kiu neniam trompas lin, kiel kutimas fari aliaj komercistoj. Karlsson estas honestulo, deklaris la korjako. Li ankaŭ rakontis, ke Karlsson diris, ke li ricevos viziton de kelkaj samlandanoj dum la printempo. Sed nun li certe estas forvojaĝinta, li aldiris.



Kie loĝis la korjako, kiu estis bona amiko de Karlsson. (Fotis la aŭtoro)

De kiam ni forlasis Ĥairusovo estis varme kaj sune dum la tagoj. Meze de la tago la temperaturo ofte altiĝis eĉ super la frostopunk-

ton. El tio sekvis, ke la neĝo fariĝis algluema kaj la sledo tute ne volis gliti. Je tiu tempo ĉiu hundsledistoj metas ŝtalon aŭ balenostojn sub la glitilojn de la sledo, t. e. oni alŝraŭbas du maldikajn glitilojn el la supremenciita materialo sub la lignajn glitilojn. Ŝtalo kaj balenosto konkuras esti pli bona. La ŝtalo glitas pli bone sur neĝo, sed la balenosto iras pli facile sur senneĝa tero, kaj printempe oni ofte devas transveturi tian. Tial estas tre ŝatata kverela kaj diskuta temo dum la printempo, kio estas pli bona, ĉu ŝtalo aŭ baleno. Kelkaj insistas pri la unua, aliaj pri la alia. Dum la tuta vojaĝo mi havis du ŝtalglitilojn ŝraŭbfiksitaĵoj sub la sledfundo kaj nun mal-fiksis ilin kaj metis ilin sur ĝustan lokon je granda faciligo por la hundoj. La sledo glitis duoble facile.

Alia artiklo, kiu estas necesa en la sama sezono, estas neĝokultivitoj. Precipe sur la tundroj de la okcidenta marbordo, kie ofte en longaj distancoj ne troviĝas unu sola punkto sur kiu ripozigi la okulon, ili estas nepre necesaj. Oni ne povas sin helpi unu solan tagon sen tiaj. Ĉiu indiĝeno, el kiu ajn speco li estu, ankaŭ komencas porti neĝokultivitojn je tiu tempo, kaj la plej multaj komercistoj vendas tiajn.

Ĉiu tago nin portis bonan distancon alsude, ordinaro ĉ. 50 km. Ni pasis unu kamĉatkanan vilaĝon post la alia. Sed mi ne malŝparos multajn vortojn pri tiuj vilaĝoj. La unu estis tute simila al la alia. Estis nur tiu diferenco ke ju pli ni proksimigis al Petropavlovsk, des pli ofte troviĝis rusoj en la vilaĝoj, kaj des pli la kamĉatkaĵoj estis miksitaj kun tiuj.

Kutimo, kiun ni tre malŝatis, estis disvastigita tiel ĝenerale sur ĉi tiu marbordo kiel sur la alia. Estis la malbona kutimo vespermanĝi kiom eble plej malfrue. En tuta Kamĉatko, kaj laŭdire estas same en la tuta nordorienta Siberio, oni manĝas la ĉefan manĝon de la tago vespere. Ĉe la kamĉatkaĵoj estas bontono vespermanĝi plejeble

malfrue. La naŭa, deka horoj vespere ordinare estas rigardataj tro fruaj, kaj por esti vere eleganta oni invitas al vespermanĝo inter la dekunua kaj la dekdua nokte. Sennombrajn fojojn ni venis tute malsategaj al vilaĝo ĉirkaŭ la sesa, sepa horo vespere. Post kiam la mastrino regalis per teo, ŝi ordinare senprokraste komencas prepari la vespermanĝon. En bonhava domo ĝi ĝenerale konsistas el salmo fritita en ursgraso, kaj el supo kun kelkaj grandaj viandpecoj de urso, boaco aŭ montŝafo. Ĉirkaŭ la oka ĉio eble estas preta, kaj odoras de bona manĝaĵo en la tuta dometo. Sed malgraŭ ke ĉiuj estas malsataj kaj nenion pli deziras ol povi manĝi, la mastrino decideme formetas la pretigitan manĝaĵon en la varman fornnon, ke ĝi devas stari kaj sekiĝi, ĝis kiam estos sufiĉe malfrue por alporti ĝin. Ĉar oni ne rajtas pagi la manĝaĵon, oni ankaŭ ne bone povas elkomandi ĝin, kiam oni deziras. Se ŝi volas esti speciale ĝentila, povas foje okazi, ke ŝi prokrastas la vespermanĝon ĝis noktomezo. Sed dume ŝi mem estas tiel dormema, ke ŝi kutime devas permesi al si dormeton por deteni sin de dormo, mi povus preskaŭ diri. Ĉirkaŭ noktomezo ŝi fine venas, dormema kaj oscedanta, kaj demandas ĉu eble estas "Para uĵinati" (tempo por vespermanĝi). Foje ni alvenis ĉirkaŭ la naŭa al vilaĝo. Ni estis tro lacigitaj por elatendi la manĝaĵon kaj tuj ekkuŝis por dormi. Inter la dekdua kaj unua horoj nokte nin vekis la gemastroj por bonega vespermanĝo.

Ju pli proksimen al la vilaĝo de Karlsson ni venis, des pli longajn tagvojaĝojn ni faris, kaj dum la lastaj sep tagoj ni permesis al ni neniun haltadon. Alie oni devas doni al la hundoj unu ripoztagon post kvin labortagoj. Sed ĉe Karlsson la hundoj povos plene ripozadi.

Posttagmeze la 28. marto fine ekaŭdiĝis la hundbojoj de la vilaĝo de Karlsson, Monomariova. Duonan horon pli poste ni enveturis en la vilaĝon. La unuan indiĝenon, kiun mi vidis, mi demandis pri la

domo de Karlsson, kaj li montris al ni belan domon kun verando kaj flagstango. Kelkaj viglaj bubetoj, kiuj vidis kien ni celas, kuris al ni renkonte kriante: "Ĉu vi veturas al Karlsson? Estas nia paĉjo."



Trans la senfinajn tundrojn survoje al la vilaĝo de Karlsson.

El la domo venis du junaj viroj. La unu estis la filo de Karlsson, la alia estis lia bofilo. Oni atendis nin delonge kaj elkore bonvensalutis nin, sed ni eksciis ke Karlsson kaj Jansson ne estas hejme, sed povas veni kiun ajn tagon. Antaŭ pluraj semajnoj ili vojaĝis al la vilaĝo Javina, unu el la plej sudaj vilaĝoj de la duoninsulo, kie Karlsson antaŭe loĝis kaj ankoraŭ havas diversajn aferojn por prizorgi. Estis granda ĉagreno por ni ne renkonti ilin, sed ni tamen estis devigitaj ripozigi la hundojn en du tagoj kaj esperis, ke la du svedoj venos dum la tempo.

Kafo kaj buterpanaro tuj estis pretigataj. Karlsson donis siajn instrukciojn. Mi havis leterojn de Karlsson, Jansson kaj la kamaraĵoj en Petropavlovsk. Tiu de Karlsson estis tiel mallonga kiel bonvola. Ĝi tekstis: "Karaj samlandanoj! Bonvenon al mia vilaĝo! Se vi ion deziras, nur diru al mia filo. Vi ne bezonas fali en embarason pri nutraĵo al la hundoj. Amike Severin Karlsson."



La tri plej junaj infanoj de Karlsson. (Fotis la aŭtoro)

Karlsson konis la vundan punkton. Li sciis, ke la plej granda malfacilaĵo dum la vintraj vojaĝoj estas havigi nutraĵon al la hundoj kaj tial volis ŝpari al ni tiun zorgon.

La domo de Karlsson ne estis simila al aliaj en Kamĉatko. Li havis unu ĉambron, kiu tute egale povus esti en sveda vilaĝana dome-

to. Meze sur la planko staris ronda tablo kun flordeseĝna tuko. Super ĝi pendis hejmeca plafonlampo, la sola, kiun mi vidis en la lando, en la fenestroj floris fukcioj kaj pelargonioj, kaj ĉe unu muro staris libroŝranko. Ĝi certe estis la sola en sia speco sur la tuta okcidenta marbordo de Kamĉatko. En tiu libroŝranko ni trovis plurajn svedajn librojn, i. a. La fabelo pri Fritiof kaj La legendoj de Flagjunkro Stål. La fabelon pri Fritiof Karlsson sciis parkere same kiel Andersson en Ust-Kamĉatsk. Plue troviĝis pluraj svedaj ĵurnaloj, kiuj plej proksime devenis de nia domo en Petropavlovsk.

Karlsson estis edziĝinta tri fojojn al kamĉatkaninoj kaj havis multajn infanojn. Ankaŭ lia lasta edzino mortis kaj multaj el la infanoj. Sed ok infanojn li ankoraŭ havis en la vivo, kaj kvin el ili estis hejme, el ili tri junaj kaj du plenaĝaj, unu filo kaj unu filino. Tiuj du aspektis tiel svedaj, kiel oni nur povas postuli. Nenio konjektiĝis al aziana sango.

Ni restis du tagojn en la domo de Karlsson. Sed kiam ni nenion aŭdis de li, ni ne povis plu atendi, tiom malpli ĉar la riveroj komencis rompi la glacikovrilon ie ajn pro la varma vetero kaj ni devis transpasi multajn. En la tria tago ni do adiaŭsalutis la gastaman, sveda-kamĉatkanan domon sur la okcidentborda tundro kaj eniris la vojon al la maro por poste sekvi ĝin dum multaj tagoj. Japanaj fiŝkapejoj kuŝis dise laŭlonge de la bordo. En kelkaj el ili loĝis gardisto, kiu prigardu ilin dum la vintro.

Kiam ni veturis ĉ. 20 verstojn, ni alvenis al tia dometo de gardisto, kie hundjungitaro estis ligita. Kiam ni alveturis al ĝi kaj la hundoj komencis boji, la pordo malfermiĝis kaj granda viro eliris. Ni rekonis unu la alian samtempe kaj kuris renkonte kun eksplodema entuziasmo. Estis Jansson. "Kie estas Karlson?" mi unue demandis, post kiam ni salutis. "Karlsson postrestis en la lasta vilaĝo, kie li devis fari kelkajn zibelajn komercojn, kaj do mi veturis antaŭe. Mi

ekaŭdis, ke vi estas en Monomaĥova, kaj volis provi vin atingi tie. Nun ni eniru kaj trinku teon dume, kaj jen Karlsson certe venos”, diris la Gnesta-ano.



Jansson kaj Karlsson (dekstre), la kamĉatkaj svedoj. (Fotis la aŭtoro)

Do ni eniris al la gardisto, kompatinda ruso, kiu sidis tie tra la tuta vintro sen alia tasko ol pririgardi, ke ĉio estas simila al si mem. Li ŝajne havis mukon en la cerbo, kaj tion mi vere ne miras. Estis ja la oka jaro, ke li sidis tie kaj kovis. Se li estus svedo, li supozeble komencus ian metion, sed plej plaĉis al li la nenionfarado. Li ŝajne pasigis la tagon rigardserĉante hundsledojn por havi akompananton ĉe la teo.

Ni sidis kelkajn horojn parolante kun Jansson, sed venis neniuj Karlsson. Jansson insistis, ke ni iru returne kaj pasigu la sekvontan tagon kune ĉiuj kvar. Fine ni konsentis lian proponon, malgraŭ ke mi spirite vidis antaŭ mi vicon da neĝovritaj riveroj, kiujn ni devos transigi. Sed aliflanke mi opiniis, ke ni ne povos forlasi Kamĉatkon ne renkontinte "Karlsson ĉe la okcidenta marbordo", pri kiu ni aŭdis tiel multe, kaj kiun neniuj el ni vidis. Ni do turnis la sledojn kaj veturis returne, ne al la vilaĝo sed al la rivera enfluejo ĉe la maro, kie Karlsson havis negrandan dometon kaj sian provizejon, ĉar li nuntempe estis granda felkomercesto. Dum la tuta tempo ni havis fortan kontraŭan venton, kiu premis la fortojn de la hundoj, sed post du horoj ni estis tie.

La dometo estis plaĉa kaj beleta. Granda magazeno el ondumita lado kuŝis apude. Estis nur kelkaj ŝtonĵetoj al la maro.

Tiun tutan vesperon ni atendis, kaj la postan tagon ni senĉese rigardesploris per la lorno for al la tundro, sed venis neniuj Karlsson. Nur en la krepuskiĝo montriĝis punkto ĉe la horizonto. Ĝi kreskis, kaj kiam ĝi estis kelkajn kilometrojn de ni, Jansson konstatis per lorno, ke li rekonas la hundojn de Karlsson. Post mallonga tempo Karlsson ankaŭ enveturis en la korton, kaj ni eliris por akcepti lin. Li aspektis tute sveda malgraŭ la neĝokamizolo kaj la vila korpaj ĉapo el boaca felo. "Bonvenon en nia lando", li unue diris. Liginte la hundojn Karlsson eniris, deĵetis la supervestojn, kaj jen ni pli proksime konatiĝis. John jam pretigis la kafon, kaj post kiam ni trinkis ĝin, Karlsson prenis la ŝlosilojn al sia magazeno kaj eniris por elekti konvenajn konservaĵojn, ĉar nun estu festeno sur la tundro. Neniam antaŭe kvar svedoj estis tie kunvenintaj. Nun, diabloj, pensis Karlsson. Jansson, kiu i. a. ankaŭ estis kuiristo sur ŝipo, scipovis la arton kuirigi manĝaĵojn kaj prenis sur sin la preparaĵojn.

Karlsson nun rakontis iom pri siaj sortoj. Li estis naskita en

Halmstad, eliris en la mondon kiel maristo kaj antaŭ 34 jaroj surteriĝis ĉe la okcidenta marbordo de Kamĉatko. En lia akompano sin trovis Finlanda filozofia doktoro, Otto Kuorikoski, kiu pro politikaj motivoj malaperis el Finnlando. Tiuj du nun surbordiĝis ĉe la vilaĝo Javina proksime de la suda pinto de Kamĉatko. Ĉar ambaŭ, precipe Karlsson, estis interesataj de ĉaso, ili ekloĝis inter la kamĉatkanoj de la vilaĝo kaj vivis per ĉaso kaj fiŝkaptado kiel ili. Post dekkvin jaroj mortis la finlandano.

Karlsson daŭrigis ankoraŭ kelkajn jarojn kiel ĉasisto sed iom post iom li transiris al felkomerco. Li pafis pli ol mil ursojn en siaj vivtagoj. Antaŭatempe la ursoj estis senlime pli multnombraj ol nun. Tiam ili venis tute al apud la vilaĝoj, kaj Karlsson pafis multajn el sia fenestro en Javina. Li rakontis, ke sur albordiĝinta baleno li kalkulis ĝis ne malpli ol 31 ursoj, kiuj samtempe manĝis grason sur la kadavro.

Antaŭatempe, li rakontis, li kutimis ekiri por ĉasi ursojn supren laŭ la Czernaja rivero al la Kurila Maro. Tie li ĉiujare pafis grandnombro da ursoj, kaj fininte la ĉasadon li faris al si boaton el kelkaj grandaj feloj kun la harara flanko alinterne kaj kun restanta sur ili lardo. En tiu li poste ŝarĝis la ceterajn felojn kaj jen drivis malsupren laŭ la rivero kun la tuta ĉasakiraĵo.

Foje li sukcesis kapti etan lupidon, kiun li bredis inter siaj hundoj. Kiam ĝi estis plenaĝa, ĝi pariĝis kun la tirhundoj kaj tiel Karlsson ricevis lupsangon en sian hundaron. La novaj tirhundoj montriĝis fortaj kaj persistemaj, sed ili ankoraŭ havis multe da lupa naturo kaj estis danĝeraj, se oni batis ilin. Foje, kiam ili estis obstinaj kaj Karlsson ilin batis, li hazarde glitfalas. Tiam ĉiuj hundoj sin ĵetis sur lin, kaj apenaŭ li forsaviĝis viva. Li ankoraŭ havis grandajn cikatrojn de iliaj mordoj.

Dum Karlsson rakontis, John aranĝis la plej pompan vesperman-

ĝon, kiun ni vidis dum jaroj. Ĝi finiĝis per konfititaj vinberoj kaj kremo, ĉio amerika.

Sed sekvontmatene ni ĉiaokaze devis forveturi. Ni leviĝis jam je la 5-a horo. John regalis nin per maldikaj krespoj kaj kafo ĉe la matenmanĝo. Antaŭ ol ni forlasis la du honestulojn, ni ricevis ilian promeson, ke ili festos la Paskon ĉe ni en Petropavlovsk. Kaj kun tio ni mansignis adiaŭ unu al la alia, kaj baldaŭ nia sledo nur estis vidata kiel punkto malproksime.

La fina ĉefpenego por atingi al Petropavlovsk

Nun ni intencis ripozi neniun tagon antaŭ Petropavlovsk, se la vetero ne metus baron en la vojo. Restis por ni 400 kilometroj. El tiuj preskaŭ 200 km iris en rekte alsuda direkto kaj plejparte sur tundroj. Poste ni ofte turniĝos orienten kaj transversos la landon.

Pri la vojo ne estas multo por diri. Ni veturis de la mateno ĝis la malfrua vespero, tranoktis ekstere kelkfoje, sed plej ofte en vilaĝoj. Kiam ni venis al la rivero Bolŝaja apud Boŝeredsk, ĝi jam estis plena de truoj en la glacio kaj de liberaj fluejoj. La glacio estis poroza kaj malforta, kaj kun vere malagrablaj sentoj ni direktis la hundojn sur la riveron kaj zigzagis inter la truoj al la alia bordo. La sorto favoris nin, sed poste ni ekaŭdis, ke la tuta rivero malfermiĝis la postan tagon.

Inter la vilaĝoj Apaĉa kaj Naĉika nin trafis plia malagrablaĵo. Tie oni devis transiri la riveron plurfoje. Ĉe la unua loko la glacio ankoraŭ kuŝis, sed ĉe la dua trimetra sulko estis senglacia. Malgranda sed kruta riverdeklivo kondukis malsupren al la akvo. Laŭ la postsignoj la plej ĵusa sledo provis transpasi la sulkon sed returniĝis kaj veturis alian vojon. Mi sciis, ke oni povas eviti la riveron transveturante monton, kiu estas tre malfacile surveturebla. Ni decidis tion lastan, sed kiam ni alvenis al la piedo de la monto kaj komencis la provon suprenigi kun nia peze ŝarĝita sledo, tio montriĝis tiel malfacila, ke ni interkonsentiĝis, ke estas pli facile transigi la sledon trans la akvosulkon ol trans tiun monton. Nome ne estis pli ol

duonmetra profundo, kie forestis la glacio. Ni do veturis returne, demetis botojn kaj ĉtrumpojn, sed hu, kiel estis malvarme iri nudpieda sur la neĝo. Jen la hundoj estis puŝataj en la akvon kaj surgrimpis la glacirandon. Ni ambaŭ devis iri en la akvon kaj jen post multaj malfacilaĵoj sukcesis suprenigi la sledon sur la glacieron. Antaŭ tio ni elprenis el ĝi ĉiujn fotoplakojn kaj aliajn objektojn facile difekteblajn de akvo. Post kiam ni transigis la sledon sur la alian bordon kaj alportis la postlasitajn objektojn, ni ekspiris pro faciligo kaj plejeble rapide investigis al ni la piedojn.

Jen ni, feliĉaj kaj kontentaj, daŭrigis nian vojaĝon, sed post maksimume kvin minutoj nin renkontis malagrabra surprizo: granda, larĝa, torenta rivero, kiu fluis tute senlacacia. Tiu, kiun ni ĵus transiris, estis nur alflua rivero al tiu. Ni nun estis enfermitaj kiel en ratkaptilo kun akvo ĉiudirekte. Ne restis alia rimedo ol returnigi kaj senŝuigi nin denove. Kaj jen ree en la akvon. Sed nun ni ankaŭ devis supreniri la krutan borddeklivon. La tuta afero kun ambaŭ transvadoj postulis por ni pli ol tri horojn, kaj kiam, ni fine surbordigis la sledon, ni preskaŭ frostdifektis la piedojn. La hundoj estis same lacigitaj kiel ni. Kaj nun atendis nin la kruta monto. Ni sukcesis transveturi ĝin per la lastaj fortoj, antaŭ ol falis la mallumo, sed al Naĉika ni ne alvenis, kiel ni antaŭkalkulis. Anstataŭe ĉe la mallumiĝo ni haltis meze en la arbaro. Ni estis tiel lacekonsumitaj, ke ni nur lasis la hundojn starante endormiĝi sur la loko en siaj jungiloj. Mem ni nur alprenis la dormsakojn kaj ekkuŝis ne kuirinte teon nek pecon da manĝaĵo. Mi estis malsekega kiel ĉifono, kaj la koro batis post la tregaj penoj ĉe la riverdeklivo. Mi ne povis dormi dum la tuta nokto.

La sekvan tagon ni alvenis al Naĉika. Ekde Sedanka oni en ĉiuj vilaĝoj edifis nin per la plej sovaĝaj famoj pri la bataloj de blankuloj kaj ruĝuloj. Neniu estas tralasata tra la ruĝa frontlinio al Petro-

pavlovsk, ĉiuj sledoj estas-inspektataj, kaj oni konfiskas armilojn kaj ĉion alian de valoro, oni diris. Tamen ni akceptis ĉiujn ĉi onidirojn kun retenemo, ĉar nun ni iomete konis rusojn kaj kamĉatkanojn. La bolŝevikoj estis afablaj al ni antaŭe kaj certe estos tiaj ankaŭ nun.

Laŭ la plej multaj famoj la ruĝa fronto staras ĉe Naĉika. Sed tie ni nur vidis ruĝan flagon sur la telefona domo. Tie oni asertis, ke ĝi staras 6 verstojn de Petropavlovsk sur la hundvojo. Ne sen scivolo kaj streĉo la lastan tagon ni alproksimiĝis al tiu punkto. Pro sekureco mi faris repakadon en la sledo, tiel ke armiloj kaj lornoj, la plej dezirataj artikloj, kuŝis en la fundo. Kun bona rapideco ni veturis al tiu altaĵeto apud la vojo, kie la gardistoj laŭ sciigo kutimas posteni. Neniu homo estis vidata. Kiam ni estis meze antaŭ la altaĵeto, tamen du armitaj viroj montriĝis kaj alokuligis la lornojn. Mi malrapidigis la kuron iomete por montri, ke mi estas preta halti, kaj rigardis al ili. Ili ne kriis halt', kiel ili faris al ĉiuj antaŭaj sledoj, sed lasis nin pasi tute simple, post kiam ili konstatis, kiuj ni estas.

Poste ni preterveturis la malgrandan vilaĝon Avaĉa kaj sur la Avaĉan Golfon, kiu kuŝis frostiĝinta. Tie ni direktis nin rekte al la urbo, kaj posttagmeze la 7-an de aprilo ni pasis la blankajn postenantojn ĉe la urbolimo de Petropavlovsk kaj plugis antaŭen tra la kota ĉefstrato, alvokate "bonan, revenon" de pluraj konatoj kaj jen flankeniĝis al nia domo ĉe la tria strato, kie ni trovis ĉiujn hejme.

Do la longa vojaĝo tra Kamĉatko estis feliĉe finita, kaj la fidelaj hundoj ricevis bone merititan ripozon tirinte nin 2700 km aŭ alivorte distancon, kiu preskaŭ egalvaloras al la duobla longo de Svedlando.

Verdire estis agrabla sento esti reveninta ankoraŭ en la vivo kaj sen pli gravaj domaĝoj de la vojaĝo ol iom da reŭmatismo, kiun ni ambaŭ ricevis. Sed tion ni volonte pagis por la rezulto de la voja-

ĝo, kiu fariĝis pli bona ol ni kuraĝis esperi. Ni ekkonis la bestaran vivon de la vintro kaj la homojn de la montegoj kaj de la tundroj. Krom tio ni kunigis valorajn kolektojn, kiuj nun troviĝas en Riksmuseet (Ŝtata muzeo) de Stockholm.

Vortklarigoj

(Kun kelkaj eseptoj vortoj troviĝantaj en Plena Vortaro
ne enestas en ĉi tiu listo.)

<i>akjo</i>	lapona kanotsimila glitveturilo.
<i>Alfa kaj Omega</i>	la unua kaj la lasta literoj de la greka alfabeto. do la komenco kaj la fino. (Biblia citaĵo: Apok. 1: 8.)
<i>ampelo</i>	kantbirdo (Ampelis garrulus).
<i>anaso sovaĝa</i>	speco de la anasoj (Anas boschas).
<i>asturo</i>	rabobesto, speco de la akcipitroj (Astur gentilis albidus).
<i>balagano</i>	salmosekigejo.
<i>boaco</i>	lapona nomo de norda cervo (Rangifer).
<i>ĉajnik</i>	tekuirilo.
<i>empetro</i>	sovaĝa arbeto el la familio de Erikacoj kun pinglosimilaj folioj kaj nigraj beroj (Empetrum nigrum).
<i>gado lesivita</i>	speciala sveda kristnaska manĝaĵo, konsistanta el sekiĝita fiŝo, precipe gado, kiun oni moligas en lesivo de sodo kaj kalko kaj poste kuiras.
<i>gracila</i>	havanta maldikan delikatan formon.
<i>gulo</i>	rabobesto, speco de la musteloj (Gulo gulo).
<i>histrioniko</i>	naĝbirdo, speco de la Anseridoj (Histrionicus histrionicus pacificus)
<i>hulo</i>	avelondado mara.
<i>ĥaraŝo</i>	rusa vorto signifanta proksimume "bone".
<i>jukolo</i>	"júkkola" estas sunsekigita salmo.
<i>jurto</i>	"jurta" estas kabano aŭ tendo, en kiu loĝas la kamĉatanoj. Antikvatempe ili estis duone subteraj.
<i>kantcigno</i>	speco de cigno, karakterizita de sia kantsimila krio. (Cygnus musicus).
<i>karadrio</i>	kantbirdo, speco de la Karadriidoj (Charadrius dominicus fulvus).
<i>kekso</i>	plata maldika kuko, ordinare el tritiko.

- kisla* putra fermentinta salmo. Vidu en paĝo 117.
- klangulo* naĝbirdo, speco de la Anseridoj (Bucephala clangula).
- kolimbo* naĝbirdo, speco de la Kolimbidoj (Colymbus).
- kormorano* naĝbirdo (Phalacrocorax pelagicus).
- lutro* rabobesto, speco de la musteloj (Lutra lutra).
- maraglo giganta* speco de la agloj (Haliaetus pelagicus).
- marmoto* mambesto, speco de la Sciuridoj, kiu dormas dum la tuta vintro (Marmota).
- mergo* naĝbirdo (Mergus); *mergeto*: malgranda mergo (Mergus serrator).
- montŝafo* speco de la ŝafoj (Ovis nivicola).
- mustelo* malgranda karnomanĝanta mambesto tre maldikkorpa, kies felo estas tre ŝatata (Mustela). /Plena Vortaro/
- muŝagariko* speco de venena fungo, ruĝa kun blankaj makuloj, (Amanita muscaria).
- niĉevó* rusa vorto sigrtifanta proksimume "ne gravas".
- nikteo blanka* speco de la strigoj (Nyctea nivea).
- nucifrago* speco de la Korvidoj (Nucifraga caryocatactes kamchaticus).
- numenio* kantbirdo, speco de la Karadriidoj (Numenius phaeopus variegatus).
- obturatoro* mekanika sistemo, lokita sur la objektivo aŭ en fotografilo, por malfermi kaj fermi laŭ difinita tempo la eniron de la luma bildo sur la impresman platon. /Verax/
- piceo* speco de la koniferoj, en Esperanto ordinare nomata "abio" (Picea).
- pinikolo* kantbirdo, speco de la Fringilidoj (Pinicola enucleator kamchaticus).
- pino rampa* speco de nana pino (Pinus pumilia).
- poliporo* speco de fungo (Polyporus).
- pologo* interna tendo de jurto.
- psalomŝĉiko* psalmokantisto kaj pastra helpanto.
- puĉ* pezo ekvivalenta al 16 kilogramoj.
- purgo* "purga" estas neĝoŝtormo, Vidu en paĝo 45.
- rodi* mordeti, manĝi per malgrandaj pecetoj; roduloj genro de mambestoj, havanta en ĉiu makzelo tranĉodentojn. /Plena Vortaro/ Komp. rodo.
- rodo* eksterhavena parto de maro nature aŭ arte ŝirmita kontraŭ la ventoj, kie la ŝipoj povas sendanĝere haltadi. /Plena Vortaro/ Komp. rodi!
- saporo* fiŝkaptilo, speco de ligna naso.

- sfagno* speco de griza musko (Sphagnum).
- sito* kantbirdo, speco de la Citidoj (Sitta europæa albifrons).
- sledo* glitveturilo. Vidu la bildojn en paĝoj 61 kaj 169.
- spuro* paŝosignoj de bestoj.
- stilzbirdoj* ordo de birdoj karakterizitaj de longaj kruroj senplumaj kiuj similas stilzojn. /Verax/
- urnio* speco de la strigoj (Surnia ulula).
- ŝamano* pastro-sorĉisto, kiu sin okupas pri "ŝamanismo", t. e. la kredo ke oni povas elvoki spiritojn kaj per ilia helpo esplori kaj ŝanĝi la pason de la okazoj.
- tabano boaca* granda muŝosimila insekto, kiu en sia lasta larvstadio vivas sub la dorshaŭto de brutoj kaj cervoj (Oedemag-na)
- tenaca* havanta densecon, kiu ne facile cedas al disrompo aŭ distranĉo; malfacile maĉebla pro sia ledeca karaktero. (tenacis; tenaz, tenace, tenacions, tough; zäh; seg.)
- vakcinio* sovaĝa arbeto el la familio de Erikacoj kun ruĝaj manĝeblaj beroj (Vaccinium vitis idæa).
- zibelo* rabobesto, speco de la musteloj, kies felo estas tre altvalora (Martes zibellina). Vidu la bildon en paĝo 102.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-076-7